Österreichische
Nationalbibliothek

# Sennacieca pedagogia revuo: dumonata organo de Sennacieca Asocio Tutmonda

Sennacieca Asocio Tutmonda

Paris; FRA 1930-1930

Signatur: 705247-B / 705247-B.1930

Barcode: +Z65010305

Umfang: Bild 1 - 172

**Nutzungsbedingungen**

Die Österreichische Nationalbibliothek macht an diesen Inhalten kein eigenes urheberrechtliches Verwertungsrecht geltend. Sie erklärt sich insofern auch mit einer Nachnutzung dieser Inhalte in der abrufbaren Qualität ausdrücklich einverstanden. Dies gilt auch für die Verwendung dieser Inhalte in Online-Foren, Blogs und in Social-Media-Kanälen wie Facebook, Instagram, Pinterest etc.. Unabhängig davon sind allenfalls bestehende Rechte Dritter an den Inhalten vor jeglicher Nachnutzung vom Verwender individuell zu klären.

Bei einer Nutzung unserer Inhalte ersuchen wir um die Angabe eines Bildnachweises (Titel, Datierung und weitere verfügbare Beschreibungen) und um eine Quellenangabe (Zitierlink aus [Portal] und der Verweis "[Portal]/Österreichische Nationalbibliothek"). Für Postings auf Facebook oder Instagram ersuchen wir um Verlinkung des entsprechenden Accounts der Österreichischen Nationalbibliothek.

ÖSTERREICHISCHE
NATIONALBIBLIOTHEK
705.247-B
ESP. M.

ÖNB
+Z65010305

# NOVA PEDAGOGIO

## Kieva teatro por infanoj

Prave oni konsideras Kievon kiel kulturan centron de Soveta Ukrainio. Pri unu el multnombraj kulturaj institucioj en Kiev ni parolu hodiaŭ—

### Pri infana teatro

Antaŭ kvin jaroj ekestis ĝi. En tiamaj malfacilaj tagoj, grupo da junaj entuziasmuloj, gvidata de iniciatintaj altekvalifikitaj aktoroj K-dino Ireno Dejeva kaj K-do Aleksandro Salamarski, — kreis sociedukan porinfanan institucion, pri kiu nun povas fieri kaj ĝoji la tuta laborulara Kievo.

Forpasis jaroj de malsato kaj laborego — la teatro fariĝis ŝtata kaj aperas en ŝtata buĝeto kaj tiu de loka soveto.

La tuta repertuaro, memkompreneble, prezentas klasproletan komenton. Kondiĉa realismo — jen estas arta fizionomio de la teatro. Tute forigita estas senbaza fantazieco deŝirita de la nuntempa vivo. La teatro estas firme ligita kun la vivo kaj interesoj de nuna tago. Ĝia repertuaro plene akordiĝas kun postuloj de nia soveta konstruado. La fantaziecon teatro donas, kiel tiun de la produktado.

Dum jaroj de sia ekzisto la teatro, firme ligita kun soveta socibazo, edukis porinfanan aktoron kaj ankaŭ sian rigardantaron. La aktoroj lernis plene akomodi sian ludon al infana percepto.

### Tri gradoj

La teatro priservas diversaĝajn infanojn. Do ĝi estas principe dividita je tri gradoj: 1) antaŭlerneja infanaro kaj malsuperaj klasoj de laborlernejo, 2) mezaĝaj kaj iom pliaĝaj infanoj, kaj fine 3) nur pliaĝaj infanoj kaj junularo.

### Dramteatraĵoj

Prezentataj dramteatraĵoj ĉiam konsideras unu el ĉi tiuj grupoj de siaj rigardantoj. Dramteatraĵoj precipe atentas la du lastajn grupojn. La plej junaj vizitantoj havas tie ĉi pupan teatron.

Ni diru komence pri dramteatraĵoj. La repertuaro konsistas el verkoj de klasikaj aŭtoroj, kiuj estas ligitaj kun studplano de lernejoj. Ĝi enhavas klasikulojn — rusajn, ukrainiajn, alilandajn. El rusaj — Fonvizin, Puŝkin, Gogol; ukrainaj — Kotlarevski, Ŝevĉenko, Franko; alilandaj — Ŝiller («Vilhelm Tell»), Servantes («Don-Kiĥoto» prezentita, kiel muzika komedio).



705. 247. B. Esp
1.
1930

Ĉar la teatro ludas por diverslingvaj infanoj, la ludado okazas en diversaj lingvoj — ukraina, rusa, hebrea. Ekzemple por hebreaj infanoj estis prezentita en hebrea lingvo la teatraĵo de hebrea verkisto Fefer «Aventuroj pro butono». La spektaklojn ĉiam akopmanas muziko, kiu okupas gravan rolon dum prezentado.

### La pupa teatro

Krom drama parto, kiu nature okupas ĉefan lokon en vivo de la teatro, por la plej junaj infanoj estas kreita pupa teatro. Ĝi estas tiel nomata «Petruŝka».

La teatro prezentas al infanaro historion de «Petruŝka» antaŭ revolucio kaj nuntempan. La formo estas teatrigita laŭ tipo de teatro de vivaj homoj.

Por ke infanoj ne ricevu impreson, ke dum ludo parolas pupoj, — antaŭ la spektaklo, en formo de ritma parado, aperas ĉiuj aktoroj kaj demonstras sian materialon. Kaj nur post tio ili komencas la spektaklon. Tiele tute estas malaperigata ĉiu sekreteco, vivigo de bestoj, kaj tuta spektaklo trapasas antaŭ la infanaro nur kiel simpla ludado.

Ĝi naskas ĉe infanoj plenan ĝojegon kaj elvokas bonajn sanajn emociojn. La pupa teatro estas transportebla. Ĝia prezentado estas ebla en la plej maloportunaj teknikaj kondiĉoj.

Ordinare la pupa teatro dufoje dum monato aranĝas eksterajn spektaklojn — en lernejoj, infanaj kluboj, infandomoj. Somere la pupa teatro gastrolas tra tuta Ukrainio.

### Kino por infanoj

Kiel unu el branĉoj ĉe la teatro por infanoj funkcias ankaŭ kino por infanoj. Bedaŭrinde nia soveta kino-produktado nur lasta-tempe komencis laboron rilate al porinfanaj filmoj. Do tiu fako de porinfana teatro ekestis kiel eksperimenta laboro.

K-doj serĉas el malnovaj niaj kaj eksterlandaj filmoj taŭgan materialon, kombinas, aliigas... por doni se ne tute taŭgan, tamen tute sanan ideologie bildon. La k-doj elektas ankaŭ muzikan ilustron. La laboro de infana kino havas ankaŭ socian karakteron. Inter la seancoj (kunsidoj) la infanoj demonstras sian lernejan artan laboron.

Kino-fako de l' teatro por infanoj plenumas gravan laboron. Ĝi celas interalie aliigi la guston de l' infanaro, kiu jam estas vundita per diversaj aventuraj filmoj, ekzemple «La ŝarkoj de Nov-Jorko» k. similaj.

### Kunlaboras pedagogoj kaj gepatroj

Kiel eduka institucio, la teatro por infanoj ne povus sukcese funkcii sen ligo kun pedagogoj kaj gepatroj...

Do ĉe la teatro funkcias la konsilantaro el lernejdelegitoj-pedagogoj kaj, krome, — gepatra konsilantaro.

Ambaŭ konsilantaroj esploras kaj diskutas materialon, pritraktas planojn kaj ekzamenas kolektitan materialon rilate al reakcioj de infanoj.

La teatro speciale multe atentas la studon de reakcioj de l'rigardanto. Tiun — ĉi laboron gvidas dum spektaklo la pedagogoj. La tuta laboro de l'teatro, komencante de vestotenejo ĝis la salono estas plenu-



**La teatro por infanoj**

Sceno el la porinfana teatraĵo «Ho». Tipoj de ukrainaj vilaĝaj knaboj

mata sub observo de pedagogoj. Tutan pedagogian parton de l'laboro gvidas konata pedagogo, profesoro Vladimirski.

### La infanaro aktive partoprenas

La junaj rigardantoj estas firme ligitaj kiel kun la produktado de l'teatro, tiel ankaŭ kun organiza laboro. Ili estas ligitaj per t. n. kunvenoj de delegitoj. Tiuj kunvenoj konsistas el reprezentantoj de infanoj el lernajoj, infandomoj, infankluboj kaj de junaj pioniroj.

La delegitaraj kunvenoj havas sekciojn: 1) Prezidantaro, 2) por interne-eduka laboro, 3) por ligo kun lernejo, 4) Kino-sekcio, 5) Redakcia komisiono.

Tiu-ĉi infana organizo ĉe teatro aktive partoprenas la vivon de l' teatro. Ĝi organizas diskutojn, konversaciojn kun reĝisoro kaj aktoroj. Ĝi eldonas sian murgazeton. En la gazeto infanoj skribas pri temoj, ligitaj kun la teatro, ekzemple, pri opinioj de lernantoj, kiujn ili eldiris en lernejo.

### La vizitado

Dum pasinta lernjaro la infanan teatron vizitis 178 mil infanoj. La vizitado okazas en formo de ekskursoj. Enirpago de 5—15 kopekoj. La infanoj de ĉirkaŭantaj Kievon vilaĝoj vizitas la teatron senpage.

### Gvida rolo

Dank'al vasta enhavo de sia laboro la teatro por infanoj fariĝis centro de l'tuta arte-eduka laboro en Kievo.

La teatro havas modelajn rondetojn de l'arteca edukado, havas bibliotekon. Fine ĝi gvidas la artan laboron de lernejaj rondetoj.

Por sia laboro la teatro havas bonan ejon. En teatro ludas maturaj aktoroj — 30 personoj. La teatro havas proprajn pentristojn, komponistojn.

### Antaŭen...

La laboro disvolviĝas. Jam oni parolas pri aliformigo de la teatro en domon de kulturo kaj ripozo de l'infano — en Palacon de l'infana kulturo. Kaj ĝi estas tute natura paŝo — antaŭen...

K-do Egers, SAT-ano 4544. Ukrainio, Kiev, Klovski Spusk 4.

N o t o: Kieva teatro por infanoj dezirus havi ligon kun eksterlandaj samspecaj organizoj. Ĉiuj dezirantaj ricevi pli detalajn informojn pri tiu ĉi teatro kaj starigi konstantan ligon kun ĝi, sendu leterojn al K-do B. Egers. K-doj, kiuj sukcesos enpresigi ĉi tiun artikolon en iu nacia gazeto, estas petataj pri alsendo de du ekzempleroj de enpresinta gazeto al la aŭtoro.

---

# Eksperimento de brita pedagogo

Antaŭ nelonge, anoj de la T. L. L. (Teachers' Labour League—Instruista Laborista Ligo) vizitis la lernejon de Bertrand Russell.

Bertrand Russell, bone konata pro siaj verkoj pri filozofio, scienco kaj politiko, fondis antaŭ du jaroj malgrandan lernejon por elprovi siajn ideojn pri edukado kaj samtempe eduki siajn proprajn infanojn.

Nuntempe la lernejo enhavas 20 infanojn de la 2-a ĝis la 8-a jaroj. Ili loĝas kaj lernas tie. La instruistaro konsistas el 2 Fröbel-instruistinoj, unu instruisto de Universistato kaj gesinjoroj Russell. Ankaŭ estas domestrino, kiu zorgas pri la fizikaj bezonoj de la infanoj.

La lernejo estas en belega loko kaj ĉirkaŭita de sufiĉe granda bieno. Tiu konsistas el arbareto kaj herbejo tute laŭ naturo, krom malgranda parto, kiu estas legomĝardeno. Granda domo entenas la dorm-, manĝ- kaj lern-ĉambrojn kaj estas ankaŭ lernĉambro kaj scienca laborejo en la bieno. Oni do konstatas, ke laŭ materiaj kondiĉoj, oni havas multe pli da oportuno labori kun sukceso tie ol ĉe la popollernejoj de la lando.

Por kompreni la specialajn punktojn de la instruado, oni devas koni la principojn, laŭ kiuj la lernejo estas gvidata. Ili estas klarigitaj en libro de B. Russell «On Education» (pri Edukado), verkita en 1926.

Unu grava punkto estas la forigo de timo. Tiucele de la komenco de la vivo oni devas ĉiel eviti kreadon de timo pri naturaj fenomenoj kaj per montro de kaŭzoj forigi la naturajn timojn. Nur sufiĉe da timo devas resti por malhelpi gravajn akcidentojn. En la eksterdoma lerneja ĉambro estis ŝnur-ŝtuparo, kiu estas sola kondukilo al supra ĉambro. Ĉiu, kiu povas suprenrampi, rajtas eniri la supran ĉambron, kie ili nuntempe kolorigas la murojn laŭplaĉe kaj faras kion ajn ili deziras. La instruistoj devas esti tute trankvilaj pri tiaj provoj de forto, ĉar se ili mem estas timemaj, la tima sento ankaŭ eniras la infanojn.

La infanoj neniam devas timi punon. La rezulto de malbonaj agoj kontraŭ la kunuloj estu la malaprobo de iliaj kunuloj; aŭ la plenkreskuloj povas okaze fari tute same al ili, kiel ili faris al la kunulo. Se tion oni faras tuj post la origina ago, juna infano komprenas kaj ne refaras same, kaj ĝi ne sentas sin malĝuste traktata, kiel okazas post puno, kiu ne havas difinitan rilaton al la unua ago. Ekzemplo pri la efiko de publika opinio estis jena. Unu el la infanoj en malbona humoro ĵetis la vestaĵojn de ĉiuj en sia dorm-ĉambro el la fenestro. Dumnokte pluvis. En la mateno oni envenigis la malsekajn vestaĵojn kaj sekigis. Dume ĉiuj montris malaprobon al la malgranda «krimulo». La plenkreskuloj ne bezonis riproĉi lin.

Al la naturaj instinktoj por konstruado oni devas doni plenan oportunon por evolui, do en la lernejo oni faras lignajn seĝojn, bakas kukojn, pentras la murojn de la scienca laborejo, en la lerneja ĉambro k. t. p.

Per konstrua laboro oni lernas esti zorgema pri la propraĵoj de aliaj, ĉar oni komprenas, ke laboro estis necesa por krei, do estas malbone detrui.

Ĉiu, kiu deziras, havas propran pecon da tero por ĝardeno kaj agas kiel li deziras en ĝi. Se la fi-kreskaĵoj kreskas, neniu ordonas lin pli bone kulturi ĝin. La sperto montros al li, ke oni ne povas havi bonan ĝardenon, se oni ne deziras labori.

Kiam la vetero taŭgas, ĉiuj infanoj ludas sen vestaĵoj en la bieno. Tiele oni komencas la seksan edukadon. Ĉiujn demandojn pri la korpo kaj funkcioj oni devas klarigi sufiĉe klare antaŭ la 10-a jaro, por ke la infanoj komprenu la fundamentojn de reprodukto. Se ili ne sufiĉe demandas, ili povas lerni pere de bestoj, kiujn ili havas en la bieno. La ĝusta sintenado al bestoj estas ankaŭ instruata pere de tiuj bestoj.

La valoro por la infano de vivado inter siaj samaĝuloj kaj iom pli aĝaj kunuloj estas, laŭ Bertrand Russell, tre granda kaj por junaj infanoj pli grava ol la kontakto kun la faktoj de la ordinara vivo, kiun donas la hejma vivo de la infanoj en la taglernejoj.

La intelekta laboro ne estas tre malsama al tio en multaj aliaj lernejoj. Unu diferenco estas, ke la franca kaj germana lingvoj estas instruataj tre frue kaj oni instruas tre malmulte da aritmetiko kompare kun la kvanto en la popollernejoj.

Oni informis nin, ke la metodoj bone sukcesis je la infanoj, kiuj venis, kiam ili nur estis dujaraj, sed tiuj, kiuj venis, kiam ili jam estis 6-jaraj, ne tiel bone respondis al la metodoj.

Al vizitanto ĉiuj infanoj ŝajnis multe pli liberaj en la sinteno ol en ordinara lernejo. Ili certe havas la oportunon iĝi tre kapablaj kaj originalaj personoj, sed ĉu estas eble eduki ĉiujn infanojn sammaniere? kio okazos al tiuj infanoj, kiam ili iros en la hodiaŭan mondon?

K-dino C. Osmond

(95 Fowlers Walk, Ealing № 5, London, Anglio).

# SUR EDUKISTA *** *** BATALFRONTO

## SOCIALISMA KONKURADO

### 1. Laboristoj konkuradas

Al ĉiuj malfaciloj de socialisma konstruado kaj al ĉiuj baroj prezentitaj de eksterlandaj kapitalistoj, la laboristaj amasoj de Sovetio respondas per nova ondo de labora entuziasmo, per kreskigo de industria iniciativo, per allogo de novaj laboristvilaĝanaj fortoj en kre-konstruan laboron. Kiel kaj pri kio konkuradas gelaboristoj en diversspecaj fabrikoj?

Ĉiam unu fabriko kontraktas kun alia pri plialtigo de produktado kaj pri malpligrandigo de memkosto de produkto per la plej raciaj metodoj de laboro, per maŝinigado de industrio, racia sortimento de materialo; pri batalo kontraŭ ŝajnigado, pri plena labortago ktp.

### 2. Lernejlaboristoj konkuradas

Edukistoj ne postrestas je aliaj laboristaj taĉmentoj. Kvinjara plano de popola mastrumo konfirmita de 16-a partia kongreso kaj de 5-a Kongreso de Sovetoj, estas aprobita kaj plene akceptita de geinstruistaro. La klerigistoj tre forte resonis por alvoko de komunista partio kaj soveta registaro. Larĝa ondo de socialisma konkurado entiris ĉiuspecajn organizojn kaj niajn geinstruistajn vicojn.

Kiel konkuradas edukistoj? Plejofte laŭ du gravaj punktoj: unuflanke, oni intencas solvi instituciajn lernejajn taskojn:

a) pligrandigo de sukcespovo de gelernantoj en sciencoj per uzado de pli raciaj metodoj;

b) batalo kontraŭ postrestado en la sama klaso;

c) plilongigo de la lerneja jaro ktp.;

aliflanke, geinstruistoj devas plene partopreni en soci-politika vivo:

a) batalo kontraŭ religiaj kutimoj, festoj,

b) batalo kontraŭ analfabeteco inter plenaĝuloj.

### 3. «FZS» konkuradas

(FZS—fabrik-manufakturaj lernejoj)

En oktobro 1929 en Kievo okazis granda kontrakto inter edukistoj de FZS el Leningrado, Moskvo, Kievo, Niĵni-Novgorod, Krjukov apud Dnepro, Konotop, ktp. pri socialisma konkurado, kie ĉefaj starigitaj punktoj estas jenaj:

1) Plialtigo de lerneja produktado; 2) Proletklasa sortimento (adapto) de lernantoj; 3) Infana edukado en komunisma direkto, kontraŭreligia,

internacia; 4) FZS plej proksime alproksimiĝu al fabriko aŭ kaj manufakturo kaj estu parto de tiu industrio, ktp.

Kunligo de 2 kvaraj (paralelaj) klasoj de FZS kun gelaboristaro forĝista en vagona metiejo ĉi-jare komenciĝis laŭ iniciativo de forĝistoj.

Unu semajnon antaŭ Oktobra revolucia festo, laborista delegitaro interkonsentis kun gelernantoj, ke ili nepre vizitu la metiejojn la 6-an de novembro. Dum 7 tagoj, laŭ ellaborita plano, infanoj preparis:

1) salutparolon,

2) 4 grandajn afiŝojn kun devizoj: «Ni bezonas nafton, farbon, panon—ĉiujn fortojn por plifortigo de nia industrio», «ĉiuj pruntedonu al la 3-a ŝtata industria prunto!». «Ni donu rebaton al la ĉiniaj blankbanditoj! Vivu ruĝarmeo!». «For analfabetecon!».

3) 8 versaĵojn individuajn kaj 5 versaĵojn kolektivajn (deklamo).

4) 6 ĥorkantojn.

La kvinan de novembro vizitis la lernejon iu delegito de la laborista forĝista grupo, kiu faris raporton al la infanoj pri memorinda bataltempo (1917—1920), pri taskoj de nia packonstruado ktp.

La 6-an de novembro je la 10 kaj 1/2 horo matene, ni ekmarŝis vagonan metiejon kaj poste al laborloko de forĝista grupo. La reprezentanto de la grupo nin tre afable akceptis kaj detale montris al ni laboron, vapormartelegon, forĝfornojn.

Je la 11-a fajfilego permesis al laboristaro matenmanĝi en la Fabrika manĝejo kaj je la 11-a kaj 20 minutoj, reprezentanto de la forĝista grupo malfermis solenan kunvenon. Unu 11-jara lernantino raportis, varme salutis la gelaboristojn kaj prezentis al ili la afiŝojn. «Internacio», kantoj kaj deklamado forte impresis la laboristojn. La kolektiva deklamado de 25 personoj faris la plej grandan impreson. Dum 10 minutoj laboristo dankis responde la infanojn pro ilia laboro kaj prezentita ĝojego! «Nia FZS iras veran vojon; al socialismo niaj infanoj proksimiĝas, detruante malnovon kaj konstruante novan lernejan vivon», diris la laboristo. La fajfilego, vokinta la laboristojn al la laboro, interrompis lian parolon. Sed la infanoj invitis la laboristojn al lerneja amuzvespero.

La 13-an de novembro okazis kunveno de la forĝistoj, en kiu ili decidis patroni infanojn (akcepti ilin kiel zorgatojn), zorgi pri ili kaj kontrakti kun ili en socialisma konkurado.

La 16-an de novembro, gelaborista komisiono konsistanta el 3 personoj subskribis kontrakton de socialisma konkurado kun reprezentanto de gelernantoj. Jen laŭ kiuj punktoj ni konkuradas:

| Laboristoj postulas: | Gelernantoj postulas: |
|---|---|
| 1. Gelernantoj devas plialtigi sukcespovon ĝis 100% kaj tute likvidi postrestadon. | 1. Forĝistoj devas plenumi industriajn taskojn je 100%, ne fari laborŝajnigon, ne drinki kaj helpi al la malriĉaj gelernantoj de niaj grupoj. |
| 2. Plibonigu kaj zorgu pri via sanitar-higiena stato. | 2. Forĝistoj devas konstante interrilati, interligiĝi kun ni, ĉeestante dum niaj lecionoj. |

3. Plenumu ĉiutage viajn taskojn kaj bone kondutu ekster la lernejo kaj en la lernejo.
4. Ĉiuj infanoj devas esti pioniroj.

5. Ni priservu nian forĝistan laborgrupon je kultureco; ni plibonigu nian ruĝanguleton, farante diagramojn, afiŝojn; ni vizitu vin pli ofte kaj ni prezentu koncertojn, deklamon, ktp.

3. Patroj helpu al lernejo, instalante ĝin kaj preparante necesajn objektojn, ilojn por nia metiejo.
4. Forĝistoj devas esti komunistoj, ili devas permesi al siaj infanoj esti pioniroj kaj kontrakti pri tio kun aliaj laboristaj grupoj.
5. Forĝistoj tute ne iru preĝejon kaj ne festu religiajn festojn en la hejmo. Vi pliampleksigu nian bibliotekon!

Por kontroli la plenumon de la kontrakto kaj prijuĝi la premion al la pli bonaj plenumantoj estas elektita arbitracia komisiono. Pri rezulto de tiu ĉi konkurado mi priskribos, kiam lernojaro finiĝos.

G. Babejkin — Krjukov ap. Dnepro.

Postnoto: Mi treege petas vin ĉiujn, ke vi priskribu metodojn, laŭ kiuj oni povas plialtigi elcenton da sukcespovo kaj plibonigi la infanan konduton. Skribu vian sperton kaj pridiskutu jenan demandon: ĉu vere povas laboristoj—gepatroj helpi en edukado de infanaro kaj plialtigi elcenton de sukcespovo? Ĉu vi praktikas tion? Nepre skribu. K-do G. Babejkin (7-jara fabrik-manufaktura lernejo, Krjukov ap. Dn.).

---

**Sovetiaj esperantistaj edukistoj!**

**Partoprenu la socialisman konkuron de S. P. R. — varbu nun jare la unuan milon da abonantoj al S. P. R. en Sovetio!**

## MISINSTRUO DE HISTORIO EN USONAJ LERNEJOJ

La pasinta mondmilito, por la liberigo de l'mondo, donis al la kapitalistoj en Usono oportunan okazon por centrigi kaj malliberigi ties institutojn. Ili celis al «laŭnacia interpreto de historio» por laŭdi ties heroojn, simile al la Treitschke kaj Nietzsche'a vidpunkto dum Imperia Germanio. Tiuj superpatriotoj kalumniis, ke S-ro Andreo Carnegie, la milionulo, ekde 1896 celis komploton por neniigi Brition kun Usono. Ili pere de patriotaj organizoj en Usono agitis, tiel ke la estraro en Novjorko (New-York City), elektis komitaton por esplori la historilibrojn ĉe la lernejoj, en oktobro 1920. Tiu raportis en januaro 1922, ke la «libroj historiaj ne estis verkitaj pro suspektinda propagandocelo: tamen en ili troviĝis multaj asertoj, kiuj mallaŭdis kontraŭ la naciaj herooj kaj estroj, ke ili diskutis pri disputeblaj temoj, ke ili enhavis ofendajn bildojn». Aliaj urboj faris same kaj premis al ties Federaj Registaroj leĝigi pri ĉi tiu temo. Tiel okazis, ke la federaj ŝtatoj Wisconsin, Oregon kaj aliaj leĝigis, en 1923, la unua, ke «neniu historia aŭ alia lernolibro estu uzata en iu ajn lernejo, kiu falsas la faktojn pri la milito pro sendependiĝo, la militon de 1812, malfamigas naciajn federajn ŝtatojn, misreprezentas la idealojn kaj celojn, por kiuj ili batalis kaj sinoferis, kaj kiuj enhavas propagandon favoran al iu ajn eksterlanda registaro».

En Montana, la lernejaj aŭtoritatoj en decembro 1923 ne reelektis instruistojn ĉe la jarfino pro iuj «diraĵoj», kvankam ili neniel subtenis tiujn akuzojn. Simile okazis en multaj aliaj urboj kaj federaj ŝtatoj. En Rhode Island, dum 1919, la estraro ĉe la Publikaj lernejoj cirkuligis demandaron jenan:

«Laŭ kiu grado la instruistoj sub via observado, ĉe aŭ ekster la instruĉambro: a) aktive propagandis por Germanio, b) aktive propagandis kontraŭ Usono, c) estis mallojalaj en vorto, ago aŭ maniero al nacio aŭ federa ŝtato, d) estis malrespektaj al leĝo kaj publika aŭtoritato, e) estis pasivaj aŭ indiferentaj al patriotismo, f) estis cinikaj pri demokratio aŭ pri historio, aŭ pri usona socia agado, g) instruas, ke demokratio estas kruda kaj neefika».

Nun pri la kritikoj kontraŭ la historio-libroj. Unu havas nur frazon pri la batalo ĉe Bunker Hill, sed 200 vortojn pri Quebec (Kvebek—en Kanado): la kritikuloj laŭŝajne ne scias, ke Kvebek signifas la falon de l'franca Imperio en Nord-Ameriko kaj la finan britigon de l'plejparto de tiu kontinento, dum Bunker Hill estas signifa, ĉar la Revolucia milicio povis brave batali kontraŭ la Brita Regula Armeo. Ne necesas diri, ke la patriotaj organizoj kun ties Irlandanidoj nature, forte interesiĝas pri ĉi tiu Revolucio.

Alia enhavas la frazon, ke «la Boston teo-atakantoj estis amasaĉo». Kion dirus tiuj samaj kritikuloj, se simila ribelo okazus hodiaŭ?

Nun ĉi tiuj patriotoj ne rigardas la reĝon Georgo III de Britio kiel tiranon, kies sola vivcelo estis subpremi la amerikan kolonion, sed kiel maljunan Germanon, kiu havis strangajn manierojn kaj estis la malamiko de la libero de ĉiuj homoj en ĉiuj lokoj. Nova portreto de ĉi tiu Georgo III anstataŭis la antaŭan.

La patriotaj societoj organiziĝis kune por publikigi novan historion, en kiu oni ne lernos pri la estinto, nek komprenos la estanton, sed enradikiĝos racia kaj nacia propagando kaj patriotismo aŭ idealoj laŭ koncepto de iu tendencgrupo de l'nacio.

Tamen la apartaj federaj ŝtatoj ne restis kontentaj. Unu post la alia, ili eldonis apartajn historilibrojn kun celo laŭdi la apartajn federajn heroojn (kaj mallaŭdi ties kontraŭulojn de l'aliaj federoj).

La sudaj federaj ŝtatoj neniel povas uzi la librojn de l'Nordaj Federaj ŝtatoj.

Unu el Nordaj libroj klarigas jenon pri «Nigrula Sklaveco»: «Pro kio oni envenigis la sklavon al ĉi tiu lando? kial estis li devige forprenita de l'varmetaj valoj inter la hejmlandaj montoj? ĉu por partopreni en la scio de l'Sanktaj Libroj (la Biblio)?—Ne, oni forprenis lian liberon, plej karan al li, lia menso ne kulturiĝis nek pliboniĝis per Scienco. Oni lin malbenis pro la vizaĝkoloro kaj lin metis en la rangojn de l'bestoj pro lia malsaĝeco» ktp.

Kontraŭe iu el Sudaj libroj klarigas pri la sama temo: «La protesto kontraŭ sklaveco devigis la sudulojn studi ĉi tiun temon kaj ili konkludis, ke la malbono de ĉi tiu laborsistemo estis malpli ol sub alia sistemo. Cent miloj da afrikaj sovaĝuloj estis kristanigitaj sub ties influo. La plej bonkoraj rilatoj ekzistis inter sklavoj kaj ties posedantoj. La negroj ne opiniis la sklavecon maljusta, ĉar ili sentis sin pli bone ol iu alia labora klaso en la mondo».

La libroeldonaj firmoj ne dormas dum ĉi tiu agado. Tiuj en la Nordo eldonis historilibrojn, kiuj kontentigas la postulojn por kripligita historio de l'Nordo, sed la samaj firmoj ankaŭ prezentas la samajn temojn je tute kontraŭa vidpunkto por kontentigi la Sudon.

En la Nordaj libroj ni legas pri «ribelo» kaj «civil-milito», sed en la sudaj libroj pri «militoj inter la federaj ŝtatoj» kaj «militoj por disiĝo».

En 1926 aperis 2 volumoj de l'«Amerikan Legion History»; ĝi nomiĝas «The Story of our American People». Ties gvidilo estis, ke ĝi devas 1. fierigi la junulojn per patriotismo, 2. enplanti karakteron, 3. esprimi sinceran spiritan vojon al kredo je dio; 4 esprimi la veron tiel, ke neniu junulo poste ĝin malfidos.

Estas dube, ĉu iam ajn antaŭe okazis tia grandskala peno por prostitui la plej altvaloran institucion, la publikan sistemon lernejan per tia speco de propagando patriota.

Tamen la instruistoj ĉe siaj kunvenoj protestis ĉie per rezolucioj. Jen estas tipa rezolucio de l'High School Teachers Association: «ke la instruistoj mem devus esti juĝistoj pri la enhavo de histori-libroj, kies celo estu vera bildo de l'estinto, pensante pri la aĝo de la lernanto, por kiu la libro taŭgu, tiel ke la vero ne estu distordita por iu ajn celo. Ambaŭ flankoj de disputebla temo estu traktataj, prezentataj je akademia vidpunkto, por ke la studanto estu dresita en liberpensa tolerado».

I. Flower, SAT-ano 3.398

# TEPS TUTMONDA ESPERANTA PEDAGOGIA SERVO

Tiu ĉi ribriko estas gvidata de K-do M. BOUBOU, 96, rue Saint-Marceau, Orléans (Loiret), Francio

## EL AŬSTRIO

### Kursoj por plikvalifikado de la Vienaj Instruistoj

La plenumo de la lernejreformo en Aŭstrio, precipe en Vieno postulis novan profundan studadon de la geinstruistaro. Baldaŭ post la revolucio en 1918 la instruistoj fondis laborunuiĝojn, en kiuj ili studis la problemojn de modernaj metodoj instruaj kaj edukaj. La faritaj en ili laboroj, la kvanto kaj kvalito estas netaksebIaj. La komunumo Vieno fondis en la jaro 1923 pedagogian instituton por meti la plikvalifikan laboron sur pli firman bazon. Ĝi oficigis scienculojn kaj praktikulojn kiel docentojn al la instituto kaj invitis la instruistaron al la vizitado. Multnombre la geinstruistaro sekvis la vokon kaj jenaj ciferoj pruvas la viglecon de la vizitado.

| Stud-duonjaro | gedocentoj | nombro de aŭskultantoj: viroj | virinoj | sume |
|---|---|---|---|---|
| Somero 1923 | 43 | 477 | 923 | 1.400 |
| vintro 1923/24 | 49 | 611 | 1.279 | 1.850 |
| somero 1924 | 58 | 452 | 993 | 1.445 |
| vintro 1924/25 | 68 | 825 | 1.895 | 2.720 |
| somero 1925 | 72 | 549 | 1.279 | 1.828 |
| vintro 1925/26 | 71 | 1.091 | 2.144 | 3.235 |
| somero 1926 | 71 | 928 | 1.523 | 2.451 |
| vintro 1926/27 | 93 | 1.127 | 2.135 | 3.262 |
| somero 1927 | 85 | 856 | 1.465 | 2.321 |
| vintro 1927/28 | 88 | 1.298 | 2.133 | 3.431 |
| somero 1928 | 83 | 824 | 1.439 | 2.263 |

Se oni pripensas, ke la Viena geinstruistaro nombras 5.704 p., kaj ke la vizito estas tute libervola, oni certe ĝuste taksos la supre menciitajn ciferojn.

Dum la vintra duonjaro 1927—28 la programo tenis jenajn kursojn: 8 pri filozofio kaj pedagogio, 6 pri specialaj pedagogioj por malnormalaj infanoj, 19 pri didaktiko de la instruo (popollerneja kaj burĝlerneja), 19 por manlabor-kaj lernejlaboreja instruo, 10 por gimnastika edukado, 13 kaj 3 infankantoklasoj por muzika edukado, 53 servis al la pliprofundiĝo en la faksciencoj, 2 kaj unu seminario por edukado de la etinfanoj, 2 por dommastruma praktiko por instruistinoj, 4 laborgrupoj okupiĝis pri lernejpraktikaj studoj. La anstataŭigo de la burĝlernejo per la ĉeflernejo necesigis apartan kursaron pri la temo: teorio kaj praktiko de la ĉeflernejo.

29 lekcioj servis la aparataron de la mikrobiologia instituto por la instruistaro.

La psikologia instituto sub gvidado de profesoro d-ro Karl Brihler laboris pri diversaj psikologiaj temoj rilatantaj la infanaron kaj junularon. La resumo pri ili aperos parte en aparta volumo de la revuo: Zeitschrift für Psychologie (vol. 107), parte en la revuoj: «Archiv für die gesamte Pädagogik», «Zeitschrift für angewandte Psychologie» kaj en la «Wiener Arbeiten zur Pädagogischen Psychologie».

La pedagogia instituto estis vizitata kaj studata de multaj eksterlandaj eminentuloj, kulturpolitikistoj kaj pedagogoj, kaj de multaj eksterlandaj studgrupoj de instruistoj.

Venis dum tiu ĉi jaro 214 personoj, el Ĉeĥoslovakio 130, el Svisio 109, el Ameriko 79, el Polio 48, el Jugoslavio 39, el Francio 17, el Estonio 2, el Ĉinio, Japanio, Hispanio, Palestino, Nederlanda Indio, Turkestanio kaj Grekio po unu, el Finnlando 12.

La pedagogia Centra biblioteko, kiu estas fondita de la Komunumo-Vieno, pligrandiĝis dum pasinta jaro je 27.000 volumoj kaj nun nombras 127.000 volumojn. En la legoĉambrego estas 405 diversaj gazetoj kaj revuoj je dispono.

Dum la pasinta jaro 21.924 geinstruistoj prunteprenis 42.206 volumojn kaj 5.365 personoj vizitis la legoĉambregon.

Raportinto K.do Jeitler

## Arbarlernejo en Alland

En la arbaroriĉa regiono de Alland (Malsupra Aŭstrio) ekzistas arbarlernejo, fondita de la «Societo por fondo de arbarlernejoj en Aŭstrio». Tien sendataj estas infanoj skrofolaj kaj tuberkulozaj. En la jaro 1927—1928 estis tie 120 lernantoj. La arbarlernejo havas dormejojn, klasejojn, malsanulĉambrojn, manĝoĉambrojn, restadejojn dumtagajn, laborejojn kaj kuŝejojn. Dum bela vetero, la instruo okazas en libera aero, meze en arbaro. Ĝi komenciĝas je la oka kaj daŭras ĝis la 12-a kaj 40 minutoj. La duonhoraj lecionoj alternas kun 20-minutaj paŭzoj, dum kiuj lastaj la infanoj ludas, kantas, dancas, skribas leterojn k. c. De la 14-a post la tagmanĝo ĝis la posttagmeza manĝo, ĉiuj infanoj ĝuas kuŝadon en la kuŝejo. Post tio, komenciĝas la posttagmeza okupado: dum bela vetero gimnastiko kaj ludado, dum malbela vetero laboroj en la laborejo (desegnado, skulptado, plektado, laborado kun kartono kaj ligno). La sukcesoj estas bonegaj.

La 3 ĝis 4 deĵorantaj instruistoj estas oficigitaj kaj salajritaj de la komunumo Wien, kiu ankaŭ zorgas pri la tuta meblaro, instruilaro, lernilaro kaj legaĵoj.

La Wien-a infanofico tien sendas la infanojn je kostoj de komunumo Wien.

## Specialaj lernejoj en Wien

Krom la popol- kaj ĉeflernejoj por normalaj infanoj ekzistas en Wien specialaj lernejoj por infanoj, kiuj en la normalaj ne povas progresi. Por spirite malbonkapablaj infanoj ekzistas 10 t. n. helplernejoj kun 122 klasoj, kiuj estas vizitataj de 1067 knaboj kaj 700 knabinoj.

En ili instruas 68 geinstruistoj kun speciala diplomo, 68 geinstruistoj ne havantaj tian apartan diplomon, unu Fräbelinstruistino kaj 20 instruistinoj por virinaj manlaboroj.

Por surdo-mutuloj ekzistas instituto en la 19a distrikto kun popol- kaj ĉeflernejaj klasoj. Ĝin vizitis 48 knaboj kaj 39 knabinoj. Por malbonaŭdaj infanoj ekzistas du-klasaj lernejoj, kiuj estas vizitataj de 58 knaboj kaj 74 knabinoj.

Unu lernejo ekzistas por tre miopaj kaj unu por kripligitaj infanoj.

Por infanoj kun parol- kaj prononcdifektoj ekzistas 13 apartaj klasoj kaj 25 kursoj. En ili deĵoras 38 instruistoj, el ili 28 havas specialan diplomon por instruo tia, kaj unu estro.

## Lernejkuirejoj en Wien

Por la 14 jaraj knabinoj ekzistas en Wien 15 lernejkuirejoj, po unu ankaŭ por la surdomutulinoj kaj por la malbonkapablaj knabinoj.

Sume ekzistas 32 kuirkursoj, vizititaj de 661 lernantinoj. La instalado de unu instrukuirejo kostas proksimume 16.000 ŝilingojn aŭstriajn.

El la raporto de la Wien-a Stadt-Schulrat (urba lernejkonsilantaro) tradukis:
Jeitler, SAT-ano.

**Leganto! Sendu vian opinion pri tiu ĉi unua kajero! Kritiku, konsilu... sed kunlaboru kaj ankaŭ abonu.**

## EL BRITIO

### Balotoj, nova socialista registaro kaj geinstruistaro

«The Schoolmaster» (La Lernejestro) rakontas strangegan balotan klopodon ĉe lernejo. Kelkajn tagojn antaŭ la baloto, la popollernejoj de unu el balotaj teritorioj el distrikto de Birmingham ricevis pakaĵojn da kartoj disdonendaj al la infanoj. Sur unu flanko estis la foto de la konservativa kandidato, Sir Burman, kaj sur la alia la jena teksto: «Se via patro kaj via patrino voĉdonos por S-ro Burman, tio signifos, ke vi ne plu bezonos resti en la lernejo tempon pli longan ol vi volas. La socialistoj volas gardi vin en lernejo almenaŭ unu jaron pli».

Oni komprenas la miron kaj indignon de la geinstruistaro de Birmingham ne nur pro tia propaganda senĝeneco, sed ankaŭ pro la demagogeco de tia alvoko bazanta sin sur mallaboremo neprudenta de l'infanoj por influi voĉdonon de la gepatroj.

La nova ministro publik-instrua estas Sir Charles Trevelyan, kiu jam estis publikinstrua ministro en la unua ministraro de Mac Donald kaj apartenas al familio de universitatanoj. En la nova Parlamento (ĉambro de Komunumoj) estas 30 edukistoj, el kiuj 25 estas socialistoj.

Henry Hauck

(Laŭ franca gazeto «Vivo kaj Lernejo»)

Tradukis: SAT-ano 518

## EL FRANCIO

### Ministraj paroloj

En Francio, dekiam estas publikinstruistaj ministroj, ili kutimas fari belajn predikajn paroladojn al la geinstruistoj. En tiu rilato la postmilitaj publik-instruaj ministroj estas predikemaj unuj ol la aliaj.

Ordinare la publik-instruaj ministroj, okaze de longaj, politikaj paroladoj en provinco (dum iaj inaŭguroj de lernejoj, de monumentoj patriotaj pri viktimoj de lasta milito aŭ simple fine ĉe iaj politikaj festenoj) nepre laŭdas la geinstruistraon pro ĝia sindono al infanaro, ŝtata lernejo kaj obeemo al la nuna politika reĝimo, sed li ankaŭ nepre per hipokritaj paroloj mallaŭdas kaj minacas la avangardajn edukistojn, kiuj kuraĝas partopreni la socian movadon.

El tiuj ministroj, depost la mondmilito, precipe du estas famaj pro siaj paroladoj aŭ cirkuleroj kontraŭ avangardaj instruistoj, edukistoj: reakciulo Leon Berard en epoko de regado de Naciista Bloko (1919—1924) kaj radikal-socialisto De Monzie dum regado de t. n. Maldekstra Bloko (1924—1928). Sed neniu ĝis nun estis tiel insultema, kiel demokrato De Monzie kontraŭ avangardaj geinstruistoj, kiujn li en cirkulero nomis «maldeculoj», «mensoguloj», «cinikuloj»...

Ni havis kiel instru-ministron ian Pierre Maraud (Petro Maro') tute ne konatan en universitataj aŭ politikaj medioj, kiu ankaŭ volis ĵeti ŝtonon al la instruistoi. La 11-an de aŭgusto, dum inaŭguro de lernejo en urbo Tulle (Tül, sed ne Tul), li deklaris:

«La instruisto ne devas esti partiulo kaj li ne devas provi esploradi, per propropiniaj eldiroj, la evoluadon sekvotan de nia socio... Ni konfidis al li la edukadon de niaj infanoj, li devas fari el ili liberajn homojn, progresemajn civitanojn respektemajn al ordo kaj leĝo. La vivo de popolo kaj ĝia evoluado ne bezonas politikajn agitadojn kaj skuadon...».

Do, laŭ tiu ministro la edukisto estas ia sociano kun reduktitaj sociaj rajtoj; li devas formi obeemajn fabrikasklavojn, kaj mem devas esti senopinia kaj obeema.

Ne malutilas diri, ke la ministroj tiel paroladas kontraŭ edukistoj, ĉiam post klara manifesto de instruistoj kontraŭ registaro ĉu en politika, ĉu en salajra demando. La parolado de Maro estas vere registara averto al instruistaro, kiu per siaj kongresoj en Paris (reformista) kaj en Beasancon (revolucia) protestis kontraŭ la faŝista premado dum la manifestacia tago de la 1-a de aŭgusto.

Kelkaj pedagogiaj gazetoj aprobas tiajn parolojn, ekzemple: la «ĵurnalo de instruistinoj» — kiu eĉ laŭdas la ministron pro lia deklaro.

SAT-ano 518

## Nova Gazeto Instruista

La Nacia Sindikato Instruista (80.000 membroj) ekeldonis propran semajnan gazeton kun titolo «Liberiga Lernejo» (L'Ecole Liberatrice). Jam aperis kelkaj numeroj. Ĝi certe estas nun la plej multekzemplere eldonata franca instruista revuo, ĉar ĉiu membro ricevas la gazeton senpage.

La titolo de la gazeto estas imitaĵo de la revuo semajna de la federacio de la ruĝinstruistoj «Emancipa Lernejo» (l'Ecole Emancipée»), kiu aperas de 20 jaroj.

Por juĝi la tendencon de la nova gazeto de la Nacia Sindikato, sufiĉas citi ke la 2-a numero laŭdas jenan parolon de Briand ĉe la Ligo de Nacioj: «La tagon, kiam oni instruos al la infanoj pacamon, tion, kio unuigas la popolojn prefere ol tion, kio ilin dividas, tiun tagon regos paco inter la nacioj».

## Lerneja Radio

Ĝis nun nur unu franca radiostacio estis provinta aŭdigi lernejan radioprogramon; ĝi estis stacio Bordeaux-Lafayette. Nacia Instruista Sindikato ĵus ricevis ĉe stacio Eiffel-Turo, la plej potenca franca stacio, la rajton organizi ĉiusabate, dum la lasta lerneja horo (de 15h 35 ĝis 16h 15) 40-minutan lernejan programon, kiu konsistas el:

1. Fabloj, rakontoj, deklamaĵoj de artistoj el la plej famaj teatroj parizaj,
2. Muzikaĵo (klasika)—fragmentoj de operoj aŭ melodioj de famaj muzikistoj—bedaŭrinde ne sufiĉe populara kaj superanta la infanan kapablon.
3. Lekcio pri historio aŭ geografio aŭ scienco laŭ rakonta formo. Unua lekcio temis pri la «prahomo en Francio», la dua pri «La Glacirompa ŝipo Krasin helpe al aerŝipo Italia» — Tiuj lekcioj cetere apartenas al la semajna lecionaro detaligita de la revuo de Nacia Sindikato «Liberiga Lernejo» kaj povas esti samtempe bilde ilustrataj per projekciado de senmovaj bildoj — la tiel nomataj fotoskopiaj filmoj (bildoserioj).

SAT-ano 518

# EL GERMANIO

## La Leipzig'a Biblioteko

Germanio estas la lando de la Bibliotekoj: nun oni kalkulas 323 da ili kun sume 37 milionoj da volumoj. Kaj tiuj ciferoj koncernas nur la binditajn volumojn!

La plej moderna biblioteko estas en Leipzig. Ĝi enhavas nun 524.000 volumojn kaj povos enhavi 10 milionojn, kiam ĝi estos finkonstruita. Ĝia fasado longas 120 metrojn kaj altas 22 metrojn. Estas 8 etaĝoj. Pli ol 100 ĉambroj koncernas la specialan servon de la libraro.

Pureco kaj mekanikaj perfektigoj forte impresas la vizitanton. Ĉie estas tualetaj lavejoj, ĉar la libro estas nekontraŭdireble la transportilo de patogenaj (malsanigaj) mikroboj. Ĉar oni ne povas desinfekti ĉiujn foliojn de la libroj, oni rekomendas lavi kiel eble plej ofte la manojn, kiuj tuŝis ilin.

La volumoj estas ordigataj laŭ formato kaj diko sur grandegaj metalaj bretoj paralelaj, kies adicia longo atingas preskaŭ 3 kilometrojn.

La katologo estis kompilita laŭ tre simpla kaj praktika metodo. Slipoj (unu por ĉiu volumo) estas ordigataj en grandega ŝranko — laŭ alfabetordo de l'aŭtornomoj. Kaj en alia ŝranko, la slipoj estas ordigitaj laŭ alfabetordo de la titoloj (oni konsideris por la ordigo la unuan substantivon de l'titolo). La slipoj mencias la formaton de la libro, la numeron de la breto-vico, kie ĝi staras, kaj la ordonumeron.

Ĉiu volumo estas petata de leganto per flava karteto enhavanta tri partojn disigeblajn: sur unu parto estas skribataj la nomo kun adreso de la petanto, la titolo kaj

aŭtoro de la verko. La karteto estas donata al giĉeto (oficeja fenestreto) kaj tuj sendata per malgrandega (miniatura) lifto al la kataloga oficejo: 4 minutojn poste la petanto ricevas la volumon!!!

Laŭ artikolo de Pjer Ŝolen (Pierre Chaulaine) en franclingva gazeto.

## Germanaj instruistoj en francaj sindikatejoj.

30 germanaj instruistoj, membroj de la «Deutscher-Lehrerverein» (Germana instruista Ligo — 150.000 membroj) el urbo Magdeburg vizitis en Oktobro Francion kaj estis invititaj de l'Nacia Sindikato paroli en laborborsoj (kvankam ili ne estas sindikatanoj) en jenaj urboj: Rennes, Nantes, Orléans, Paris. Tio estas manifestacio de la pacifista pedagogia federacio internacia FIAI.

# EL JUGOSLAVIO

## La superŝarĝo en nombro da gelernantoj en la popollernejoj

En Jugoslavio, la popollernejo daŭras 4 jarojn. Estas popollernejoj kun 6 aŭ 8 kursoj (lernjaroj), sed tio estas maloftaĵo. En malgrandaj vilaĝoj ne estas instruisto por ĉiu grupo da gelernantoj, sed laŭleĝe, se la nombro de gelernantoj ne superas 45, instruist(in)o devas instrui kaj labori kun ĉiuj infanoj en unu lernoĉambro.

Sed dum la tri lastaj jaroj, la nombro da gelernantoj tiom grandiĝis, ke nun unu el plej aktualaj lernejproblemoj estas: la superŝarĝo en nombro da gelernantoj en popollernejoj. Nun preskaŭ ĉiu instruisto instruas minimume 50—60 gelernantojn kaj tio kun du, tri aŭ kvar kursoj (lernjaroj). Ekzemple, mi kun mia edzino instruas 185 gelernantojn en vilaĝo (ĉiu havas po du kursoj). Sed tio ne estas escepta ekzemplo, multaj aliaj gekolegoj superas je tiu ĉi superŝarĝo.

En tiaj okazoj, kiam la nombro por unu instruisto superas 80, la Ministro de Klerigo aprobas instrulaboron per tielnomata «duontaga instruado». Tiu instruado konsistas en tio, ke duono da gelernantoj vizitas lernejon antaŭtagmeze kaj cetera duono posttagmeze en sama lernoĉambro (aŭ unuj venas la lernejon en unu tago kaj aliaj en dua tago). Kiel rekompencon por tia laboro, la instruisto ricevas ĉiumonate 50 dinarojn da plia salajro.

Kio estas kaŭzo de tiu ĉi superŝarĝo? Al tiu demando oni donas unu respondon: manko de lernoĉamboroj estas ĉefa kaŭzo de superŝarĝo en nombro da gelernantoj, ĉar estas sufiĉe da geinstruistoj, eĉ ekzistas tro multe da ili.

En urboj, tiu ĉi superŝarĝo estas pli granda ol en vilaĝoj. De tiu vidpunkto, la plej malbonaj lernejaj cirkonstancoj estas en ĉefurbo Belgrado. Sekve de granda loĝantaro, la Belgradaj popollernejoj ne estas sufiĉaj. Tie estas 16 popollernejoj kun 155 lernoĉambroj kaj 11.450 gelernantoj. Jen la stato de Belgradaj popollernejoj en jaro 1929:

| | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1-a | popollernejo | havas | 13 | lernoĉambrojn | kun | 13 | klasoj . . | 636 | gelern. |
| 2-a | » | » | 8 | » | » | 9 | » . . . | 451 | » |
| 3-a | » | » | 8 | » | » | 13 | » . . . | 578 | » |
| 4-a | » | » | 4 | » | » | 4 | » . . . | 151 | » |
| 5-a | » | » | 8 | » | » | 16 | » . . . | 761 | » |
| 6- | » | » | 10 | » | » | 14 | » . . . | 598 | » |
| 7-a | » | » | 10 | » | » | 10 | » . . . | 502 | » |
| 8-a | » | » | 16 | » | » | 29 | » . . . | 1.365 | » |
| 9-a | » | » | 16 | » | » | 31 | » . . . | 1.507 | » |
| 10-a | » | » | 8 | » | » | 12 | » . . . | 545 | » |
| 11-a | » | » | 8 | » | » | 14 | » . . . | 565 | » |
| 12-a | » | » | 13 | » | » | 21 | » . . . | 1.053 | » |
| 12-a | » | » | 13 | » | » | 21 | » . . . | 1.052 | » |
| 13-a | » | » | 17 | » | » | 21 | » . . . | 967 | » |
| 14-a | » | » | 2 | » | » | 4 | » . . . | 151 | » |
| 15-a | » | » | 6 | » | » | 16 | » . . . | 912 | » |
| 6-a | » | » | 8 | » | » | 15 | » . . . | 706 | » |
| | | | 155 | | | 242 | | 11.448 | |

Do, en unu lernoĉambro kunvenas pleje 152 gelernantoj (15-a lernejo) kaj malpleje 49 (1-a lernejo). Kaŭze de tio, normala instruado estas nur en tri (1-a, 3-a, 7-a) lernejoj. En ĉiuj ceteraj, oni lernas per «duontaga instruado».

La malbonaj rezultoj de tia lernlaboro estas konataj.

Pri fondado de konstruoj por popollernejoj zorgas komunumoj. Sed jugoslava geinstruistaro nun deziras ne nur ŝtatan kunhelpon, sed ke la Ministrio de Klerigo nur fondu lern-konstruojn. Ĉu oni sukcesos? ni vidos.

Stanko Prvanoviĉ

## EL LATVIO

### 10-jara burĝigo de latvia lernejo

En fino de septembro 1929 estis aranĝita la soleno de 10-jara datreveno de latvia lernejo kun pedagogia ekspozicio.

La lernejo en Latvio travivis en tiuj 10 jaroj multe da malbonaĵoj. Eĉ la plej ruĝaj instruistoj nun estas en plej granda parto perdintaj siajn ruĝajn simptomojn. La detalojn montris la ekspozicio mem.

La influo de l'malnova programo kaj reakcia leĝfarado reflektiĝis eĉ en pure teknikaj raportoj, tute neparolante pri la faroj, en kiuj estas videbla «ideologio», ekzemple: mizeraj kaj banalaj manlaboroj kun malsaĝaj floretoj, «naciaj» branĉetoj ktp. faŝista «Hakenkreuz» — fajrkruco — estas simbolo de ĉiuj lernejoj— tiu ĉi simbolo estas karakterizo kiel simbolo de l'nigra vento.

Temoj donataj al lernantoj kiel hejmskribaĵoj estas voksignaloj ĝis malsupozeblo. Sentimentalo, detalemo kaj antaŭkonvinko kontraŭ socialismo, eĉ kontraŭ moderna scienco, starigante religion, kiel gvidanton kaj savanton. Jen moderna latvia lernejo!

La eksperimentaj atingoj en lernado (ekz: fizikaj, natursciencaj) estas ankaŭ tre malriĉaj kaj mizeraj, ili ŝajnas tre unutonaj, samaspektaj; en ĝeneralo la lernado kondukas ne al progreso, sed—al stulto...

Tial estas klare, kial en kvartaga lernejfesto la sporto kaj gimnastiko okupis la ĉefan lokon: antaŭ la sentimentalo oni povas kontraŭstarigi nenion alian, ol superabundan fizikan ekzercon, ĉar la lasta ofte tre bone forkondukas de logika pensado.

Nenion timas la burĝaro pli multe, ol la memstaran pensadon, ĉar memstara pensado forkondukas de burĝaro.

Longe la lernejjunularo ne povos loĝi kaj vivi en «fajrkrucaj» muroj — proksimiĝas jam tempo, kiam la lernantaro ĉesos silenti...

Jozeforo, Riga

———

**Rubrikestroj, kunlaborantoj, sendu senpere al nia redaktoro viajn artikolojn (nur por TEPS al ĝia rubrikestro).**

**Skribu ĉiam sur unu flanko de l'papero! Uzu prefere skribmaŝinon!**

# EL POLIO

Dum la «Unuiĝo de polaj geinstruistoj el unuagradaj lernejoj» disvastigas tra la mondo, ankaŭ per helpo de sia «juna esperanto-sekcio», franclingvan broŝuron, kiu proklamas ĝian mirindan progreson sub faŝisma regado, «ĝian entuziasmon esti salutita, dum kongreso, de kriento de Polia Sendependeco, Marŝalo Pilsudski, honora membro de l'Unuiĝo», ĝian ĵurpromeson al li donaci «sangan kaj monan tributon, kiam Patrolando bezonos», — ni aŭskultu la vean kaj protestan krion de klaskonscia tre suferanta pola instruisto, SAT-ano 10.099:

## El letero de pola instruisto

Vi petas, ke mi informu vin pri la abomena vivo de edukistoj en Polio, mi tion certe faros en miaj venontaj artikoloj, sed jam mi volas atentigi vin je la treege mizera stato de instruisto en Polio, eĉ en la ŝtataj lernejoj, kie la salajro estas firme fiksita kaj certa. Instruisto, kiu ne volas aŭ ne scias «danci laŭ la fajfilo» de la Pilsudski-a reĝimo, estas suspektata kaj minacata. Oni ĉiam devas nevole subteni kaj enkonduki la faŝistan reakcion en la lernejon. Ankaŭ la ekonomia stato ne estas pli bona. Mi ne parolas jam pri la instruistoj en la t. n. naci-malplimultaj lernejoj, kiuj ne estas eltenataj de la registaro. Tie la instruisto simple malsatas. Mi havas multajn kolegojn, kiuj instruas en tiaj lernejoj, ili ricevas la salajron nek en sama monato, nek en la dua kaj eĉ tria. Oni ĉiam ŝuldas al ili por 4-5 monatoj. La infero de l'malsatego konstanta turmentas ilin kaj iliajn edzinojn kaj etulojn. Mi asertas, ke en neniu lando kultura la instruistaro suferas politike kaj ekonomie, kiel en Polio; mi mem, ekzemple, instruis 9 jarojn en diversaj popollernejoj kaj vesperkursoj. La salajro estis sufiĉa nur por ne morti. Tiel mi instruis kaj malsatadis ege, ĝis mi malsaniĝis danĝere. Per malmultaj groŝoj prunterprenitaj de la familio (laborista) mi veturis kuracejon, elirante el sanigejo kaj ree malsatante, mi denove malsaniĝis. Post la resaniĝo, mi jam restis absolute senlabora, ĉar la kuracistoj malpermesis al mi labori. Dume mi havas hazarde 2-3 lecionojn privatajn. En lernejo mi ne povas pli instrui por ne pli malbonigi la sanstaton.

Mi jam sentas, ke mi proksimtempe ree estos senlabora. Nu, kio poste? ree malsato, sekvata de malsanoj ktp. kaj — sciu, ke mi ne estas unusola. Tio estas la efektive reala vivstato de miloj kaj miloj da geinstruistoj en Polio. Kion fari? Dronas ni en mondo de turmentoj neelteneblaj!

SAT-ano 10.099

## Fabrikoj de faŝista gvardio

Nur naivuloj povas miri, ke en nia Faŝistio troviĝas ankoraŭ regionoj, kie la analfabetularo atingas la gloran nombron de 71% el la loka loĝantaro. De kie oni povas akiri klerigon, se ĉiuj ŝtataj oficialaj klerigistoj zorgas nur por la religiigo kaj faŝistigo de la junularo! La buĝetoj de la militelspezoj ĉiam kreskas, oni ĉiam konstruas kazernojn kaj malliberejojn. Veraj edukejoj estas tute superfluaj.

Jen ekzemple lastatempe oni malpliigis la nombron de la instruhoroj por sciencoj, manlaboro kaj kantado, favore al la militekzercoj de ĉiuj lernantoj senescepte. La p a f i l o fariĝas la plej grava kaj plej populara lernmetodo. Sub masko de «korpkulturo» kaj «sporto» oni enkondukas en la lernejoj tre vastan instruon de milit-prepariĝo. Estas nur la religi-horoj, kiuj ne suferis malpliigon.

En Varsoviaj lernejoj oni lastmonate tutlibere propagandis gasmiliton kaj ĝian treegan valoron por la «kara patrio». Oni simple venenas la infanajn cerbojn kaj fabrikas faŝistajn patriotojn, kiuj poste devos batali kontraŭ ĉies emo liberigi sin el la sanga faŝisma infero. Ĉiu lernejo fariĝas tiele fabriko de kripligitaj uloj. Tre klare evidentigas tion la ĵus-okazinta «Ĝenerala Landekspozicio» en Poznan, kie oni demonstras antaŭ la tutmondo la prosperajn kulturvalorajn akirojn dum 10 jaroj de sendependeco de Polio. En la Pavilono de Klerigiministrio oni vidas preskaŭ nur... pafilojn kaj pafilojn! Oni fieras pri la novenkondukita militinstruado. Ĝi estu la plej trafa, plej «moderna» edukilo por la popolo.

Ne miru do, se en nia Faŝistio abundas la nombro da analfabetuloj; ne sufiĉas tempo por vera klerigagado. Pli utile kaj praktike estas religiigi kaj armi la venontan generacion!...

## Iom pri la suferoj de l'ukrainaj kaj blankrusaj lernejoj

Mem la ukraina loĝantaro en Polio nombras pli ol 4 milionojn, krom la blankrusoj kaj aliaj t. n. «slavaj naciaj malplimultoj» kaj tamen iliaj lernejoj suferas neaŭditajn turmentojn. En Vilno kaj Luck, en Pinsk kaj Lvuv, ĉie kie ili loĝas ili estas persekutataj. Iliaj lernejoj, instruistoj kaj gelernantaro estas traktataj kiel senvaloraj estaĵoj. Ĉe la plej stulta suspekto, oni malpermesas lernejojn kaj arestas eĉ infanojn. Dum la dua proceso de la konata blankrusa «Hromada» en Vilno, oni arestis multe da gelernantoj, vizitantaj la blankrusan gimnazion. La instruistoj, kiuj ne havas la honoron plaĉi al la kuratoro (ŝtata regiona lernejestro) aŭ al la distrikta lernej-inspektoro, estas tuj senoficigitaj. Oni altrudas devigan poligon al la alilingvaj amasoj, eĉ en regionoj, kie ili efektive estas la absoluta plimulto.

La kulturmovado ĉe la subpremitaj popoloj en Polio troviĝas en mizera stato, ĝuante preskaŭ neniajn ŝtatajn subvenciojn.

## Nova «reformo»

La judaj popollernejoj (ekzistas pli ol 200 da ili) ne estas subvenciataj de la registaro, nek de la komunumaj institucioj. La judaj malriĉaj laboristaj amasoj do devas senelire mem elteni siajn lernejojn, per la propraj mizeraj groŝoj. Malgraŭ tio, estas la juda popollernejo (kun juda instru-lingvo) altevoluinta pro la absoluta foresto en ĝi de la religi-instruado kaj pro la plej novaj pedagogiaj sistemoj, tie aplikitaj. Nune, krom ĉiuj aĉaj ĉikanoj flanke de la Ministrio por Klerigado, ekestis plej nova kaj plej danĝera: oni, per la helpo de judaj klerikaluloj kaj burĝoj, ellaboris programon de juda religi-instruado, devige altrudota al ĉiuj judaj popollernejoj. La danĝero estas grava. La gvidantoj de la minacataj lernejoj, kune kun la laboristaro, certe provos rebati tiun hipokritan atencan «reformon» de niaj ŝtataj «edukistoj».

SAT-ano 10099

**En 1929, organo de neŭtraluloj havas 800 abonantojn.**
**En 1930, Sennacieca Pedagogia Revuo havu 2000!**

# EDUKISTO KONTRAŬ PASTRO

Tiu ribriko estas gvidata de Sekretario de liberpensula SAT-sekcio K-do KARL HUBRICHT, Mariannenstr 22/1, Leipzig O30 (Germanio)

## DATREVENO:
### Antaŭ 20 jaroj, la hispanaj pastroj murdis Franciskon Ferrer



Francisco Ferrer

20 jaroj pasis depost la neforgesebla mateno de l' 13. oktobro 1909, kiam en la «fama» hispana fortikaĵo Montjuich kvar soldataj pafoj kovris la krion «Viva la Escuela Moderna!» Kaj bela 50-jara viro falis morta. La viro, al kiu ĉi vortoj apartenis, estis Francisko Ferrer. La libera lernejo ekhavis sian unuan martiron.

Kio do estis la moderna lernejo, pro kiu oferis sian vivon la nobla Ferrer?

Ni konas sub la nomo «nova lernejo» plurajn eksperimentojn pri edukado en Eŭropo kaj Ameriko. Preskaŭ en ĉiuj-ĉi lernejoj la edukado estas trasaturita per burĝeca spirito. Preskaŭ ĉie la «novaj lernejoj» estas edukejoj por la infanoj de l'reganta klaso. Ĉu pro tia lernejo mortis Francisko Ferrer? Ne, tute alia estis lia moderna lernejo. Ĝi estis edukejo por laborulaj infanoj, edukejo bazita sur la fundamentoj de scienco kaj proleta klaskonscio,—ĝi estis grava eksperimento pri proleta edukado. Ĝuste pro tio la reakcia katolika bando, kiu regis kaj regas en Hispanio, ne povis toleri ĝian ekziston kaj post furiozaj atakoj fine mortigis ĝian fondinton kaj kreinton.

Dum 10 jaroj, Katolika Eklezio spionatendis la momenton, kiam ĝi povos frapmortigi Ferrer kaj malaperigi lian verkolaboron.

Li ne nur kreis senreligiajn lernejojn en ankoraŭ mezepokeca Hispanio, li ankaŭ redaktis la belan revuon «Renovigata Lernejo» en hispana kaj franca lingvoj, per kiu li atakis religian kaj ŝtatan edukadon. Li eldonis kaj propagandis la verkojn de alilandaj avangardaj pensuloj kaj li estis ankaŭ propagandisto de esperanto.

Por malaperigi lin, la katolika reakcio organizis kontraŭ li fi-kampanion; oni implikis lin en la proceson kontraŭ la Barcelonaj ribeluloj (kiuj okazis en samaj tagoj, kiam okazis la universala esperanto-kongreso

en Barcelono—1909). Kvankam Ferrer tute ne partoprenis la ribelon, li estis senpruve kondamnita. La pulĉinela reĝo ankoraŭ nun reganta en Hispanio, subskribis la mortigordonon kaj Ferrer estis senprokraste pafmortigata.



Pastroj murdis Ferrer, sed liaj ideoj nun vigle vivas en la hispania universitato, kie profesoroj kaj studentoj sukcese batalas kontraŭ faŝista katolika diktatoreco. Antaŭ kelkaj monatoj Madridaj studentoj senkapigis statuon de la reĝo kaj gluis sur muro de l'urbo jenan afiŝon: «Ni forigis la kapon de la reĝo por vidi kion ĝi enhavas, kaj ni povis konstati, ke ĝi estas malplena!»

Edukistoj el tutmondo, memoru ĉiam pri Francisko Ferrer kaj ne ĉesu lukti kontraŭ la tri unuigitaj nigraj potencoj: pastraro, burĝarmeo kaj kapitalismo (la aspergilo, la sabro kaj la monŝranko). 1.334518.

---

**Katolika pastraĉo, Karl Marks kaj... eksigo el lernejo**

La fakto okazis en 6-a klaso de unu el la Varsoviaj gimnazioj. En tiu religiema, pia edukejo, oni instruadas dufoje ĉlusemajne pri religio. Agitis dum unu leciono la pastro kontraŭ «Karl Marks kaj lia socialismo». «Ĉiu malfeliĉo, predikis la pastro, devenas de la socialismo, kies kreinto estis herezulo kaj sendiulo. Ĉiuj anoj de l'socialismo meritas do forigon el la homa socio kaj malbenon de la eklezio».

Subite: «Permesu al mi diri ion kontraŭ tio!» petis unu el la lernantoj, membro de socialista «Ruĝa Skolto». Aŭdinte tiun «arogon», la pastro forpelis la lernanton el la lernejo. Ankaŭ la edukisto estis tre incitita kaj li decidis jene: «La lernanto devas nepre senkulpiĝi antaŭ la pastro kaj peti lian pardonon pro sia troa kuraĝo». La lernanto kontraŭis: li ja neniun ofendis. Sed la decido estis neŝanĝebla. La lernanto do humiliĝis, revenis lernejon kaj turnis sin al la pastro jenvorte: «Mi tre bedaŭras la okazintaĵon. Mi neniel intencis ofendi la pastron. Mi do petas vian pardonon kaj donas la honoran promeson de ruĝa skolto»... Ne pli, sed ĝi sufiĉis! Pro sia dua «aroga eldiro» la lernanto estis jam definitive forigata el la gimnazio.

Tiel oni «instruas» kaj «edukadas» ĉe ni, ne en ia vilaĝeto, sed en ĉefurba eŭropa moderna mezlernejo!

SAT-ano 10 099.

---

**EDUKISTOJ MEMORU KE**

**„Religio estas opio de l' popoloj"**
*Karl Marks*

**„Religia edikado estas krimo kontraŭ infanaro"**
*Leo Tolstoj*

# POR EDUKISTINOJ

**Tiu ribriko, fako de SAT-virina sekcio, estas gvidata de K-dino SIMONE GLODEAU, 177, rue Bagnolet, Paris XX (Francio)**

## ĜANERALA BILDO

### de l'edukistina situacio en tutmondo

Ĉi-sekvantaj linioj estas eltiritaj el alvoko de la feministinaj grupoj el la avangarda franca geinstruistaro, ĵus dissendita per esperanto al ĉiulandaj edukistinoj.

Preskaŭ ĉie, la servutaj katenoj, kiuj premas la viran edukistaron, ja pli forte premas la virinojn-edukistinojn.

En preskaŭ ĉiuj landoj el tutmondo, la edukistino jam elportas sian sklavecon, kiel ajna virino. Eĉ se ŝia profesia salajro ne estas malpliigata kompare kun tiu de l'instruisto, tiuokaze ofte la leĝo kaj ĉiam la tradicia moralo malpermesas al ŝi la plej elementajn rajtojn en la privata, familia, socia vivo.

En Britio, Svisio, Finnlando, Luksemburgo, Svedio, ktp... en 10 eŭropaj landoj, la salajro de l'edukistino estas malpli alta ol tiu de ŝia kamarado edukisto. En kelkaj landoj (Holando, Svedio, Finnlando, ktp.) la instruistinoj, kiuj zorgas la tiel delikatan edukadon de la plej junaj infanoj en la «etulaj klasoj», estas konsiderataj, kiel «malsuperaj edukistinoj», por kiuj ne necesas longa pedagogia preparo, sed por kiuj sufiĉas duon-salajro!

Eĉ ankoraŭ estas landoj (Germanio, Britio, Holando, Svisio, ktp.), kie celibato—senedzeco—estas deviga por instruistinoj: al ŝi malpermesate fondi familion! Ŝi devas esti monaĥino komisiita por edukado! Se ŝi edziniĝas, ŝi forlasu la edukoficon!

En kelkaj landoj (Rumanio, Svedio, Luksemburgo, Italio, Finnlando), ankoraŭ nun la edzino-instruistino rajtas neniun tute pagatan akuŝan libertempon. Ŝi devas pagi, el sia propra salajro, la salajron de sia anstataŭantino — ĝuste en la momento, kiam kreskas ŝiaj monbezonoj kaj prizorgoj. Ĉie, krom eble en sovetaj respublikoj, politika-religia moralo de burĝaro trudas siajn stultajn antaŭjuĝojn al privata vivo de l'edukistino.

En ĉiuj kapitalistaj ŝtatoj, oni povas ankaŭ konstati klaran tendencon al porvirinigo de l'eduka profesio. Sed la registaroj ne trompas nin, ĉar ni scias ja, ke ili preferas instruistinojn (pli ol instruistojn) nur tial, ke virino, jam senigita je politikaj kaj sociaj rajtoj, ne kuraĝos postulegi siajn profesi-rajtojn!

Esperu nenion de pli malpli demokrataj registaroj, eĉ en landoj, kie virino akiris rajtojn voĉdoni kaj «parlamentani».

E m a n c i p o  d e  l'e d u k i s t i n o j  e s t o s  l a  l a b o r o  d e  l'e d u k i s t i n o j  m e m,  h e l p a t a j  d e  l a b o r i s t a r o,  k l a s f r a t a r o  k a j  k l a s f r a t i n a r o.

Edukistino estu ĉe la kapo de virina movado, same kiel ŝi estu ĉe la koro de movado de laboristaj amasoj...

Kion volas edukistinoj en tutmondo? Samajn rajtojn, kiel k-doj edukistoj! Egalan salajron, egalan kulturon, ĉiajn egalajn rajtojn inter edukisto kaj edukistino!

Pagatan akuŝan libertempon longedaŭran! Plenan liberon en sia privata vivo! Sian rajton en politika kaj socia vivo!

## Kondiĉoj de instruistinoj en Britio

1. Plejparte la geinstruistoj estas edukitaj aparte. Ĝis la 18-a jaro ili iras al duagrada lernejo kaj estas multe pli da lernejoj por unu sekso ol «miksitaj lernejoj». Poste ili iras dum du jaroj al Pedagogia Kolegio. Mi ne konas Kolegion por ambaŭ seksoj por instruistoj de popollernejoj, sed la geinstruistoj por duagradaj lernejoj povas ĉeesti kursojn en Pedagogia Kolegio por geinstruistoj en Londono, kvankam estas multaj kolegioj por unu sekso. La geinstruistoj por duagradaj lernejoj iras unue al la universitato, do multaj el ili ricevis edukadon kune tie, ĉar estas multaj kolegioj por ambaŭ seksoj en la Universitatoj.

Nur la malnovaj Universitatoj, kiel Oxford kaj Cambridge, havas tute apartan instruadon por viroj kaj virinoj.

La ekzamenoj estas samaj por geinstruistoj. Nur virinoj instruas en la infanetaj lernejoj kaj tiuj el la instruistinoj, kiuj elektas la instruadon de infanetoj, havas iom malsimilan ekzamenon. Ili ankaŭ povas studi en specialaj kolegioj por ricevi la Fräbel-Ateston.

2. La salajroj kaj pensioj ne estas samaj por instruistoj kaj instruistinoj.

Antaŭ kelkaj jaroj, la instruistinoj laboris en la plej granda geinstruista unuiĝo (N.U.T.) por egala salajro, sed ili ne havis sukceson, do ili fondis N.U.W.T. (nacia unuiĝo de virinaj instruistinoj). Tiu unuiĝo laboras por egaleco, sed ĝi ne estas politika asocio. La T.L.L. (Instruista Laborista Ligo) ankaŭ subtenas egalrajtojn kaj nuntempe proponas salajran skalon al la geinstruistaro, por ke ili estu pretaj, kiam la nuna salajra skalo finiĝos en 1931. Tiu Unuiĝo estas socialista kaj la viroj helpas la virinojn, sed ĉar ĝi estas politika, ĝi ne enhavas tiom da membroj ol la neŭtralaj asocioj.—

La N.A.S. (Nacia Asocio de Instruistoj) kontraŭstaras egalsalajrecon por virinoj kaj enkondukon de virinoj en knabaj lernejoj. Ĝi fondiĝis, kiel kontraŭulo de la N.U.W.T. el N.U.T. - membroj, kiuj malaprobis la sintenon de la N.U.T., ĉar ĝi, laŭ ili, tro favoris la virinojn. Vere la N.U.T. ĉiam «sidis sur la barilo», kaj ne faris ion por la virinoj.

La instruistoj en la duagradaj lernejoj plejparte apartenas al propraj organizoj:

1 — Assistant Masters Association (Instruistoj)
2 — Assistant Mistresses Association (Instruistinoj)
3 — Head Masters Association (Ĉefinstruistoj)
4 — Head Mistresses Association (Ĉefinstruistinoj).

La asocioj de la virinoj ĉiam diras, ke ili deziras egalan salajron, sed akceptas ne-egalecon sen batalo.

Ĉiu speco de instruisto aŭ instruistino havas apartan organizon bedaŭrinde, do estas tre malfacile agi kune. Ĉiu, kiu kredas, ke li estas supera al la ordinara instruisto, havas propran organizon.

3. En la plej multaj lokoj, la instruistino ne povas daŭrigi sian laboron, se ŝi edziniĝos. Antaŭ eble dek jaroj, ili povis edziniĝi en servo de la Londona Distrikta Konsilantaro (L.C.C.), sed ne en la antaŭurboj de Londono kaj en aliaj urboj. Ĉiu konsilantaro povis fari sian propran regulon pri tio kaj estis permesite en kelkaj lokoj kaj malpermesite en multaj aliaj.

Estas plimulte da instruistinoj ol da instruistoj. Tri instruistinoj respondas al du instruistoj.

Ĉiu infaneta lernejo havas nur instruistinon, do pli da virinoj estas necesaj por tio. La infanoj estas en tiu speco de lernejo ĝis la 7-a jaro de la 5-a jaro. Dum kaj post la milito estis kelkaj virinoj en la knabaj lernejoj (ne en ĉiuj). Ili instruas ordinare la malgrandajn knabojn. Ĉar ilia salajro estas malpli alta ol tiuj de la viroj, ili kostas malpli multe al la ŝtato kaj kvankam ili nun ne plu estas bezonataj en la knabaj lernejoj, tamen ankoraŭ restas sufiĉe multaj.

4. Por pensioj, la geinstruistoj en popollernejoj antaŭ kelkaj monatoj havis novan aranĝon; ili pagas, same kiel la geinstruistoj en duagradaj lernejoj, t. e. 5% de la salajro. Antaŭ 6 aŭ 7 jaroj, la geinstruistoj ne pagis por la pensio, sed por ŝpari la monon la registaro enkondukis la 5-procentan aranĝon. Vidvoj de instruistinoj ne ricevas pensiojn.

5. Estas tre malmulte da instruistinoj, kiuj estas edzinoj. La plejmulto da edziniĝintaj instruistinoj estas sufiĉe maljunaj, ĉar ĉiuj novaj edzinoj estis eksoficigitaj en la Londonaj lernejoj dum la lastaj jaroj.

6. Ĉiuj 21-jaraj virinoj en Britio rajtas baloti. Multaj el ili estas feministaj kaj dum la plej aktivaj tagoj de la lukto por la balotrajto t. e. antaŭ la milito, multaj instruistinoj vigle partoprenis la feministan movadon. La plejmulto estas membroj de la diversaj profesiaj asocioj kaj estas samgrade aktivaj kiel la viroj, mi opinias.

7. Laŭ profesia vidpunkto, la instruistinoj postulas egalecon kun, la viroj. La sola grava diferenco estas en la salajroj. Ĝis nun ankaŭ viro ĉiam estas elektita, kiel ĉefinstruisto en lernejoj por geknaboj.

Socie kaj politike estas multe da malsamaj tendencoj inter la instruistinoj anglaj. La instruistinoj estas la plej bone pagataj laboristinoj — se oni ne pritraktas la malmultajn, kiuj havas tre specialajn kaj bone pagitajn oficojn en aliaj profesioj — do ili estas ofte malmulte interesitaj per la politikaj movadoj. Multaj interesiĝas en Paco kaj subtenas la Ligon de Nacioj, opiniante, ke ĝi estas vojo al Paco.

C. Osmond

---

## La francaj instruistinoj

En Francio, ni ricevas pedagogian preparon saman, kiel niaj kolegoj instruistoj kaj tiuj el ni, kiuj oficas en lernejoj por tre junaj infanoj, ricevas salajron saman, kiel ni.

Nur post batalo dum 10 jaroj kaj eĉ pli longe, ni sukcesis eltiri favore de mondmilito — la salajregalecon (kun la instruistoj), kiun kontraŭstaris ne nur registoj, sed ankaŭ multnombra parto de la vira instruistaro. Sed ni estas la solaj ŝtatoficistinoj, kiuj ĝuas tiun avantaĝon pri salajro egala al la vira. Tamen tiu egaleco estas perfortita en kelkaj punktoj: kiam instruisto mortas, lia edzino ricevas parton de la pensio — sed kiam mortas instruistino, ŝia edzo ricevas nenion (kvankam ŝi pagis por pensio procentaĵon saman, kiel instruisto).

Certe ni havas rajton edziniĝi kaj ni ne povas imagi, ke oni malpermesas tiun rajton en kelkaj landoj. Por ĉiufoja patriniĝo (akuŝo) ni ĝuas pagatan libertempon de 2 monatoj (1 monato antaŭ akuŝo kaj 1 monato poste), sed ni opinias, ke tio estas nesufiĉe longa.

En Francio, virino ne rajtas voĉdoni. Sed ni partoprenas vigle en la socia batalo; multaj el niaj k-doj estis kondukataj al tribunaloj, estis punataj per altaj monpunoj, estis ĵetataj en malliberejon pro sia agado pacifista, politika, sindikatista kaj socia.

Ni batalas flanko-ĉe-flanko de niaj laboristinoj—k-dinoj, por ke oni apliku al ĉiuj virinoj la justan principon: «Por egala laboro, salajron egalan!» Ni luktas por libera patriniĝo ankaŭ (eksterleĝa), por ke patrineco estu konsiderata, kiel socia funkcio ŝtata kaj tute monsubtenata; kaj pro tio jam oni persekutis nin per kelkaj procesoj kaj monpunoj. Ni luktas por la mizera infanaro — kaj ĉefe kontraŭ milito. Ni estas decidaj radikalaj kontraŭmilitaristinoj. Ni rajtas deklari, ke nia propagando efikas.

Esperanto-Servo de Ruĝaj Franciaj Edukistinoj

---

**K-dino! Vi legis kun intereso, sed... ne forgesu: 1-pagi vian abonon, 2-kunlabori per artikolo!**

## Situacio de l'edukistino tra la mondo
## Demandaro

1. Ĉu vialandaj instruistinoj devas fari studojn, pasi ekzamenojn tute samajn kiel instruistoj?

Ĉu studentoj kaj studentinoj estas kune edukataj en la pedagogiaj lernejoj?

Ĉu la edukistinoj por plej junaj inf noj devas fari studojn samajn kiel aliaj — ĉu pli longajn, ĉu malpli? — kaj ĉu ili devas pasi apartan ekzamenon?

2. Ĉu salajro, monhelpoj, pensio de l'instruistinoj egalas tiujn de l'instruistoj? — Kian agadon instruistinoj entreprenas por salajregaleco? — ĉu en tio ili ricevas helpon de instruistoj? (de kiuj?) — Ĉu instruistinoj sin organizis en apartaj asocioj?

3. Ĉu instruistino rajtas edziniĝi daŭrigante sian oficon? Ĉu ĉiam estis tiel? — Kiujn sekvojn celibato havas en instruistinara movado?

4. En kiuj kondiĉoj, vidvino de instruisto, mortinta dum ofic - aŭ pensitempo, rajtas pension? — Ĉu vidvo de instruistino mortinta (pensiita aŭ ne) rajtas pension? — Ĉu celibataj instruistoj kaj instruistinoj devas spezi procentaĵon al aparta kaso de vidvinoj kaj orfoj? — Ĉu edzinaj instruistinoj spezas al ĉi kaso tiom da procentaĵo salajra, kiom edzaj instruistoj, eĉ se ĉi kaso ne donas pension al vidvoj?

5. Ĉu instruistino rajtas pagatan akuŝan libertempon? kiomlongan? — Ĉu ŝi mem devas pagi sian anstataŭantinon? — Ĉu oni tolerus, se instruistino havus infanojn ekster leĝa edzeco aŭ vivu kun elektita amiko, ne edzo?

6. Ĉu vialandaj instruistinoj havas voĉdonrajton? — ĉu ili partoprenas en profesia edukista agado, en feminisma movado? — ĉu ekzistas feministinaj grupoj ĉe instruistinaro?

7. Kiuj estas viaj apartaj postuloj? (je vidpunktoj: korporacia, politika, socia). — Kiuj estas viaj plej bonaj agit-kaj batal-rimedoj?

K-dinoj, nepre respondu al nia edukistina servo (K-dino Simone Glodeau, 177, rue Bagnolet, Paris XX). Helpu nin organizi kunligon inter 2 milionoj da tutmondaj edukistinoj. Viaj leteroj kaj dokumentoj estos publikigataj en nia revuo kaj en diverslandaj organoj.

**S. P. R. sin turnas aparte al vi!**
**Sendu tuj vian abonpagon por 1930!**

# NI, GESTUDENTOJ...

**Tiu ribriko, sub kontrolo de SAT-studenta sekcio estas gvidata de K-do D. SNEĈKO, Postkesto 33, Minsk (Soveta Blankrusio)**

---

## Studenta vivo en Japanio

En lastaj jaroj, vivo de studentoj en Japanio prezentas al ni diversajn bildojn influatajn de socia disvolviĝo. Tute same kiel en aliaj kapitalistaj landoj, en Japanio nuntempe regas furioza uragano de l'blanka teroro. Burĝoj, ŝovinistoj, militistoj furioze klopodas stultigi popolon al la reĝeco de l'imperia kapitalismo kaj blindigi ilin pri la pli kaj pli akriĝanta kontraŭstaro de sociaj klasoj.

Pia penado de l'burĝaro estas turnata precipe al junularo, studentoj. Jam delonge milita edukado en lernejoj, de liceo ĝis universitato, aplikiĝadas per la mano de 4.000 oficiroj nerezervaj. La registaro speciale zorgas eduki studentojn en ŝovinistaj ideoj.

Kiel rimedon de tia penado, nuntempe oni havas lernejan policon en ĉiu kolegio, universitato. Lerneja polico klopodas ĉiam enketi ideojn de studentoj, kaj forpeli ĝustatempe danĝeran tendencon de l'ideo. Ni ne komprenas, kiel oni povas fari enketon pri cerba stato de studentoj kaj aliparte, kiel negativa rimedo, la Registaro ankaŭ penadas pliprosperigi la studadon de «spiritaj», kontraŭsociaj sciencoj, ekz: religiaj sciencoj, orienta filozofio, historio kaj klasika studo pri antikva Ĉinio, ktp. La lastdata movado «Kultura ĝeneralmobilizado», kiu estas iniciatita de Eduka Ministrio kaj celas al 10 milionoj da eksterlernejaj gejunuloj enplanti fortan ŝovinistan, reĝaman, naciistajn ideojn, ankaŭ okupas gravan lokon en la ŝtata klopodado.

Krom tiuj metodoj, sportoj ankaŭ ludas gravan rolon por «bonigi studentan cerbostaton». Lastatempe, ĵurnalistoj, burĝoj, instruistoj, instigas al ĉiu naciano altigi la nivelon de l'korpa stato per sporto. Eĉ la ministro de edukado deklaras, ke «sportoj kondukas junulojn, studentojn al sana pensado, al sendanĝera ideo». Ne komprenante realan staton de l'socio nuntempa, kion alian oni povas fari per sanaj korpoj, ol kulturi kaj praktiki faŝistan ideon!

Sed al tiuj tendencoj de nia registaro, ne ĉiuj studentoj estas obeemaj; unuj el ili kuraĝe batalas kontraŭ lerneja aŭtoritato, kaj aliaj kaŝe agitas al senkonsciaj junuloj. Dum lastaj jaroj, multaj profesoroj studentoj estas forpelitaj, aŭ malliberigitaj pro agitado aŭ pro senkaŝa studado de sociaj sciencoj.

En 15-a de majo 1929, en du universitatoj, ŝtata kaj privata, en Tokio kelkaj miloj da studentoj batalis kontraŭ regantoj per manifestacio, atakparoladoj, por malaltigo de lerneja pago, pli liberigo de studado de sociaj sciencoj ktp. kaj ankaŭ reakciaj studentoj atakis oratorojn. Multaj estis vunditaj kaj poste multaj studentoj estis forpelitaj el la Universitatoj.

Kiel ajn la registaro subpremos pli furioze studentan movadon, tamen sociaj kontraŭstaroj prezentantaj pli kaj pli akriĝantajn batalojn nepre kondukos studentojn al vera kompreno pri la afero.

Tokia SAT-ano

## Prusiaj studentoj perdas memadministro-rajton

La prusa ministro por sciencoj kaj popolklerigo ordonis nuntempe sekve de la negativaj voĉdonoj en ĉiuj germanaj universitatoj kaj teknikaj superlernejoj, ke definitive la ĝisnuna gestudenta memadministracio, same la enspezoj de devigaj kotizoj estu malpermesataj. La voĉdonoj plene staris sub la devigaj paroloj kaj frazoj de la feŭdaj studentkorporacioj naciistaj — kaj multloke la gestudentaro eĉ ne sciis, kion ĝi ekperdos.

Laŭ la konstata statistiko de la regna oficejo porstatistika studas 88.000 gestudentoj, el ili 7.500 inaj. La plej multnombre vizitata universitato estas Berlin (ĉ. 8000), sekvas München, Köln kaj Leipzig; kontraŭe studas en Greifswald nur 800, en Rostock nur 630 gestudentoj.

Ĉirkaŭe 50% el la tutgestudentaro estis enskribitaj en la jura kaj medicina fako, dum la studentinoj studas plejparte biologion, matematikon aŭ filologion. En Berlin eksterlandanoj estas 12%, precipe el Bulgario, Polio, Rusio. 6000 gestudentoj devas perlabori (ankaŭ dum la libertempoj) vivrimedojn, multnombre kiel laboristoj. Sed la klaskaraktero en la germanaj universitatoj ellumas el la fakto, ke nur malmultaj gestudentoj apartenas al proletklaso. La germanaj universitatoj konservadas la kontraŭproletan klaskarakteron reakcian!

---

## Pri latvia universitato

Pri unu jubileo latvia burĝaro povas lamenti kaj kriplori — pri latvia universitato. Köim da jubileoj-festoj malfeliĉa latvia laborularo estis devigita travivi! Sed nun la latvia proletaro povas ĝoji — la plej grava jubileo (universitata) organizita de Latvia burĝaro — fiaskis kun granda krevo! La afero estis jena.

En Latvia universitato regas reakcia studentaro, kiu disfalas je du partoj: «korporacio» kaj «konkordioj». La «korporantoj» ne volas agnoski la rajtojn de «konkordantoj», ĉar la lastaj estas pli malfortaj. Dum la jubileaj tagoj, kiam sur stratoj estis videblaj grandaj amasoj da solenantaj fistudentoj (laborul-studentaro ne partoprenis) komenciĝis interbatoj inter burĝaj studentoj. La proleta loĝantaro de Riga estis atestanto en furiozo de sataj senokupuloj. Kun grandaj kriegoj kaj malbenoj ili ĵetis unu al alia putrajn pomojn kaj fetorajn ovojn. Kompreneble la paca loĝantaro ankaŭ suferis de tiaj studentaĉaj amuzaĵoj.

Sendube tiaj korporantoj kaj konkordantoj ne estas reprezentantoj de vera laborula popolo en universitato, ili estas nur burĝaj kaj baronaj filetoj kaj fraŭlinoj. Kaj se ili batas unu la alian, estas tre bona fakto, sed ĉu finfine ili nuligos sin-mem? En tiu-ĉi nuligo ludos la plej gravan rolon laborul-studentaro, kiu liberigos nian «alma mater» de infekta malsano—burĝeco.

En la balotoj, por la komitato de latvia universitato la unuan fojon estis elektita unu revoluciema studento. Kvankam la reakcio tre persekutadas la laborulan studentaron, tamen ili vivas kaj agas...

Jozeforo (Riga)

---

# NIA SAT EDUKISTA SEKCIO

**Tiu ribriko estas gvidata de Sekretario de SAT-edukista sekcio K-do M. BOUBOU, 96 rue Saint-Marceau, Orléans (Francio)**

## NI KAJ NEŬTRALULOJ

Estas sciate, ke pro nia klara klasbatala koncepto, ni kutimas diskuti en niaj partiaj, sindikataj aŭ aliaj organizoj, laŭ tute klara dialektiko. Tial, al ni ne malplaĉas respondi al la kritikoj, kiujn direktas al SAT-edukistoj ĉiu numero de «Internacia Pedagogia Revuo», organo de TAGE, acocio de neŭtralaj esperantistaj geinstruistoj. Ni ja scias, ke per tiu diskuto ni altiros al SAT kaj al nia SAT-edukista laboro multajn kolegojn, kiuj simpatias al socialismo.

TAGE ne volas, ke ni organizu SAT-edukistan sekcion,
— ke ni fondu propran avangardan pedagogian organon,
— akceptas nur, ke ni organiziĝu en SAT-sekcio de TAGE mem,
— pretendas, ke ĝi kapablas defendi niajn klasbatalajn interesojn,
— ke ni endanĝerigas la tutan edukistan esperanto-movadon.

Iom da historio montros, ĉu ni povas esperi, ke TAGE iam fariĝos klasbatala. Postmilite reviviĝis la edukista esperanto-movado dank'al avangarda gazeto «Novaj Tempoj», fondita de trio Vitkok'Testud'-Bubu (Vittecoq-Testud-Boubou) el Francio. Dume, multaj kolegoj, konataj propagandistoj antaŭmilitaj silentis. Sed avangarda «N. T.» ne povis vivi, eĉ nur sur kontraŭmilita programo, pro inerto de plejmultaj edukistoj, profesoroj, docentoj, kiuj malkviete atendis sereniĝon de la revoluciaj ondoj en 1920—24. Tial estis transdonata «N. T.» al Saksa Esperantista Instruista Ligo kaj estis fondata TAGE (Nürnberg'a kongreso) sur burĝa progresema kaj tolerema bazo. Perdante iom post iom sian avangardecon, N. T. fariĝis I.R.P., kaj TAGE post kelktempa observa periodo estis oficiale agnoskata de la ĝenerala esperanto-movado kaj de UEA, kaj tiun agnoskon pri «neŭtraleco» sankciis esperantistaj eminentuloj enirantaj la redakcian komitaton de I.P.R. La nombro da abonantoj kreskis de 300 ĝis 800. La rolo de l'avangardaj edukitoj kaj de kelkaj SAT-anoj (interalie de k.do Goldberg kaj de mi) por revivigi la edukistan esperanto-movadon estis tiel sindona, kiel necesa pro inerteco de la neŭtraluloj. Stariĝas nun la demando, ĉu ĝi ne sufiĉe daŭris...

Se ni konsideras nun la progresojn de esperanto en la avangardaj edukistaj medioj, ni konstatas kolosan kreskon. Antaŭ 8 jaroj, la «Novtempanoj» estis nur kelkaj dekoj. Nun estas 800 geinsturuistoj en SAT. La peresperanta Laboro ĉe l'avangarda edukistaro kreskis tiagrade, ke antaŭ 4 jaroj devis esti fondata TEPS (pedagogia servo). Kvankam krom TEPS ni ne havis organizan centron, avangardaj edukistaj organizoj de si mem ekaplikis esperanton. Nun ni sufokiĝas sub amaso da demandoj, petoj, proponoj al ni direktitaj. Nia peresperanta laboro estas multoble pli grava ol tiu de la neŭtraluloj. Ni multe pli ol ili bezonas gazeton. De jam 4 jaroj, grava revuo ukraina «Vojo de Klerigo» eldonas sian 4—8 paĝan esperanto-resumon. De lasta majo la tutsovetia geinstruistaro eldonas «Sovetan Pedagogian Revuon» en esperanto. Edukintern ankaŭ decide sin direktas al utiligo de esperanto. Ni atendas, ke la neŭtraluloj montru al ni tiel daŭrajn sukcesojn.

Sed... tia progreso okazanta ekster agado sistema de SAT-edukistoj nepre atingos fiaskon kaj endanĝerigos la edukistan esperanto-movadon, se ni ne koncentrigas urĝe ĉiujn ĉi esperanto-aplikajn penojn per organizado de nia SAT-edukista sekcio. S.P.R. naskiĝas en oportuna tempo, eble eĉ iom malfrue. Ni estis projektintaj ĝin eldoni nur en 1931; sub trudo de l'okazaĵoj, ĝi aperas nun.

Kien sin direktas TAGE, de kiam ĝi fariĝis sufiĉe multnombra movado? Sufiĉas tralegi la kajerojn de IPR en lasta jaro, por konstati, ke ĝi tute apartenas al burĝa flanko de l'edukistaro: ĝi aliĝis la pacifistan maldekstran organizon FIAI (kaj per tio mem kaŭzas malkontenton de multaj SAT-anoj, ankoraŭ membroj de TAGE), ĝi ankaŭ aliĝis al kongreso de dekstra Mondfederacio (Ĝenevo). Tamen, K-do Gold-

berg eraras, supozante (en IPR, № julio-aŭg., p. 100), ke ni celas similan malrespekton al rajto de malplimulto per samigo de edukista SAT-sekcio kun iu esperanto-sekcio de Edikintern.

En samdata kajero de IPR, oni povas legi (p. 96) pri sukceso de instruisto en Köln, kiu instruis siajn gelernantojn preĝi en esperanto: «... klarvoĉe diras tion la instruisto kaj laŭte pie eksonas la belaj vortoj de l' «Patro nia» de kvardek junaj lipoj». Tiu instruisto certe estas afabla kaj fervora kolego, sed nenion organize komunan ni volas havi kun li.

En sept-okt. kajero de IPR, d-ro K. Riedel finas sian artikolon pri Helsingör'a Mondkongreso per stranga konkludo: «La esperantista pedadgogaro devos plenumi ankoraŭ gravajn taskojn (ellaboro de pedagogia terminaro en esperanto), antaŭ ol fari nenion pli bonan ol sin politike disigi». Stranga logiko! Ĉu d-ro Riedel forgesas la gravan laboron provatan sur tiu vojo de la esperanto-resumo de Vojo de Klerigo? ĉu li scias, ke K-do Filipov entreprenis terminologiajn serĉadojn en ĉiuj pedagogiaj esperanto-eldonaĵoj postmilitaj (pedagogia rubriko de Sennacieca Revuo, TEPS-informilo, resumo de V. de Kl; IPR, pedagogia serio de la Nova Epoko...)? Ĉu li scias, ke SAT-edukistoj jam planis eldonon de la 7-lingva pedagogia terminologia vortaro kun esperanto kiel ĉeflingvo kaj ke tiu plano longe studita ne estas ia malklara nebulo? Ĉu la laboristoj devas atendi la teknikajn perfektojn por sin liberigi? ĉu la SAT-anoj malpravis, disiĝante de la neŭtrala movado per proklamo: «For la neŭtralismon»!, ne atendante pliajn aldonojn al la Fundamenta Vortaro? Ĉu ne estas strange, ke tiu SAT nuntempe mem eldonas tiun grandan esperanto-esperantan vortaron, kiun tiom bezonas la tuta esperantistaro! Ankaŭ sur la terminologia kampo, la estonto montros, ĉe kiu flanko kuŝas la pure scienca laboro.

En sama kajero de IPR, d-ro Riedel klare konfesas sian maldekstran burĝecon (p. 118). Al nia aserto, ke en nunaj kondiĉoj de l'internacia vivo, TAGE povas aliĝi nur burĝan movadon, li respondas: «Mi estas homo, kaj portas mian koron maldekstren, sed mia cerbo funkcias feliĉe ankoraŭ duflanke». Erara metaforo, (ĉar nur supraĵa vorta komparo) se ne misofendo. Le cerbo de SAT-edukistoj ne funkcias kriple, ĝi klare konscias pri la du flankoj de homara vivbatalo kaj plenkonscie la SAT-edukistoj elektas unu flankon, tiun de la vera maldekstra parto, de la proletaro — dum la klaskonscio de radaktore de IPR estas ankoraŭ malforta kaj neklara, kaj li «ne ankoraŭ» kapablas elekti.

Deziro de k-do Goldberg estas, «ke en TAGE kaj IPR resonu la bataloj, kiujn ni aktive partoprenas en la instruistaj asocioj ĉiulandaj». (IPR, nov. 1929, p. 134). Kredeble temas ankaŭ pri katolikaj kaj faŝistaj bataloj. Se ni legas la raporton pri TAGE-kunveno en Budapeŝta kongreso, (IPR, sept-okt. 1929, p. 115—116), ni konstatas, ke iu kolego propagandis por la infangazeto «La Etule» el Parizo (pure katolika) kaj ke al la kunvenantaro «ĝi ŝajnis esti rekomendinda»; «la ĉefa sukceso de la pedagogia konferenco estis la akcepto de 5-persona delegitaro ĉe la ministro de la kulto». SAT-edukistoj neniam toleras kunrespondeci pri sendo de delegitaro al kulta ministro de faŝisma reĝimo.

Mi ne intencas ĉi tie ofendi la fervoron kaj sinceron de K-do Goldberg kaj d-ro Riedel. Sed venis tempo prikonsideri nian movadon laŭ nia socialista penso. Ni scias, ke en krizaj transiraj periodoj, je nomo de komuna ĉiuklasa bono travas burĝa flanko defendantojn ĉe avangarduloj mem pro diversaj flankaj malhelpoj ne tuje venkeblaj. Iom post iom ĉiuj avangardaj edukistoj kuniĝos en nia SAT-edukista sekcio forlasinte gvidajn postenojn en TAGE. Certe kaj dezirinde, ili ankoraŭ abonos IPR, precipe se ĝi liveros «neŭtralan» (teknikan kaj rigore objektivan) informaĵon anstataŭ longaj propagandaj artikoloj tendencantaj al burĝa edukpacifismo.

Oni nombris ĝis nun 5000 esperantistajn edukistojn en tutmondo. IPR havas 800 abonantojn, el kiuj apenaŭ kvarono estas SAT-anoj. Multajn milojn povos ankoraŭ konkeri IPR. Sed ni ne plu volas oferi sur altaro de la neŭtralismo la centojn da fervoraj SAT-edukistoj, kiuj ne volas aboni la neŭtralan organon.

M. Boubou

---

## Ligo per esperanto inter blankrusaj kaj francaj geedukisoj

Karaj Kamaradinoj

Al feministinaj grupoj de la Ruĝa Franca Edukista Federacio.

Konatiĝinte kun via alvoko en bulteno de Tutmonda Esperantista Pedagogia Servo pri korespondado, ni, geinstruistoj de Kopysa rajono (distrikteto), tre volonte akceptas vian proponon. Ni diras: genstruistoj — ĉar la korespondado interesas ne nur instruistinojn, sed ankaŭ la instruistojn. Niaj geinstruistoj kunvenas ĉiudumonate kaj dum la kunvenoj ni legos viajn leterojn kaj respondos.

Nun ĉiuj laboruloj de Sovetio streĉas siajn muskolojn kaj mensojn por krei fundamenton de socialismo — teknikan bazon. Neniu laborulo staras flanke. Ni geinrtruistoj ankaŭ partoptrenas en konstruado de nova vivo. Malklero de nia laboristo kaj kamparano multe malhelpas al sukcesa konstrua laboro. Sekve, de la laboro de la soveta insruisto parte dependas la sukceso. Unu el la metodoj por plialtigi la rezultojn de la laboro estas metodo de socialista konkurado. Fabriko kontraŭ fabriko, laborejo kun laborejo konkuras en kvanto da faritaj produktoj. Tian metodon ni ankaŭ uzas en lerneja kaj kultura laboro. Ni pensas, ke la metodo estas taŭga ne nur en Sovetio. La specialista konkurado povas plivigligi ankaŭ laboron de proletaj organizoj en kapitalistaj landoj.

Nia kunveno, pridiskutinte la demandon, decidis averti la edukistinajn grupojn de Franca Ruĝa Instruistaro por inviti ilin al socialista konkurado kun la geinstruistoj de nia distrikteto. Ni sendas al via organizo la taskojn, kiujn prenas memvole niaj geinstruistoj. Nia instruistino ne apartigas sin en la plenumo de la taskoj. Samtempe ni invitas la Feministinajn Grupojn el Ruĝa Franca Geedukista Federacio pligrandigi kontakton kun fabrika proletaro virina, organizante:

a) konversaciojn kun laboristinoj pri politikaj temoj,
b) legadon de laboristaj gazetoj en virinaj kunvenoj,
c) lukton kontraŭ minacanta milito, kiun intencas tutmonda kapitalistaro kontraŭ Sovetio.

Ni aldonas al la letero Kontrakton, en kiu niaj geinstruistoj starigas antaŭ si plenumotajn taskojn. Via organizo en la kontrakto ankaŭ metu antaŭ sia organizo taskojn, kiujn ĝi devas plenumi, se vi deziras konkuri kun nia organizo. Unu ekzemplero de la kontrakto restu en via grupo, duan subskribitan de via grupo resendu al ni. Nia loka komitato de sindikato de eduklaboristoj vin sciigos pri pasado de konkuro, pri plenumo de taskoj, kiel de ĉiuj geinstruistoj, tiel aparte de instruistinoj.

Estu la kontrakto nia ĉiama firma daŭra interligo sur kampo de kreo de socialismo en tutmondo. Akceptu nian varman amikan saluton!

En la nomo de geinstruista konferenco de Kopysa distrikteto subskribis: Traskoviĉ k Astrahoviĉ.

Adreso de nia esperanto-peranto: P. Krapivin, v. Anikoviĉi, P.O Maslaki, Orŝansk okrug, (Blankrusio). USSR.

Esperanto-teksto de P. Krapivin.

---

## Kontrakto pri socialisma konkurado inter geedukistoj

de Kopys'o distrikteto (Blankrusio) kaj edukistinoj el Ruĝa Francia Geedukista Federacio por lernojaro 1929—1930 (esperanto-servo).

La kontrakto inter la du organizoj estu pri jeno:

La kontrakto inter la du organizoj estu pri jeno:

A. — Kopys'aj geinstruistoj prenas sekvontajn taskojn:

1 — Lukton kontraŭ rompo de la laboro per neakurata vizitado de la lernejoj, kiel de instruistoj, tiel de lernantoj, ĝis plena 100%-a likvido de la manko;

2 — Sisteman laboron por plialtigo de la labordisciplino en lernejo;

3 — Likvidi dujarecon (lerno dum du jaroj en la sama lerngrupo), malpliiginte ĝin de 18—20%, kiel estis lastjare, ĝis nur 7%;

4 — Tutan laboron fari laŭ plano, prilaborante produktadan (organizan) planon por tuta jaro antaŭ la lernjaro kaj laboran (kalendaran) kompilante antaŭ ĉiu duonjara periodo;

5 — Likvidi analfabetecon de 15000 analfabetuloj plenaĝaj (en aĝo de 12 ĝis 40 jaroj), la laboron fari senpage, entirante en la laboron ne malpli ol 60% el ĉiuj geedukisoj de la distrikteto;

6 — Atingi decidon de la loĝantaro pri fermo en la distrikteto de 5 preĝejoj, (3 kristanaj kaj 2 hebreaj);

7 — Malfermi 10 ruĝajn anguletojn (vilaĝajn klubetojn) kaj 10 agrikulturajn rondetojn;

8 — Varbi 10 geedukistojn en por-foresta (perletera) pedagogia fakultato kaj teknikumo;

9 — Varbi 2 geedukistojn en por-foresta kurso de sindikata movado;

10 — Atingi plenan plenumon de la lernprogramoj;

11 — Plivastigi kontraŭreligian kaj internacian edukadon meze de plenaĝa loĝantaro kaj gelernantoj, organizante 10 ĉelojn de «Kontraŭdiuloj» kaj varbonte ĉiujn gelernantojn kiel membrojn de IRH (Internacia Ruĝa Helpo )kaj OZET (societo, kiu havas celon helpi al hebrea loĝantaro estiĝi agrikulturistoj);

12 — Per lernantoj pligrandigi partoprenon en plialtigo de rikolto, kolektante cindrojn, agitante por likvido de limoj inter kampoj, por purigo de semoj, ktp...

13 — Ne malpli ol unufojon ĉiusemajne en lernejo legi gazetojn kaj ĵurnalojn al la plej aĝa loĝantaro kaj lernantoj;

14 — Altiri la gelernantojn en disvastigo de la presaĵoj meze de la loĝantaro, atingi, ke ĉiu lernanto varbu unu abonanton de presaĵo kaj ĉiu lernejo abonu ne malpli ol 3 ekzemplerojn de diversaj ĵurnaloj;

15 — Atingi bonan laboron de la lernantoj en memgvidaj organizoj; komitatoj de lernantoj, sanigaj kaj kulturaj komisionoj kaj aliaj, entirante ĉiujn gelernantoj de triaj kaj kvaraj lerngrupoj de elementa lernejo kaj ĉiujn lernantojn de 7—jara lernejo en unu el la komisionoj;

16 — Partopreni en disvastigo de la 3-a ŝuldo-prunto de industriigo de Sovetio, aĉetinte per gelernantoj de ĉiu lernejo ne malpli ol 5 rublojn de obligacioj por ĉiu komenca lernejo kaj 50—rublan obligacion por ĉiu 7—jara lernejo.

Komisiite de geinstruistoj de Kopüsa distrikteto: (subskriboj).

R e d a k c i a n o t o. La konkuron, kiun blankrusaj edukistoj proponis per esperanto al francaj avangardaj instruistinoj, povas akcepti kompreneble ĉiu ajn alia organizo edukista. SAT — instruistoj peradu la internacian kunligon de viaj sindikatoj kun la sovetaj!

## Kieva instruistaro por esperanto!

(Faktoj el nia pedagogia vivo).

1. Gravaj decidoj: Teatro je la nomo de la fama popola ukraina poeto Taras Ŝevĉenko. La plej granda drama teatro en Kievo. Okazas ĉiujara konferenco de kleriglaborantoj. Pli ol milo da pedagogoj. Ĉeestas instruistoj, edukistoj el infanĝardenoj, instruktoroj de diversaj fakoj: artoj, korpkulturo... Vera instruista parlamento.

Oni priparolas gravajn demandojn de nova soveta edukado.

— Plifortikigu internacian edukadon. Pli vaste utiligu internacian lingvon. Lernu esperanton gek-doj! Aranĝu en viaj lernejoj esperanto - rondetojn...—flame vokas K-do SAT-ano 5627.

El rezolucio: «...pli da atento al internacia infana ligo... utiligi pli vaste internacian lingvon esperanto... ĉe lernejoj, infandomoj, pioniraj taĉmentoj organizi esperanto—rondetojn... krei ĉe Centra Domo de Klerigo esperantokursojn por geinstruistoj...» Ĉiuj punktoj estas unuvoĉe akceptataj. Ĉiuj forte aplaŭdas.

Antaŭ nelonge, multaj pedagogoj el Kiev ja ankoraŭ ridetis skeptike ĉe la sola vorto «esperanto».

* * *

2. Ĉe fervojistaj kleriglaborantoj. Instruista konferenco de Sud-Okcidenta fetrvojo. El ĉiuj lokoj de Ukraino alvenis pedagogoj. Laboras internacieduka seckio (Konvinka ekspozicio de lerneja peresperanta ligo). Raportas K-do SAT-ano 4554

— «...por vasta aplikado de esperanto en lernejo... por esperantorondetoj en ĉiuj fervojaj lernejoj...» — unuanime aprobas la konferenco.

Tiaj estas la faktoj el nia praktiko.

D. Viktorov-Ĉeĥoviĉ kaj B. Egers

---

**En Saksio 300 edukistoj abonas la neŭtralan I. P. R-on.**
**En Sovetio 800 edukistoj abonu S. P. R-on en 1930!**

## LA ANGULO DE L'INTERHELPO

### Letero al italaj, francaj, svisaj, germanaj, norvegaj, japanaj, usonaj, anglaj geinstruistoj

Karaj Gekolegoj!

Geinstriustoj en Krjukova fabriklernejo tre bezonas detalajn informojn pri organizoj kaj festoj, kiujn oni aranĝas en viaj landaj lernejoj kaj pro tio ili tre petas vin sendi materalojn laŭ jenaj demandoj;

1 — Kiuj infanorganizoj estas permesataj en lernejo kaj ekster lernejo?

2 — Kiel pedagogoj organizas ĉiutage infanripozon, libertempon kaj amuzon dum interrompo de studado?

3 — Kiujn festojn oni aranĝas por infanoj en lernejo?

4 — En kiuj ĝeneralaj festoj (por plenaĝaj civitanoj) patroprenas infanoj?

Ne forgesu, karaj Gek-doj, ke viaj ĝustatempaj informoj helpos al nia laboro kaj pli altigos valoron de esperanto al edukistoj.

Do skribu laŭ adreso: USSR. K r j u k o v o ap. N e p r o — 7-j a r a f a b r i k l e r n e j o, a l i n s t . G. B a b e j k i n.

---

### Peto de Pedologia scienc-esplora katedro ĉe supera instituto de popolklerigo en Kiev al ĉiulandaj geinstruistoj

Karaj Gekolegoj!

Surbaze de sperto en kelkaj Kievaj lernejoj pri peresp-a internacia laboro, nia pedologia katedro ekinteresiĝis pri la demando de Internacia eduko en lernejo. Tiucele, ĉe Kieva laborlernejo № 43 estas organizita eksperimenta studo inter la lernantoj. El la lernantoj de superaj klasoj oni fondis esperanto-rondeton. La rondeto celas praktike utiligi espon por interligo, por kolekti diversan utilan por lernejo materialon kaj sciigojn el ĉiuj landoj de la mondo, utiligi la ricevitajn materialojn por pliviligligo de la lernprocedo.

Samtempe la gvidantoj povas fari observojn pri la infanaro, esplori percepton de infanoj al la lingvo, metodojn de instruo, influon de esp. studo al infanoj, ilian intereson por internacia korespondo kaj influon de la korespondo al la infana psiko. Laŭeble estos fiksata laŭgrada internaciiĝo de infana psiko, la plej interesaj fenomenoj, tiurilataj opinioj de infanoj , iliaj reagoj...

Siaflanke la gvidantoj utiligos dum laboro ĉiujn edukklerigajn elementojn.. Sciencesplora Katedro inrteresiĝas pri vivo de lernejoj en diversaj landoj.

Metodikaj demandoj precipe estas interesaj. Jen estas vico da demandoj, al kiuj komence ni petas respondi: 1) Kiajn edukajn influrimedojn oni uzas en via lernejo? 2) Kondutregularo por infanoj en lernejo, 3) Kiujn lernilojn oni aplikas, instruante abocon al infanoj (precipe urbaj)? Ni deziras ricevi de vi ĉefajn aboco-librojn uzatajn en via lando. Ni intencas kolekti aboco-librojn el tutmondo por ekspozicio. Vi bonvolu aldoni klarigojn en esperanto, por ke ni klare vidu ideon de l'aŭtoro. Nia rondeto ankaŭ bezonas koresnpondon kaj interaŝanĝon per diversaĵoj. Bonvolu ligi ĝin kun viaj lernantoj aŭ doni la adreson al alia lernejo. Ni esperas ankaŭ vian personan kunlaboron kaj garantias akuratan respondon kaj plenumon de viaj petoj. Saluton kaj antaŭdankon.

USSR. K i e v, — ul V o r o ŝ i l o v a 25—T r u d ŝ k o l a № 43 (p o r P e d o l o g i a K a t e d r o).



Presejo «Internacia» de Moskva Trusto «Mospoligraf»

# NOVA PEDAGOGIO

## Mezuri la intelekton

Oni povas pesi varojn kaj precize certiĝi pri ties pezo rilate al la normo, ĉu po funto en Britio, ĉu po kilogramo sur la kontinento. Tamen ĝis lasta tempo, oni ne povis tiel agi pri la enhavo de l'kapo, nome la intelekto. Oni ne povis ĝin elkapigi por eltrovi la diferencon de l'unu kompare kun aliaj. Mankis mezurilo. S'ro Bine (Binet), franco, en jaro 1905-a elpensis rimedon, laŭ kiu oni povus konstati eĉ la enhavon de l'cerbo; li elpensis mezurilon. Li aplikis ĝin al 700 infanoj en la lernejo kaj tiel eltrovis, kiuj el ili estis sub la normo. Ĝi bone taŭgis por la junuloj, sed ne estis sufiĉe perfekta por tiuj, ni diru, pli ol 11-jaraj. S-ro Stanford, usonano, denove eksperimentis kun la Binet'a mezurilo kaj precizigis ĝin por la maturuloj, kaj eĉ por mezuri la super-normulojn. Li ekprovis ĉe 1 000 junuloj inter 5—14 jaraĝaj, kaj lia mezurilo nomiĝas la Binet-Stanford mezurilo. (Vidu angle: L. M. Terman, «Measure your Mind»).

Oni ankoraŭ ne plene fidas je ĝi, kaj ĉe la lerneja ekzameno oni uzas ĝin kune kun la normala ekzamenoprovo kaj ankaŭ la opinion de l'instruisto bazitan sur la laboro de l'junulo en la klaso.

Oni komparis la junulojn de la lernejoj en laboristaj kvartaloj kun tiuj de l'mezklasa kaj kapitalista kvartaloj kaj trovis, ke la riĉaj junuloj havas intelekton mezan ĝis unu jaro, pli maturan ol la laboristaj. La inoj superas la junulojn ĉie krom ĉe la laboristaj, eble ĉar ili pleje prizorgis la infanetojn. Ĉi tio montras eblan diferencon pro la heredo aŭ la medio, kaj eŭgenikistoj erare konkludas, ke la kapitalistoj regas kaj la laboristoj laboras, ĉar la kapitalistoj havas pli da intelekto ol havas la laboristaro.

Tiu diferenco en la mezurado ĉe ambaŭ sferoj montras, ke la mezurilo ankoraŭ ne estas je 100% perfekta, ke ĝi ankoraŭ ne povas trafi la laboristojn, ĉar ĝi postulas scion pri abstrakto kaj vortaro, kiu mankas al ili pro diferenco ĉe hejmo kaj lernejo.

Ni estu klaraj pri tiu ĉi afero. Ni ne celas mezuri la informon, kiun oni lernas, sed la ennaskitan cerbo-kapablon, — la kapablon por lerni.

Oni tiel eltrovas, ke grupo da junuloj tre varias. Ekzemple, ĉe 10-jaruloj troviĝas intelekto de 7-jaruloj, kune kun tiu de 12-jaruloj. En tia klaso, la intelekte 7-jaruloj nenion lernos, kaj la supernormuloj intelekte 12-jaraj nesufiĉe lernos. Kiel eblas instrui en klaso kun tiom da diferenco? Ili devus esti en apartaj klasoj. Tiuj havantaj intelekton de 12-jaruloj, kvankam 10-jaraj, devus troviĝi ĉe 12-jaruloj, kaj la, laŭ intelekto, 7-jaruloj--ĉe la 7-jaruloj, aŭ en aparta lernejo. La subuloj aŭ superuloj ĉe iu ajn aĝo restas sub- aŭ superuloj tra la tuta vivo.

Oni kombinas diverse la demandojn, tiel ke en la mezurilo troviĝas eble 6 apartaj planoj kaj eble 2 alternativoj. La instruisto povus tiel anstataŭigi unu aŭ du por la aliaj, se li tion volus.

Binet diris, ke «juĝi bone, kompreni bone, kaj rezoni bone, estas la esencaj agadoj de l'intelekto». La intelekto devas kompreni, scii familiarajn objektojn, citi ciferojn post unu aŭdado, kaj solvi problemojn. Tio ĉi estas nur skizo kaj ne la tuto.

Ĉe 3-jaroj, demandu la etulon: Montru vian nazon. Kio estas tio? (Montri al ĝi aĵojn, tranĉilon, ktp). Ĉu vi estas knabo aŭ knabino? Kio estas via nomo? Diru, «Patrino» (Mama). Ripetu (6-7 silaban frazon); ekz.: ni havas etan hundon. La hundo kuras post la kato. En somero la suno estas varmiga.

Ĉe 4-jaroj: oni demandas:

Kion vi devas fari, se vi estas dormema? malsata? malvarma? Respondoj estas diversaj, sed ĉe la dua taŭgos: mi devas manĝi; mi devas trinki lakton.

Ĉe 6-jaroj:

Kion vi faras, se pluvas, kiam vi iras al la lernejo? se via domo pro brulo detruiĝas? se vi ekiras al iu loko kaj ne trafas la vagonaron?

Ĉe 8-jaroj:

Kion vi faras, se vi rompas ion, kio apartenas al alia? se sportokunulo vin frapas, sed ne celis tion fari?

Ĉe 10-jaroj:

Kion vi devus diri, se iu petas vian opinion pri persono, kiun vi ne tre bone konas? Kion vi devus fari antaŭ ol komenci ĉe io tre grava? Kial devus vi juĝi pli laŭ ies ago ol laŭ ies vorto?

La junulo ankaŭ devos ripeti nombrojn tiel aŭ inverse (malantaŭen); ekz., oni diras 41 923; li respondas 32 914.

Skalo:

| Tiel | | Inverse | |
|---|---|---|---|
| 3 ciferoj | 3 jaroj; | 3 ciferoj | 7 jaroj; |
| 4 » | 5 » | 4 » | 9 » |
| 5 » | 7 » | 5 » | 12 » |
| 6 » | 11 » | 6 normulo | 15—17 j; |
| 7 » | 14 » | 7 superulo | pli ol 17 j.; |
| 8 » | superulo. | | |

La cerbo ne povas sorbi pli ol difinitan nombron, kaj oni povos tiel eltrovi pli-malpli, en rapida maniero, la kapablon de l'etulo.

La junulo havas liston da misaranĝitaj frazoj, kiujn li devas ordigi, ekz.: Viroj flugilojn havas ĉiuj. Tiu frazo sonas komprenebla en esp-o, ĉar tiu lingvo ja estas fleksebla; sed ne estas tiel en la naciaj lingvoj.

Ekzistas eble 400 diversaj proviloj, kaj laŭ la kombino en grupoj de 6 ĝis 8, oni rapide aljuĝas la kapablon.

Oni malfermas vortaron kaj diras unu vorton eble el ĉiu paĝo-subo. La junulo eble ne povas respondi plene, sed se li iom komprenas ties signifon, li ne malsukcesas:

40 vortoj el 100=12 jaroj; 50=14 jaroj;
65—normulo; 75=superulo.

La mezurilo nun prove aplikiĝas por eltrovi la plej kapablajn por diversaj fakoj kaj metioj. Ne ĉiu ekzerco dependas je respondo. Oni prezentas antaŭ la junulo problemojn, kiujn li devas kopii, alearon, tra kiu li devas iri ĝis la centro, ktp.

Al ĉiu kandidato ĉe soldatiĝo en la usona armeo, en j. 1917, oni po 500 en 50 minutoj aplikis tiun ĉi mezurilon. La nova soldato devis ĉe 8 problemoj per plumo substreki la ĝustan vorton (estis eble 40 vortoj ĉe ĉiu problemo). Tiel tre rapide montriĝas uloj taŭgaj por altaj aŭ malaltaj postenoj. Oni mezuris 1 700 000 da soldatoj kaj trovis jenan rezulton: sub 10-jara menso—10%; 10-11 j.—15%; 11-12 j.—20%; 13-14 j.—25%; 15-16 j.—16½%; 16-17 j.—9%; 18-19 j.—4½%; La meza mensaĝo estis 13-14 j.; troviĝis tiaj nur 25%. Sub tiu ĉi tre malalta mezo troviĝis 45%; supermeze 30%. La plej superaj estas lingvistoj kaj filozofoj; ne tiel altaj estas la komercistoj.

Evidente, kvankam la korpo kreskas ĝis maturiĝo, kaj la individuo vivas eble ĝis 70 jaroj pli-malpli, tamen la meza cerbo ĉesas kreski post la 14-a jaro. Tiuj ĉi homoj estis tipaj maturaj homoj, sed laŭ tiu ĉi konstato, ilia intelekto ne estas tre alta. Ĉi tio konstatas, ke ĉe la normala homo m a n k a s intelekto. Ĉu eblas esperi, ke tiaj homoj i n t e l e k t e forigos la nunan socian sistemon kaj enkondukos socialismon?

Laŭ mi—ne. Same kiel en antaŭaj epokoj, ankaŭ nun, la homoj vivas sub la nuna sistemo ĝis tia momento, kiam ili ne plu p o v o s tiel vivi. La medio ne restas statika, sed dinamika, t. e. ĝi konstante ŝanĝiĝas. T i u ŝ a n ĝ i ĝ o en la medio finfine devigos al tiuj homoj forpuŝi la nunan kaj enkonduki novan socion. La homoj agos ne pro intelekto, sed pro devigo.

A l i a j p r o v o j.

Analogio. Ĉielo: bluo: herbo: tablo, v e r d o, varmo, grando. La ulo devas substreki la ĝustan vorton. Kiel al ĉielo rilatas bluo, tiel al herbo rilatas...?

Informo. Homoj aŭskultas per siaj okuloj, o r e l o j, nazo, buŝo. Kompletigo de frazo. La hundonomo..... Jako. (Enskribi «estas»).

Juĝo. Kion fari, se oni estas soifa?

a) plori ĝis oni alportos trinkaĵon;
b) manĝi pecon da sala porko;
c) akiri trinkon da akvo;
ĉ) legi reklamon.

Meti (x) ĉe la ĝusta respondo.

J. F l o r o

## PRI INFANAJ KONSUM-KOOPERATIVOJ EN SOVETA LERNEJARO

Kiel unu el specoj de sociutila laboro kaj de memorganizado de lernantoj ekzistas en multaj sovetaj lernejoj infanaj konsumkooperativoj.

Tiuj kooperativoj havas la taskojn:

1. provizi lernantojn per nemultekostaj skrib-kaj instru-komercaĵoj, (tio estas precipe grava por vilaĝaj lernejoj, ĉar en lokaj vilaĝaj konsumkooperativoj oni ne povas aĉeti necesajn lernejajn varojn, ĉar ĉi tiujn varojn ne sufiĉe atentas administrantaro de kooperativo; eĉ se tiuj varoj troviĝas en kooperativo, ilia sortimento ofte ne koncernas lernejajn bezonojn);

2. praktike konatigi al la lernantoj la principojn de kooperativa afero, ĝia organizado, kalkulado, ktp...

3. tiu lerneja kooperativo, prizorgata de lernantoj mem, donas vastan kampon por memorganizado de infanoj, por enlaboro en ili de organizaj kutimoj, kiuj estas tiel necesaj en nia lando dum periodo de konstruata socialismo;

4. tiu kooperativa laboro ĝuste direktata, trafe solvas (kune kun aliaj memorganizoj de lernantoj) la demandon pri lerneja disciplino (plimalmultiĝas nombro da diversaj infanaj petoloj, ĉar infana troa energio trovas utilan aplikadon).

Jen kiel mi organizis konsumkooperativon infanan en mia lernejo.

Antaŭ ĉio mi mem studis tiun demandon en nia pedagogia gazetaro kaj mi konsiliĝis kun spertaj pedagogoj. Poste mi komencis preparan laboron kun lernantoj dum 2-3 semajnoj por krei infanan intereson kaj opinion ĉirkaŭ la demando (rimedoj: eksterklasaj konversacioj individuaj kaj komunaj, rakontoj pri praktiko de infankooperativoj en aliaj lernejoj, ktp...).

Kiam al mi ekŝajnis, ke la intereso por tiu afero ĉe la infanoj ekbruliĝis, kaj kiam kelkaj infanoj mem ekpostulis organizon de kooperativo, mi kunvokis komunan kunvenon de lernantoj. Ni pridiskutis regularon, difinis kotizojn, elektis gvidantaron kaj kalkulantaron.

La gvidantaro kunligiĝis senpere kun distrikta kooperativa unio, atingis kreditojn ĉe diversaj organizoj kaj privilegiojn. Sekve de tio, nia lernejkooperativo povis vendi varojn je 1-2 ĝis 5 kopekoj pli malalte ol nia vilaĝa konsumkooperativo pri la samaj varoj.

Dum tri monatoj, nia kooperativo disvendis inter lernantoj (nia lernejo nombras 100 lernantojn) diversajn skrib-kaj instru-varojn por sumo de 300 rubloj.

Pro malmultekosto de niaj varoj en nian kooperativon turnis sin ankaŭ gepatroj kaj loka loĝantaro. La laboro de nia kooperativo estis pridiskutata multfoje en komunaj kunvenoj de lernantoj kaj en lerneja murgazeto. La profiton de vendado (3 rublojn) ni uzis por akiro de infanapoteko.

A. B. Ŝatalov

## LA SOVETA PEDAGOGIA GAZETARO

La decida ruinigo de l'malnova lernejo, grandega krea laboro por formado de l'nova soveta pedagogio, kiu konformas al interesoj de laboruloj, aperigis grandan postulon pri nova pedagogia literaturo. Ĉi tiu postulo akcelis ankaŭ aperon, en kompare mallonga tempo, de granda reto da pedagogiaj revuoj. Tiuj pedagogiaj revuoj distingiĝas per pluraj specifaj trajtoj inter la tutmonda, pedagogia gazetaro: ili estas ne izolaj organoj de apartaj institucioj aŭ grupoj, sed partoj de granda eduk-ad-organizo, partoj kun klare difinitaj funkcioj, konformaj kun certa ĝenerala plano; ili estas laborcentroj, akumuliloj de novaj spertoj, gvidlumiloj por novaj serĉadoj, forĝejoj de la nova soveta edukado; fine, ili estas bataliloj, propagandiloj, reedukiloj por la granda maso de l'eduklaboristaro.

Laŭ nekompletaj statistikoj, dum la periodo 1917—1924 naskiĝis pli ol 300 tiaj revuoj. Pedagogiaj gazetoj tiujaraj respegulis per sia enhavo kaj aliaj trajtoj tiujn unuajn paŝojn en la konstruado de l'popola klerigo, por kiuj estas karakteriza la serĉado de novaj ĝeneralaj vojoj, la organiza senformeco, kompare malgranda kvanto da praktikuloj, konstruantoj ĉe nova soveta lernejo. Temoj de artikoloj estis ĝeneralaj, la materialo — hazarda, ne ligita kun la bezonoj de kresko kaj evoluo de l'popola klerigo; forestis sperto el la vivo de l'lernejo «kia ĝi estas», treege limigita estis rondo de aŭtoroj kaj de verkistoj. Sed samtempte la unuaj revuoj ludis grandan rolon en la kreado de l'nova lernejo. Ili vekis la penson de l'avangarda pedagogo, efektivigis lian soci-politikan edukadon.

Transiro al la organisma konstruado sur la bazo de mastrumaj kaj planaj prikalkuloj forte influis ankaŭ la pedagogian revuon. La kvanto da revuoj rapide malpliiĝas dum la kvalito ŝanĝiĝas. La revuo komencas orientiĝi je difinita leganto, en la elekto de materialo jam malplimultiĝas hazardeco, la loka vivo pli bone estas respegulata, kaj plej ĉefe estas, ke la nova leganto — la amasa pedagogo — komencas eligi el sia medio aktivistojn kiel aŭtorojn, kiuj laŭgrade tute ŝanĝas la vizaĝon de l'ped. revuo. La moderna pedagogia revuo fariĝas iom post iom organo por gvidi la aktualan pedagogian praktikon. El la revuo de «aparatanoj» (gvid-oficistoj), ĝi transformiĝas iom post iom en la organon de l'loka pedagogia publikeco, per kiu la centra kaj loka aparato de popola klerigo, helpe de plej bona pedagogia aktivularo, konkeras ĉiam pli grandajn rondojn de l'edukistaro.

Ĉi tiu evolua procedo ne estas tamen ankoraŭ plenfinita.

La kvanto da pedagogiaj revuoj nun atingas en RSFSR 60, en Ukrainio — 20. Ekzistas revuoj ankaŭ en aliaj respublikoj de l'Unio. Laŭ teritorio priservata oni distingu centrajn revuojn (en RSFSR—15, en Ukrainio—5) de lokaj. Iliaj taskoj ne estas samaj. La ĉefa rolo de centraj organoj estas ideologia gvidado de l'edukistaro kaj helpo al larĝa interŝanĝo de spertoj en la tutunia aŭ tutrespublika skalo. Ili devas

ĉiuflanke lumigi la plej aktualajn problemojn de l'popolkleriga konstruado, doni konsekvencan marksisman bazon por solvo de ĉi tiuj problemoj, klarigi la esencon de l'soveta maniero kapti la problemon, preni el la spertoj de l'pasinto kaj de burĝaj landoj ĉion por ni taŭgan, ĉion kio povas por ni utili, samtempe forĵetante ĉion, kio malhelpas, efektivigi la taskojn de l'moderna lernejo. La centraj gazetoj devas prikalkuli la spertojn de lokoj, ĝeneraligante ilin, pritaksi la lokan konstruadon. Kontraŭe al tio ĉi, la lokaj ped. gazetoj, ne forgesante la ideologian gvidadon, direktas sian atenton al la tasko de l'priservo de la lokaj, distriktaj bezonoj; ili individuigas ĉiujn aktualajn problemojn, uzas la lokan gazetaron. Sed ĉiam pedagogia gazeto — ĉu centra ĉu loka — restas organo «militanta», batalanta kontraŭ ĉiuj postrestoj de l'malnovo, kontraŭ ĉiuj etburĝaj influoj en la afero de l'klerigo kaj edukado. Oni provas altiri al kunlaboro, kiel aŭtorojn de artikoloj kaj kiel korespondantojn, ne nur edukistojn, sed ankaŭ sociemulojn kaj kultur-aktivulojn el laboristaro kaj kampularo, anojn de l'sovet-sekcioj, de l'asocioj «For Analfabetismon» kaj «Infanamikoj» ktp. La revuo, precipe loka, devas liveri al tiuj aktivuloj necesan materialon por kontraŭbati tiajn manifestojn de l'etburĝa influo, kiaj estas, ekzemple, la kresko de kontraŭsemidismo, religiaj inklinoj, dekadence - kontraŭsociaj grupiĝoj en la lernejo ktp. Tamen la ped. revuo orientas sin esence al la edukisto aŭ kleriginspektoro, kaj ne povas speciale priservi gepatrojn kaj eksterlernejan aktivularon. Des pli grava fariĝas tial tasko organizi kontakton inter la pedagogia kaj la ĝenerala gazetaro. Tiurilate estas nur farataj la unuaj paŝoj.

Krom laŭ teritorio priservata, la gazetoj pedagogiaj varias ankaŭ laŭ sia destino. Dum la plejmulto el ili estas destinata por la amasa edukisto, ekzistas ankaŭ organoj por pedagogia aktivularo aŭ pli kvalifikita parto de edukistoj (scienc-pedagogiaj revuoj). Tipon de tia scienca revuo prezentas, ekzemple, la ukraina monatrevuo «Ŝlaĥ Osviti» (La Vojo de Klerigo), vaste konata al eksterlandaj legantoj dank'al sia esperantlingva resumfolio. La eldonkvanto de ambaŭ revuo-tipoj tre klare montras diferencon inter ili. Se, ekz., «Ŝlaĥ Osviti» aperas en 4-5 mil kopioj, la poramasa monata ped. revuo «Radjanska Osvita» («Soveta Klerigo») en la sama Ukrainio jam havas 18—20 mil abonantojn, kaj la rusiaj «Metodiĉeskij Rukovoditel» («Metodgvidanto») — ĝis 36 mil, «Vestnik Prosveŝĉenija» («Klerigheroldo»), por nura Moskva distrikto destinata (legata, tamen ankaŭ ekster ties limoj), — 4-5 mil, nura leningraddistrikta «Prosveŝĉenije» («Klerigo») — 3 000, ktp. Pli grandaj ankoraŭ estas eldonkvantoj de pedagogiaj ĵurnaloj: «Uĉitelskaja Gazeta» («Instruista Ĵurnalo», Moskvo) aperas en 80 mil ekzempleroj, «Narodnij Uĉitel» («Popola Instruisto», Ĥarkovo) — 22 mil. Komprenebla estas, ke nome por tiaj amasaj eldonaĵoj plej gravas la problemo pri larĝa kunlaborigo de vastaj edukistaj rondoj. Ili estas entirendaj kiel aŭtoroj, ili estas alkutimigendaj sin turni al sia revuo pri ĉiuj aferoj de sia edukista kaj sindikata vivo (la t. n. «konsulta» laboro). En ambaŭ rilatoj ekzistas jam tute certaj realigaĵoj. La revuoj kiel la nomita

«Vestnik Prosveŝĉenija» kaj aliaj unuigis ĉirkaŭ si m i l o j n da aktivaj korespondantoj-eduklaboristoj. La revuo de Ivanovo-Voznesenska distrikto atingis tion per individua korespondado kun apartaj siaj abonantoj. Estas uzataj por la sama celo ankaŭ tiaj metodoj, kiel publikaj kunsidoj de l'redakciaj kolegioj, konferencoj de korespondantoj k. s. Tamen, la unua tutsovetia konferenco de redaktoroj de l'pedagogiaj revuoj, okazigita antaŭ jaro (1928), devis konstati, ke ĝenerale «la vojoj por altiri kunlaborantojn kaj korespondantojn, kaj por oprganizi konstantan kaj intiman interligon kun ili ne estis precize markitaj» (ĝis tiam, ĉar nun ĝuste la nomita konferenco donis pri tio ĉi konkretajn sugestojn).

La fakto, ke la amasa eduklaboristo ne ĉiam kaj ne ĉie fariĝis jam dominanta aŭtoro en la amasaj ped. revuoj (pli multe aŭtoras la klerigaj oficistoj kaj metodistoj), ne per tio, kompreneble, estas kaŭzata, ke kvazaŭ mankus al la vica instruisto fakta materialo, observoj kaj spertoj, sed ĉefe per lia literatura (koresponda) nesperteco. Tiurilate nun devas helpi al la ped. gazetaro la Eduklaborista Sindikato. La intima interligo de l'sindikataro kun la revuoj estas ĝenerale karakteriza trajto de l'soveta vivo, kaj la pedagogia gazetaro prezentas nenian escepton el ĉi regulo. Se eĉ la gazeto ne estas eldonata kune de l'komisariaj organoj kaj de sindikataj fakoj (similaj kune-eldonataj gazetoj ankaŭ ekzistas), tamen la influo de l'sindikato en la redakcio ĉiam estas asekurita, la sindikata vivo sur la kolonoj de l'revuo ĉiam respegulata. La eduklaboristoj en siaj kunvenoj (sindikataj) metas kaj priparolas diversajn problemojn, ligitajn kun la laboro de sovetaj pedagogiaj eldonaĵoj, aŭskultas raportojn de l'redakcio, korektas de sia flanko la laboron de ĵurnaloj kaj revuoj, organizas literaturajn vesperojn kaj disputojn, dediĉitajn al apartaj problemoj de l'pedagogia gazetaro. Kaj nun, kiam temas pri ankoraŭa levado de l'aktiveco de la eduklaboristoj, pri ilia «gazet-koresponda eduko», la sindikato, kiu havas ja inter siaj taskoj ĉiuflanke akceli ĉian aktivecon de ĝiaj anoj, helpos per organizo de specialaj korespondanto-kursoj por instruistaro kaj per enmeto de korespondant-problemo en la programon de ĉiuj kursoj organizataj por levi la kvalifikon de l'instrulaboristo.

Tute apartan lokon okupas en la kadroj de l'pedagogia gazetaro soveta la revuoj de naciaj minoritatoj. Nun proprajn naciajn pedagogiajn gazetojn posedas ne sole nacioj kun malnova nacia kulturo (ni citu, ekzemple, la judajn kaj germanajn ped. revuojn en RSFSR kaj en Ukrainio, la polan — uniaskalan kaj ukrainan en RSFSR, la tataran k. a.), sed ankaŭ la gentoj, nuntempe nur alvokitaj al la partoprenado en ĝenerala socia kaj kultura vivo — per la vojo de kreado sian nacian kulturon (ni nomu, ekz., pedagogiajn revuojn de Komi-a, Udmurta kaj Baŝkira respublikoj aŭ regionoj). Ĉi tiuj naciaj revuoj multe diferencas inter si koncerne objektojn de sia prefera atento kaj profundecon de ties tralaboro. Se, ekz., la revuoj juda kaj pola pritraktas principajn kaj ĝeneralajn pedagogiajn problemojn, la revuoj de l'hungarofinna grupo (komi-a kaj udmurta) pli atentas demandojn de la lingvo kaj la organizojn. La ukraina revuo (temas tie pri la gazeto

eldonata en RSFSR) de l'komenco mem ekprenis la program-metodajn problemojn kaj tiujn pri la hejmstudoj, ktp. La naciaj pedagogiaj revuoj prezentas gravan ĉenaron en la tuta kulturpolitika rimedaro de l'sovetpotenco. Lastatempe estas kreita speciala tutsovetia ped. revuo (ruslingva) dediĉita al problemoj de naciminoritata klerigo.

Ĉio dirita ne elĉerpas ankoraŭ la diversecon de tipoj de l'sovet. pedagogiaj revuoj, ĉar ili varias ankaŭ laŭ amplekso de sia enhavo: apud ĝeneralaj pedagogiaj revuoj, kiuj pritraktas problemojn de ĉiuj klerigo-branĉoj, oni trovas ankaŭ specialajn organojn, kiuj priservas edukistojn de apartaj branĉoj. Ekz la ukrainia «Robitniĉa Osvita» («Laborista Klerigo») estas destinita por eduklaboristoj de l'amasa profesia klerigo, la jaroslava (RSFSR) «Naŝ Trud» («Nia Laboro») atentas precipe instruistojn de l'duagrada lernejo, la leningrada «Krasnougolec» («Ruĝangulisto» — t. e. laboristo de l'ruĝa anguleto» — tiel tas nomataj kultur-klerigaj aranĝoj por laboristoj kaj oficistoj ĉe fabrikoj kaj oficejoj) — eduklaboristojn de l'politika klerigo; la abonantaron de l' «Prosveŝĉenije na Tránsporte» («La Klerigo ĉe la Transporto») montras jam la nomo de l'revuo mem.

Tia estas ĝenerala bildo de l'nuna soveta pedagogia gazetaro. Ĝiaj plej frapantaj trajtoj estas, sendube, senhezita komunisma gvidado kaj baziĝo sur edukista amaso. Kiel oni jam vidis, ne ĉio en la lasta direkto estas ankoraŭ atingita, tamen la vojo elektita restas, evidente, ĝusta. La mankoj neeviteblaj estos iom post iom forigataj. Al tio helpos, krom la forto-streĉoj de l'amasoj mem, ankaŭ ĉiama pliperfektiĝo de l' redakciaj kolektivoj, sperto-interŝanĝo en la redaktoraj konferencoj similaj al la jam okazinta. Oni povas ankaŭ multon esperi de l'agado de l'antaŭ du jaroj fondita Asocio de l'Laboristoj de la Pedagogia Gazetaro, kies tasko ja estas — plialtigi la kvalifikon de tiu laboristo kaj helpi senpere al la ped. gazetaro en ĝia malfacila kaj malsimpla laboro.

---

**Sovetiaj esperantistaj edukistoj!**

**Partoprenu la socialisman konkuron de S. P. R. — varbu nunjare la unuan milon da abonantoj al S. P. R. en Sovetio!**

## Radio kaj kino en usona lernejo

En Usono, la radio-sendstacioj apartenas al privataj firmoj. La ricevanto pagas neniom (kontraŭe en Britio, kie oni devas pagi 2/—ĉiujare) sed la rajton paroladi oni devas aĉeti. Firmoj tie tiel reklamas per dungado de famaj artistoj, fanfarone prezentataj de ies sapo, aŭto, ktp. Tial, ne ekzistas edukad-programo kun specialaj lerno-libroj, kiel en Britio. Kelkaj lernejoj (plejparte la duagradaj en la grandaj urboj) posedas aparaton, sed uzas ĝin por publikaj ceremonioj, ekz. por aŭskulti la paroladojn de la Prezidanto ĉe Armistica Tago (Batalhalta).

Laŭ la lasta ĉiujara raporto de la «Federal Commissioner» (Estro de la Tutusona Edukada Fako), raporto ĵus eldonita, «instrukcio per radio ricevas multe da atento. Multaj lernejoj en la urboj ekipiĝis per ricevilo kaj aliaj instalas ĝin. La «Ohio State Legislature» (unu el la 48 ŝtataj parlamentoj en Usono) jam voĉdonis monon por pligrandigi unuagradan edukadon per radio. La estro de edukada radio-dissendado en la ŝtato Ohio diras, ke pli ol 1 200 lernejoj anoncis, ke ili intencas starigi ricevil-aparaton». (Citaĵo el New York Times, nov. 24, 1929).

La «Columbia Broadcasting System» komencos la 4-an de februaro 1930 serion de Tutusonaj edukadaj dissendoj por infanoj el la 5-a grado kaj la plej junaj infanoj el altlernejo (t. e. infanoj 11—15-jaraj). Ĝi eksperimentos per du duonhoroj ĉiusemajne ĝis junio. La firmo anoncis broŝurojn por radio-instruado. Unu periodo okupiĝos per la drama prezentiĝo de naciaj herooj, de gravaj okazaĵoj, ktp... Ekzemple, la eltrovo de Kolumbo, kiam li vojaĝis unuafoje trans Atlantikon, la albordiĝo de la pilgrimaj pastroj, la subskribado de la deklaro de sendependeco, la unua vaporŝipo de Fulton, la unua trovo de oro en Kalifornio, la pac-konferenco ĉe Hago, ktp... La dua periodo uziĝos diverse por literaturo, politika scienco, higieno, naturscienco j kaj muziko. La direktistoj de la «Columbia System» ricevis helpo-promeson de multaj edukistoj.

Por instrui muzikon, la usonaj instruistoj ĉefe uzas ankoraŭ la gramofonon (fonografon). Sed aranĝo de koncertoj por la lernejoj jam efektiviĝis.

En la terkulturaj ŝtatoj, en la Mez-okcidento, la terkulturaj kolegioj starigas siajn proprajn radio-staciojn. La celo estas eduki la farmistojn kaj la lekcioj pritraktas bredadon, bestojn, preparadon de lakto, naturaĵon, zorgon de farma maŝinaro, ktp... Jen estas resumo de kuranta programo de Kansas State Agricultural College (Kansas estas mezokcidenta ŝtato):

Je la 8-a — muziko kaj korpekzercado sub direkto de spertulo (ofte la kamparaj lernejoj utiligas tian servon).

Je la 10-a — la dommastrino ricevas konsilon pri la menuo, pri la dommastrumado.

Posttagmeze je la 12-a 30 — la farmisto lernas pri la vetero, la novaĵoj el la vendejo pri prezo de greno, ktp...

Je la 16-a 30 — la geknaboj aŭskultas raporton pri siaj diversaj kluboj.

Je la 17-a — estas donata kompleta raporto pri la vendejo en Ĉikago (Chicago) kaj en Kansas City. Kelkfoje la stacio raportas pri la sportludoj de la kolegio.

## Pri kino

En ĉiu bone ekipita kolegio, la aŭditorio enhavas kino-aparaton. En la duagrada lernejo kaj eĉ en la plej bona unuagrada lernejo troviĝas kino. Portebla aparato kaj nebrulebla filmo estas haveblaj por periodaj vizitoj aŭ specialaj lekcioj en la plej malgranda lernejo. Ofte firmoj provizas filmojn senpage por reklami pri sia industrio. Komercoĉambroj (lokaj organizoj de dungantoj, entreprenantoj), kiuj volas interesi homojn en siaj urboj, uzas la saman metodon).

La Federal Commissioner (estro de Tutusona Edukada Fako) raportis, ke «Instruo per vidado, per la moviĝanta bildo (kino) kaj per tiaj helpiloj, kiaj estas grafikaĵoj, stereografaĵoj, t. e. bildoj uzataj de la stereoskopo, stereoskopaj kliŝoj, ricevas pli da atento tra la tuta lando». Tiu deklaro sufiĉe klare montras, ke en Usono kino estas pli multe uzata por distri la maturaĝulojn ol por eduki la infanojn. Ŝajnas, ke la kino estas uzata en Usono pli multe ol en iu alia lando, sed ne kiel edukilo. Ne ekzistas ĵurnalo aŭ revuo pri kino kaj radio en la lernejo.

Mark Starr, Katonah, NY. USA

---

**Por esti membro de SAT-edukista sekcio, necesas:**

**1-e esti SAT-ano,**

**2-e aboni S.P.R-on.**

**NENIU APARTA KOTIZO**

# SUR EDUKISTA ★★★
# ★★★ BATALFRONTO

**Kongreso de la Instruista Labor-Ligo (TLL) en Liverpool (jan. 1930)**

Dum la Kongreso de la TLL oni akceptis inter aliaj la sekvantajn proponojn:

1. La ekzekutiva komitato devas prepari ŝanĝojn en la strukturo por la proksima kongreso, ĉar la ligo ne deziras nun havi ian rilaton kun la Labor-Partio, al kiu ĝi antaŭe filiiĝis.

2. Ĝi malaprobis la reorganizadon, kiu nuntempe okazas en la lernejoj, ĉar la proponoj pli akrigas la klasdiferencojn inter la lernantoj kaj inter la instruistoj de la unuagradaj kaj duagradaj lernejoj. Oni gratulas la Londonan Komitaton, ĉar ĝi subtenis la gepatran protest-komitaton en East Ham kontraŭ la eduka komitato kaj la NUT (Ñacia Unuiĝo de Instruistoj).

3. Ĝi proponis unu skalon de salajro por ĉiuj — instruistinoj kaj instruistoj — en ĉiu speco de lernejo. Propono pri aldono por infanoj, edzinoj ktp. ne estis findiskutata. La salajro por junaj geinstruistoj devas esti pli alta.

4. Ĝi protestis kontraŭ la maldungo de edziniĝintaj instruistinoj kaj postulis, ke jam eksigitaj virinoj estu redungataj.

5. La ekzekutivo devas diskuti la forigon de ĉefinstruistoj.

6. Ĝi vokis la membrojn veki intereson por la EWI (Educational Workers' International—Eduk-Intern, Parizo) kaj kondamnis la aliajn instruistajn internaciajn federaciojn.

7. Protestis kontraŭ la propagando en la lernejoj pri la Ligo de Nacioj, ĉar la Ligo nur estas ŝirmilo por militpreparoj, ĝis nun ne malhelpis militiron de siaj membroj kaj rifuzis diskuti senarmiĝon.

8. Protestis kontraŭ la agado de la laborista registaro en Hindio.

9. Subtenis proponon de Edukintern pri korespondado inter geinstruistoj en diversaj landoj.

10. Alvokis la geinstruistaron labori por la tuta forigo de religia instruado en ŝtataj lernejoj.

11. Malaprobis la militarismon kaj imperialismon en la skolta movado kaj alvokis la membrojn subteni la junularajn organizojn, kiuj havas proletan tendencon, kiel la junkomunistojn.

12. Alvokis la membrojn subteni la SAT-Kongreson en Londono en aŭgusto 1930.

Dum la kongreso estis publika kunveno pri partieco en la lernejo.

Dum la SAT-Kongreso en Londono ĝi esperas organizi internacian kunvenon pri la sama temo.

Geinstruistoj, kiuj venos al la kongreso, estas petataj anonci sin al:

Kamaradino C. Osmond
95 Fowlers Walk,
Ealing, London W 5.

jam nun por ke la kunveno estu sukcesplena.

Oni proponas, ke la k-doj parolu esperante, donante ekzemplojn pri naciemo kaj kontraŭ-proleta tendenco de la lernolibroj de la propra nacio. La raportoj aŭ notoj de la paroladoj estos tradukataj angla-lingven.

## STUDA TROSTREĈO DE LA FRANCAJ GELERNANTOJ

Post agitado de la plejmultaj instruistaj gazetoj el Francio, la Publikinstrua Ministerio decidis nomi specialan «komisionon pri la studa trostreĉo de la gelernantoj». Tiu komisiono, kiu konsistas el diversaj parlamentanoj (deputitoj kaj senatanoj), enketas ĉe lernejestroj, profesoroj, scienculoj, kuracistoj kaj asocioj de gepatroj.

Ĉiuj kuracistoj, ankaŭ fama sciencul ino s-no Küri (Curie) eltrovintino de radiumo, deklaris, ke ĉiuaĝaj gelernantoj sidadas senmove tro longan tempon en la lerntago. En popollernejoj ja estas nur apenaŭ duonhora ripozo en tuta tago: kvaronhoro matene kaj kvarono posttagmeze. Ili postulis la malpliigon de la nombro da instruhoroj (ĝis nun 6 horoj ĉiutage: 3 hor. matene, 3 hor. posttagmeze krom en libertagoj ĵaŭdo kaj dimanĉo); ili ankaŭ postulis pli longan okupon pri korpekzercado kaj higieno kaj ankaŭ forigon de parto de la hejmaj taskoj tiele, ke la gelernantoj estu tute liberaj en ĉiu vespero kaj en ĉiu libertago. Ili kondamnis la tro vastajn studprogramojn kaj lernolibrojn.

D-ro Paŭlo Bonkur (Boncour), konata kuracisto, kiun konsultis la komisiono, donis la rezultojn de siaj enketoj pri tiu celo. Li ekzamenis 345 infanojn el parizaj popollernejoj kaj ankaŭ el gimnazioj kaj reallernejoj. Li jene starigis la gradiĝon de l'atentivo (atentopovo) de la lernantoj laŭ la aĝo:

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 6- 7-jaraj infanoj | 2 | horojn | da atentivo | ĉiutage. |
| 8- 9-jaraj — | 3 | horojn k.$^1/_2$ | » | ĉiutage. |
| 10-11-jaraj — | 5 | horojn | » | ĉiutage. |
| 12-13-jaraj — | 6 | horojn | » | ĉiutage. |
| 14-18-jaraj — | 8 | horojn | » | ĉiutage. |

Tiu atenta tempo inkludas (inkluzivas) ankaŭ lerntempon por taskoj kaj lecionoj, do eventuale ankaŭ hejman lernlaboron.

Laŭ tiu sama doktoro, la ekzercoj pri aritmetiko kaj poste pri ortografio plej laciĝas la infanojn; kontraŭe, la perobjekta instruado (sciencoj naturaj...) kaj desegnado malplej lacigas ilin. Mezbonaj gelernantoj pli rapide laciĝas ol la aliaj, ĉu bonaj ĉu malbonaj. Li kontrolis eksperimente, ke la atentivo estas preskaŭ nula je fino de la lerntago seshora; apenaŭ triono de la lernantoj tiam kapablas atenti. Li ankaŭ pruvis, ke atento tre malpliiĝas merkrede kaj sabate, ĉefe en fino de,

posttagmezo, kaj ke ĵaŭda kaj dimanĉa plenaj libertagoj, sen hejmaj taskoj, estas nepre necesaj.

Al ĉiuj tiuj deklaroj, la francaj geinstruistoj konsentas: ili ja delonge, ĉefe en la urboj, sentas la kvieton de la lernantoj en la lundaj kaj vendredaj matenoj post plena libertago, ili bone konscias, ke post tiu kvieto venas vigla laboremo en mardo kaj vendredo posttagmeze, kiu finiĝas per nerva laco merkrede kaj sabate. La francaj geinstruistoj, kiuj instruas 6 horojn ĉiutage plej etajn infanojn, eĉ nur 6-jarajn, aparte aprobas la eksperimentan pruvadon de nepra neceso de du plenaj libertagoj en semajno, ĉar de jam kelkaj jaroj iuj «raciigistoj» de lernejaferoj... kaj de landa mastrumado, pretendis trudi al la geedukistoj 33 horojn de instruado en la semajno per forigo de la ĵaŭda tuta libertago kaj alpreno de l'angla semajno kun nura duontaga libero en la sabata posttagmezo [1]).

S-ino Curie akre kritikis la superŝarĝon de klasoj ĉe nombro da gelernantoj; ŝi konfesis, ke plej multaj francaj lernejoj estas en abomenaj higienaj kondiĉoj, postulis bone aerumeblajn kaj vastajn lernkonstruojn. «Lernejo»—ŝi diris—«devas esti la lukso de la lando».

Kompreneble la avangardaj edukistoj el Francio tre skeptike rilatas al la povo de tiu ĉi komisiono nur konsilvoĉa kaj scias, ke la plej eta nur ŝajna reformeto estos distrumpetata de tutlanda gazetaro, kiel ega reformo senmortigonta iun ministron kaj iun parlamenton. Ili jam vidis la trompon de la gazetaro pri la fama «senpageco» de la duagrada lernejo, kiu efektiviĝas la «unikan» (unuforman kaj por ĉiuj atingeblan) lernejon dum efektive tiu ĉi reformo sukcesis ŝparigi monon al riĉa-burĝaj gepatroj kaj pagigi ĝin sub imposta formo al la popolamaso mem. Ne pli ol antaŭe, la proletido povas viziti la duagradan lernejon, eĉ se instruado estas senpaga, ĉar manĝado, vestado, loĝado, lernolibroj, ktp... estas ja «pagaj», sed mankas ŝtata mono por stipendioj.

La fakto, ke la parlamento ĵus konsentis krediton eksterordinaran de 500 milionoj da frankoj por konstrui novajn lernejojn, tute ne signifas, ke la nombro da lernantoj en ĉiu klasĉambro estos reduktata, sed nur ke en Pariza regiono kaj en malproksimaj kamparoj la infanoj ĝis nun ofte lernis en barakoj aŭ en kvazaŭ-staloj. Cetere ĝi estas kompensata de la fakto, ke de kelkaj jaroj estas sisteme organizata raciigado de l'edukado per ĉiam pli kaj pli trudaj aranĝoj celantaj atingi maksimuman laboron de l'instruistoj kaj de la lernantoj. Estas videble, ke oni celas atingi modlebligon de l'infanaj cerboj kaj flekseblon de la geinstruistaro per plirigorigo de la kontrolo sur la edukistoj, de la lerneja administracio kaj disciplino. La rezulto estas klara: devigi instruistojn kaj lernantojn al pli intensa laboro por silentigi la ribelemon de nuna geedukistaro kaj stultigi la venontan generacion de «civitanoj».

Rilate la aktualan demandon pri trostreĉo de l'infanoj en lernado, la avangardaj edukistoj havas tre radikalajn postulojn:

---

[1]) Noto Red. Nia K'do estas neĝuste informata rilate al tiu ĉi punkto. La lernejoj elementaj en Britio estas fermataj tutan tagon dum sabato kaj dimanĉo. Entute la lernejaj horoj sumiĝas je $27\frac{1}{2}$ po semajno).

1. Ili postulas malpliigon de l'instruhoroj ĉefe por la plej junaj lernantoj, kiuj ankoraŭ nun lernas 6 horojn ĉiutage (plus ofte la fakultativaj vesperaj «studhoroj»). Infanoj lernu matene sur benkoj de sia klasĉambro, kaj vigle moviĝu posttagmeze manlaborante aŭ gimnastikante, aŭ ekskursante sur kamparon.

2. Ili postulas la forigon de la t. n. «studhoroj», t. e. la unu-duhora studado post la oficiala deviga lernotempo. De la 16-a horo ĝis la 18-a multaj gelernantoj restadas senmovaj kaj silentaj en lernejo por mallaŭte studi la lecionojn kaj fari la taskojn. Se foresto de la gepatroj en la hejmo postulas gardadon de l'infanoj post la instrua tempo, oni organizu tiun socian servon per ekskursoj, distroj, for de la lernoĉambro.

3. Ili postulas tutan forigon de la hejmaj taskoj kaj lecionoj.

4. «... tutan forigon de la unuagrada ekzameno, kiu trudas intencan stultigan laboregon al 11-12-jaraĝaj infanoj. La t. n. atesto pri unuagrada lernejo, kiu estas la unua ofica diplomo, kontrolas per ekzameno en fino de la 6-a lernojaro apenaŭ trionon de la lernantoj. Ĝi estu anstataŭota de ĝenerala ĉiujara ekzamenado de ĉiuj gelernantoj, postulanta neniam «premegon» de la cerbo.

5. La nombro da lernantoj por unu instruisto ne superu 25. Ĝis nun ĝi ofte superas 40, 50, kaj eĉ 60, 70 lernantojn.

6. La gelernantoj de popollernejoj bezonas tiel longan ripozon, kiel gimnaziaj. Tial la somera libertempo (kiu estas nun 2-monata: de 1-a de aŭgusto ĝis 1-a de oktobro) estu plilongigata kaj daŭru 3 monatojn kaj duonon, komencante de 15-a de julio kiel por la aligradaj altlernejoj.

7. La trostreĉo de la lernado kaŭzas sian malbonon ĉefe ĉe mizeraj lernantoj de proleta klaso. Estu organizata speciala socia servo por certigi normalan nutradon kaj vestadon al tiuj infanoj, en atendo, ke la tuta prizorgado materia de la laborklasaj infanoj estu konsiderata kiel ŝtata devo kaj neniel kiel «devo» de bonfarantaro.

SAT-ano 518

---

**«Lernejo ekster la vivo, ekster la politiko — estas mensogo kaj hipokrito».** **(Lenin)**

## LA TRABO KAJ LA PAJLERO

### Reakcia franca lernejo klaĉas kontraŭ sovetaj edukistoj

Ĉiu memoras, ke antaŭnelonge kelkaj sovetaj profesoroj estis eksigataj el siaj postenoj pro tio, ke ili propagandis kontraŭsovetan ideologion. La gestudentoj de Sovetio, kiuj la unuaj suferis pro tiu reakcia propagando, plendis pri tio al la superaj popolklerigaj aŭtoritatoj per rezolucioj de siaj memadministraj organizoj.

La franca reakcia «gazeto de geinstruistoj» okaze de tio daŭrigas sian kampanion kontraŭ soveta lernejo, represante la artikolojn de la plej kontraŭsovetiaj francaj gazetoj; ĝi tiel partoprenas fervore la nunan kampanion de, preskaŭ, tutfranca gazetaro kontraŭ Sovetio.

Primokante la pedagogian novaĵon el Rusio, ĝi reproduktas parton de artikolo el fama gazeto «Mateno» sub jena titolo: «La rusaj lernantoj mem ekzamenos siajn instruistojn», aŭ «La domo kun fundamento supren!» La rusaj geinstruistoj, laŭ ĉi tiu eltranĉita artikolparto atribuita al «Krasnaja gazeta» konscios, ĝis kia grado la burĝa okcidenteŭropa gazetaro kapablas aliformigi la faktojn kaj la tekstojn.

Jen la teksto atribuita al «Krasnaja gazeta», kiun ni retradukas senŝanĝe el la franca reakcia instruista revuo: «Oni antaŭnelonge malkovris, ke el 46 instruistoj kaj helpinstruistoj pri kemio, nur unu estas komunisto. Ankaŭ 76 instruistoj el la medicina lernejo ĉiuj estas nekomunistoj».

«La sovetregistaro decidis publike ekzameni ĉiujn universitatajn profesorojn antaŭmilite instruintajn aŭ nun 65-jarajn. Tiuj, kiuj ne ĝuos fidon de la komunistoj, estos eksigataj. Tre baldaŭ 200 profesoroj estos tiel ekzamenataj. Ili devos prezentiĝi antaŭ juĝantaro konsistanta el studentoj kaj devos raporti pri siaj sciencaj laboroj en lastaj 10 jaroj. Krome, ĉiu profesoro devos klarigi, kial li opinias sin inda konservi sian instruoficon».

«La ekzamenjuĝantaro, konsistanta el studentoj, decidos per ordinara plimulto da voĉoj, ĉu la profesoro povos konservi sian katedron aŭ devos ĝin forlasi».

«La helpsekretario de popolkleriga komisario Grobovski, deklaris, ke tiu aranĝo rezultigus eksigon de tre multaj profesoroj».

«La Krasnaja Gazeta aldonas al tiu eksterordinara raporto, ke ne ekzistas kaŭzo maltrankviliĝi pro la profesoraj vakoj. Tiuj vakoj estos plenigataj per la scienculoj preparataj de proletaro, ĉar kio gravas, tio estas havi ne templojn de scienco, sed lernejojn de komunismo. Kaj kio necesas, tio estas mapli havi doktorojn, inĝenierojn, juristojn, ol havi ruĝajn doktorojn, ruĝajn inĝenierojn, ruĝajn juristojn».

La reakcia franca «Gazeto de geinstruistoj» konkludas per tiuj mokvortoj: «Prizorgeme obei veron, respekti inteligentan sendependecon, kulturi pensliberon, tio estas tiom da okcidentaj kaj eble kapitalismaj malseriozaĵoj, kiujn ruĝa Rusio forpelis al malnovaĉo!»

## Respondas avangardaj instruistoj

La sovetaj instruistoj repondos al tiu insulta maniero, kiu aliformigas la veron per fortranĉo de ĝenantaj tekstopartoj. Kia mensogo pretendi, ke sovetaj studentoj decidas kaj ordonas eksigojn de siaj ne-komunistaj profesoroj. Ĉu do ne ekzistas Popolkleriga Komisario por findecidi? Kiel firaportite estas pri memadministro de studentoj—kiun oni tiel laŭdas en okcidento, kiam ĝi estas uzata por plifirmigi burĝan reĝimon. Ni ja scias ke en lastaj jaroj kelkaj kontraŭkomunistaj kaj religiemaj profesoroj kuraĝis propagandi senkaŝe al studentoj dum siaj lekcioj aŭ kursoj, sed ke studentoj klaskonsciaj malkaŝis al superaj instancoj tian fipropagandon. Klasbatalo ankaŭ ekzistas en soveta lernejo: kulakoj kaj nep-komercistoj havas profesorajn helpantojn sur la kultura fronto. Tio estas fakto.

Ĉu tia klasbatalo ne ekzistas en lernejoj de aliaj landoj? En blanka Francio nun 20 instruistoj estas diverse persekutataj pro sia politika opinio kaj interalie k-do Doron, kiu antaŭ kelkaj monatoj estis eksigata pro sia komunisteco. Li estis partopreninta dum libertempo al kontraŭmilita manifestacio de 1-a de aŭgusto. En lasta junio, 108 studentoj el Porinstruista Lernejo en Kemper' (Quimper) estis lokaŭtataj (provizore eksigataj) kaj 10 studentoj el ili definitive eksigataj pro sia kontraŭstaro al neetenebla lerneja disciplino kaj al militista preparo de la studentoj. Antaŭ kelkaj monatoj, studento, k-do Ristan, estis eksigata el Universitato en Diĵon' (Dijon) pro tio, ke traserĉinte lian hejmon, oni trovis komunismajn paperojn. Antaŭ kelkaj semajnoj, en urbo Bluà (Blois), la polico penetris la Porinstruistan Lernejon kaj traserĉis vestojn de studento akuzita pro aliĝo al Komunista Junularo.

En la lando, kie okazis la granda Revolucio de 1789 (!), kie nobeloj rezignis(?) pri siaj privilegioj en fama nokto de 4-a de aŭgusto samjara, kie revoluciaj burĝoj trumpetis al tutmondo «deklaron de la homaj rajtoj», en kiu estas demokrate esprimite, ke «neniu devas esti persekutata pro siaj propraj opinioj», tre demokrata respublika registaro persekutas instruistojn pro ilia politika agado eksterlerneja, kaj ankaŭ studentojn, kiuj kuraĝas montri, ke «ili venis la lernejon por fariĝi edukistoj, ne militistoj». En tiu persekuta periodo, la reakcia gazetaro kuraĝas riproĉi sovetan studentaron kaj registaron sin defendi kontraŭ profesoroj, kiuj provas, en lernejo mem, veneni la lernantojn per opio de religio kaj kapital-ideologio.

SAT-ano 518

---

**Rubrikestroj, kunlaborantoj, sendu senpere al nia redaktoro viajn artikolojn (nur por TEPS al ĝia rubrikestro).**

**Skribu ĉiam sur unu flanko de l'papero! Uzu prefere skribmaŝinon!**

## LA EDUK-LABORISTO EN SOVETIO

### 1. Nombro kaj konsisto

Ĉiuj laborantoj de l'institucioj por popola klerigo en Sovetio, komencante de l'plej malalta servpersonaro, t. e. de gardistoj, purigistinoj, kurieroj, kaj finante ĉe profesoroj kaj la popolkomisaroj de klerigo mem, anas unuecan sindikaton de eduk-laboristoj. Kvante la anaro de tiu sindikato prezentas grandegan armeon da 793 mil homoj. Da virinoj en ĝi estas 55,4%, pli ol en ajna alia sindikato en Sovetio. La suba servpersonaro konsistigas ĉirkaŭ 25%, la edukistoj de ĉiutipaj institucioj 55%.

La revolucio enportis konsiderindan demokratigon de l'sociklasa konsisto de l' eduklaboristaro. Pleje ĝi tuŝis la personaron de l' elementa lernejaro. Se antaŭ la revolucio ĝi enhavis 36,2% da kamparanoj dum la pastridoj kaj nobelidoj estis 31%, en jaro 1927-a da kamparanoj estiĝis 51,6%, kaj, krom tio, da laboristoj 5,1%. Rilate partianecon, la plej multenombra grupo el la eduklaboristoj, la elementlerneja instruistaro, dividiĝas jene: komunistoj 4,5%, komjunuloj 8,7%; la ceteraj estas senpartiuloj.

La demokratigo de l'pedagogia personaro kaj la kresko de l' komjunula kaj junkomunista intertavoloj en ĝi pligrandiĝas kun ĉiu nova kursfino de l'pedagogiaj lernejoj.

La ĉefan, pli bonan kadron da instruistoj por la elementlernejo en RSFSR havigas la pedagogiaj teknikumoj kun kvarjara instrukurso, kien oni akceptas adoleskulojn, finintajn la sepjar-lernejon.

En la kursfinintaro de l' pedagogiaj teknikumoj de RSFSR en 1926/27 estis da laboristoj 13,8%, kamparanoj 47,9%, gefiloj de oficistoj 28,2%. Tre grandan elcenton de l'element-lernejaj instruistoj en RSFSR havigas la ĝeneralkultura naŭjara lernejo, en kies lastaj du grupoj (klasoj) parto de l' studlecionoj estas dediĉita al pedagogiaj disciplinoj.

Laborantojn de lernejoj pli alttipaj, t. e. de lernejoj por duagrada kaj speciala klerigo, preparas la superaj pedagogiaj lernejoj kaj parte aliaj superlernejoj.

Pro la plialtigitaj taskoj, kiujn la sovetia lernejo starigis al la instruisto, la organoj de popolklerigo, la sindikato kaj la instruistaro mem dediĉas multan atenton al la problemoj de plikvalifikigo de l'nunaj pedagogiistaj kadroj.

En 1927/28 pluraj dekmiloj da instruistoj de ĝeneral-kulturaj lernejoj en ĉiuj respublikoj de USSR aliĝis kursojn por plialtigo de kvalifiko aŭ perkorespondajn kursojn.

### 2. La materia stato de l'eduk-laboristaro

Ĉiujare la materia stato de l'eduk-laboristaro pliboniĝas. Tiel la instruistoj de elementlernejo ricevadis en 1925/26 meze tra l'USSR monatan salajron da 34 rubloj; nun ili ricevas meze po 52 r.; en gran-

durboj kaj ekstrem-provincoj la salajro estas multe pli alta. La kvinjara rekonstru-plano de l' soveta registaro supozas estigi por 1932/33 salajron de l' elementlerneja instruisto en urbo je 100 r.; en la kamparo je 87 r. La meza salajro de l'instruistoj de duagradaj lernejoj samtempe elkreskos de 50 rubloj ĝis 1$^1/_2$-oblo de l'salajro de elementlerneja instruisto.

Sian salajron la instruistoj de unuagradaj lernejoj (elementlernejo) ricevas por 24 horoj da laboro kun la lernantoj semajne. En lernejoj duagradaj la salajro estas pagata por 18 horoj da laboro semajne; en la duagradaj fak-lernejoj samkvanta salajro-normo estas ricevata por 12 lecionoj semajne. Sed kutime tiuj kategorioj da pedagogoj havas pli da lecionoj ol por unu salajronormo, gajnante ofte 1$^1/_2$ kaj iam eĉ 2 salajronormojn.

La profesoroj de superlernejoj en RSFSR ricevas la salajron por ses lekcihoroj semajne. Ĉi tiu salajro en 1926/27 egalis 110 rublojn monate, kaj ĉi-jare ĝi atingis 180 r. por la industriaj superlernejoj kaj 160 por la ceteraj. Laŭ la kvinjara plano estas projektate pligrandigi ĝin por 1932/33 ĝis 350 r. La profesoroj, ankaŭ kutime laborgajnas pli ol unu salajronormon: 1$^1/_2$—2 kaj kelkiam eĉ 3. La salajrado de l'profesoroj en aliaj respublikoj estas proksimume tia sama.

La instruistoj de lernejoj unuagradaj kaj duagradaj ricevas post ĉiuj kvin servojaroj periodecajn plidonojn de salajro, da 60—72 kaj da 100—150 rubloj respektive; la sumo de l'aldono varias depende de instruiteco-grado.

La instruistoj de vilaĝaj lernejoj ricevas senpage loĝejon ĉe la lernejo, kun hejto kaj lumigo; se loĝejo ĉe la lernejo mankas — 10%-an plidonon al la normala salajro.

La edukistaj gefiloj studantaj en superlernejoj estas liberaj de ajna pago por la instruado.

La laŭleĝaj ĉiujaraj libertempaj forpermesoj por la pedagogia personaro de ĉiuj lernejoj daŭras du monatojn, krom la infandomoj kaj ĝardenoj, kie la edukistoj ricevas 1$^1/_2$ monatan forpermeson. La bibliotekistoj kaj la helpa servpersonaro ĝuas monatan forpermeson. La ferioj daŭras pli longe ol la forpermesoj.

La instruistoj de unuagrada lernejo post 25 jaroj da pedagogia laboro ricevas pension da 30 rubloj monate. Restante ĉe la laboro, ili havas rajton je duona pensio kaj plipago al salajro. Por la instruistoj de duagrada lernejo estas starigita post 25 laborjaroj pensio da 40 rubloj monate. La profesoroj kaj instruistoj de superlernejoj, laborintaj kiel scienclaboristoj 25 jarojn, havas rajton pri pensio egala al sia plena salajronormo.

Samkiel ĉiuj laboristoj kaj oficistoj en Sovetio, la eduklaboristoj estas asekuritaj per socia asekuro, efektivigata ekskluzive je la kostoj de l'labordonantaj institucioj per difinitaj pagoj de kelkaj elcentoj de l'salajrosumo al la organizoj de l'soci-asekuro. La soci-asekuro garantias al la laboranto senpagajn kuraco-servojn kaj kuracilojn. Dum la malsano la laboristo ricevas el asekurkaso plensalajran subvencion. La eduklaboristo havas rajton pri la subvencio el asekurkaso pro malsano

ĝis dum kvar monatoj. Plue, se li ankoraŭ ne resaniĝis, li estas ricevanta pension pro invalideco.

Se la asekurito perdas la laborkapablon pro malsano kaj invalidiĝas, li ricevas pension ĝis du trionoj de sia salajro, depende de l'grado de invalideco. En okazo de morto de l'laborinto liaj nelaborkapablaj vivsubtenitoj (edzino, superaĝaj gepatroj, neplenaĝaj gefiloj) ricevadas sociasekuran pension.

Gravedaj eduklaboristinoj rajtas forpermeson kun plena salajrokompenso dum $1^1/_2$ monatoj; la vilaĝaj instruistinoj kaj manlaboristinoj — dum du monatoj. Samlonga forpermeso estas prezentata post la akuŝo.

Je la kostoj de l'soci-asekuro la laboristoj ricevas subvencion dum senlaboreco ĝis naŭ monatoj dum jaro; se la senlaboreco daŭras pli ol jaron, ili povas ricevi la subvencion dum dekok monatoj. La senlaboraj elementlernejaj instruistoj ricevas subvencion mezan da dek kvin rubloj monate, la oficistoj teknikaj meze po dekunu rubloj kvindek kopekoj. Por la nelaborkapablaj familianoj de l'senlaborulo estas donata plipago da 15—35% de l'subvencio mem.

### 3. Partopreno de l'edukistoj en la progresigo de l'popolklerigo kaj en la soci-politika vivo

Havante kiel sian fincelon efektivigon de l'komunismo, la eduklaborista sindikato de Sovetio, samtempe kun la defendo de materiaj kaj juraj interesoj de l'sindikatanoj, antaŭmetas kiel plej proksimajn taskojn: (a) partoprenon en la afero de l'kulturkreado de l'lando kaj en la tuta socialismo-konstruado; (b) partoprenon en la disvolvo kaj plibonigo de l'tuta popolkleriga branĉo; (c) plialtigon de l'kulturnivelo de l'sindikatanoj kaj disvolvon de ilia soci-politika konscio.

La eduklaboristoj de l' USSR, krom sia senpera laboro ĉe la okupata ofico en kulturklerigaj institucioj, en plimulto kunhelpas la socialisman konstruadon per sia libervola senrekompenca socipolitika laboro.

La decida politiko de rekonstruo de l'popol-ekonomio, efektivigata de l'soveta administro, kaj de ĝi elvokata rezistado de l'kapitalismaj elementoj, sekviganta pliakrigon de l'klasbatalo, precipe sur la kamparo, rezultigis diferencigon ankaŭ en la medio de edukistoj. Formiĝis konsiderinda tavolo el edukistoj, definitivaj adeptoj de l' komunista partio kaj de l' sovet-administro, kiuj partoprenas plej aktive la socipolitikan vivon de l' lando, kaj helpas la partiajn kaj sovetorganojn en ties politikaj kaj ekonomiaj entreprenoj. Ĉe la mala poluso elkonturiĝas tavolo, vere nekonsiderinda, el reakcie inspiritaj edukistoj, malkaŝe kontaktantaj kun la riĉa kampulo (kulak') en la vilaĝo, kaj kun la novburĝo (nepman) en la urbo. Fine estas intera tavolo el edukistoj, ne malkaŝintaj sian politikan fizionomion, ŝancelantaj depende de l' socipolitika cirkonstancaro kaj farantaj pure kulturportan laboron meze de l'loĝantaro. La sindikato celas decidan helpon al la avangarda, politike aktiva parto de l'instruistaro por ties socipolitika agado kaj maksimuman entiron de l'hezitanta intertavola parto al tiu laboro. Kio koncernas la reakciajn

elementojn, la sindikato ne prenas la devon defendi ilin okaze de ilia eksigo fare de l'administracio, kaj, pli ol tio, celas organizi la publik-opinion de l'edukistaj amasoj en la direkton de memepurigo de iliaj vicoj.

En la socia laboro de l'plimulto de edukistoj ekzistas sendube difinitaj realigoj. Kreskas la partopreno de l'edukistoj, precipe vilaĝaj, en ĉiuj regionoj de l' kultur-kreado, ekzemple, dum kampanio por elekto de sovetoj; ĉe grenprovizadoj porŝtataj; ĉe memimpostado de vilaĝanoj por kulturbezonoj de l' kamparo (lernejoj, vojoj, hospitaloj, k. s.); ĉe disvastigo de ŝtatpruntobligacioj, ktp. La vilaĝaj edukistoj propagandas sur la kamparo por la kolektivigo (organizado de kolektivaj mastrumoj), por ĉiuforma kooperado, batalon por plifekundigo de l'grundo, por plivastigo de l' semita areo, kaj plibonigo de l'agrikultura tekniko. Por tio ili faras raportojn en kunvenoj de kamparanoj, gvidas agrikulturajn rondetojn de kamparanoj, organizas agrikulturajn ekspoziciojn eksperimentajn kampojn kaj legomĝardenojn sur apudlernejaj parceloj, disvastigas agrikulturan libraron. La plimulto de l'laboro de edukistoj iras la vojon de likvido de analfabeteco, de laboro en vilaĝ-legejo, gvidado de ĝeneral-kulturaj kaj politikaj rondetoj por la junularo, raportoj en rondet-kunvenoj pri socipolitikaj temoj, kulturlaboro speciale inter virinoj, ktp.

La urba instruistaro estas multe malpli altirita al la socipolitika laboro.

Ni notu kelkajn apartajn flankojn de l' socia laboro de l' eduklaboristo. Tre aktive partoprenis la eduklaboristoj la «kulturkampanion». Preskaŭ kvindek mil eduklaboristoj libervole instruadis analfabetulojn. Aliaj formoj de kulturkampanio: batalo kontraŭ la alkoholismo, disvastigo de ĵurnaloj meze de l' loĝantaro, organizado de «ruĝ-anguletoj», k. s.

Batalsektoro de la socipolitika laboro de l' eduklaboristoj estas ilia partopreno en reelektoj de sovetoj kaj la laboro en ili. Tre konsiderinda nombro da eduklaboristoj estas anoj de vilaĝsovetoj aŭ de ties reviziaj komisionoj. En la urboj la eduklaboristoj partoprenas en urbaj sovetoj kaj ties sekcioj. Ili ankaŭ partoprenas la kulturpatronadon de l'Ruĝa Armeo.

Pro la «ofensivo» kontraŭ la riĉkampulo en vilaĝo, la senigo lin de politikaj rajtoj, plifortigita impostado, eksigado el kooperativaro, pliakriĝis la klasbatalo. La riĉkampuloj penadas elektigi por la bazaj organoj de l' sovet-administro kaj kooperativaro siajn adeptojn. La plimulto de l' eduklaboristoj, efektivigante la gvidlinion de la partio (komunista), organizas kontraŭstare al la influo de l'riĉkampuloj la malriĉularon kaj la kamplaboristojn, agitadas en la antaŭ-elektaj kunvenoj kontraŭ la riĉkampuloj. Krom tio, la instruisto sociaganta kontraŭpuŝiĝas kontraŭ la riĉkampulo kaj ties alianculo, la klerikularo, dum la fiksado de impost-objektoj, grenprovizadoj, k. s. Rezulte la riĉkampulo kaj la pastro fariĝas la plej furiozaj malamikoj de l' avangarda instruisto. Ne malofte estas la okazoj de pelĉasado de tiaj eduklaboristoj flanke de l'reakciaj elementoj — per denuncoj, kalumniado, minacoj, batado kaj eĉ murd-atencoj. Tiel, dum la lasta jaro estas registrita pli ol cento da okazoj de persekutado de eduklaboristoj sur la

fundo de ilia socia aktiveco fare de l'riĉkampuloj; estis eĉ okazoj de murdo.

Por prezenti al la eduklaboristoj la eblon partopreni la disvolvon kaj plibonigon de l'popolklerigo, en konferencoj kaj kongresoj de eduklaboristoj — sindikataj aŭ kunvokataj de l' administracio — estas farataj raportoj de organoj de l'popolklerigo pri la pasinta akademia jaro, perspektivaj (por la plua tempo) aŭ pri la plej gravaj aferoj: budĝeto de l'popolklerigo, demandoj de provizado, de lernejar-reto, de pliintensigo de l' progresado de lernantoj, ktp. En la ĝeneralaj kunvenoj de l'laborantoj de ununura institucio aŭ baza sindikata organizo estas aŭskultataj la raportoj de l'instituciestroj pri ilia laboro. La simplaj laborantoj eldiras siajn opiniojn pri la mankoj de l' laboro kaj pri la faroj, necesaj por plibonigi ĝin, kaj la sindikato penas efektivigi la komunan opinion de l' laborant-amaso. Devo de l' sindikato estas kontraŭbatali ĉian subpremon (flanke de l' administracio) de l' serioza kritiko, kontraŭ persekutado de l' laborantoj pro kritiko pri l' administracio.

Por pli bone sciiĝi pri la opinioj de l' simplaj laborantoj, la sindikato delegas siajn reprezentantojn en konsilantarojn de lernejoj kaj aliaj kulturklerigaj institucioj, kaj al kunsidoj de organoj por popolklerigo kaj konsiliĝoj de ili kunvokataj.

Ĉar konsiderinda parto de l' antaŭrevolucia instruistaro kaj de laborantoj enoficiĝintaj dum la unuaj jaroj de l' revolucio, ne havas la kvalifikon necesan por la soveta lernejo, ili plialtigas sian kvalifikon per aŭtodidakta laboro en rondetoj, per korespondkursa studado. En 1928 j. al tiuj formoj de plikvalifikigo estis altiritaj pli ol 60 000 laborantoj, precipe instruistoj.

La mankanta politika klerigo estas kompletigata en rondetoj de politika ABC. En tiuj partoprenis pasintjare preskaŭ 8% el la vilaĝa instruistaro. La politika momento estas tuŝata en raportoj ĉe ĝeneralaj kunvenoj. La instruistoj vizitas ankaŭ publikajn partiajn kunvenojn.

La sindikatmovadaj scioj estas perfektigataj en aro da kursoj, aranĝataj por la sindikatfunkciuloj, — rondetoj por la amasa eduklaboristo kaj raportoj ĉe ĝeneralaj kunvenoj. Proksimume por ĉiuj cent lokkomitatoj (bazaj sindikataj kolektivoj) estas meze dekok sindikatismo-rondetoj.

Tia estas la fizionomio de l' eduklaboristo en Sovetio kaj lia situacio.

La sindikato faras grandan eldonlaboron, kiu servas por la bezonoj de l' eduklaboristo kaj de l' eduk-institucioj. Lastatempe vaste ekdisvolviĝis la internacia eduko de l' sindikatanoj kaj la plialtigo de ilia intereso por demandoj de l' internacia edukista movado.

Ĝenerale oni ne povas ne agnoski, ke la eduklaboristoj, en plimulto, meritite okupas la respondecan lokon en la kreado de l' socialisma kulturo.

Z a h a r o v — (Esperantigis V. K.)

---

**Vi ne faris vian devon!**
**se vi opinias vin avangarda kaj ankoraŭ ne abonis Senn P. R-on.** 

## INSTITUTO POR LA SCIENCO PROLETA

Skizeto de nia deveno. — Lastan jaron en novembro, ni organizis «La Instituton por la internacia kulturo», kaj laboris por disvastigi la aferojn de sovetiaj kaj alilandaj proletaj kulturoj. Kaj nun, ĉirkaŭ ni kolektiĝis simpatiaj sciencistoj. Multaj novaj opinioj kaj konsiloj aperis. Ni jam devis ricevi novan karakteron. Tial ni disigis nian malnovan instituton. Kaj kun novaj multaj membroj ni fondis tute novan «Instituton por la scienco proleta», la 13-an de oktobro 1929, en Tokio.

El niaj statuto kaj decidoj. — Ni celas marksisman studadon de ĉiuj sciencoj, kaj ĝian ĝeneraligon. Ni eldonas monatan presorganon «La Scienco proleta», kaj laŭeble eldonos popularan kulturan revuon. Ni organizos kursojn, lernejon kaj publikajn kunvenojn, kaj celkonforme eldonados proletkulturajn kaj marksisme sciencajn librojn. Nia instituto konsistas el 4 fakoj: 1-a—politikaj kaj ekonomiaj sciencoj; 2-a—filozofio, historio, edukproblemoj ;3-a—belartoj, belliteraturoj, filologio; 4-a—natursciencoj, ekzaktaj sciencoj, kaj teknologio.

El niaj nunaj agadoj. — La unuan kurson, ni aranĝis en Tokio, la 9, 10, 11-an de novembro 1929. Ĝin partoprenis ĉ. 300 personoj ĉiuvespere. Programo estis: kultura progreso de Sovetio; pri batalo de kamparanoj; kooperativo; nuna historiscienco; pri ĉinia revolucio; fundamenta problemo en juro; pri arto; nuna japania kapitalismo; deveno de japania proleta movado; pri kino; proleta teatro; Japania proleta literaturo; pri super-realismo.

Jenajn stud-komisionojn ni nun havas. — 1. Japania kapitalismo. 2. Ĉiniaj problemoj. 3. Ŝtatsciencoj. 4. Mondrevolucio. 5. Materialisma dialektiko. 6. Japania Meiĵirevolucio. 7. Historio de japania proleta movado. 8. Edukaj problemoj. 9. Modernaj artoj. 10. Japaniaj modernaj literaturoj en Meiĵiepoko. 11. Historio de japania proleta arto. 12. Proleta kino. 13. Historio de mondliteraturo. 14. Kontrolado de fremdaj vortoj.

La Sekretario

## NIAJ PRINCIPOJ

(Alvoko al la marksistaj scienculoj en la tuta mondo)

Disvolviĝo de marksismo en sfero de sciencoj estas nun unu el la plej rimarkindaj faktoj de l'mondo.

Ĝi promesas la tute novan kulturan vivon al la homaro, alterne interhelpante kun la politika kreskado de l'internacia proleta potenco.

Sed tiu esenco de l'fakto ankoraŭ ne plene sin montras kiel realo en ĉiuj partoj de l'mondo. Precipe en la landoj sub la kapitalista reĝimo la universala karaktero de l'sciencoj estas malhelpita, kaj sinteza evoluo de l'kulturo estas kripligita, eĉ tute ne ebligita:

Internacia burĝaro plue, trovas sian intereson en fabrikado de falsaj sciencoj. Kaj preskaŭ ĉiuj sciencaj institucioj en tiuj landoj ŝanĝas siajn esencajn karakterojn konforme al tiaj taskoj.

Japanio ankaŭ ne povas esti escepto. Precipe en tia lando, kie ankoraŭ forte restis feŭdismo, kaj ne plene disvolviĝis la moderna kulturo, burĝaj sciencistoj ne povis multe progresigi la sciencon. Tuta afero estas lasita al la marksistoj, la proletaj sciencistoj.

Dum furiozo de l'reakcioj helpante politikan kreskadon de la proletaro, ni marksistaj sciencistoj devas progresigi la sciencon, ni devas batali kontraŭ burĝa reakcia kulturo. Necesas al ni forta kunligo de internaciaj marksistaj scienculoj precipe de la sciencaj laborantoj, kiuj konstruas novan kulturon en Sovetio.

Ni nun organizis nin mem kaj fondis la Instituton por la scienco proleta.

Ni nun deklaras niajn principojn: batali kontraŭ reakcian kulturon, helpi al proleta politika potenco, kaj disvolvi marksistan sciencon universale. Kaj ni alvokas kunhelpon, fortan kunlaboradon de internaciaj proletaj sciencistoj.

La 1-an de novembro 1929.

«La Instituto por la scienco proleta», 86, Minami-maĉi, Jocuja, Tokio.

P. S. — Ni petas tutmondajn k-dojn represi ĉi tiun deklaron en ĉiulandaj kulturaj organoj.

---

**JAM ANONCU VIN**

**por la SAT-edukista konferenco**

**partoprenota de la brita Instruista Laborista Ligo (TLL) dum X-a SAT-kongreso en Londono (aŭg. 1930).**
**Turnu vin al: K-dino C. Osmond, 95 Fowlers Walk, Ealing London W. 5.**

# TEPS TUTMONDA ESPERANTA PEDAGOGIA SERVO

**Tiu ĉi ribriko estas gvidata de K-do M. BOUBOU, 96, rue Saint-Marceau, Orléans (Loiret), Francio**

## EL BLANKRUSIO

### Kultura revolucio en BSSR

Pasis 12 jaroj de post Oktobra revolucio. Dum tiuj 12 jaroj estis plenumita en Sovetio ega kultura laboro. Mi volas noti kelkajn faktojn, kiuj tre klare montros ke nur volo kaj energio de venkonta proletaro povas fari miraklojn.

Laŭ plano, en BSSR (Blankrusio) ni projektis likvidi senalfabetecon dum proksimaj kvin jaroj. Hodiaŭ ni povas certigi ke tiun-ĉi taskon ni plenumos dum nur 3 jaroj. Sekve, dum 15 jaroj ni sukcesos likvidi entute senalfabetecon, kiun restigis al ni la cara reĝimo (estis preskaŭ 70% da senalfabetuloj!).

Soveta Blankrusio sin trovis antaŭ ĉiuj lernejoj detruitaj, ekzistis neniu supera lernejo... Pasis 12 jaroj, kaj ni jam havas 4 superajn lernejojn. En 1930, ni malfermos kvinan superan teknikan lernejon! En 1930 ni ankaŭ celas malfermi 7 industriajn teknikumojn: alumetan, teksan, aŭto-traktoran, kudran, konstruan, lignaĵistan...

La nombro da lernejoj kreskas, ankaŭ en naci-lingvoj. Hebreoj, poloj, litovoj, latvoj kaj aliaj naciaj malplimultoj, loĝantaj en BSSR, havas eblon instrui siajn infanojn en gepatra lingvo.

En 1926/27, la poloj havis 132 4-jarajn lernejojn en sia lingvo. Nun tiu nombro estas 161! Krom tio ekzistas 12 7-jaraj lernejoj, 3 lernejoj de kamparana junularo, 40 lernejoj por likvidi senalfabetecon, 7 infandomoj, 2 infanĝardenoj k t p.; preskaŭ samon havas judoj.

Ekzistas 4 teknikumoj (3 judaj kaj 1 pola); ĉe superaj lernejoj ekzistas nacifakoj. En Blankrusia sciencakademio, kiu estas naskita nur dank'al Oktobra revolucio, estas ankaŭ hebrea, pola, litova fakoj.

Mi ne parolas jam pri atingoj de blankrusaj laboristoj kaj kamparanoj, kiuj ricevis rajton disvolvi sian kulturon. Ekzistas blankrusaj, hebreaj, latvaj, polaj, litovaj ŝtataj teatroj. Aperas literaturo en ĉiuj lingvoj. En pola lingvo aperas 200 presfolioj (kontraŭ 100 en pasinto).

En nuna jaro ŝtata eldonejo aperigos 100 presfoliojn en litova lingvo.

Ŝtatan universitaton eniras ĉiujare novaj kernoj de l'laboristaro. En nuna jaro estis akceptitaj 88% de laboristaro en universitaton. Scienckernojn oni ankaŭ varbas el laboristoj.

Minsk estis antaŭe simpla provinca urbeto; nun ĝi fariĝis sufiĉe forta industria kaj kultura centro de la lando. Kino kaj radio, en nacilingvoj de BSSR, estas postoktobraj atingoj. Dum 10 jaroj (ĉar 2 jarojn en Blankrusio estis terura milito kun polaj legioj kaj bandoj) la blankrusa laboristaro kune kun vilaĝanaro sukcesis venki ĉiujn malamikojn, restarigi detruitajn lernejojn, fabrikojn kaj jam konstrui novajn.

> La lando de antikvaj legendoj,
> Lando de marĉoj, arbaroj,
> Lando de poemoj kaj fabeloj,
> Lando de kampoj —

fariĝis dank'al Oktobra revolucio, sub la vera kaj ĝusta gvidado de la Kom-partio,

> Lando de maŝinoj, fabrikoj,
> Traktoroj kaj «osinstroj»'oj. (? Red.)

Dimitri Snejko

## Reformo de niaj lernejoj

Aktuala estas la demando. Venis jam tempo por efektivigi radikalan, pripensitan, sisteman reformon de lernejoj, kiu lernejaron plenigu per nova spirito kaj ebligu lernantaran progresadon, respektive ankaŭ transiron al diversaj lernejtipoj, por ke ne estu neniigita plej granda nacia riĉo, reprezentaĵo de talentaj kaj spirithavaj kapoj.

Mi jam skribis, ke oni enketis, sed nia estinta ministro preskaŭ nenion efektivigis el siaj promesoj, kvankam je la fino de enketado li sen iu ajn rezervo konsentis kun reformo, ja kun grandskala reformo radikala. Ŝajnas, ke nia ministro intencis nur silentigi publikon, kiu rilate al la aktuala demando sin montris per voĉoj treege riproĉantaj.

Ĉiu pripensu: ĉe la fino de nuna lernejjaro oni permesis, ke de post la 1/9. t. j. estu malfermitaj nur eksperimentaj lernejoj unuagradaj (3 en Praha, poste en Blumpolec, Riĉany kaj en Zlin ĉe ŝufabriko Bat'a). Do oni instruas nur en la unua klaso. Sed la ministerio metis jenajn kondiĉojn:

1. Lernejoj estos nomataj «eksperimentaj diferencaj lernejoj burĝaj».
2. La eksperimentado estas permesata nur por unu jaro;
3. Lernantoj de la eksperimentaj lernejoj transirontaj je la mezlernejo devas fari akceptan ekzamenon el ĉiuj lernobjektoj.
4. Inspektoroj pli ofte faros viziton.
5. Oni devas rilate al mezuro de kono instruota akiri minimume rezulton de normalaj lernejoj.

Vi vidas oficialan intencon, laŭ kiuj estus reformotaj nur publikaj lernejoj, sed ne la mezlernejaro. Kaj tamen la reformo de tiuj estas plej grava kaj dezirinda, precipe rilate al preparo de estontaj instruistoj. Estas vero, ke oni proponis fondi pedagogiajn akademiojn, sed la propono neniam ankoraŭ ekaperis. Jam tiu fakto diras klare, kion intencas burĝaj malprogresemuloj burokrataj. Ili ne favoras la reformadon, kaj ni devas antaŭ ĉio reformi instruistan klerigon pligrandigonte ĝin kaj poste reformi la malsuperan lernejaron.

Por progresema instruistaro ne ekzistas laŭdire mono, por ke ĝi pli kleriĝu, pli bone sin preparu por malfacila devo instruista en superaj lernejoj, sed al privataj institutoj klerikalaj nia ministro ree kaj ree donas rajton publikecigan kaj anstataŭ konstruo de novaj pedagogiaj akademioj oni pritraktas novajn porinstruistajn institutojn fondotajn.

Tre malkontentiga estas stato rilatanta niajn burĝajn lernejojn. Kamparana lernantaro plenigas, ja eĉ superplenigas klasojn de niaj burĝaj lernejoj en urboj, kiuj devas mem laŭleĝe vivoteni sin je konto de urbaj elspezoj. Tia stato estas neeltenebla kaj tre nemorala. Plej granda burĝa partio terkulturista (agrara) streĉis fortojn, por ke propono de t. n. distriktaj (distrikto—regiono, ĉirkaŭanta la lernejon en distanco de 5 kilometroj) burĝaj lernejoj ne estu pritraktata, sed ke oni daŭrigu esploradon. Sed ni scias tre bone, ke tia esplorado signifas morton, kaj, se ne, almenaŭ narkotigon de la propono por longa tempo. Niaj urboj tre longe verŝajne pagos ankoraŭ je siaj burĝaj lernejoj, kvankam tiujn plene superplenigas tre multloke nur kamparanaj infanoj terkulturistaj. Kaj tial? Tial, ke agrara, kun klerikala partio kunligite, volus siajn voĉdonantojn pli pezigi per novaj financaj devoj. Nur nacia politiko mortigis novajn esperojn.

Alian reformon de nia lernejaro popola ni vidas en malgrandigo de nombro da lernantoj por unu klaso. Oni devas multan penadon efektivigi, ĝis landa reprezentantaro sukcesigos la malgrandigon de 70 lernantoj je 50. La estinta nombro estis 80. Tiu estis ega, kaj ĉe tiu oni entute ne povis fari individuan edukadon. Sed ankoraŭ unu malhelpas — ni ne devas enskribi infanojn, kiuj ne finis la 6-an jaron, ĝis 1-a de septembro de kuranta jaro. Do, infano naskiĝinta de 2-a de septembro ĝis 31-a de decembro estas preskaŭ 7-jara, kiam ĝi povas komenci sian lernejdevigan vizitadon. Kaj se tiu infano estos enskribita, tiu pos tokjara lerno devas vizitadi la popolan lernejon preskaŭ ĝis 15-jaro; ĉar dum jaro devas neniu ĉesigi la vizitadon.

Al tio aliĝas malbona stato de niaj lernejoj. Ni vane postulas plibonigon. Eĉ se porlernejaj oficoj laŭdeve ordonas plibonigon aŭ novan konstruon, influaj deputitoj-burĝoj ekintervenas kaj efektivigo estas ĉesigata. Tiuj intervenantoj diris, ke ni

multon da nebeżonaj lernejaj palacoj ekkonstruis kaj ke oni devas ĉesigi tian agadon. Do oni ne konstruas popollernejojn, sed aliajn palacojn por lernejoj, politike favorataj, kvankam duonmalplenaj.

Niaj lernejoj ne havas bezonajn porlernejajn helpilojn. Almozula groŝo, konsentata por helpiloj, neniel sufiĉas.

Jes, ni postulas kaj ne ĉesos postuli efektivigon de radikala reformo de lernejoj kaj volos reformon de preparo porinstruista, fondon de regionaj distriktaj lernejoj burĝaj, senmankajn konstruojn kaj sufiĉan prizorgon de helpiloj kaj malgrandigon de nombro da lernantaro por unu klaso. Jen problemoj ĉiuj maturiĝintaj por solvo, aktualaj, pro tio ne prokrasteblaj.

Laŭ J Pučajev en «Ĉeĥa instruisto», tradukis Jar. Machek

## EL FRANCIO

### Statistikoj

Dum milito 1914—19 estis mobilizitaj en Francio: 28 309 instruistoj ŝtataj; murditaj —7 407, vunditaj—9 624. En Francio estas 67 884 ŝtatlernejoj kun 2 969 694 da infanoj kaj 12 342 privataj lernejoj (konfesiaj) kun 770 859 infanoj.

## EL GERMANIO

### La lernejoj en la Germana Regno, 1926/27

En la unua oktobra broŝuro de 1929 de la perioda gazeto «Wirtschaft und Statistik» estas publikigitaj la provizoraj ĉefrezultoj de la regna lernejstatistiko rilate al la lernjaro 1926/27. La nombro de la popollernejanoj en la germana regno ampleksanta la antaŭmilitan teritorion sumiĝas laŭ enketo el 1911 je 8 966 100; el 1906: 9 779 400. Enketoj pri la aliaj lernejoj ne okazis antaŭ 1911. La tuta nombro da gelernantoj sumiĝis:

| | 1911 (nuna regna teritor.) | 1921/22 | 1926/27 |
|---|---|---|---|
| Popollernejoj (inkuzive privataj lernejoj kun porpopollerneja programo) . . . . . . . . . . . | 9.073,000 | 8.930,100 | 6.695,800 |
| Mezaj lernejoj . . . . . . . . . . | 317.700 | 329,300 | 267,900 |
| Pliperfektigaj, porprofesiaj kaj specialaj . . . . . . . . . . . . | — | 2.120,900 | 2.507,000 |
| Superaj lernejoj: | | | |
| por la vira junularo . . . . . | 392,700 | 475,000 | 551,300 |
| por la ina junularo . . . . . . | 215,000 | 247,700 | 271,300 |
| krome en preparaj klasoj . . . | 40,700 | 76,800 | 22,900 |

**Eĉ se vi estas komencanto,
ne timu verki raporton pri via lernejo kaj edukistaro por TEPS
kaj vi ricevos monatan esperanto-bultenon.
Turnu vin senpere al: M. Boubou, 96 rue Saint-Marceau. Orléans (Loiret) Francio.**

La evoluo de la gelernantaj nombroj rilatas al la evoluo de la loĝantoj aĝaj — ĝis 14 jaroj (lerndevigaj) kaj 14 ĝis 18 jaroj (devigaj al pliperfektigaj lernejoj):

La regna loĝantaro en la aĝo de 6 ĝis 14 kaj de 14 ĝis 18 jaroj (1910 kaj 1925)

| | Sekso | Nombro de 1910 (nuna regna teritorio) | la loĝantarô | Ŝanĝiĝo 1925 kompare al 1910 (=100) |
|---|---|---|---|---|
| 6-14 jaroj (lerndeviga) . . | vira | 5.064,492 | 3.870,182 | 76,4 |
| | ina | 5.039,132 | 3.794,152 | 75,3 |
| | sume | 10.103,624 | 7.664,334 | 74,9 |
| 14-18 jaroj (deviga al pliperfektigaj lernejoj) . . | vira | 2.305,262 | 2.645,752 | 114,8 |
| | ina | 2.306,153 | 2.601,303 | 112,8 |
| | sume | 4.611,415 | 2.246,055 | 113,8 |

En la nuna teritorio regna de 1910 ĝis 1925 la loĝantaro havanta la lerndevan aĝon malplimultiĝis preskaŭ je kvarono. Tio estas la sekvo de la granda minuso de naskoj dum la milito. Ĝi tutplene montriĝis per la kvar jarklasoj malmulte plenigitaj, kiuj vizitis la popollernejon depost 1922, 1923, 1924, 1925. Laŭ tio la nombro de la gelernantoj en la publikaj popollernejoj mapligrandiĝis je 26,4% de post 1911 ĝis 1926/27.

La enloĝantaro, kiu havis la aĝon devigan al pliperfektigaj lernejoj, plimultiĝis ankoraŭ je 14% depost 1910 ĝis 1925. La saman evoluon montras la nombroj de la gelernantoj en la pliperfektigaj, porprofesiaj kaj specialaj lernejoj laŭ ekzistantaj komparaj nombroj depost la lernjaro 1921/22 ĝis la lernjaro 1926/27 kaj en la superaj lernejoj, kaj por la vira kaj por la ina junularo, de 1911 ĝis 1926/27.

La popollernejo ampleksas per 4 klasoj la komunan lernejon fundamentan (Grundschule), sur kiu konstruiĝas la kvar superaj klasoj de la popollernejo. Pro tio en la popollernejo ĝenerale ĉiuj infanoj troviĝas depost sia ekvizito de la lernejo ĝis la kvara aŭ parte nur ĝis la tria lernjaro. Ĝi estas ankaŭ plue ĝis la 14-a vivjaro por la multe plej granda parto de la loĝantoj — por pli ol 90% de la tuta loĝantaro la efektiva lernejo entute.

La nombro de la popollernejoj preskaŭ ne ŝanĝiĝis. La nombro de ĝiaj geinstruistoj estis atinginta 1921/22 sian supron kaj nur poste malpligrandiĝis, sed multe pli malmulte ol la nombro de la gelernantoj; ĝi restis, precipe rilate al la instruistinoj 1926/27, ankoraŭ konsiderinde super la stato de 1911. Laŭstatistike unu geinstruisto instruis 1911—54,4, 1926/27—36,8 gelernantojn.

Publikaj popollernejoj en la germana regno:

| | 1911 (nuna regna teritorio | 1921/22 | 1926/27 | Ŝanĝiĝoj en 1926/27 kompar. al 1921/22 1911 | |
|---|---|---|---|---|---|
| Publikaj popollernejoj . . . | 52,358 | 82,763 | 52,785 | 100,8 | 100,0 |
| Lernejaj klasoj . . . . . | — | 208,185 | 187,377 | — | 90,4 |
| Lernantoj sume . . . . . | 9.050,367 | 8.894,496 | 6.669,769 | 73,6 | 74,9 |
| el tiuj viraj . . . . . . . | 4.516,566 | 4.456,183 | 3.356,740 | 74,3 | 75,2 |
| inaj . . . . . . . | 4.533,801 | 4.429,303 | 3.303,029 | 72,9 | 73,6 |
| Plenokupitaj geinstruistoj . . | 166,288 | 195,946 | 180,964 | 108,8 | 93,4 |
| el tiuj: viraj . . . . . . | 131,813 | 146,933 | 137,174 | 104,1 | 93,4 |
| inaj . . . . . . | 34,475 | 49,013 | 33,791 | 127,0 | 89,4 |
| Nombris 1 lernejo klasojn . . | — | 3,9 | 3,6 | | |
| 1 klaso lernantojn . . . . . | — | 42,9 | 35,3 | | |
| 1 geinstruisto lernantojn . . | 54,4 | 45,4 | 36,8 | | |

La ĉi suba statistika tabelo montros la variojn de la popolaj publikaj lernejoj en la germana regno de 1901 ĝis 1921 kaj 1927.

Pli poste vi trovos similan statistikon pri la publikaj lernejoj por la respubliko Saksio.

La nombro de la privataj lernejoj kun popollerneja programo (ne rimarkindaj laŭ sia nombro) pligrandiĝis 1926/27 kompare al 1911; la nombro de la lernantoj ankaŭ, kompare al 1921/22, sed precipe kompare al 1911.

Privataj lernejoj kun popollerneja programo en la germana regno:

| | 1911 (nuna regna teritorio | 1921/22 | 1926/27 | Ŝanĝiĝoj en 1926/27 kompare al 1921/22 1911 (=100) | |
|---|---|---|---|---|---|
| Lernejoj . . . . . . . . . . | 408 | 675 | 572 | 140,2 | 84,7 |
| Lernantoj sume . . . . . . | 22,660 | 35,584 | 36,991 | 163,2 | 104,0 |
| el tiuj viraj . . . . . . . | 10,156 | 14,988 | 15,211 | 149,8 | 101,5 |
| inàj . . . . . . . | 12,504 | 20,596 | 21,779 | 174,2 | 105,7 |
| Plenokupitaj geinstruistoj . . | — | 1,500 | 1,470 | — | 98,0 |
| el tiuj viraj . . . . . . | — | 503 | 445 | — | 88,4 |
| inaj . . . . . . . | — | 997 | 1,025 | — | 102,8 |

Por la respubliko Saksio la prilernejstatistika enketo en la lernjaro 1926/27 montris jenajn rezultojn:

| | Lernjaro 1921/22 | Lernjaro 1926/27 |
|---|---|---|
| I. Publikaj popollernejoj: | | |
| Lernejoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . | 2,197 | 2,129 |
| Lernantoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . | 820,174 | 597,234 |
| Plenokupitaj geinstruistoj . . . . . . . . . . . . . | 16,673 | 15,752 |
| II. Pliperfektigaj, porprofesiaj kaj specialaj lernejoj | | |
| Lernejoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . | 2,034 | 1,565 |
| Lernantoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . | 239,878 | 283,742 |
| Geinstruistoj ĉefoficaj . . . . . . . . . . . . . | 2,063 | 3,990 |
| Geinstruistoj neĉefoficaj . . . . . . . . . . . . . | 8,655 | 5,542 |
| III. Superaj lernejoj por la vira junularo: | | |
| Lernejoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . | 84 | 167 |
| Lernantoj en ĉefklasoj . . . . . . . . . . . . . | 30,717 | 43,879 |
| Lernantoj en preparaj klasoj . . . . . . . . . . . | 400 | 348 |
| Plenokupitaj instruistoj . . . . . . . . . . . . . . | 1,882 | 2,628 |
| IV. Superaj lernejoj por la ina junularo | | |
| Lernejoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . | 15 | 29 |
| Lernantinoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . | 6,992 | 11,376 |
| Plenokupitaj instruistoj . . . . . . . . . . . . . . | 290 | 281 |
| Plenokupitaj instruistinoj . . . . . . . . . . . . . | 158 | 245 |

(Tradukita el «Sächsische Schulzeitung» 1929, № 33).
Johs. Kurt Haubold, Riesa-Groba (Germanio) Altrockstr. 22,1.

## EL HISPANIO

### La salajroj de la instruistoj

La geinstruistoj en Hispanio estas klasigataj en du grandaj grupoj formante du longajn listojn, kiujn oni nomas «ordenskriboj». La geinstruistoj, kiuj apartenas al la unua, akiris la lernejon (la postenon) proprece per ekzamenkonkuro kaj tiuj, kiuj apartenas al la dua ordenskribo, lernejon havas proprece, sed ne gajnita per la ekzamenkonkuro.

La unuaj povas praktiki la profesion en vilaĝoj aŭ urboj kun iu ajn nombro da loĝantoj kaj ilia salajro povas esti de tri mil pesetoj ĝis ok mil pesetoj laŭ la loko, kiun ili okupas en la ordenskribo, loko gajnita per «antikveco», t. e. la malnoveco en la nombro de la servojaroj. La postenon ili povas ankaŭ ricevi per ekzerckonkuro nomita «limigita». Tiujn ĉi geinstruistojn oni nomas ankaŭ «plenrajtaj».

La duaj povas praktiki la profesion nur en vilaĝoj enhavantaj malpli ol 501 homojn kaj ilia salajro estas je 2 000 pesetoj ĝis 3 000 pesetoj. Tiujn ĉi geinstruistojn oni nomas «limigit-rajtaj».

La kategorioj kaj salajroj de la du grupoj de geinstruistoj estas:

| | Kategosio. | Salajro. | | Kategorio. | Salajro |
|---|---|---|---|---|---|
| | 1-a . . . | 8 000 pesetoj | | 8-a . . . . | 3 000 pesetoj |
| | 2-a . . . | 7 000 | Dua | 9-a . . . . | 2 500 |
| Unua | 3-a . . . | 6 000 | ordenskr. | 10-a . . . . | 2 000 |
| ordenskribo | 4-a . . . | 5 000 | | | |
| | 5-a . . . | 4 000 | | | |
| | 6-a . . . | 3 500 | | | |
| | 7-a . . . | 3 000 | | | |

La lernejoj forlasitaj de la propruloj pro maljuneca pensiiĝo, morto, ktp., estas por la provizoraj geinstruistoj, kiuj gajnas nur 2 000 pesetojn jare, sed ili havas neniajn ordenskribajn rajtojn. Por akiri nun lernejon proprece, oni devas plenumi konkuron kaj jam oni gajnas 3 000 pesetojn.

Gregorio Betrán
Maestro nacional Cetina (Zaragoza) Hispanio

## EL SOVETIO

### For la analfabetecon el Sovetio!

La taskoj de la kultursocia konstruado, plua disvolvo de la kultura revolucio nuna, kunlige kun de ni notita programo de la «grandaj laboroj», elstariĝas sur unuan vicon, postulas precipan atenton, precipan ekskluzivan zorgon.

Jam estas klara vero, ke sen sufiĉe granda kultura superniveliĝo de la laboruloj, ni ne povos solvi la starantan antaŭ ni grandegan taskon je l 'afero de la rekonstruado de l'industrio kaj je la plena aliformigo de l'agrikultu a mastrumado (ekonomio).

Inter la demandoj de la konstruado, la tasko de la likvido de l'analfabeteco sendube estas la plej grava, la plej unuaranga: la perdo de l'ritmo rilate la lukton kontraŭ analfabetecon malrapidigus la ritmon ĝeneralan de nia socia rekonstruado.

En Sovetio, la elcento da legosciantoj tre pliiĝis dum la lastaj jaroj, sed oni ne devas forgesi eĉ dum unu minuto, ke pli multe ol duono de la loĝantaro (53%) estas analfabeta, ke sufiĉe grandan elcenton da analfabetuloj ni havas eĉ inter la industrilaboristoj.

Jen kial la lukto por ĝustatempa tempolima likvido de l'analfabeteco necesigas tian batalan signifon, jen kial al ĉi tiu afero estas necese oferi maksimumon de l'fortoj kaj de l'atento.

En speciala decido rilate tiun demandon, Centra Komitato de Tutsovetia Komunista Partio proponas: «urĝe plifortigi la ritmon de la likvido de l'analfabeteco, konsiderante unuavice la industriajn laboristojn el la urboj kaj la novajn tavolojn de proletaro, la senhavajn vilaĝanojn en la vilaĝoj, la laboristojn el sovetia mastrumado, la sezonlaboristojn, la malriĉularon, la anojn de la kolektivaj mastrumoj». La Centra

Komitato donas radikalan proponon: «likvidi la analfabetecon de l'industriaj laboristoj dum unu jaro, de la sovetmastrumaj laboristoj kaj de la anoj de la kolektivaj mastrumoj — dum du jaroj».

Estas certe, ke la taskon plirapidigi la ritmon de likvido de l'analfabeteco oni plenumos nur tiuokaze, se al ĉi tiu afero atente rilatos kun tuta energio kiel partiaj, tiel ankaŭ sovetaj kaj sindikataj organizoj, se por tiuj ĉi celoj oni mobilizos tutan nian sociaparaton.

En sia decido, la Centra Komitato de Tutsovetia Komunista Partio proponas: «radike alikonstrui la tutan sistemon de laboro» rilate la likvidon de l'analfabeteco, vaste uzonte novajn labormetodojn.

Nun oni prilaboras konformajn planojn kaj antaŭpreparas ĝustajn ciferojn por la buĝeto de 1929/30; la proponoj de la CK de TKP devas esti tutplene efektivigataj.

Ni jam havas seriozajn atingojn en tiu ĉi rilato. Ni havos la plej grandajn sukcesojn, se ni kun pli granda fervoro, ekbatalos kontraŭ tiu cara postrestaĵo, kiu estas analfabeteco.

K-do Kolpakov
Groznij, Norda Kaŭkazo.
Komunistiĉeskaja, 64 (USSR)

## Seninterrompa laboro en Sovetlernejoj

Laŭ decido de Komitato de Popolkomisaroj, institucioj kaj produktejoj transiras al seninterrompa laboro per apliko de la kvintaga semajno (4 labortagoj kaj 5-a ripoztago). Oni proponas nomi la tagojn tiel: stelo ,falĉileto, martelo, garbo kaj suno. Kvintaga semajno havas ja grandegan signifon por la batalo kontraŭ la malnova vivmaniero, religio kaj por konstruo de nova vivo laborista, forĵetanta religiajn festojn kun ĝiaj drinkoj, interbatoj kaj ĝia malsaĝigo de l'homamasoj.

Nuntempe la pedagogia gazetaro studas la demandon, kiel soveta lernejo partoprenos en la edukado de la nova homo. Ĝi havas eblon tion fari, eĉ ne plilongigante la lernjaron, ĉar ĝis nun ni havis 218 lerntagojn kaj 60 ripoztagojn kaj per kvintaga semajno ni havos 216 lernajn kaj 54 ripozajn tagojn. Tio ĉi havas signifon por la sano kaj la sukcesado de l'infanoj kaj samtempe ebligas konduki fortan batalon kontraŭ la malnovaj tradicioj en sovetlernejo.

Aliflanke, same kiel la fabrika produktado okazas nun seninterrompe, ĉar la laboristoj laboras kaj ripozas laŭvice je grupoj, tiel same oni povos instrui pli grandan nombron da infanoj, ĉar ĉe ni multaj infanoj ne lernas pro manko de lernkonstruoj. Oni tiucele plibonigos la ventoladon de la lernejoj kaj ĝeneraligos enkondukon de laboratoria metodo en lernado, kiu jam ekzistas en nia urbo Dnepropetrovsko.

La seninterrompa instruado havas plej grandan signifon por la infanoj de laboristoj, kiuj jam transiris al la aplikado de la kvintaga semajno. Estus bone se oni koincidigus ripoztagon de l'infano kun tiu de la gepatroj. Tiu ĉi demando nun diskutiĝas en tuta pedagogia gazetaro de Ukrainio kaj rapide transiros en la vivon.

Je nomo de l'internacia grupo de Instituto Popoleduka — Ŝnol

## Ruĝa flago en preĝejo

En laborista regiono Kajdaki staras, konstruita per manoj de laboristoj, Brjanskaja preĝejo. La laboristojn oni devigis doni 1% el salajro por konstruadi ĝin. Tio ĉi okazis antaŭ 16 jaroj. Tio ĉi estis en malnovo. Dum ĝia inaŭguro ĉeestis mem caro Nikolao la II. Nun 23 000 laboristoj de fabrikoj je nomo Petroka kaj Lenin postulis ĝian fermon, ĉar ĝi estis kulturejo de malklero, malkulturo kaj kontraŭrevolucio. Ukraina centra Ekzekutiva Komitato kontentigis ilian peton. La preĝejo estas fermita. Krucoj estas rompitaj. En ĉefa kupolo flirtas ruĝa flago. En la preĝejo oni faris ekspozicion de sukcesoj de ukraina metalurgio. Dum amaskunveno ĉe fermo de preĝejo ĉeestis miloj da laboristoj, studentoj, infanoj; elpaŝis multe da maljunuloj-laboristoj, kiuj konvinkiĝis pri malutilo de la preĝejo. El sonorilejo aŭdiĝis muziko de «Internacio»....

Tio ĉi estas ankoraŭ unu venko en fronto de kulturo!

Viktoro Kopejkin

## Vivo de soveta instruisto rakontata de li mem

Karaj k-doj! Mi tre volonte konsentas al vi skribi, sed mi timas, ke mi ne povos vin kontentigi plene, ĉar mi lernas esperanton nur de tri monatoj.

Mi estas instruisto de matematiko en lernejo de kampara junularo. Tiu ĉi lernejo lokiĝas en vilaĝo je 60 kilometroj de urbo Novorossijsko (kiu troviĝas sur bordo de Nigra maro) kaj je distanco de 16 km de fervojo. Nia lernejo estas tipo de mezlernejo, ĉar en ĝi oni akceptas la lernantojn, kiuj jam lernis kvar jarojn en komenca lernejo.

Nia lernejo havas trijaran kurson; ĉi tie oni lernas sekvantajn sciencojn: algebron, geometrion, trigonometrion, fizikon, natursciencojn (botanikon, zoologion, anatomion), gepatran lingvon (gramatikon), verkojn de naciaj literaturistoj, sociajn sciencojn (komitato por politika klerigo), kamparanan mastrumon kaj kemion.

Nia lernejo havas 6 hektarojn da kulturebla grundo: 2 hekt. estas okupitaj per ĝardeno kaj legomplantejo, la resto estas plugata. En ĝardeno kreskas: pir-, pom-, prun- kaj aliaj fruktarboj. En legomplantejo ni baldaŭ povos kreskigi ĉiujn legomojn. Apude estas parcelo, kie kreskas tabako. La plantetojn (junajn) de tabako ni vendos al la kamparanoj, kiuj replantos ilin sur kampoj. En plugata grundo, ni semas tritikon, maizon, terpomojn, ktp...

En nia lernejo estas du grupoj da lernantoj: sume estas 61 gelernantoj (el ili 17 junulinoj). En unua grupo estas 33 kaj en dua 28 gelernantoj de 15 ĝis 22 jaroj. En la kunloĝejo de la lernejo loĝas 40 gelernantoj (32 junuloj kaj 8 junulinoj). La ĉambro de la junulinoj estas tute aparta.

La okupojn de la gelernantoj gvidas: administranto, agronomo kaj du instruistoj — pri matematiko kaj gepatra lingvo. Ĉiujn laborojn en ĝardeno, legomplantejo kaj en kampo plenumas gelernantoj. Ili ankaŭ balaas lavas plankon en siaj loĝejoj, hejtas fornojn, ordigas siajn litaĵojn ktp... sed la manĝaĵon preparas kuiristino. La instruado estas senpaga, sed la pensionon de la gelernantoj pagas ĉu la gepatroj (ĉirkaŭ 9 rubloj en monato) aŭ diversaj organizoj, kiam la lernantoj estas malriĉaj. La laboroj de gelernantoj ne limigas sin al nura studado; ili ankaŭ devas konduki grandan socian laboron inter kamparanoj. Por ĉion ĉi plenumi, en lernejo ekzistas labordisciplino kaj organizo.

Mi daŭrigos rakonton en venonta numero. K. Kisselov

Adreso: Kisselov, Konstantin Varfolomeeviĉ, Selo Kievskoe, Ĉernomorskij okrug (Sovetio).

## EL SVISIO

## Lerneja higieno

D-ro Wintsch, en la svisa revuo «Pro Juventute», plendas pro tio, ke en la t. n. «Romanda Svisio» (Suisse Romande) la lerneja higieno ne tre progresas pro manko de kunligado de la kuracistaj penoj. Sed li montras, ke en aliaj svisaj regionoj, kelkaj iniciatoj kaj sukcesoj estas menciindaj.

Ekzemple en Neuchâtel, kie ekzistas nun denta kliniko lerneja, oni konstatas, ke en la klasoj de plej junaj infanoj la proporcio de la suferantoj pro karioj (dentputriĝo) estas limigita je 20%, dum en apudaj urbetoj tiu proporcio atingas ĝis 95% de la tuta gelernantaro.

En naŭ lernejoj de kantono de Vaud, funkcias la «Sunlernejoj», t. e. lernejoj, kie infanoj ĉiam estas ĉe pura ekstera aero suna. La nombro de la forestantaj infanoj malkreskis laŭ proporcio de 4 kontraŭ 1 depost la enkonduko de la aera kaj suna kuracado, dum en apuda komunumo, kie ne estas praktikata tiu kuracado, la nombro da forestantoj ne malpliiĝas.

**Tiu ribriko estas gvidata de Sekretario de liberpensula SAT-sekcio K-do KARL HUBRICHT, Mariannenstr 22/1, Leipzig 030 (Germanio)**

## SCIENCO KAJ RELIGIO

Per la daŭra progresado de scienco kaj tekniko la homo estas survoje alproprigi la atributojn, kiujn havas, laŭdire, la dioj de la kredantoj.

Per radio ni povas aŭdigi nian voĉon samtempe ĉiuloke sur nia terglobo, per bildradio ni povas eĉ vidi la okazantaĵojn en alia loko; do ni posedas la dian econ Ĉ i e - a l e s t o.

Ĉu ni estas ĉiopovaj? Certe ne! Tamen ni estas potencaj kaj priregadas parte la naturfortojn. Ni ankaŭ antaŭdiras la okazontaĵojn. La astronomo antaŭdiras precize la iradon de la astroj, la meteorologo pliperfektigas sian sciencon antaŭdiri la veteron—kiom longe ankoraŭ kaj ni povos fari aŭ influi la veteron laŭ la bezono de la kamparano kaj eĉ la geologo estas survoje antaŭdiri la tertremojn. La aparatoj kaj metodoj de la scienculoj laboras pli precize kaj pli rapide ol antaŭe. Iam oni mezuris la diverslokajn profundaĵojn de la maroj per kablo dum kelkaj horoj, hodiaŭ oni konstatas la profundaĵojn dum kelkaj sekundoj per subakva eksplodo, do per la eĥo. Per skribo kaj presarto — skribo estas materiigita penso — ni povas koni la spiriton de homo post lia morto, per filmo ni povas vidi la aspekton kaj gestojn de la mortinto, per gramofono ni povas aŭdi lian voĉon. Tio estas la s p i r i t a s e n m o r t e c o. La medicina scienco eltrovis metodojn por plijunigi la maljunulojn; tion oni povas konsideri kiel la komencon al m a t e r i a s e n m o r t e c o.

Kaj la bonfaro de dio? Ĉu ĝi ekzistas? Ne, tute ne! Malgraŭ, aŭ pli bone pro la grandegaj progresoj de la tekniko la plimulto de la homaro suferas. Kaj la religioj malgraŭ miljara praktiko ne sukcesis helpi al la homo. Forrestis la bonfaro de dio. Nur la homo mem povas liberigi la homon el la suferoj, ordigante kaj sistemigante la materian kaj spiritan bezonojn de la homaro. Por la homo de nia epoko la bonfaro de dio estas la efektiviĝo de la s o c i a l i s m o.

Sed tio kondiĉas, ke la nuna kaj la estontaj gentoj pensu socialisme kaj ateisme. La infanoj devas esti edukataj en la senco de la socialismo, kiu entenas ankaŭ ateismon. (Religia socialismo estas sensencaĵo). Tio estas tasko de la gepatroj kaj instruistaro.

K u r t H u b r i c h t

## SENOFICIGITA!

### ĉar li neis ekziston de diablo!

Ĉu vi memoras, ke la fama tribunalo en Dajton (Dayton en Usono), antaŭ kelkaj jaroj, kondamnis instruiston, kiu instruis siajn lernantojn pri darvinismo? Tiu tribunalo deklaris kontraŭreligia kaj krima la teorion pri transformiĝo de la vivantaj specoj.

Sed en Germanio, lastjare tian stultan kontraŭsciencan kondamnon superis la administracia tribunalo en Darmŝtat (Darmstadt). Post plendo de pastro Ŝnajder (Schneider) kaj Hartmann, tiu ĉi tribunalo senoficigis instruiston Veber (Weber) pro jenaj faktoj:

1) Veber deklaris al siaj lernantoj, ke diablo ne ekzistas;

2) Veber montris la parencecon inter simio kaj homo;

3) Veber insistis pri la fakto, ke hundoj estas mambestoj tiel same, kiel ankaŭ homoj;

4) Veber skribis sur la nigra tabulo jenan frazon: «Ni estas sur tero por vivi, kiel bonaj kamaradoj», anstataŭ skribi: «Ni estas sur tero por servi kaj agrabli al Dio».



La verkistoj de la romkatolika Petro-Kanisto-Unuiĝo mokas liberpensulojn pro ilia evoluteorio kaj malkonfesas, ke la homo devenas de la simio.

En epoko de la konkordatoj, la lernejon ŝtatistoj donas al pastroj, kiuj mallumigas ĝin, senĝene kovrante ĝin per sia nigra ĉapelo. Tonsuritaj pastroj ne volas simili tonsuritajn simiojn (vidu la bildon).

## KIAJN REKOMPENCBILETOJN UZAS LA KATOLIKAJ PRIVATAJ LERNEJOJ EN FRANCIO

Tio jena ne estas mensogo. Mi posedas rekompencbileton al mi donacitan de kamarado, kiu trovis ĝin apud katolika lernejo. Sur unu flanko estas presita jena teksto:

— Rekompencbileto de katolika junularo — tria serio: difektoj kaj malvirtoj — IV Envio № 244.

Sur la alia flanko jenan presitan tekston oni povas legi:

— La enviulo nepre fariĝas pesimisto kaj revoluciulo. Ĉar la havaĵoj de l'aliuloj kruele suferigas lin, li malamas siajn kunhomojn. Ĝuste de tiu malamo sin inspiras ĉiuj, kiuj penas renversi la socion.

Kredeble ĉiuj serioj de tiuj rekompencbiletoj prezentas similajn kontraŭrevoluciajn tekstojn. Gek-doj, konstatu unu fojon plie, ke «religio havas socian radikon» (diris Lenin) kaj ke pastro kaj burĝo eĉ liberpensa estas du amikoj.

## LA «VILA MANO»... NIGRULA SIN ETENDAS AL FRANCA LERNEJO

Gek-doj, vi certe scias, ke ĝis fondo de la senkonfesia ŝtata lernejo (1881—1884) aŭ ĝis leĝo pri «Disigo de ŝtato kaj religio (1905), Francion la papo nomis «la plejaĝa filino de katolika eklezio».

La senkonfesia lernejo, la sola ŝtata t. n. «laika» lernejo, tiu donaco de jakobenaj burĝaj ŝtatistoj antaŭ 45 jaroj, tiu konkero de francaj geinstruistoj per kuraĝa batalado, estas en grava danĝero — pro la nunaj traktadoj inter Vatikano kaj francaj ŝtatistoj. La evidenta celo estas mildigi la leĝon de 1905 pri «disigo de ŝtato kaj religio».

Eksk-do Mussolini, kiu estis jam informita pri tiuj traktadoj, ironie aludis pri ili antaŭ Roma Senato la 25-an de majo 1929. Li diris:

«... Post la milito okazis tuta serio de konkordatoj en Litovio, Latvio, Polio, Bavario. Nun oni diskutas konkordaton kun Prusio kaj vi ne estu surprizataj, se morgaŭ okazos simila kun Francio. Francio estis rompinta siajn rilatojn kun Vatikano en 1904, sed restarigis ilin en 1921 (per sendo de diplomato franca ĉe papon), kaj en 1929 per agnosko de naŭ misiiŝtaj kongregacioj. Aliflanke la solenaj festoj okazintaj en Francio pri kvincentjara jubileo de Ĵan Dark (la virgulino de Orleans, mortbruligita de pastroj!—Red.) pruvas, ke la politika atmosfero de Francio tute transformiĝis...»

Okaze de tiuj festoj, oni vidis la francan respublikestron (kiu estas protestanto) en katedralo kaj sur stratoj apud la papa legato kaj 70 prelatoj katolikaj kaj ankaŭ multaj parlamentanoj kaj urbkonsilantoj-liberpensuloj!

Laŭ la germana gazeto «Bremener Zeitung» la papaj traktadoj kun francaj ŝtatistoj kaj partiestroj en lastaj ses monatoj antaŭeniris. «La konkordato inter Romo kaj Parizo estas preskaŭ finpreparita. La konkordato agnoskos la senkonfesian lernejon en Francio, sed kompense... la pastroj, havos la rajton penetri la ŝtatan senkonfesian lernejon por instrui religion ekster la oficiala lernotempo».

Franciaj geinstruistoj! La «vila mano» de la nigraj homoj etendiĝas al via lernejo! Ĉu fine vi komprenos la vanan agadon de via liberpensema burĝaro, kiu trompis vin. «En modernaj kapitalismaj landoj, la radikoj de religio estas ĉefe sociaj», diris Lenin. Nur praktikado de klasbatalo povas senmaskigi religion, helpanton de tuta burĝaro.

Laŭ informo de «Liberiga Lernejo» libere arangis M. Boubou

## RELIGIO ESTAS BREMSO POR SOCIALISMO

Eklezio, kiu superregis dum carismo, estis unu el la gravaj fontoj de absolutismo kaj de ĉiu reakcieco. Ĉiu religia ideologio povis dum carismo «vivi» kun ideologio de revoluciaj partoj de socio. La religio dum carismo estis grandega bremso sur vojo de liberiĝo de laboremulaj amasoj.

Religiaj organizoj ankoraŭ kaj nun forte batalas por sia vivo, celas per ĉiuj rimedoj konservi sian organizon, plifortigi sian influon inter amasoj. Ili penas akomodiĝi al ĉiuj postrevoluciaj klasaj movadoj, ili serĉas novajn formojn de laboro, per kiuj ili posedos la amasojn.

En malantaŭaj kondiĉoj de mastrumo ŝtata dum carismo ili posedis kaj regis milionojn kaj milionojn da kamparanoj. Preĝejaj konsilantaroj kaj similaj organizoj havas nun ne malpli, ol unu milionon da plej reakciaj membroj. Laŭ kvanto ili konsistas el kulakoj (riĉul-kamparanoj), estintaj ĝendarmoj, policanoj, caraj partianoj kaj aliaj.

La religiaj organizoj kontraŭas al ĉiuj kulturaj kaj revolucipolitikaj entreprenoj de soveta ŝtato; ili batalas kontraŭ kompartio, komjunularo kaj junpioniraj organizoj. La Unio de Batalantaj Ateistoj faris kaj faras grandegan pozitivan laboron, en afero de detruo de l'influo de la religio kaj samtempe en afero de la kultura revolucio. Ateisma movado estas karakterizata de pligrandiĝo de la «ĉeloj de ateistoj, plimultiĝo de membroj, de amasaj agadoj de laboremuloj kontraŭ preĝejoj, temploj, sinagogoj, kaj pligrandiĝo de unueco de ateista laboro kun soci-politika laboro.

Jen kelkaj ciferoj el nia industria urbo Dnepropetrovsko. Je 1-a de januaro de 1929 estis 30 ateistaj ĉeloj, 9 en distrikto (sur kamparo). Je 1-a de januaro de 1930 estas en urbo 180 ateistaj ĉeloj (15.000 membroj), en distrikto, sur kamparo 80 (4000 da membroj) kaj en lernejoj 60 ĉeloj (5.400 membroj). Dum estinta jaro estis 12 kursoj de ateismo, kiujn vizitis 176 personoj; monataj kursoj kunigis 36 homojn; estis ankaŭ malfermita ateista fako ĉe Laborista Universitato por 30 homoj. Okazis ateismaj lekcioj en geinstruistaj kursoj kaj 2 geinstruistaj konferencoj kaj kursoj pri ateistaj demandoj.

Oni konstatas pligrandigon de la kvanto de l'abonantoj de l'ateista literaturo (ĵurnalo «Bezboĵnik» «Ateisto»)—250 novaj abonantoj. Oni eldonis specialajn ateistajn libretojn pri religiaj festoj. Dum matenmanĝoj en niaj fabrikoj je nomo de Petrovski (23 000 lab.) oni faris 315 ateistajn konversaciojn. En fabrikoj de l'ruĝa Ĉeĉelevka laborista regiono okazis 215 tiaj diskutoj.

La laboristoj de l'fabrikoj je nomo Petrovski kaj Lenin fermis 2 fabrikpreĝejojn. La ruĝarmeanoj fermis Znamenkan preĝejon (estinta militista preĝejo ĝis revolucio). La hebrea loĝantaro fermis 2 sinagogojn. La kamparanoj ankaŭ fermis ĉiujn preĝejojn transformante ilin en

klubejojn. Ĉi tio montras al ni, ke laboristkamparanaj amasoj iradas for kaj kontraŭ religio.

Kontraŭ religiaj festoj kaj ritoj ankaŭ stariĝas lernantoj de niaj laborlernejoj. Ili postulis, ke urba soveto malpermesu havi la abiojn kaj alvokis la gepatrojn ne elspezi monon por «kristnaskaj» abioj. Ĉi tion postulis 44 laborlernejoj de nia urbo. Dum raportado de l'urbsoveto, la infanoj proponis fermi preĝejojn. Sed ni havas ankoraŭ inter junularo kaj infanaro religiemulojn. Ekzemple, en lernejo de 2-a ŝtupo vizitas la preĝejojn triono el la tuta gelernantaro. Ni ankoraŭ havas religiajn instruistojn kaj profesorojn. Nia tasko estas: pretigi la vicojn de l'ateistaj laborantoj, pligrandigi la union de Batalantaj Ateistoj, havante en ĝi kulturlaborantojn (instruistojn studentojn) kaj fari la ateisman propagandon fortega ilo de la kultura revolucio kaj socialista venko.

Por internacia brigado de Dnepropetrovska Pedagogia

Superlernejo **Nina Kopejkina**

---

**«Ju pli disvastiĝados klero en la popolo, ju pli religiaj antaŭjuĝoj estos elpuŝataj de socialisma konscio, des pli proksima estos venkotago de la proletaro, liberigonta ĉiujn premegitajn klasojn el ilia sklava stato en la moderna socio».**

**(Lenin)**

# POR EDUKISTINOJ

Tiu ribriko, fako de SAT-virina sekcio, estas gvidata de K-dino SIMONE GLODEAU, 177, rue Bagnolet, Paris XX (Francio).

## SITUACIO DE LA SAKSA INSTRUISTINO

Francaj instruistinoj sendis alvokon en esperanto al instruistinoj el tutmondo, petante daŭran interligan korespondadon por defendo de la rajtoj de l'edukistinoj kaj ĝenerale de ĉiuj virinoj el laborklaso. Alilandaj Kdinoj relegu la alvokon aperintan en TEPS-numero de Junio 1929 kaj sendu respondon al TEPS sekretario.

Leipzig, en septembro 1929

Ŝatataj kamaradinoj!

En Germanujo lernejaj aferoj ne estas tiel facile priskribeblaj kiel ekzemple en Francujo, ĉar ĉe ni sur tiu ĉi kampo regas plena suvereneco de la diversaj ŝtatoj; ne ekzistas la forta centrigado kiel en Francujo, sed granda decentrigado. Ĉiu ŝtato havas la rajton (ekz. Prusujo, Bavarujo, Saksujo, ktp.) fiksi laŭ la regna konstitucio de 1919 sian propran lernejleĝon. Ĝenerala regna lerneja leĝo ne ekzistas ankoraŭ. Tial mi ne povas doni raporton pri la situacio de la edukistino, kiu estas valida por tuta Germanujo, sed ekzakte mi nur povas priskribi la situacion en Saksujo aldonante aludojn pri la aliaj germanaj ŝtatoj (landoj). Mi nun klopodos sekvi kiel eble plej multe vian demandfolion, por faciligi al vi la resumon.

1. La porinstruista eduko estis ĉiam la sama por instruistoj kaj instruistinoj, samaj studoj, samaj ekzamenoj kun kelkaj malgrandaj esceptoj, ekz, gimnastiko kaj t. n. porvirinaj laboroj (trikado, ktp.). La porinstruista instruado fariĝis en speciala edukejo, la seminario, kiuj estis instalitaj plejparte en malgrandaj urboj. La lernado daŭris de la 15-a ĝis la 20-a jaro, sume 6 jarojn, kaj finiĝis per ekzameno. Sekvis poste 3 jaroj de asistanto,-ino, kiuj ankaŭ finiĝis per ekzameno, kiu rajtigis serĉi mem en iu loko oficon. La junaj instruistinoj asistantinoj ŝatis oficon privatan en riĉaj familioj antaŭ ol preni oficon publikan. Kunedukado por instruistoj kaj instruistinoj ne ekzistis en porinstruistaj lernejoj. La nova porinstruista eduko estas alia: en Germanujo ĝi estas plej bone kaj ekzakte efektivigata en Saksujo de post 3 jaroj, nome:

La gejunuloj lernas en iu supera lernejo de la 10-a ĝis la 19-a vivjaro sen iu ajn tendenco al pedagogia eduko. Nur tiam, post la 19-a vivjaro ili devas decidiĝi por la profesio instruista. La porinstruista eduko nun fariĝas en la pedagogiaj institutoj en Leipzig kaj Dresden dum tri jaroj, kaj estas la sama por knaboj kaj knabinoj en kunedukado. Do, tiuj venontaj instruistoj kaj instruistinoj havas pli longan studadon kaj tial pli altan salajron ol la malnova generacio de geinstruistoj.




Miss (F'ino) Carmen de Barnes (Karmen de Barnz), knabino verkinta libron pri vivo en privataj intern-edukejoj en Usono, kaj pro tio eksigita el tiu edukejo de Nov-jorko.

Por plej junaj infanoj, ĝis la sesa vivjaro, ne ekzistas devigo, devo. Ilia lernado aŭ vizito de iu ajn instalaĵo estas libervola. Por ili ekzistas la t. n. «Kinder-gärten» (infanĝardenoj), ĉu privataj, ĉu komunumaj, sub gvidado de «Kindergärtnerinnen» (infanĝardenistinoj), kiuj, se ili volas estri komunumajn infanĝardenojn, devas lerni dum 2 jaroj en urba seminario por infanĝardenistinoj kaj pasi specialan ekzamenon. Ilia studado ne estas tiom longa kaj malfacila kaj tial la salajro ne tiom alta. Ankaŭ riĉaj familioj preferas en tia maniero edukitajn infanĝardenistinojn por siaj plej junaj infanoj.

2. La salajro de geinstruistoj dum senedzeco estas la sama. Por sama ofico, sama labortempo ekzistas la sama salajro. La instruisto edziĝinta ricevas pli altajn monhelpojn por loĝejo kaj por la infanoj, al kio tute ne havas rajton la instruistino edziniĝinta. Plejparte la instruistinoj eniras la instruistajn asociojn; ili ne volas apartiĝi de la instruistoj; sed ekzistas ankaŭ granda asocio en Germanujo, kiu nur ampleksas virinojn, ne nur instruistinojn de la popollernejoj, sed ankaŭ tiujn de ĉiuj aliaj superaj lernejoj. Ĝi nomiĝas: «Allgemeiner Deutscher Lehrerinnenverein» (Ĝenerala Germana Instruistinasocio).

3. Krom multaj aliaj avantaĝoj la nova konstitucio post la revolucio alportis al la instruistino la rajton edziniĝi kaj daŭrigi sian oficon. Antaŭ la revolucio tio estis neebla al ŝi. La tuta publiko, inkluzive la geinstruistaro, estus furiozinta en falsa morala patoso kaj per hipokritaj diroj. Ne estas la loko ĉi tie por pli longe pritrakti la diversecon de la publika opinio. Ankoraŭ nun la kontraŭstaro al la instruistino patrino ne ankoraŭ malaperis tute. La publika opinio ankoraŭ post la revolucio unu fojon postulis la malaperon de la instruistino edziniĝinta post la malfeliĉa inflacio 1924 en la famaĉa eksoficiglego, kiu dekretis: ĉiuj oficistinoj edziniĝintaj ĝis la 31-a de marto 1924, devas esti eksoficigataj, ĉar ili estas «duoble gajnantaj» («Doppelverdiener»). Sekve de tio ĉiuj instruistinoj edziniĝintaj ankaŭ estis eksoficigitaj; ili ricevis «elaĉetan sumon» aŭ provizoran pension ĝis reenoficiĝo. Vere tiu regulo al la ŝtato nur ŝparis malmulte da mono. La instruistinoj, kiuj edziniĝis post la 31-a de marto 1924 ree povis daŭrigi sian oficon. Vere estas ke ankoraŭ ĝis nun ili ofte devas suferi per la envio de siaj kolegoj.

4. La vidvino de instruisto, mortinta dum ofico aŭ pensitempo, rajtas ŝtatan pension. La alia kazo, vidvo de instruistino, ĝis nun ne okazis kaj tial mi ne povas diri ĉu li rajtas pension. Certe ĉi tiu kazo estus traktata en la multaj ministeri-oficejoj en Germanujo en tre diversa maniero, tio dependas tute de la persona kaj politika opinio de la ministeri-oficistoj. Elspezo de procentaĵo al apartaj kasoj por vidvinoj kaj orfoj flanke de geinstruistoj celibataj ne estas deviga; tiu elspezo estas tute libervola. Instruisto, kiu krom la ŝtata pensio por sia vidvino kaj infanoj volas monhelpon por ili, fariĝas membro de kaso aranĝita de la instruistasocio.



Anna Texler (Teksler), maljuna eks-instruistino, funkciinta dum kvindek jaroj en novjorkaj urbaj lernejoj, kaj nun mizere vivanta, ĉar urbaj aŭtoritatoj ne volas pagi al ŝi pension.

5. La instruistino rajtas pagatan akuŝan libertempon, sume 10 semajnojn, nome 4 semajnojn antaŭ kaj 6 semajnojn post la akuŝo. Tiu tempo povas esti dispartita ankaŭ en alia maniero. La anstataŭantino estas pagata de la ŝtato. Laŭleĝe ŝi ankaŭ povas havi infanojn ekster leĝa edzineco, sed tiu kazo ĝis nun, laŭ mia sperto, fariĝis nur unufoje en Germanujo kaj estas certe por la patrino tre riska afero. Tio tute dependas de la publika opinio, de la lerneja administracio kaj precipe de la fortaj nervoj de la instruistino. Ankaŭ la kunvivado kun amiko ne estas kontraŭleĝa, tamen aliaj influoj estas sufiĉe fortaj por neebligi tion.

6. Depost la revolucio laŭ la regna konstitucio ĉiuj virinoj en Germanujo havas la voĉdonrajton ĉu aktivan aŭ pasivan. La instruistinoj vigle partoprenas en profesia edukista agado, en politika movado kaj ankaŭ en feminista movado (ekz. batalo por la rajtoj de la edziniĝinta instruistino).

7. Miaj apartaj postuloj estas ke la nombro de la instruistinoj en knabinaj lernejoj estu pli granda ol ĝis nun. Certe ĝis hodiaŭ la influo de la vira kolegaro estas tro granda, pli granda ol en aliaj landoj, kaj laŭ mia opinio estas necese, ke minimume la virina edukistaro ampleksu en tiaj lernejoj la duonon de la gekolegaro. Estas ankaŭ necese, ke pli ol ĝis nun edukistinoj havu decidan influon en la gvidado de lernejoj. Ni luktas kontraŭ la antaŭjuĝoj, ke edziniĝinta oficistino estas devigata forlasi sian oficon kaj kondamnata al nura mastrumado kaj patriniĝo.

Tio devas dependi tute de ŝia propra volo. En politika vidpunkto ni luktas, ke nova milito ne mortigaĉu la infanojn, kiujn ni naskis, kaj ni salutas ĉiujn klopodojn, kiuj kreskigas la amikajn rilatojn internaciajn ĉu de laboristoj, ĉu de instruistoj, ĉu de aliaj profesioj.

Gertrud Räuber

## SITUACIO DE BLANKRUSA INSTRUISTINO

1. La instruistinoj blankrusaj ricevas pedagogian antaŭpreparon saman, kiel instruistoj, lernante en la samaj pedagogiaj kursoj kaj pasante la samajn ekzamenojn. Por geinstruistoj en mia lando ekzistas du ĉefaj specoj de lernejo: pedagogia teknikumo por unuagradaj lernejoj kaj pedagogia fakultato ĉe universitatoj por geinstruistoj de pli altaj lernejoj (7-jaraj, 9-jaraj). Ĉe la institutoj ekzistas fakoj por la geinstruistoj de la plej junaj infanoj, kiuj lernas en infanaj ĝardenoj. La geinstruistoj de l'infanĝardenoj ricevas la saman salajron, kiel la geinstruistoj de la komenca lernejo.

2. Salajron, pension, instruistinoj ricevas egalajn al tiuj de instruistoj. Apartajn sindikatajn organizojn instruistinajn ni ne havas, ĉar en siaj politikaj rajtoj, soveta virino estas plenrajta. Estas vere, ke virinoj havas siajn apartajn kunvenojn, ili penas liberigi sin de malnovaj vivmoroj, plibonigi sian situacion per organizado de infanaj placetoj, vartejoj, kaj socia nutrado. Tiun ĉi laboron ili efektivigas per elekto de delegitinoj kaj okazigo de ĝeneralaj virinaj kunvenoj.

3. Kompreneble, ĉiu instruistino povas edziniĝi kaj daŭrigi sian oficon.

4. Vidvino de mortinta instruisto ricevas la monhelpon de la asekurkasoj, kiuj ekzistas el la mono de dungantoj, po kvarono de instruista salajro por ĉiu infano, tamen la monhelpo entute ne estu pli ol monata salajro de l'instruisto. Tio sama estas, kiam mortas instruistino aŭ restas post ŝi infanoj. Estas vere, ke se la vidvo aŭ la vidvino havas iajn rimedojn por vivo la monhelpon oni povas malpliigi.

5. Ĉiu instruistino havas libertempon kvarmonatan akuŝan, pagatan de asekurkaso. Pri leĝa aŭ neleĝa edzineco ni ne havas iajn diferencojn. En sia privata vivo la instruistino povas vivi, kiel ŝi volas konservante ĉiujn siajn rajtojn.

6. Ĉiu laborula virino (sekve ankaŭ instruistino) havas voĉdonrajton de post februara revolucio de 1917. La rajton Oktobra revolucio forprenis de burĝinoj-ekspluatistinoj.

7. Virino en Sovetio ne bezonas batali por politikaj aŭ ekonomiaj rajtoj. Ilin ŝi ja posedas. Tamen la vivordo ofte malhelpas uzi la rajtojn. Ekzemple, ŝi povas partopreni sindikatan movadon, tamen la infanoj, la hejma mastrumo ofte ne donas eblon aktive partopreni la movadon. Antaŭ sovetia virino staras la tasko venki la malhelpojn per radika rekonstruado de la vivordo. Kaj ni esperas, ke tiu venko fariĝos baldaŭa realaĵo, kondiĉe ke ĉiuj laboruloj aktive partoprenu ne nur en virina movado, sed en tuta socialista rekonstruo de nia ekonomia sistemo.

En la nomo de geinstruista konferenco de Kopysa disrikteto, skribis: (Esp. teksto de Krapivin)

Traskoviĉ, Astaĝoviĉ

# NI, GESTUDENTOJ...

Tiu ribriko, sub kontrolo de SAT-studenta sekcio estas gvidata de K-do D. SNEĴKO, Poŝtkesto 33, Minsk (Soveta Blankrusio)

## NIA LERNEJO EN SARATOV, KAJ NIA STUDENTARO

Supera Veterinara Lernejo estas fondita en Saratov dum civila milito. Tial ĝi estas nekompareble pli malriĉa ol aliaj lokaj superaj lernejoj. Ni, ekz., ne havas speciale konstruitan domon kaj okupas ejojn de eksa gimnazio, kiuj ne sufiĉas por ĉiuj laboratorioj kaj kabinetoj. Pro tiu ĉi kaŭzo kelkajn sciencajn disciplinojn oni lekcias al ni en Universitato, kiu posedas luksajn domegojn kaj eĉ apartan klinikan urbeton. Konstruo de nia lerneja domo estas projektata nur en sekvanta jaro.

### Ekonomia stato

Ekonomia stato de nia studentaro pliboniĝas de jaro al jaro. Ŝtata stipendio pasintjare egalis 23 rublojn, — nun 27. Stipendioj de diversaj institucioj estas pli grandaj — ĝis 50 r. Stipendiojn ricevas 50% da studentoj. Dudek sep rubloj estas sumo modera, sed permesas kontentigi ĉiujn niajn vivbezonojn. Kvina parto de studentoj loĝas en lerneja komunloĝejo, pagante 2—5 rublojn monate. Aliaj luas privatajn ĉambrojn. Kutime en ĉambro loĝas du-tri studentoj kaj pagas po 5—7 r. Por tagmanĝo en propra manĝejo ni pagas al nia kaso de interhelpo 9 r. monate. Kason aniĝas 72% da studentoj. Kasoj de apartaj lernejoj estas unuigitaj ĉe speciala komisiono, kiu zorgas pri plibonigo de studentaj vivkondiĉoj. La komisionon eniras reprezentantoj de urba soveto kaj de aliaj pli-malpli gravaj institucioj. Ĝi posedas en la urbo diversajn magazenojn, panbakejon, apotekon, dentistan ambulancon, centran manĝejon kun malkaraj tagmanĝoj (0,23—0,34 r.), frizejon, metiejojn, ktp., per kiuj ĝi priservas je privilegiaj kondiĉoj (kredito, rabato) studentaron.

### Socia konsisto

Du trionoj da studentoj venas superan lernejon «de stablo kaj plugilo» — ili estas laboristoj kaj kamparanoj. Necesajn por enirekzameno sciojn ili ricevas en laboristaj fakultatoj, lernejoj por kamparana junularo, teknikumoj, ktp. Alian trionon konsistigas oficistoj kaj iliaj gefiloj. Tiel nomata «nelaborula tavolo» (pastraro, komercistoj, k. s.) estas tre malgranda, kaj komencante de kuranta jaro ĝi tute ne estas akceptata en superajn lernejojn. Pagas por studado nur tiuj studentoj, kies gepatroj estas altsalajrataj (ekz. altkvalifikitaj specialistoj). El 500 niaj studentoj por pasinta lernojaro pagis 26 personoj en tuta sumo

1 600 rublojn (de 10 ĝis 500 r., laŭ enspezo de la gepatroj). Interalie, 500 r. pagas studentino, kies patro estas «nepulo», — burĝo, kreita de nova ekonomia politiko.

Niaj superaj lernejoj ne povas dume akcepti ĉiujn, kiuj deziras ricevi superan klerigon. Sed tiu deziro estas tiom forta, ke abiturientinoj, ekz., ekzameniĝas eĉ en nia lernejo, ne timante malfacilojn de veterinara profesio por la virino. En kelkaj kursoj elcento da virinoj atingas 30. En medicina kaj pedagogia fakultatoj ilia kvanto eĉ superas tiun de viroj.

### Socia studenta vivo

En la lernejo bolas socia vivo. Ekzistas multenombraj rondetoj (rajda, drama, sporta, muzika, scienca, rondeto de aktuala politiko, de profmovado, k. s.), ĉeloj de diversaj sociaj organizoj: Komjunularo, Kompartio, Int. ruĝa Helpo, «For Analfabetecon!», k. a. Gvidrolon ludas studenta profesia komitato (mallongigite, profkom), kiu unuigas sindikatanojn (87%) kaj ĉiujn aliajn studentojn. Profkomo eniras Sindikaton de Medicinsanitaraj Laboruloj kaj havas reprezentanton en Studenta Fako ĉe Sindikatara Soveto. Profkomo havas kultur-klerigan, akademian kaj ekonomian sekciojn, pri kies destino parolas iliaj nomoj.

Nia studenta murgazeto havas korespondantojn inter studentoj, scienclaborantoj kaj oficistoj de lernejo. Neniu noto en ĝi restas senresponda flanke de l'administrantaro — murgazeto estas aŭtoritata. Intercetere, sekretario de administrantaro estas studento.

### Du interesaj faktoj

Socian fizionomion de nia studentaro montras jenaj faktoj. Por entreprenita aŭtune en Saratov grandioza militiro kontraŭ analfabeteco nia lernejo sendis 360 volontulojn, kiuj entuziasme organizas en ĉiuj urbaj anguletoj lernejojn kaj grupojn de analfabetuloj, instruas ilin, klerigas, dediĉas al ili sian tiom karan por studento tempon. Kaj kun fiero ni povas diri, ke ne sen nia partopreno dum ĵus pasinta vintro estis likvidita analfabeteco ĉe 18 000 analfabetuloj. Notinde estas, ke multaj profesoroj aktive partoprenas en batalo kontraŭ analfabeteco kaj mem instruas abocon al nelegosciaj.

Jen alia fakto. Paroĥanaro de iu urba preĝejo, konsistanta el kelkaj dekoj da sendentaj maljunuloj kaj malkleraj virinoj, por siaj dio-kultaj bezonoj okupis grandan ejon, dum la apuda lernejo suferis malvaston. Pioniroj-lernantoj de iu lernejo komencis agitadon por fordono de preĝeja konstruo en disponon de ilia lernejo. Socia opinio subtenis la infanojn; multegaj oficejoj, fabrikoj, ankaŭ nia lernejo, revokis per rezolucioj de ĝeneralaj kunvenoj, postulantaj, ke la urba soveto disponigu preĝejan konstruon al la lernejo. Ĉe ni rifuzis subskribi la liston nur du studentinoj kaj unu profesoro, kiuj estas primokitaj en nia murgazeto

kaj sur scenejo. Dum reprezentado de nia «Viva Gazeto» [1]) post oficiala parto de iu festvespero, aktoroj sur scenejo moksolene donacis al diemaj profesoro kaj studentinoj po preĝlibreto, devigite ilin konfuzitajn forlasi la halon sub ridoj kaj mokaj rigardoj de ĉeestantoj.

## Studenta kontrolo de la lernejo

Ĉe ĉiuj katedroj de nia lernejo laboras tiel-nomataj lernobjektaj komisionoj, kiujn eniras profesoro, liaj asistantoj kaj kelkaj studentoj. Tiuj komisionoj zorgas pri pli bona funkciado de siaj katedroj. Nombre studenta parto de komisionoj ne cedas al la profesor-instruista. Tio ofte estas tre grava. Komisionoj elektas profesorojn kaj scienclaborantojn el sin deklarintaj kandidatoj; ili elektas ankaŭ kandidatojn el studentoj, kiuj deziras sin dediĉi al scienca agado. Do, ĉar parto de profesoraro restas ankoraŭ fremda al ni laŭ sia ideologio, tasko de studentoj-membroj de komisionoj estas, ne allasi sur postenojn de scienclaborantoj personojn ideologie fremdajn, elekti inter studentoj ne nur la plej kapablajn, sed ankaŭ la plej aktivajn en socia rilato, proletdevenajn kaj fidelajn al laborista klaso.

En kreado de nova sovetia lernejo partoprenas ĉiuj studentoj. Vintre ni havis specialan «lumonaton», dum kiu sub fajron de studenta kritiko estis metata laboro de katedroj, agado de administrantaro, de lernejaj sociaj organizoj. Ĉiuj akademiaj grupoj, ĉiuj kursoj daŭre priĵuĝis kaj senkompate kritikis mankojn en nia lerneja vivo, proponis vojojn por ties forigo, donis multe da valoraj konsiloj, kiuj nun estas efektivigitaj. Ne nur kelkaj profesoroj ricevis de ni «varmegan ŝvitbanon», kiel parolas rusoj, — ni ne kompatis nin mem. Ni vipis studentojn, kiuj ne konscie rilatas al studado, ne volas plenumi socian laboron, kiuj vidas en lernejo nur rimedon por estonta persona prospero. Laŭ nia postulo kelkaj tiaj studentoj estas eksigitaj el lernejo.

Ĉiu nia studento havas ian t. n. socian ŝarĝon. Kiu zorgas nur pri studado kaj ne deziras partopreni socian vivon de l'lernejo, tiu estas konsiderata kiel fremda al ideoj de soveta lernejo. Post kvinjara lernado junaj bestkuracistoj devas esti ne nur spertaj specialistoj, sed ankaŭ bonaj sociaj agantoj, aktivaj konstruantoj de la nova socialista vilaĝo.

S. B o j e v (Saratov)

---

[1]) Viva gazeto, disvastigita en Sovetio, speco de sceneja revuo pri aktualaĵoj— de loka vivo (en fabriko, lernejo, ktp.) prezentata en facila satirhumora kaj originala formo de amatora kolektivo.

---

**Per Senn. P. R.**

**ni kondukas vin senpere**

**en la internacian bataladon de la mondedukistoj. Abonu kaj kunlaboru!**

## STUDENTOJ BOJKOTU MILITISTAN INSTRUON!

En Francio, la lastan homarbuĉadon oni akceptigis al la popolo, deklarante, ke ĝi estos «la lasta, finlasta milito», justa kaj rajta milito eternigonta pacon. Sed tuj post la milito, la francaj ŝtatistoj, kiuj estas el la plej eminentaj pacifistoj el Ligo de Nacioj, organizis la plej teruran armeon el mondo, kun bazo de potenca multenombra oficiraro kaj suboficiraro (profesiaj militistoj).

Sed tio ne sufiĉis. Timante ian demokratigon de l'armeo, ili organizis en ĉiuj altlernejoj superan militistan preparon (mallongige PMS) en celo el popolelito, el studentoj fari rezervajn oficirojn, apartigi la intelektajn junulojn de la t. n. «malalta klaso», la soldataraĉo en kazernoj, kaj ilin instigi por «renegati» sian devenan klason.

Depost la por «ĉiam lasta milito», la PMS floradas en la porinstruistaj lernejoj. Kvankam la PMS estas fakultativa por pedagogiaj studentoj, la ministro donis severajn ordonojn por ke ĉeestu ĉiuj studentoj. Kompreneble, kontraŭ tio ribelas la proletaj studentoj. En lasta junio, la studentoj el la pedagogia lernejo en Kemper (Quimper) ribelis kontraŭ la militista preparo, sabotis ĝin, protestis kontraŭ la severega disciplina reĝimo kaj estis «lokaŭtataj» de la registaro. Post la lokaŭto, 10 studentoj restis eksigitaj. Malgraŭ tiu persekuto, nunjare la batalo kontraŭ PMS rekomenciĝas en Quimper. Preskaŭ ĉiuj studentoj rifuzas ĝin partopreni kaj «kvarantenigas» (parole bojkotas) la flavulojn.

La tuta pedagogia studentaro el Privas amase rifuzas la militistan preparon kaj la 14-an de novembro 1929 laŭtigis al ĉiuj francaj studentoj la jenan admirindan alvokon:

«La helpo donata per militista preparo al la studentoj por facile atingi la superajn oficirgradojn de l'armeo — estas nur rimedo uzata de burĝaro nun intelekte tute degeneranta por pluigi sian regadon, ĉerpante por si el freŝa energio de la proletidoj.

«Ni, filoj de laboristoj, kamparanoj kaj modestaj oficistoj, deklaras ke ni rifuzas fariĝi lakeaĉoj de burĝaro, t. e. perfidi nian klason. Ni asertas, konforme al opinio de proleta pedagogo Albert Tjeri (Thierry), ke «rifuzo parvenuiĝi» estas la devo de ĉiuj estontaj popoledukistoj.

«Konsciante nian klasdevon, ni amase rifuzas partopreni la kursojn de PMS, ĉar ni opinias, ke nia loko en la kazerno ne devas esti super, sed apud la proletoj kies batalojn ni volas partopreni.

Ni, pedagogiaj studentoj en Privas, laŭtigas nian varman alvokon al ĉiuj francaj studentoj-kamaradoj por ke siavice ili rifuzu viziti la kursojn de PMS, kiu estas fazo en la preparado de l'imperialisma milito.

La pedagogiaj studentoj el Privas».

Necesas mencii, ke la gvidado de tiu studenta movado apartenas al la «Unio de Ruĝaj Pedagogiaj Studentoj» (UGEE), plej grava sekcio de la «Ruĝa Studenta Federacio» (UFE).

SAT-ano 518

# NIA SAT EDUKISTA SEKCIO

Tiu ribriko estas gvidata de Sekretario de SAT-edukista sekcio K-do M. BOUBOU, 96 rue Saint-Marceau, Orléans (Francio)

## EFIKO DE PERESPERANTA LABORO

La Pedologia Katedro de la Kieva Instituto de Popola Klerigo decidis starigi peresperantan laboron post raporto de profesoro Muziĉenko pri utiligo de esperanto por internacia edukado kaj scienca ligo kun eksterlando.

Samtempe prof. Muziĉenko proponis organizi ĉe laborlernejo № 43, de li estrata, esperanto-rondeton por starigi modelan esperantan laboron en lernejo.

Ambaŭ laborojn nun gvidas SAT-kdo Egers, kiu jam atingis bonan sukceson. Kiel unuan taskon, la kieva Pedologia Katedro decidis kolekti per esperanto ĉiulandajn abocolibrojn kaj jam alvenis tiaj libretoj el Polio, Francio, Japanio, Ameriko, Jugoslavio... En la Kieva pedagogia ekspozicio ĝis nun plej belan lokon okupas la trideko da diversaj abocolibroj kaj legobildaroj el Francio. Tre dezirataj estas materialoj el aliaj landoj, ĉefe el Rumanio, Bulgario, Grekio, Turkio. La Pedologia Katedro ĉiam rekompencas la sendintojn.

Jam okazis kelkaj laŭdaj raportoj pri tiu peresperanta laboro. Tial nun ni havas tre gravan poresperantan agitadon en kievaj scienc-pedagogiaj rondoj. «Tion ni danku al k-do Muziĉenko, ĉar li estas tre aŭtoritata scienculo kaj liaj paroloj signifas pli multe, ol la penoj de iu esperantisto».

Prave tion opinias kaj al ni skribis tieaj SAT-edukistoj. Sed necesas aldoni, ke tiun sukcesan agitadon ni unue ŝuldas al peresperanta faka laboremo de la kievaj SAT-edukistoj kaj de iliaj eksterlandaj korespondantoj.

SAT-edukistoj, aŭdu alvokon de Kieva Pedologia katedro. Tial, ekzemple, koncentru kelkajn semajnojn viajn penojn al dokumentumo de la Kieva ekspozicio, por ke la peresperanta sukceso disaŭdiĝu tra tuta Sovetio. Amase sendu abocolibrojn al:
Pedologia Katedro — Trudŝkola № 43 ul. Voroŝilova, 25. Kiev (Ukrainio)

---

Ĉu vi jam abonis?
Se jes, ni petas vian konsilon, vian kritikon kaj ĉefe vian kunlaboron.

## LA «SOVETA PEDAGOGIA REVUO».

Ni ne sekvos la konduton de la «neŭtralaj» esperantistaj edukistoj, kiuj de preskaŭ tuta jaro silentas pri la plej granda atingaĵo (ĝis nun) de esperanto en pedagogiaj medioj, nome pri apero de la «Soveta Pedagogia Revuo». Tiu sukceso pri daŭra aplikado de esperanto por pedagogia informado multe pli valoras ol la unutagaj sukcesetoj de TAGE en novlernejaj, neŭtralaj, pacifistaj kongresoj internaciaj en lasta jaro, kvankam unuafoje TAGE vigle klopodis por ekataki la internacian fortikaĵon de neinternaciistaj edukistaj organizoj.

Ni ja komprenas, ke la neŭtrala organo IPR timas montri al tutmonda neŭtrala geinstruistaro, ke la bolŝevikaj edukistoj estas nun la plej kuraĝaj aplikantoj de esperanto (ĉar ili estas internaciistoj). Aliflanke, ni supozas, ke gvidantoj de TAGE timas konkurencon de la «Soveta Pedagogia Revuo».

Al avangardaj kolegoj, kiuj iafoje prave restas anoj de TAGE pro apartaj kondiĉoj de landa propagando, ni ripetas, ke la fina venko de esperanto okazos en internaciismo kaj ke en la kapitalisma «neŭtrala» medio la sorto de esperanto sekvos la samajn trompajn zigzagojn, kiel la porpaca propagando ...ĝis la venonta milito.

SAT-edukistoj kaj «Senn. P. R.» ne timas la konkurencon de «Sov. Ped. R.». Ni ne riproĉos pri disigo de penoj kaj malfortigo de la movado. Kiu ne rimarkas, ke la apero de «Sov. Ped. R.» kaj de nia «Senn. P. R.» signas la komencon de la nova epoko, en kiu aplikado de esperanto ludas la ĉefrolon?

Ni scias, ke la esperantistaj geinstruistoj ne trovas monon por unu propaganda organo (kies intereso estas nur esperantista), sed en nuna novepoko, la plej malriĉa edukisto el balt-aŭ balkan-lando volos trovi unu-du dolarojn por informi sin pri la internacia vivo de l'edukistoj ĉe la plej riĉa fonto.

En proksima numero, ni prezentos detalan bibliografian artikolon pri la «Soveta Pedagogia Revuo», kiu jam aperigis naŭ kajerojn. Ne parolu seninforme pri soveta pedagogio kaj pri soveta geinstruistaro. En neniu ekstersovetia gazeto eblas trovi tiel abundan materialon pri tiuj nekonataj temoj. En momento, kiam furiozas en tutmondo kontraŭsovetia kampanio, la «Soveta pedagogia Revuo» gvidos avangardajn edukistojn al ekkono de vero pri Sovetio.

M. B.

## ĈE FIAI KAJ SPI

Oni povas legi en la januara kajero de «Internacia Pedagogia Revuo», ke la sekretario de la Federacio Internacia de Asocioj Instruistaj (FIAI) Lapjer' (Lapierre) esprimis sian dubon pri la internacieco de l'edukista esperanto-movado kaj moketis pri asocio TAGE, tial ke ĝi estas nombre nepotenca kaj ke pli ol la duono de la tutmonda membraro troviĝas en Germanio. Pro tiu fakto, la sekretario de TAGE konkludas: «Malpro-

pagandas esperanton inter la instruistaro tiuj, kiuj ne abonas al TAGE».

Laŭ nia opinio, tiu konkludo estas erara. Oni ĝis nun registris 5000 esperantistajn edukistojn en tutmondo, sed ni konjektas, ke la reala nombro superas 10 000. TAGE havas preskaŭ 1 000 membrojn. Bedaŭre nur tre malmultaj el la ceteraj estas SAT-edukistoj kaj la riproĉo de TAGE ne povas sin turni al ni. Ni ja deziras, ke TAGE prosperu konkerante la amason de la neŭtralaj, ankoraŭ ne organizitaj, esperantistaj edukistoj. Sed oni ne povas devigi la klaskonsciajn edukistojn aliĝi al TAGE por imponi ĉe burĝa eĉ pacifista organizo.

Ĉar Lapjer estas ankaŭ unu el la gvidantoj de l'Amsterdama instruista internacia organizo SPI, ni aldonas jenan rimarkon. Tuj post la milito, Lapjer estis revoluciulo el la ruĝa franca instruistaro kaj verkis laŭ revolucia spirito faman raporton pri «reformo de la Lernejo», en kiu laboristaj esperantistoj sukcese proponis paragrafon favoran al esperanto (konfederacia kongreso en Lyon). Ni ne scias ĉu li ŝanĝis sian opinion rilate al esperanto, sed certe li apartenas al tiuj gvidantoj, kiuj grave eraras rilate la rolon de l'esperantistaj edukistoj kaj la servon de esperanto.

Esperantista edukista organizo ne povas esti konsiderata sur sama nivelo, kiel konsistigaj landaj sekcioj el iu internacio. La fakto, ke Lapjer konsideras nur la nombron de esperantistoj, pruvas, ke li miskomprenas la interligan rolon de internacia lingvo kaj de esperantistaj edukistoj, kiuj ne formas iun apartan specon de instruistoj sed devas penetri lande kaj internacie la edukistajn organizojn. Cetere, pro la unuflankeca konsisto de TAGE, Lapjer ne estas informita pri alia grava densejo de l'esperantista edukista movado: estas en Sovetio preskaŭ tiel multe da esperantistaj geinstruistoj, kiel en Germanio.

La k-doj, kiuj simpatias al Amsteradama SPI, povas korekti tiun eraran opinion kaj por esperanto labori, skribante al:

Sekretario de SPI (K'do Georges Lapierre) — Syndicat National des Instituteurs, 211, rue Lafayette, Paris (Francio).

## Ĉe Eduk-intern.

Oni scias, ke dekomence Edukintern, kiu festis lastjare sian dekjaran jubileon, utiligis esperanton. Sed pro la kontraŭagado de kelkaj idistoj, la gvidantoj de Edukintern dum multaj jaroj rilatis neŭtrale kaj singardeme al nia lingvo, kvankam ĝi publikigis 100-paĝan broŝuron pri situacio de geinstruistoj sur tutmondo, por kiu raportis 25-landaj esperantistaj edukistoj. Sed idistoj tute malaperis el Edukintern post sia konata fiasko; ili aŭ forlasis la internacilingvan aferon, aŭ provis sin kroĉi al Occidental, sed malesperis pro neprospero de tiu nova lingvo; unu eĉ elpensis novan lingvon.

Nia persista laboro praktika sur la internacia kampo kaj certe ankaŭ la grava disvastiĝo de esperanto en la rusaj pedagogiaj medioj kaj fine la decido de la sovetia geinstruistaro eldoni propagandan «Sovetan Pedagogian Revuon», rompis la ĝisnunan neŭtralecon de Edukintern. Nun, unu el la sekretarioj scias nian lingvon kaj utiligas ĝin. Nunaj cirkon-

stancoj estas tre favoraj por peresperanta laboro ĉe Edukintern. Jam ĝia organo publikigis esperantlingve salutleteron de la SAT-edukista kunveno en Leipcig kaj anoncon pri la Soveta Pedagogia Revuo.

Tamen la SAT-edukistoj ne devas havi fatalisman opinion pri la progreso de sia movado. Certe la tempo pasadante favoras nin, sed ni ne devas dormi; ni laboru kiel praktikaj internaciistoj kaj subtenu la organizojn, kiuj ekaplikas esperanton. Tial devo de SAT-edukistoj estas aboni la Sovetan Pedagogian Revuon kaj la k-doj, kiuj simpatias al Edukintern, devas subteni ties peresperantan laboron. Turnu vin al: Sekretario de ITE (k-do Cogniot), 8 Avenue Mathurin-Moreau. Paris-XIX (Francio).

## PROTESTO DE TLL (INSTRUISTA LABORISTA LIGO) KONTRAŬ PERSEKUTADO EN HINDUJO

La Konferenco de TLL (Jan. 1930) subtenas la deklaron faritan de la Ekzekutiva Komitato en majo je la nomo de la Ligo. Ĝi forte protestis kontraŭ la akraj atakoj, kiuj okazas kontraŭ la laboristaj unuiĝoj kaj laborista movado de Hindujo, deklarante, ke la persekutado malebligas ĉian sendependan proletaran organizadon de koloniaj popoloj, kaj ĉian provon esprimi ilian opinion pri politikaj kaj ekonomiaj aferoj. La Konferenco malaprobas la sintenon de la Laborista Registaro pri la Meerut'a proceso kaj deklaras, ke la Laborista Partio aktive subtenas la konservativan imperialismon, daŭrigante la netolereblan ekspluatadon de subigitaj rasoj por la profito de kapitalismo.

Tiu ĉi Konferenco ankaŭ opinias, ke la Hinda Nacia Kongreso jam montris, ke ĝi ne reprezentas la proletaron de Hindujo, sed ke ĝi estas nur organizo kontrolata de burĝaj kaj burĝetaj naciemuloj, kiuj emas gajni cedaĵojn de la registaro pere de ŝajna batalemo, sed fakte agas kun la imperialistoj, kontraŭ la kreskanta tajdo de ribelo de laboristoj kaj kamparanoj. La konfreenco de TLL scias, ke la laboristaj kaj kamparanaj partioj kaj la Girni Kangar (Ruĝflaga Unuiĝo, Bombay) gvidas la luktadon de la laboristoj kaj kamparanoj. Ni do promesas kunagi kun la nacia «Meerut Defend-Komitato» en la batalo kontraŭ la Laborista Registaro, kiu daŭrigas tiun ĉi persekutadon.

La TLL atentigas la geinstruistojn de Hindujo pri la gravo de la kresko de analfabeteco inter la hinda proletaro sub la brita regado kaj instigas ilin unuiĝi kun la hindaj laboristoj kaj kamparanoj, batalante kun ili por detrui la britan kapitalistan subpremadon. La hindaj instruistoj plibonigos siajn aĉajn kondiĉojn kaj atingos kulturliberon nur tiele, kaj ne pere de la burĝaj naciemuloj, aŭ per lojalo al la Brita Imperio.

La Konferenco promesas subteni Edukintern en ĝia laboro en Hindujo kaj aliaj kolonioj aŭ preskaŭkolonioj, kaj instrukcias la Komitaton interrilati kiel eble plej multe kun la geinstruistoj en tiuj landoj.

C. Osmond (9896)
(Esp. Sek-ino ĉe TLL)



Presejo «Internacia» de Moskva Trusto «Mospoligraf»

# Henri Ford—edukisto?

## LIA PROPRA LERNEJO

Laŭ ĵus multe legata verko de M. Hindus «La Homaro Elradikigata», Ford kaj lia traktoro ricevis multe da admiro en Sovetio. Ĉu la sovetianoj tiom simile admiros lian lernejon? Li anoncis la elspezon de 100,000,000 por edukado laŭ sia propra plano. Sed li jam antaŭ du jaroj komencis eksperimenti ĉe edukado.

Lia lernejo stariĝis en Sudbury en la ŝtato Masaĉuzets (Massachusetts), Usono. Ĉirkaŭas ĝin 3000 akreoj de bieno. Tre proksime estas la famaj antikvaj lernejo kaj la trinkejo-muzeo, posedataj de Ford por memori la estinton. (Por la proletaro la distrikto famaĉas pro proksimo al Boston, la mortigejo de Sako kaj Vanceti). En la lernejo loĝas kaj studas 31 knaboj laŭ deveno diversnaciaj: itala, greka, pola, litova kaj holanda. Eĉ en la nutrado ili havas severan, sciencan reĝimon. Nek kafon, teon, kakaon, nur lakton la studentoj povas trinki. Matene ili ricevas nur lakton kaj frukton, ekz. oranĝsukon, bakitan pomon kun kremo kaj lakton kiel trinkaĵon. Meztage nur amelhavanta nutraĵo estas en ordo: terpomoj, buter-pano, legom-salato, kaj kuiritaj legomoj. Ĉe vespermanĝo la studentoj ricevas la protein-havantajn viandon, supon kaj verdajn legomojn. Ili ŝajnas farti bone kaj ne volas manĝi pudingon kaj sukeraĵon.

Krom lerni kion manĝi kaj ne manĝi, la knaboj lernas kiel prizorgi sin fizike kaj ĝuste vesti sin; ankaŭ mastrumi domon kaj elspezi monon. Ili preparas la matenmanĝon, purigas la lernejon, gladas kaj riparas sian vestaron, sen helpo de iu virino. En la administrado de la lerneja farmo, la knaboj melkas la bovinaron, bredas la ŝafojn, kokinojn kaj aliajn bestojn; prizorgas la fruktarbaron k. t. p. Nur unu lernejestro loĝas en la domo, kaj li unufoje dum ĉiu monato fizike ekzamenas, pesas kaj konsilas ĉiun studenton.

La aĝo de la lernantoj estas de 12—17 jaroj, kaj la pli junaj devas enlitiĝi je la 21-a h. prepare por la ellitiĝo je la 6-a matene. Antaŭ la matenmanĝo je 7.15, ili devas ekzerciĝi kaj aŭskulti al parolado pri korp-kulturado kaj higieno. Tiam sekvas dompurigado kaj kunveno por preĝoj, kaj je 8.30 h. la instruado komenciĝas. Triono el la studentoj iras al klasĉambro. La aliaj entreprenas taskojn sur la farmo: riparas aŭtojn, la meblaron, la elektroaparaton k. t. p. Lertaj meĥanistoj instruas kaj konsilas en la arto kaj scienco de plumbado, hejtado, ĉar-

pentado, elektro-lumigo kaj aŭtofabrikado. Sed ne laŭ aranĝita kursaro, sed laŭ la bezonoj de la farmo. Same ili lernas pri la librotenado, muelado de l'greno.

Ĉiutage la studentoj studas $6^1/_2$ horojn kaj ricevas salajron de 2 dol. tage. Parte el tiu ĉi sumo ili pagas por la vivrimedoj; aliparte ili aĉetas vestojn kaj enmetas en la banko.

Ĉiun trian semajnon la knaboj vice revenas al la klasĉambro kaj studas laŭ la Dalton-plano. Jen la temoj: angla lingvo, historio (spite la fakto, ke Ford iam diris «Historio estas ĉarlatanaĵo»), civitismo, matematiko (algebro kaj geometrio) praktika matematiko kaj ĝenerala scienco (fiziko kaj ĥemio). Notinda estas la manko de kulturtemoj kaj de naturscienco. La studentoj flankokupe muzikas, faras radio-aparaton, dancas kun la knabinoj el la vilaĝo unufoje semajne, debatas kaj tre malmulte ludas. Ili estas sub kontrolo severa kaj devas ricevi permeson antaŭ ol iri al la vilaĝo aŭ viziti geamikojn.

Supozeble Ford nun aplikos sian priedukan idearon pli grandskale. Certe li bone produktis amase la aŭton kaj la traktoron. Sed oni ne povas meti infanon sur la «belto» (la moviĝanta rubando, per kiu Ford kunigas la aŭton) kaj atendi la rezulton je bone edukita homo. Kiel kutime, Ford ricevis tra la tutmondo reklamon pro sia edukadplano. Sed ĝis nun li ne pruvis, ke li estas instruisto, kvankam lia eksperimento estas atentinda.

---

## Vivreformo kaj popollernejo

Ĝojige estas, ke oni en la instru-programoj de la popollernejoj montras pli da kompreno por la vivreformo. Antaŭ mi kuŝas la aritmetika libro por la sepa kaj oka lernjaroj de la Leipzig'aj popollernejoj: «Nun Kalkulu». En ĉi tiu libro mi trovas, sur paĝo 134, la parton «Malamikoj de la sano, nomitaj Alkoholo kaj Tabako». La unua tasko komenciĝas per jenaj vortoj: «Alkoholo estas veneno». Nun oni legas procentajn nombrojn por la diversaj alkoholaj trinkaĵoj, kaj per tiuj la infano rimarkas, ke la kvanto de la alkoholo ĉiam restas samgranda, ĉu oni nur trinkas glason da biero, vinglason plenan da vino, aŭ likvorglason plenan da likvoro.

Laŭ tio oni prikalkulas la ekonomian malutilon. Kiel estas konate, la elspezo por alkoholo kaj tabako en Germanio estas pli ol ses milionoj da markoj (jare). Unu tasko estas: Se iu ĉiutage trinkas unu glason da biero, kaj fumas du cigarojn, kiom li por tio devas elspezi dum jaro? Tio ankoraŭ estas tre modesta! (Modera supozo? Red.) Al mi konfesis viro antaŭ du jaroj en la somera refreŝigejo, ke li fakte elspezas po tago du markojn por tabako; kun la alkoholo eble estas mil markoj dum unu jaro. Por la sama mono, la familio povus aĉeti 25 centfuntojn (funto-$^1/_2$ kilogr.) da figoj, aŭ 40 centfuntojn da pomoj, aŭ 15 centfuntojn da nuksoj, aŭ 1700 kokosojn, aŭ eventuale pianon. Tio, kion oni per tio forprenas de la familio, estas terura.

Ĉefe profita por nia movado estas la ĉapitro «Nutrado kaj laboro», sur paĝo 136. Tie troviĝas: «Nia korpo bezonas por vivi albuminon (ovoblankon), grasojn, karbonhidratojn, glikozon, akvon, salojn kaj vitaminojn». Poste sekvas la tabelo de la diversaj nutraĵoj, kiuj nun devas esti prikalkulataj laŭ la kalorioj. Se tio ankaŭ estas iom unuflanka, la infanoj tamen rimarkas, ke el ĉiuj nutraĵoj, kiuj ne estas rafinitaj al artefaritaj, la nukso enhavas la plej multajn kaloriojn, ĉar ĉe ĝi je 100 gramoj da kvanto estas 20 g. da albumino, 10 g. da karbonhidratoj, kaj 60 g. graso, dum ĉe freŝa viando estas nur 20 g. da albumino, 0 g. da karbonhidratoj, kaj nur 5—30 g. da graso.

Al la diversaj manĝaĵoj, kiujn la infanoj devas prikalkuli, mi aldonis ankoraŭ krudmanĝaĵojn, kaj mi vidis, ke ili enhavas pli da kalorioj ol la aliaj manĝaĵoj. Kiel konate, 100 g. da nuksoj jam havas 681 da kalorioj, do, por la 1500 kalorioj, kiujn la homo bezonas po tago, ne tro multe mankas.

Bedaŭrinde ĉi tie, kiel tagan kvanton, oni ankoraŭ skribas la malnovan kvanton; por mezaj laboristoj 118 g. da albumino, 100 g. da graso, kaj 520 g. da karbonhidratoj; por pezlaboristoj 170 g. da albumino, 145 g. da graso, kaj 720 g. da korbonhidratoj. Ke tio ne estas ĝusta, oni jam delonge pruvis. Ĉefe, el la ovoblanko sufiĉas 50 g.

En la ĉapitro «Spirado kaj sang-cirkulado», oni skribas: «La plej bonaj kaj plej malmultekostaj rimedoj por la konservo de la sano estas suno, aero, kaj akvo.

Nun sekvas taskoj:

1. Fiksu por la klasĉambro la pezon de la aero kaj de la oksigeno, se la aero estas bona!

2. Elspirita aero enhavas karbonacidon. Se estas en unu kuba metro pli ol unu litro, la aero estas malsaniga. Infano elspiras dum unu horo 10 litrojn da karbonacido. Kalkulu, kiom da karbonacido estas en la lernoĉambro post unu horo!

3. Kiom nur devas troviĝi?

4. Post kiom da minutoj oni devas refreŝigi la aeron?

5. La sango fluas al la pulmo por fordoni per la ruĝaj sangoglobetoj karbonacidon kaj akcepti oksigenon.

6. La pulmo de la plenkreskulo enhavas ĉirkaŭe kvin litrojn da aero. Ĉe plej profunda spirado ĉe ĉiu spiro estas elŝanĝataj ĉirkaŭe 3,5 litroj, kaj ĉe trankvila diafragma spiro ĉirkaŭe 0,5 litro da aero. Kaj tiel sekvas ankoraŭ vicoj da interesaj taskoj pri la sangamaso, kaj la partoj de la sango, la sangoglobetoj, kaj la laboro de la koro. Sed ĉiuj taskoj rekomendas reformon de la ĝisnuna vivmaniero.

Ne forgesi mi volas, danki pro la ĝojo, kiun ha✓is mi kaj mia klaso per donacaĵo de iu. Per tiu la klaso, dum la lasta jaro, povis ricevi dum la migradoj vegetarajn manĝaĵojn, kaj paskon ĉiu infano, ĉe la forlaso de la lernejo, ricevis porcelanan fruktoteleron kun surskribo: «Je memoro pri la eksiĝo de la fruktinfanoj de la 33-a Popollernejo, paskon 1929».

Tradukis el «La Vivanto» (Die Lebenskuust), K-dino 1615.



**La Laborista Kolegio, kie instruas SAT-K-do M. Starr**

# Brookwood

Brookwood (Brukŭud) estas laborista eduka institucio loĝeja por geviroj, korporaciigita laŭ la leĝoj de la ŝtato Novjorko. Ĝi lokiĝas ĉe Katonah, N, Y., (64 kilometrojn norde de la urbego Novjorko).

La lernejo estas administrata de Direktoraro konsistanta el reprezentantoj de la metiunuiĝoj, kiuj aprobas kaj subtenas ĝin, kaj el la fakultato, studentoj kaj diplomitoj de la lernejo.

Ĉiu instruisto ĉe Brookwood havis propran sperton en la laborista movado, ĉu kiel oficulo aŭ aliel, kaj la fakultato kaj la administra grupo estas organizitaj sub la nomo la Brookwood'a Ĉelo, N-ro 189-a, de la Amerika Federacio de Instruistoj, kiu estas parto de la Amerika Federacio de Laboro.

Brookwood celas prepari aktivajn membrojn de laboristaj organizoj por pli inteligenta kaj efika servo al iliaj organizoj.

La daŭro de plena kurso estas du jaroj. Ekzistas kursoj pri Administrado de Metiunuiĝoj, Leĝoj rilatantaj al Laboro, Laborista Historio, Organizaj Metodoj, Ekonomio, Arto de Publika Parolado, Parlamenta Leĝaro, Historio de la Civilizo, Psikologio, Laborista Ĵurnalismo, Angla Lingvo, k. a.

Ĉe Brookwood ankaŭ havas lokon unu- kaj dusemajna aŭ semajnfina kursoj kaj paroladoj dum la somero kaj okaze je aliaj sezonoj de la jaro. La temoj pritraktataj estas: Juĝistaj Malpermesoj, Senlaborado, Laboristaro kaj Politiko, Organizaj Metodoj, kaj la Virino en Industrio.

Brookwood sin konsideras parto de la laborista movado de Usono kaj de la mondo. Brookwood pririgardas la laboristan movadon kaj kiel praktikan ilon, per kiu laboristoj atingu pli altan salajron, malpliigon de laborhoroj, kaj pli bonajn laborkondiĉojn, kaj kiel grandan socian forton, havanta kiel finan celon la bonstaton de ĉiuj homoj en sociordo senigita je ekspluatado kaj bazita sur gvidado laboristara.

Nia ĉefa klopodo ĉi-rilate ĉiam estis malkovri rimedon por pligrandigi la potencon de la laborista klaso kaj de ties organizoj, por la atingo kaj de ĝia tuja kaj fina celoj, pli ol liveri finpreparitan planon pri la strukturo de la nova sociordo aŭ fiksitan formulon, kiel tiu lasta estas atingebla.

Kiel eduka institucio, Brookwood ne opiniis sian taskon proklami sen analizo la opiniojn aŭ politikon de iu aparta organizo aŭ sekcio de la laborista movado. Ĝi provas, prefere, helpi siajn studentojn al kompreno, per studado, analizo kaj diskutado, de la filozofio kaj politiko de la Amerika Federacio de Laboro kaj de aliaj organizoj kaj grupoj en la laborista movado usona kaj tutmonda, celante unuavice instrui sutudentojn kiel pensi, ne diri al ili kion pensi.

---

## LA MOVADO POR AVANGARDAJ LERNEJOJ EN NEDERLANDO

Depost kelkaj jaroj, precipe post la mondmilito, nombro da geinstruistoj en Nederlando tre interesiĝas por instruado en avangarda senco; sed ili ne nur teorie pristudis la temon, tamen ankaŭ, aŭ pli bone: u n u e ili praktikis ĝin. Tiele estis fonditaj kelkaj avangardaj lernejoj: unue en Laren (ĉe Hilversum) jam en la jaro 1903; kaj post la mondmilito en Soest, Hilversum, Amerofort kaj Huizen. Pliaj nun estas preparataj.

Inter tiuj ĉi lernejoj ne ekzistas ia laŭdisciplina, sed nur spirita rilato. Kaj ĉar la internaj aferoj en ĉiu lernejo estas aranĝataj diversmaniere, mi plue nur parolos pri la lernejo, kie mi laboras, tiu en Huizen apud la «Zuiderzee» (suda maro), je 25 kilometroj de Amsterdamo, en belega naturo.

Kompreneble la lernejo ne estas ŝtata lernejo: la registaro neniam konsentus, ke en ĝiaj lernejoj estus instruata, ekz. ke la milito nur estas profitilo por la kapitalista klaso, aŭ ke la hodiaŭa organizo de la socio postulas la klasbatalon! Do, la lernejo estas privata; tio estas facila en Nederlando, ĉar nia leĝo ordonas, ke kiam difinita nombro da gepatroj postulas lernejon de ia principo aŭ tendenco, la ŝtato pagu ĉiujn elspezojn, sed ke tiuj gepatroj cetere restu liberaj rilate al la interna organizado aŭ principoj.

Nia lernejo, kiu nomiĝas «La Nova Lernejo», «lernejo por humanitara instruado», estas bazita je sekvantaj principoj: kontraŭ-kapitalista, sed neŭtrala rilate al politika partieco; kaj plie ĝi stariĝas je «humani-

tara starpunkto» en ĝia plej vasta senco; sekve la geinstruistoj devas esti: socialisto (en sia agad- kaj pens-maniero, aneco al ia partio ne estas deviga), kontraŭ-militulo, abstinentulo, vegetarano kaj kontraŭfumulo.

Koncerne la pedagogian bazon ni opinias jenon: unue, la esenca celo de ĉiu edukado devas esti: preparado de la infano por vivo, en kiu la supereco de la spirito (racio) super la materio estu konfesata, kaj en kiu estu penata al la realiĝo de tiu ĉi starpunkto, al gardado kaj plifortigado de la spiritaj fortoj en la infano; due, ni respektu la personecon de l'infano kaj ĉiam memoru, ke tiu personeco nur povos klerigi sin sub formo de disciplino, kiu kondukas al liberigo de ĉiuj spiritaj fortoj (povoj); trie, dum la instruado en la lernejo la kunnaskita intereso povu montriĝi libera, t. e. ĉiu intereso, kiu esprimas sin propramove kaj tiu trovas sian esprimon en sia aktiveco je fizika, intelekta, estetika, socia aŭ iu alia kampo; kvare, la lernej-socio estu kondukata per infanoj kaj plenkreskuloj kune; tiu ĉi kunlaboro plifortigas tiel same la personan kiel la komunan respondecon; kvine, ĵaluzo kaj konkuro devas malaperi el la edukado kaj doni lokon por speco de kunlaborado, kiu kutimigas la infanon al servado en la socio per sia personeco; sese, ni volas kuneduki knabojn kaj knabinojn, tiel same kuninstruado kiel kunedukado; tamen povu la du seksoj kleriĝi laŭ sia karaktero kaj ili influu unu la alian laŭ sana maniero. Unuvorte ni volas: Krei samajn evolukondiĉojn por la persona kapablo de ĉiu infano, en simpla bela medio, kiu kiel eble plej multe kreskigas la socian senton.

Nia lernejo estas organizata laŭ la metodo «Dalton», la amerika metodo, kiu donas al ĉiu infano taskojn, laŭ ĝia aĝo por semajno aŭ por monato; la instruado do estas tre individua: preskaŭ ĉiuj infanoj en iu klaso aŭ ĉambro en la sama momento pristudas diversajn laborojn, kaj eĉ ne du estas samgrade klerigataj! Sed tiele ni tre bone povas rimarki la personajn talentojn, do ankaŭ ni kapablas poste trovi la metion en kiu la knabo aŭ la knabino devas labori laŭ sia talento.

Ĉar en nia lando ankoraŭ en malmultaj lokoj estas lernejoj, mi malfermis je mia propra respondeco en aprilo 1929 internulejon por geknaboj el aliaj lokoj, kiuj volas viziti nian lernejon.

A L V O K O! Se estas Gekamaradoj en aliaj landoj, kiuj simpatias kun tiu ĉi edukmetodo kaj instruado aŭ kiuj konas gepatrojn, kiuj deziras tian edukadon por siaj infanoj, mi alvokas ilian helpon! Mi intencas prigrandigi nian internulejon ankaŭ por eksterlandanoj; tiam la lingvo, parolota ĉe ni, estos esperanto, kiu nun jam estas instruata al niaj lernantoj. Kiu volas helpi tiele fondi veran Sennaciecan Lernejon? Adreso: Alb. J. Groenestein, «La Nova Lernejo», Huizen (Nederlando). Sat-ano 10451.

---

# SUR EDUKISTA ★★★ ★★★ BATALFRONTO

## Laboristaro—Edukistaro

Ĉe supraĵa ekrigardo al la sindikata movado nacia kaj internacia, kaj al la loko, kiun diversaj laborul-grupoj okupas en ĝi, ŝajnas eble tre stranga kaj paradoksa la fakto, ke la laborul-kategorioj plej altkulturaj, la intelektlaboristoj, estas la malplej progresintaj en klaskonscia direkto kaj okupas en la sindikatmovado iun en la lastaj lokoj (se ne la lastan). Sed pli proksima ekrigardo, ekzameno al la socia situo de l'intelektularo, senpera analizo de ties rolo en la procezo de l'socia produktado malkovras sufiĉe reliefe la kaŭzojn de tiu ĉi «stranga» fenomeno kaj permesas konstati ties tutregulecon, — el la ŝajna paradokso ne restas eĉ postsigno.

La funkcio de organizado de l'socia produktado (kaj de la tuta socia vivo) kiu komence estis senpere apartenanta al la propraĵhavuloj-ekspluatistoj, estas iom post iom, en la daŭro de soci-ekonomia evoluo, «komisiata», «konfidata» al nove formiĝanta socia grupaĵo, kiu stariĝas inter la du fundamentoj soci-klasoj — la klaso de propraĵhavuloj, kiuj laŭgrade forlasas la funkcion de senpera organizado, kaj la senpropraĵa klaso de ekspluataj organizatoj. Tiu ĉi nova socia intertavolo—la intelektularo, al kiu apartenas ankaŭ la edukistaro, estas en la rilato socipolitika ekstreme nestabila, ĉiam ŝanceliĝanta pro sia meza situo inter la du polusoj de l'klaseca socio. Plie, la organizanto-funkcioj kaj la alta kulturnivelo faras la intelektularon en ĝia porpra konscio «elito», «salo de la tero». Ĉio-ĉi kune prenita, akcelas la formiĝadon de l'iluzio pri «superklaseco». Ĉi tiu iluzio estas la plej karakteriza trajto, kiel de la intelektularo entute, tiel ankaŭ de unu el ties konsiderindaj partoj—de la edukistaro.

Laŭ sia socia origino kaj laŭ sia situo en la ekonomio de l'socia produktado la intelektularo ne prezentas tamen unuecan soci-ekonomian kategorion: ni renkontas en ĝiaj vicoj tre malsamajn grupaĵojn, de pure burĝaj, konsistantaj precipe el malriĉiĝintaj eksuloj el la regantaj klasoj parence ligitaj kun la ĉi lastaj kaj materie interesataj pri la konservo kaj plilarĝigo de ties klaspozicioj, — ĝis la laborulinteleatularo, elirinta el la vicoj de l'proletaro kaj de laboranta kamparulero, samkiel tiuj lastaj ekspluatataj de la klasomastro, sed nur pro sia ideologia kaptiteco ne konscianta sian situon de ekspluatata servisto-komizo.

La edukistaro, la instruistaro en sia ĉefparto (ni ne parolas pri la malmultnombra superularo edukista) tute apartenas al la lasta intelektula grupo, kiun oni povas tutprave nomi intelektlaborista proletaro, ĉar laŭ sia origino, laŭ sia socia situo kaj laŭ sia vivmaniero ĝi malmulte diferencas de la cetera laborula amaso, kaj tamen

la edukistaro, kiu klase apartenas al la laboristaro kaj la laboranta kamparularo, fariĝas, en la kondiĉoj de kapitalisma ordo, antaŭposteno de l'burĝaro sur la ideologia fronto de l'klasbatalo, fidela kondukilo de la burĝara ideologia hegemonio en la densa laborularamaso. La kaŭzo estas, ke la burĝaro, bone konsciante la tutan gravon de la ideologiaj «gvid-altaĵoj» en la plifortigado de l'klassuperregado kaj ekspluatado, eluzas ĉiujn poveblojn tiudirekte. Izoliginte la edukistaron de la cetera laborularo per la tuta lernej-sistemo, stariginte la edukistaron en materian kaj administran dependon de la burĝa ŝtato, la reganta klaso tamen ne kontentiĝas. La burĝaro komprenas, ke se ĝi ne konservos en siaj manoj la ideologian influon je la edukistaro, ĝi ne povos formadi la kreskantan generacion konforme kun siaj interesoj, kaj ĝi atingas sian celon per aparta sistemo de formado de edukistaro fidela al la «bazoj» de l'ekzistanta sociordo. Kaj la diseco de l'edukistoj, kaŭzita de la ekzistanta lerneja organizo, la kondiĉoj mem de l'pedagogia laboro (kompareblaj kun la labor-kondiĉoj en aliuj fakoj en la periodo de individu-metiistaro) tute ne favoras la emancipiĝon el ĉiuj ĉi klasmalamikaj, konservemaj influoj: la edukistaj organizaĵoj aperantaj en la XIX-a jc. estas trasaturitaj de burĝa individuismo, gildismo, korporatismo, ili estas tute f r e m d a j al la organizoj de l'proletaro.

Tia estas la situo de l'edukistaro kiel parto el la intelektlaboristaro en la kondiĉoj de progresanta kapitalismo. Sed la kapitalisma socio ja ne restas senŝanĝa, ĝi ja havas difinitan evolu-dinamikon, obeante la leĝojn de socia kaŭzeco, — kaj kune kun ĝi dinamike ŝanĝiĝas ankaŭ la situo de l'edukistaro.

La evoluanta kapitalismo, atinginte sian imperialisman fazon, transformas la burĝaron en klaso progresema-supreniĝanta je klaso konservema kaj, plue, reakcia. Celante konservi sian superregadon, tiu ĉi klaso plifortigas la ekspluatadon de l'laborularo, nudigas la klasperfortecan esencon de la ŝtato. La premado je la laborulaj soci-tavoloj, kaj inter ili, ankaŭ je la intelektlaborularo, ĉiam kreskas. La edukistaro ĉiam sentas pli kaj pli la premadon de la ŝtato, de kiu ĝi dependas — pro la ŝtatigo de l'lernejo, ideologie sam-kiel materie. Estiĝante klaso reakcia, la burĝaro ĉesas esti interesata pri ĝista scienca organizado de l'lerneja afero, — tion ĝi ne bezonas: ĝi postulas bone dresitajn obeemajn laboristojn, kaj ne pli; ĝi bezonas, ke la lernejo preparu laboristojn kun difinita kvalifiko kaj samtempe, ke ĝi kontraŭbatalu la «malutilajn», «detruemajn» revoluciajn influojn. La lernejo akiras senmaskan karakteron de instrumento por klassuperregado—tio fariĝas klara por ĉiuj kaj elvokas protestojn en la vicoj de la «neŭtrala» intelektularo, en la vicoj de l'edukistaro. Kaj samtempe komenciĝas ofensivo de la burĝa ŝtato kontraŭ la edukistaron, en pluraj landoj la salajroj estas reduktataj, la morala kaj la jura situacio estas pli malbonigataj (precipe tio koncernas la juninstruistojn kaj la instruistinojn). Ĉio ĉi ne povas ne akceli la pereigon de l'«s u p e r k l a s e c a» i l u z i o, ĉio ĉi ne povas ne forpuŝi la edukistaron de fidela servado al la burĝa sociordo.

Samtempe la progresanta kresko de l'produktad-fortoj, la grandegaj progresoj de l'scienco kaj de la tekniko prezentas ĉiam pli kaj pli grandan rolon en la procedo de l'socia produktado al la laboro altekvalifikita, al laboro organiza. Kreskas la rolo de l'lernejo, kiu estas produktado-branĉo preparanta produktantojn. Rimarkeble kreskas ankaŭ la rolo de intelektlaboristoj, la rolo de edukistoj. La intelektlaboristaro ekkonscias la gravecon de sia rolo. La intelektularo (inter ĝi la edukistaro) foriĝas de la burĝaro, sed ĝi ne estas ankoraŭ veninta al la proletaro. Sed ĉe tiu punkto la procedo de ĝia socia deformiĝo ne haltas: la plua vojiro de l'socia evoluo, la kreskado de l'soci-politika aktiveco de la proletaro, la nekapablo de l'intelekt-laboristaro, kiel de nememstara soci-ekonomia grupaĵo, ludi rolon memstaran — ĉio ĉi faras neevitebla la pluan evoluon de l'intelektlaboristaro en la direkto al interligo kun la mànlaboristaro. Oni tamen ne prezentu al si tiun evoluon kiel simplan kaj rektlinian.

Kiel ni jam diris, la intelektularo entute kaj ties partoj ne prezentas per si tute homogenan amason, ĉar apartaj grupaĵoj, el kiuj ĝi konsistas, okupas tute malsaman pozicion en la moderna socio: iliaj funkcioj estas malsamaj. Ne penetrante profunde en specialan analizon de l'soci-politika konsisto de l'socigrupo nin interesanta, la edukistaron, ni notu nur, ke, krom la fundamenta amaso, et-burĝa kaj amorfa, la amaso, kiu ĉiam estas la objekto influata de la klasoj socipolitike aktivaj (agrar-posedantoj, burĝaro, proletaro) kaj ŝanceliĝas, balanciĝas jen unuflanken — jen aliflanken. Krom tiu amaso ni trovas inter ĝi ankaŭ grupaĵojn politike plenkonsciajn, malkaŝe kaj senhezite stariĝantaj je tiu aŭ je l'aliu flanko de l'barikado (reakciemaj kaj revoluciemaj grupaĵoj) aŭ penantajn surbazigi iun mezan pozicion (reformistaj elementoj). En diversaj periodoj, ĉe diversa soci-politika situacio la «specifa pezo» de tiuj edukistaj grupaĵoj varias, sed ilian ekziston oni povas nun konstati ĉie. Dum «stabilaj» «periodoj de relativa trankvilo la limoj ilin dividantaj estas malpli rimarkeblaj, sed en la momentoj, kiam la klasbatalo akutiĝas, precipe se ĝi alprenas la formon de intercivitana milito, la «distavoliĝo» de l'edukistaro, samtiel tiu de la tuta intelektularo kaj de aliaj interklasaj mezaj grupoj, procedas tre rapide (la postmilitaj okazintaĵoj en Rusio, Germanio, Italio, Bulgario, k. a. landoj donis tiurilate plurajn rimarkindajn ekzemplojn). Ĉi-okaze estas karakteriza por la instruistaro, ke ties partoj, kiuj foriĝis de la burĝaro, liberiĝinte el sia ideologia kaptiteco, tuj okupas decide-kaj radike-malamikan pozicion kontraŭ la reganta klaso (ekzemploj: Francio, Rusio, Bulgario, Ĉinio k. a.); tio okazas dank'al jam notita ĉi-supre foresto de la klas-ekonomiaj ligoj inter la edukistaro kaj la ekspluatistoj.

La progresanta reakciemo de l'burĝaro, la ofensivo de la ŝtato kontraŭ la edukistaron kaŭzas laŭgrade progresantan revolucianiĝon de la lasta. La respondaj persekutoj nur plifortigas kaj akcelas ĉi tiun procedon. Rezulte la influivo-diapazono de l'avangardaj edukistaj grupoj rimarkeble vastiĝas; en la edukistaro vekiĝas konscio pri ties klasunueco kun la proletaro; la edukistaj organizoj perdas sian

intelektulan «pulvoriĝemon» kaj entiriĝas en la orbito de l'tutproletara poremancipa batalo (frapanta fakto: la instruistaj strikoj, antaŭ nelonge ankoraŭ preskaŭ nekredeblaj, nun fariĝis kutimaj en pluraj landoj). La eduklaboristaro eniĝas la proletaran s i n d i k a t m o v a d o n fariĝante unu el ties taĉmentoj kaj baldaŭ la eduklaborista movado, en sia kresko rompanta la naciajn kadrojn, suriras la arenon de l'internacia vivo, fariĝas m o v a d o i n t e r n a c i a.

R e d a k c i a K o m i t a t o

---

## LA ĜENERALA LERNEJA SISTEMO DE NOVSUD-KIMRUJO (NEW SOUTH WALES)

Por doni al alilanduloj ideon pri edukado en Aŭstralio, estas necese komence, memori ke nia lando diferencas de aliaj, ĉar ĝi estas tre juna kaj vasta. La loĝantaro sumiĝas je ĉirkaŭe ses milionoj, kio estas tre malmulte, kiam oni konsideras la vaston de la lando. La eduka sistemo ne estas afero de la tuta Aŭstralia Federacio de Ŝtatoj, sed ĉiu Ŝtato havas sian propran regadon. Ĉar mi loĝas en la ŝtato de Novsudkimrujo, mi skribos pri la sistemo, kiu apartenas al tiu ŝtato, rimarkante samtempe, ke ĝenerale ĝi estas sufiĉe tipa rilate al la sistemo de la kvin aliaj aŭstraliaj ŝtatoj.

### Regado de lernejoj en Novsudkimrujo

Edukado en Novsudkimrujo (same kiel en la tuta Aŭstralio) estas deviga, kaj ĝenerale senpaga. La plimulto el la lernejoj apartenas al la Ŝtato mem, sed ĉirkaŭe kvin procentoj el niaj lernejoj estas privataj, ĝenerale Gastlernejoj, kie la lernantoj ofte pagas grandan sumon. Sed eĉ tiuj lernejoj ĝenerale estas registrataj de la Ŝtata Edukada Departemento, kaj ili submetiĝas al la samaj ekzamenoj kiel la Ŝtatlernantoj. La infanoj de la riĉuloj ĉeestas ĉe la privataj lernejoj aŭ la plimulto da ili.

La Ŝtatlernejoj estas administrataj de la Ŝtata Departemento, kaj super tio regas la Direktoro de Publika Instruado. Ankaŭ en la Ŝtata Parlamento estas Ministro de Edukado, kiu posedas kelkajn diktatorajn rajtojn super la Instruistoj; sed ĝenerale la eduka plano estas kontrolata de la Direktoro mem kaj la Oficistaro. La instruistoj mem havas tre malmulte da potenco en la regado de la lernejoj. En la sekvonta artikolo mi intencas skribi pli longe pri la kondiĉoj de la instruistoj.

Tiele la lerneja sistemo direktata de la centra oficejo en la ĉefurbo (Sidnejo, Novsudkimrujo) estas ĝuste la sama por ĉiu lernejo de la Ŝtato. La pli grandaj lernejoj en la ĉefindustriaj lokoj estas direktataĵ de la samaj reguloj kiel la plej malgranda kampara lernejeto, kun unu instruisto kaj dudeko da lernantoj. Ĉi tiu centra sistemo enhavas multe da avantaĝoj, sed unu el ĝiaj malvantaĝoj estas ĝia fuŝaĵo kaj ĝia burokrateco. Departementaj Inspektoroj vizitas ĉiun lernejon unufoje dum la jaro, kaj en kamparaj regionoj Inspektoro estas priresponda por la tuta grupo da lernejoj en la distrikto, kaj li devas informi la centran Departamenton pri la progresado de la lernantoj.

## Nombroj kaj tipoj de lernejoj

Jen kelkaj statistikoj pri nia Instruado en Novsudkimrujo. Ni elspezas ĉirkaŭ kvin milionojn da funtoj sterlingaj ĉiujare por instruado. Tio estas triono de nia tuta elspezo por publikaferoj. La loĝantaro de Novsudkimrujo nur estas 2,350,000. Estas 9,599 geinstruistoj, kies salajroj faras parton de 69 procentoj de la tuta elspezo. Do vi rimarkos, ke la subteno de la instruistoj kostas tre pli multe ol la subteno al la instruatoj.

Ĉiu infano devas ĉeestadi lernejon inter la sepa kaj dekkvara jaroj. (Ekzistas kelkaj kindergartenoj por junuletoj, sed la plimulto da infanoj komencas la studadon ĉe la sesa aŭ la sepa jaro). En Novsudkimrujo estas 3,179 Ŝtataj Lernejoj de la tipoj sekvantaj:

(1). Primaraj Lernejoj, kiujn ĉeestadas infanoj de la sepa ĝis la dekkvara jaroj. Ĉar 90 procentoj (ĉirkaŭe) el la infanoj ĉesas ĉeesti lernejon ĉe la aĝo de dekkvar jaroj aŭ nelonga poste, tiuj lernejoj estas la pli grandaj kaj gravaj. En tiuj lernejoj oni lernas la anglan lingvon, matematikon, historion, geografion, naturan historion, lernejan agrikulturon, higienon, arton, muzikon, ekzercadon per la manoj, kudradon, ekzercadon.

(2). Post-primaraj Lernejoj kiuj donas du-tri jaran kurson, preparas la lernantojn por la diversaj profesioj. Tiu kurso sekvas la instruadon en la primaraj lernejoj.

(3). Altaj Lernejoj kiuj donas pli altan edukadon en ĝenerala kulturo, en fremdaj lingvoj, precipe la latina kaj la franca, en altgradscienco, matematiko, angla lingvo, historio, k. t. p. Tiuj lernejoj estas la vojo, kiu kondukas al la profesioj diversaj, ekzemple, kuracistoj, leĝistoj, sciencistoj, kaj profesoroj — ĉiuj niaj inteligentuloj. La alternejoj ankaŭ preparas la lernantojn por la Universitato. En ĉiu ĉefurbo de Aŭstralio estas lokataj universitatoj. La novsudkimruja estas en nia ĉefurbo, Sidnejo. Sed, dum ses procentoj el la infanoj ĉeestas altlernejojn, nur 6 procentoj vizitas la universitaton. Ĉar la studado en altlernejoj sekvas precize la postulojn de la universitato, la plimulto el la ses procentoj malŝparas sian tempon studante objektojn, kiujn ili neniam utiligos post la kurso.

(4). Aliaj tipoj de lernejoj por specialaj celoj, ekzemple: duon-tempaj lernejoj ĉe tre malproksimaj regionoj; unu «Vojaĝanta» lernejo; unu Korespondada lernejo por studantoj kiuj loĝas tro malproksime de urbo aŭ vilaĝo por ĉeesti lernejon; Teknikaj lernejoj kiuj preparadas lernantojn por spertaj metioj, tiel kiel inĝenierado, doma scienco, k. t. p.; vesperlernejoj kie junuloj aŭ junulinoj kiuj ĉesigas siajn studadojn je la aĝo de dekkvar jaroj povas ĉeesti tri vesperojn ĉiusemajne; Industriaj kaj Reformejaj lernejoj—por kulpulaj infanoj; kaj unu lernejo por la surdaj, mutaj kaj blindaj personoj.

Estas ankaŭ malmultaj specialaj lernejoj aŭ klasoj por idiotaj aŭ mense malfortaj infanoj.

Krom tio, estas Profesia Gvida Oficejo, kie oni prezentas antaŭ lernantoj psikologiajn provojn por eltrovi tion, kio taŭgas al ili. Spertuloj en diversaj metioj konsilas al la gepatroj de la infanoj taŭgajn

profesiojn. (Tamen tiu ĉi afero ĵus komenciĝas en nia ŝtato, kaj ĉu la rezultato estos bona aŭ ne mi ne scias).

### Tio, kion la Ŝtato celas fari

La Ŝtata Registaro de Novsudkimrujo penas doni senpagan instruadon en la primaraj kaj altaj lernejoj. Kompreneble tio signifas ke lernantoj kiuj ĉeestas, ne pagas kotizon. Feliĉe la Registaro sukcesas fari tion en la Primaraj lernejoj. Sed kiam la infanoj atingas la aĝon de dekkvar jaroj, la plimulto el ili ne ĉeestas la lernejojn, pro tio ke ili devas laboradi en fabrikoj, butikoj, domoj, farmbienoj, k. t. p. aŭ en diversaj metioj. Dum la jaro 1927 ĉirkaŭe 10,000 infanoj laboris ĉiutage en fabrikoj. Do, por la plimulto el niaj infanoj, instruado ĉesiĝas kiam ili havas la aĝon de dekkvar jaroj. Tamen, la Ŝtato donas kvanton da stipendioj al lertaj lernantoj, kies gepatroj ne povas pagi la elspezojn por la alta edukado. Tiuj stipendioj ankaŭ alportas senpagajn librojn. Estas krom tio aliaj stipendioj, kiuj ebligas malriĉajn infanojn ĉeesti la Universitaton, ankaŭ niajn du Instruistajn Preparadajn Kolegiojn, kie ĉiujare multe da lernantoj sin preparadas por estiĝi Ŝtataj Instruistoj.

Ĝenerale, tamen, nia Kapitalista Ekonomia Sistemo malhelpas la plimulton el la infanoj (certe la infanoj de la laborista klaso) partopreni la avantaĝojn de alta instruado.

### Kuracado en la lernejoj

La Novsudkimruja Departemento de Edukado utiligas la servojn de 19 kuracistoj, 8 flegistinoj, 15 dentistoj kaj helpantoj, kaj 13 oficistoj por prizorgi la sanon de la infanoj.

Kompreneble ĉi tio ne sufiĉas, sed estas komenco. Ĉiujare la urbaj lernantoj estas kuraciste ekzamenataj, kaj ĉiu-trijare la kamparaj infanoj. Oni informas la gepatrojn pri la malsanoj de la infanoj, kaj oni konsilas prizorgon. La lerneja kuracisto ne povas prizorgi pri malsanaj infanoj, ĉar li ne havas la tempon! — sed, se la gepatroj estas sufiĉe riĉaj, oni kondukas la malsanulon al privata kuracisto, aŭ al hospitalo. En Sidnejo estas kelkaj klinikoj kaj hospitaloj, kie oni prizorgas senpage, malsanajn infanojn.

Ĉiu instruisto kaj profesoro devas sin submeti al kuracista ekzameno, antaŭ ol ili povas eniri la Instruistan Preparadan Kolegion; kaj ili devas esti tute sanaj, antaŭ ol oni permesos instrui en la lernejoj. Oni donas Kurson de tridek lekcioj pri higieno al ĉiu lernanto de la Instruista Kolegio.

Clarice Irwin, (F-ino) Sydney. Aŭstralio

---

# KONDIĈOJ DE INSTRUISTOJ EN NOVSUDKIMRUJO (AŬSTRALIO)

Antaŭ ne longe mi legis la «Internacian Programon» de la «Internaciaj Edukaj Laboristoj» (al kiu Sovetedukaj laboristoj apartenas), kaj mi komparis la postulojn de tiu programo al la estantaj kondiĉoj de Aŭstraliaj instruistoj. Mi trovas, ke nia sistemo plenumas la plejparton el la petoj de la Internacia Asocio. Ĝis nuntempe ni estas sufiĉe feliĉaj. La Registaroj de niaj ses ŝtatoj plendas senĉese, ke ne estas sufiĉe da instruistoj kaj profesoroj. Do, oni nin traktas bone. Ni havas novan landon, kaj la nombroj de niaj lernejoj pliiĝas laŭ la pliiĝo de la loĝantaro, laŭ la kreskado de novaj industrioj, de novaj farmregionoj, k. t. p. La nombroj de lernejoj en Aŭstralio pliiĝas ĉiujare kune kun la nombro de instruistoj. Tamen, ne estas malfacile antaŭvidi la tempon kiam la ĝeneralaj vivkondiĉoj ĉi tie estos pli malfavoraj ol nuntempe. Nia alta vivnormo ĉe la manlaboristoj jam atakiĝis. Senlaboreco iĝis tre grava problemo; nia «baza salajro» por ĉiu laboristo estos baldaŭ malaltigata; multajn industriojn minacas pli malgranda salajro kaj pli longaj laborhoroj. La tempo ne estas tre malproksima, kiam la «intelekta klaso» suferos, sed ne nuntempe. Pro tio, Aŭstraliaj Instruistoj, ĝenerale tute ne havas ideon pri sia vera rilato kun la laborista klaso. Ili ne sin ĝenas pri nia freneza ekonomia sistemo. La plejmulto el ili estas tute «burĝaj» kaj konservativaj, kaj komplete ignoras la ekonomian bazon de nia socio. Tre malmulte da instruistoj jam vekiĝis al ekkono de sia vera klassituacio.

Antaŭ kelkaj jaroj la instruistoj de Novsudkimrujo estis tre malbone organizitaj kaj malbone pagitaj. Kiam la «Laboraj Registaroj» akiris potencon, kaj kiam la profesoroj sin organizis en forta sindikato (nomita «La Federacio de Instruistoj» de Novsudkimrujo), niaj salajroj multe pliboniĝis. Tial, niaj instruistoj nun alprenas laborist-unuiĝajn principojn, sed ne volas sin rigardi kiel verajn laboristojn, kunligatajn al la industriaj laboristoj en sia batalo havigi pli bonajn kondiĉojn. 70 aŭ 80 procentoj el la instruistaro apartenas al la «Federacio».

Triono de la tutaj publik-elspezoj disponiĝas al edukado. Niaj antaŭaj «Labor-Registaroj» starigis multajn lernejojn, kaj pliiĝis la salajroj de instruistoj. Kompreneble, malgraŭ Labor-Registaroj, la inklino de niaj lernejoj estas kapitalista kaj konservativa; la instruado kaj metodoj estas organizitaj por subtile enplanti en la mensojn de la infanoj la ortodoksajn kapitalistajn ideojn; sed tamen, la antaŭaj penoj de la Labor-Politikistoj, kune kun la premo de nia forta Instruist-Federacio, sukcesis pliigi la nombron de novlernejoj ĉiujare, kaj reteni la bonajn kondiĉojn de instruistoj ĝenerale.

Jen kelkaj detaloj pri salajroj kaj ĝeneralaj kondiĉoj: Ni havas dek semajnojn da libertempo ĉiujare, kaj ni laboras ĝenerale de la naŭa horo matene, ĝis la kvara posttagmeze. Oni permesas al konstantaj instruistoj forpermeson de tri monatoj (kun plena salajro), se ili estas malsanaj. Post tiam, se oni ne ankoraŭ estas sana, oni povas akiri forpermeson de unu monato (kun duon-salajro), kaj unu monato sen salajro.

Min interesas ekstreme la Sovetlanda regulo laŭ kiu la virinoj devas ricevi egalan pagon por egala laboro; ĉar en Aŭstralio la salajro de virinoj ĉiam estas pli malalta ol tiu de viroj. Tial, instruistinoj ricevis kvar kvinonojn de la salajro de viroj. Kompreneble ni petas egalan pagon por nia egala laboro, kaj ni, la instruistinoj, pensas, ke la nuntempa sistemo de pagado estas tre malĝusta. Instruistoj en Novsudkimrujo ne ricevas la pension- ĝis post siaj dek jaroj de laboro. Post tio, estas pensioj, al kiu instruistoj kontribuas sumon deduktatan el siaj salajroj. Ekzistas diversaj kaŭzoj por plendoj ĉe niaj instruistoj. Unue, estas sufiĉe granda grupo de «Provizoraj» instruistoj; antaŭe oni povas ilin eksigi; kaj ili ricevis salajron multe pli malaltan ol ordinaraj instruistoj. Al ĉi tiu klaso apartenas instruistoj kaj instruistinoj, kiuj havas nur malmulte da preparado por sia profesio. Ankaŭ estas multaj edzinoj, kiuj reeniras la instruistprofesion post kelkaj jaroj de edzeco. Se iliaj edzoj vivas, tiuj virinoj neniam povas esti «konstantaj» instruistinoj. La «provizoruloj» pensas, ke oni ilin traktas tre malĝuste, ĉar ili faras tiom da laboro, kaj samspecan kiel la aliaj. Due, kreskanta nombro de instruistoj plendas, ĉar ili ludas tian malgravan rolon en la administrado de la tuteduka sistemo kaj ĉe siaj laboroj en la lernejoj. Ni havas unu reprezentanton sur la «Komitato de Oficistoj», kiu decidas ŝanĝojn de pozicioj kaj de lernejoj por ĉiu instruisto; sed ni ne havas voĉon en la kontrolado de la eduka departamento mem. Eĉ la ĉefinstruistoj de grandaj lernejoj devas sin submeti ĉiam al la departamentaj reguloj, kaj la ordinaraj instruistoj havas tre malmulte de libero en sia laboro. Escepte kiam ni povas influi la departamenton per nia Federacio, oni ne permesas al la instruistoj kontroli la edukan sistemon. Ĉi tio estus gravega plenumado por tiuj, kiuj scias pri via Sovet-sistemo de aŭtonomio en la lernejo.

Clarise Irwin

---

**Sovetiaj esperantistaj edukistoj!**

**Partoprenu la socialisman konkuron de S. P. R. — varbu nunjare la unuan milon da abonantoj al S. P. R. en Sovetio!**

# POR EDUKISTINOJ

Tiu ribriko, fako de SAT-virina sekcio, estas gvidata de K-dino SIMONE GLODEAU, 177, rue Bagnolet, Paris XX (Francio)

## SITUACIO DE JUGOSLAVA INSTRUISTINO

1. En Jugoslavio la instruistinoj devas fari la samajn studojn, kaj submetiĝi al tute samaj ekzamenoj kiel instruistoj. Gelernantoj, kiuj sin preparas por estiĝi geinstruistoj, estas plejparte kune edukataj. Nur en la pli grandaj urboj kiel Belgrado, Zagreb kaj aliaj ekzistas apartaj porinstruistinaj lernejoj. La edukistinoj por plej junaj infanoj ordinare estas popollernejaj instruistinoj kun speciala ekzameno.

2. Rilate al la instruistina salajro la stato estas jena: — La jugoslavaj ŝtataj oficistoj, inter ili la geinstruistoj, ricevas konstantan jaran salajron (laŭ kategorioj kaj salajraj gradoj), kaj monatan monaldonon. Ĉi tiu aldono estas ŝanĝebla, kaj precipe ĉe junaj geoficistoj estas multe pli granda ol salajro mem. Ekzemple, plej juna oficisto de la dua kategorio ricevas 421 dinarojn da salajro kaj 752 dinarojn da monata aldono. (56 din.—1 dol.). La needziniĝinta instruistino aŭ vidvino-instruistino ricevas egalajn salajron kaj aldonon kiel instruisto. Sed la edziniĝinta instruistino kun edzo-instruisto aŭ ŝtatoficisto-edzo rajtas tutan salajron sed nur duonon de monata aldono. Tamen, kiam geedzoj ne oficas en sama loko (urbo aŭ vilaĝo), tiam la instruistino ricevas tutan aldonon. La salajro neniam malpligrandiĝas.

3. Instruistino rajtas edziniĝi kaj daŭrigi sian oficon. Celibateco ĉe jugoslavaj instruistinoj ne ekzistas.

4. Vidvino (neoficistino) de instruisto rajtas ricevi pension se la instruisto, ŝia edzo, estas oficinta almenaŭ kvin jarojn. Vidvo de instruistino, ne estante oficisto, ne rajtas pension, sed se la mortinta instruistino havas infanojn, ili ricevas pension. Por pensio oni forprenas nenion.

5. Por akuŝi, la instruistino rajtas havi tridek tagojn da pagata libertempo. Anstataŭantinoj ne ekzistas. Infanojn ekster leĝa edzineco kaj vivon kun amiko oni ne toleras.


6. La jugoslavaj virinoj ne havas voĉdonrajton. Preskaŭ ĉiuj popollernejaj instruistinoj apartenas al la granda Asocio de Jugoslava Geinstruistaro. La edukistinoj por plej junaj infanoj havas apartan asocion. Specialaj feministaj edukistinaj grupoj kun apartaj tasko kaj celo ne ekzistas, sed instruistinoj aliĝis al ĉefa Jugoslava Feminista Asocio. kiu batalas por feminismo kaj klerigo de virinoj.

7. La speciala postulo de jugoslava instruistino estas egaleco ĉe monata monaldono kun instruisto. Ĉefan bataladon por tio gvidas la Asocio de Jugoslava Geinstruistaro. La rimedoj estas konvinki leĝdonantojn, ke «por egala laboro estu egala rekompenco».

St. Prvanoviĉ

# EDUKISTO KONTRAŬ PASTRO

**Tiu ribriko estas gvidata de Sekretario de liberpensula SAT sekcio K-do KARL HUBRICHT, Mariannenstr 22 1, Leipzig 030 (Germanio)**




## LA MODERNA KATOLIKA RELIGIINSTRUO

En germana gazeto por katolika religio-pedagogiko «Katechetische Blätter» ni trovas apudan bildon. Ĝi estas destinata por infanoj de la elementa lernejo, kaj devas esti desegnata per multkolora kreto sur la murtabulo, por enplanti al infanoj la katolikajn saĝojn.

La bildo (de H. M., helppastro en Glonn, Bavario) prezentas la rakonton de la diboĉulo kaj malriĉa Lazaro. La maldekstra duono montras ambaŭ en la ĉi tiea-mondo; ĉi tie sidas la diboĉulo ĉe plena tablo k la malriĉa Lazaro rigardas sopire al la tablo de la riĉulo. Ambaŭ estas mortantaj (mezo de la bildo); ĉi tie ambaŭ estas egalaj. Sur la dekstra duono ni trovas ambaŭ en la eterneco. Lazaro eniras la ĉielon kaj estas solene akceptata de sankta Petro, la diboĉulo falas en la inferon kaj estas de la diablo puŝata en la eterna «fajro». Tiel aspektas la moderna religi-instruo en la laborlernejo.

## SCIENCO PLI POTENCAS!

Prof P. Delmas, estro de la patrindomo de Montpellier, sciigis al la medicina fakultato en Parizo, ke li eltrovis rimedon, per kiu la virino povas naski sendolore.

**Nia amata sinjoro:** Bruta! Iam mi diris al la virino: Kun doloro vi devas naski infanojn! Ĉu la scienco estas pli potenca ol mi?



# GEPATROJ, INFANOJ, INSTRUISTOJ

## ĈU PATRINA EDUKADO?

Nia K-do «Milda Kataluno» skribis iufoje en «S-ulo»: «Estas patrino, kiu edukas kaj instruas la infanon». Kaj li tion ŝatas. Ŝajnas al mi, ke li tute eraras.

Niaj K-doj instruistoj, pro modesto, ne ekrespondis je tiu eraro. Do, mi ne-instruisto ekkaptas la temon. Kiom utila estus, ke ĉiuj niaj K-doj, gepatroj aŭ estontaj gepatroj ĉiam legu «Sennacieca n pedagogian revuon», por formi al si seneraran opinion pri eduk-instruaj temoj.

Ni konsideru la plej favoran okazon por feliĉo kaj instruo de infano: patro kaj patrino estas kleraj, paciencaj, justaj. (Tiajn gepatrojn mi neniam trovis. Mi konis paciencajn, severajn gepatrojn, sed ili estis religiaj, do ne kleraj, nek justaj).

Kun tiaj perfektaj gepatroj, infanoj fariĝas, laŭ burĝa ŝato, «bone edukitaj». Ili ne parolas sen demando. Ili ne bruas.

Ili estas monstraj idoj, io kiel hundoj aŭ elefantoj montrataj en cirkoj, stultigataj per troedukado. En vivo, inter VIVAJ infanoj, ili ŝajnas monaĥetoj. Je ilia dudeka jaro, patrino ankoraŭ tenas ilin «sub jako», kaj per tio, tro ofte, ili fariĝas ftizaj, tronervemaj.

Oni legu kiel Anatolo Frans' (Anatole France) plendadas, ĉar ankoraŭ dudekjaran lia patrino lin subigis je patrina pasio, patrina diktatoreco, kiu eĉ por kvinjara infano estas teda kaj malfortiga. Kutime familioj kun nur unu aŭ nur du idoj ilin tiel sklavigas. Ni devas celi naski kvankam ne tro da idoj, sed ne ankaŭ fieduki ilin.

Sed tiom bonaj, kleraj, paciencaj, severaj gepatroj kiel la gepatroj de Anatolo Frans aŭ de Gete aŭ de Viktor Hugo kvazaŭ ne troviĝas en la mondo. Kvazaŭ en ĉiuj familioj, virino estas superstiĉa, viro estas koleraĉa kaj ne sukcesas esti justa, eĉ kiam li kredas esti. Ambaŭ estas malkleraj.

Kio okazas en tiu grandega plimulto da familioj? Regas en ili ĉiama milito inter infanoj kaj gepatroj, inter patro kaj patrino, kaj bogepatroj. Oni disputas ofte ĝis daŭra malamo de unu «partio» (patro, filinoj kaj bopatrino) kontraŭ la «alia patrio» (patrino kaj filoj, aŭ aliuj). Bonajn amikojn mi havas, jam kleretajn, scivolemajn. Iliaj infanoj estas samtempe malfeliĉaj kaj malfeliĉigaj: «neelteneblaj».

En tiaj familioj kun ena milito, ne estas nur malvirtoj de gefamilianoj, kiuj naskas disputon inter ili. Mi ĉiam rimarkis, ke speciale la uloj

kun plej viglaj, potencaj karakteroj, disputadas inter gefratoj, gepatroj kaj idoj, kuzoj, se ili tro loĝas kaj laboras kune. Kun ne-familianoj, ĉiu el ili estas afabla, servema. Kun frato aŭ patro, tro samkarakteraj, ĉiu tuj ekkoleras, rifuzas helpon, malafable respondas.

Tion mi vidis ĉie, kaj mi pensas: tio estas natura leĝo. Familio devas disiĝi, precipe la plej viglaj familioj. Viglas fratoj kaj gepatroj, se ili restas kune, terure interluktas. Post saĝa disiĝo, en diversaj anguloj de la mondo ĉiu el ili utilas. Ili tute amikece korespondadas kaj retroviĝas dum kelkaj tagoj por paroli pri siaj diferencaj ŝatoj kaj sukcesoj.

Ni vivas en plena kristana heredado. (Mahometanoj suferas, ankoraŭ pli ol ni, proksimume la samajn superstiĉojn, kiel kristandevenaj homoj). Ni ne kredu esti liberigitaj, ĉar ni ne plu vizitas preĝejon aŭ moskeon. Kredo je familio estas kristana. Per tiu kredo pastraro regis, precipe per patrino, sur familioj; sur tuta homaro. — Ŝovinismo estas kristana, kvankam ne laŭkrista: eklezio ne timas kontraŭdirojn. Ĝi ekkrias kontraŭdirojn iom pli laŭte, kaj malkleruloj kredas aŭdi la «Veron». —Malŝato de seksa amo estas kristana: ni ĉiuj en amo estas ankoraŭ hipokrituloj. Kaj la diboĉoj de diboĉuloj estas lacigaj ludoj naskitaj de anima hipokrito: plezuro peki.

Naturo ne estas diboĉa nek ĉasta, nek ŝovinista, nek familia. Kiam ni estos venkintaj katolikan heredon, ni nek malĉastos nek ĉastos: ni vivos laŭ-nature, tio estas laŭracie, ĉar racio estas unu el niaj naturaj homaj instinktoj.

Do, mi pli ŝatas ankoraŭ la tre viglajn, sangoriĉajn familiojn kun «civila milito ene», ol la anemiajn kristanajn familiojn kun saĝaj, ŝimaj, hipokritaj infanoj, submetitaj sub kristanaj burĝaj moraloj.

En religiaj familioj kiel en sangoriĉaj militplenaj familioj, infanoj ricevas malbonan edukinstruon.

Ni nur povas fidi je instruistoj por plibonigi tion, por fari homojn el tiuj infanoj stultigitaj en familio.

Tio, ne ĉar instruistoj estas superaj homoj, — kvankam, fakuloj, ili tre superas patrinojn. (Por fariĝi patrino, sufiĉas seksumi. Por fariĝi instruisto, necesas «iom» studadi).

Sed la granda bono por infano en lernejo estas tiu: lernejo estas respubliko el infanoj. Eĉ sub la plej severa, sed justa instruisto, la lernado nur funkcias per «respublika akcepto» de la infanoj. Se la 40 infanoj volus rezisti, nek 10 instruistoj venkus ilin instruante. Laŭ ĉiuj miaj memoroj, laŭ ĉiaj miaj rimarkoj, infanoj akceptis entuziasme lernadon, precipe dum la lastaj jaroj kaj ĉiam pli kaj pli, dum pli aplikiĝas sistemoj, ekzemple, de nia K-do Freinet kaj de liaj kunlaborantoj, kies vigla movado esprimas la dezirojn de ĉiu bona instruisto.

Malbonajn instruistojn mi kvazaŭ ne konis. Nur unu tro koleran profesoron mi rememoras, kiu eĉ vundis iufoje, nevole, maltrankvilan bruegantan lernanton. Tamen, li estis simpatia, kaj certe, eĉ dum kolero, ege malpli danĝera ol frapanta patrino.

Tre peniga estas laboro de instruistoj, kion kutime laboristoj ne rimarkas (kaj burĝoj perfide ripetas, ke instruistoj estas «mallaboremu-

loj», ĉar instruistaro kutime puŝas al revolucio kaj socialismo). Gepatroj kun kvar infanoj pripensu, kia devas esti la memkontrolo de instruisto, kiu ne nur kontrolas, sed instruas kaj edukas kvardek infajon en la sama ejo. Kiu patrino akceptus gardi 40 infanojn?!

La metio, la faka scipovo de instruisto, la ekzamenoj kaj provoj, la statistikoj pri rezultoj, la reciproka kontrolo de instruistoj per si mem, la kontrolo de direktoroj kaj inspektoroj, ĉu ŝatataj, ĉu respektataj discipline, ĉu kritikataj (eble estonte ili estos baloteleklataj per instruistaro, kaj ne plu favorelektataj per registaroj), ĉiuj tiuj kontroloj certigas ĉiaman bonan rezulton de eduko kaj lerno en publikaj lernejoj. Nur la programoj, en faŝistaj kapitalistaj landoj, malhelpas la bonfaron de geinstruistoj, kontrolitaj per ĉirkaŭo, kontrolitaj per si mem.

Neniu kontrolas patrinojn. En Parizo, en granda strato, figepatroj mortigis infanon per ĉiutaga batado. Nur post morto la najbaroj ekkomencis rakonti, ke ili aŭdis terurajn kriojn, ke ili jam delonge sciis, ke tiu infano estis malfeliĉa. Laŭ niaj kutimoj ĉiu fipatr(in)o rajtas respondi al tiu kiu riproĉas kruelaĵojn kontraŭ infano: «Vi ne rajtas enmiksiĝi ĉe mi, en «Mia familio». Tiu infano estas mia infano. Okupu vin pri vi mem». (Ĉiam la kristana «sankta Familio» «bazo de ĉiu socio», la privata posedo eĉ de siaj inkujoj.)

Dezirinda estus plie, en estonta socio, ke geinstruistoj ankaŭ instruu... la gepatrojn, kies influo, lingvo, nescio, prokrastas ĉiujn antaŭirojn de la lernantaj infanoj. Ni kun ĝojo konstatas, ke tio fariĝas jam en Sovetio.

En Francio, tre ofte patro deziras, ke infano ne vizitu preĝejon. Infano ankaŭ, laŭ patra kaj instruista ekzemplo kaj konsilo, jam malŝatas la ekleziaĉojn. Sed patrino, avino, onklinoj insistas: «Mi volas, ke li manĝu la korpon de Kristo je sia deka jaro, same «kiel faras ĉiuj «ĝentilaj» homidoj en nia lando».

(Ho, tiu «Same kiel faras ĉiuj», blinde akceptata de virinoj, en pensmaniero, vestado, lukso, elspezo, manĝado, trinkado, fumado, en ĉio! Tiu reakciemo de virinoj, kiu verŝajne estas ligita kun natura tendenco de ĉiu ino serĉi certan, proksiman savon, sen pripenso! Ĝi estas la plej peza prokrastilo de homa bono en ĉiuj landoj).

Ni senstultigu ilin. Geinstruistoj, instruu la gepatrojn. Sed jam, ne atendante finan venkon ĉe virinoj, ni tuj ne plu permesu, ke infanoj ricevu ĉiujn patrinajn superstiĉojn, samtempe kun patrinaj batoj, kisoj, larmoj, ĵaluzoj, timoj, kaj aliaj hereditaj sensencaĵoj.

Kisado, mildo estas pli ŝatataj kaj ekzakte taksataj de infanoj, kiuj dum tuta tago ludis kaj lernis for de domo, socie vivis inter geknaboj, kuris, plifortiĝis, riskemiĝis, ĉar lerte kuraĝi, riskemiĝi ni ankaŭ devas lerni. La plejmultaj patrinoj timeme malhelpas infanojn, kiel tiuj kokinoj, kiuj naskis anasidojn kaj proteestas, kiam tiuj idoj ĵetas sin sur akvon.

Ne, milda K-do Kataluno, la patrino ne estas edukistino. Preskaŭ neniam ŝi taŭgas por eduki infanon. Anatolo Frans (Anatole France)

plendas, ke lia patrino tro «kovis» lin, stultigis lin ĝis plenaĝo: 20-a, 25-a jaro. — Panait Istrati rimarkas, ke lia patrino nur instruis lin iom, por ke li fariĝu k o m e r c i s t o, r i ĉ u l o, e k s p l u a t i s t o. — Julio Vales (Jules Valles) terure akuzas patrinon, patron, familion. Li tute pravas.

Patrinoj, nutru pupojn, kisu kaj konsolu infanetojn kaj infanegojn dum dolĉaj kaj larmaj minutoj. Sed patrinoj mem sciu, aŭ socio prizorgu, fari infanojn kaj homojn viglaj, fortaj, mempensaj, saĝe riskemaj. Tion ĝis nun virino ne scipovas instrui. Nur malrapide patrino fariĝos edu kistino, kiam ŝi mem estos ricevinta bonan edukon dum infanjaroj, ne antaŭ jardekoj (aŭ jarcentoj, laŭ la landoj).

Sed homaro bezonas TUJ bone edukitajn idojn.

Ĵ i e f (nek instruisto, nek patro)

---

## TERAPIO DE DIVERSAJ INFEKTAJ MALSANOJ PER DIVERSAJ SEROJ

### (dediĉita al kol. Machek)

### A. Difterito

La terapio de l'infektaj malsanoj progresas ĉiujare. Mi, kiel studento, jam tiam interesiĝis pri tiu ĉi afero kaj hodiaŭ vi permesu al mi diri kelkajn vortojn pri ĝi.

Kontraŭ difterito, tute konata malsano, oni uzas seron enhavanta antitoksinon pogrande, plejparte en unuaj tagoj de la malsano. Eĉ se la malsano nur similas al difterito estas bone uzi la seron kaj efikas injekto. Se la malsano ne estas grava, sufiĉas ordinare 3000—5000 unuoj en muskolojn de korpo, precipe de abdomeno; en pli gravaj kazoj ni uzas 10 000 unuojn enmuskole. Ankaŭ sukcese ni donas injektojn envejnen, ĝenerale en tre gravaj kazoj kaj tiam ni donas duonon da injekto envejnen kaj duonon enmuskolen. Cetere sufiĉas unu injekto, sed se dum tri tagoj, la febro ne ĉesis, ni estas devigataj doni novan injekton.

Dum la lasta epidemio de difterito, ni uzis tiun duan injekton nur en kvar kazoj. La sero devas esti sufiĉe koncentrita, alimaniere ni estus devigataj doni grandajn injektojn, kiuj unue ne estas agrablaj kaj due kaŭzas ankaŭ seran malsanon, ne danĝeran sed ankaŭ ne agrablan. Se aperas epidemio en urbo aŭ en familio, estas bone uzi tuj kiel protektilon injekton enmuskolan de 1000 unuoj, kiu sufiĉas por 2—4 semajnoj. Ŝafa sero estas uzata bonefike kiel protektilo.

Sanajn infanojn ni imunigas per tiel nomita anatoksino difterita. Inokulado de $^1/_2$—1,2 kub cm. enmuskole sekvas en intertempoj de unu semajno; se infanoj suferis pro reakcio, ni povas tute bone lastan injekton ne doni. La reakcioj estas malgrandaj ĉe infanoj en la unuaj jaroj de la vivo; plej bone estas inokulado al infanoj de $1^1/_2$ ĝis 6 jaroj; post la 6-a jaroj reakcioj estas ĝenerala fenomeno. La imunigo aperas en 14 tagoj post la lasta injekto kaj daŭras preskaŭ tutan vivon. Eblo de infekto per difterito estas nur 1,20 %. Kaj krom tio oni povas injekti al infanoj en estonta tempo kiun ajn seron sen timo, ke ĝi malsaniĝos pro sera malsano.

Kiel do ekscii, ĉu infano inklinas al difterito aŭ ne? Eĉ tion ni povas per reakcio de Schick. Se post injekto de 1/50 de minimuma kvanto de diftera toksino en haŭton ni ne vidas reakcion, ni ne devas inokuli ĝin, ĉar tiuokaze la organismo ne inklinas al difterito.

### B. Sero kontraŭ skarlatino

Kiam usonaj scienculoj trovis streptokokon, kiel kaŭzon de skarlatino, mi komencis en mia laboratorio ankaŭ studi ĝin kaj penis ĝin trovi en ĉiu kazo de citita malsano. Vidu statistikon:

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 1926: | 265 kazoj | de skarlatino... | streptokoko | trovita en | 201 | kazoj. |
| 1927: | 125 kazoj | » | streptokoko | » | 87 | kazoj. |
| 1928: | 321 kazoj | » | streptokoko | » | 263 | kazoj. |
| 1929: | 567 kazoj | » | streptokoko | » | 480 | kazoj. |

Kombino kun difterito estis malofta, nur 28-foje en ĉiuj studitaj kazoj. La streptokoko de skarlatino havas sufiĉe da veneno, kiu kaŭzas ne nur febron, sed ankaŭ ekzantemon tute similan al tiu de bestoj.

Kiam mi uzis germanan seron, mi povis konstati, ke la longeco de la malsano estas la sama, sed jam la duan tagon ekzantemo malaperis. Je komplikoj de skarlatino, ĝi ne havas influon kaj ŝajnas, ke nefritoj post ĝia uzado estas pli oftaj ol se la malsano estus kuracita sen ĝi. La malnova terapio per saloj de salicil-acido estas nun ofte uzata. Sed ĝia prezo kaj efikoj estas dubaj.

Reakcio de Schultz-Charlton servas al mi, kiel reakcio diagnoza; ekzantemo de skarlatino malaperas en la loko de la injekto dum 24 horoj; se ĝi persistas malsano ne estas skarlatino. Oni injektas 0,1 kb cm de skarlatina sero. Sed, kiel mi diris, ni postulus de sero skarlatina, ke ĝi influu ankaŭ en la komplikoj de la malsano. En plej nova tempo produktas la germana industrio la tiel nomitan skarla-strepto-serinon, kiu devas influi en la komplikoj. Oni ĝin ankaŭ injektas enmuskolen, sed la statistikoj ĝis nun publikigitaj estas nur malgrandaj, kaj ni ne povas diri lastan vorton en tiu ĉi demando. Poste aperas ofte malsano sera, kiun ni scias forigi per injektoj de kalcio.

Do, koncerne la streptokokon de skarlatino, oni ankoraŭ ne diris la lastan vorton: ĝi estas ebla kaŭzo de skarlatino.

Prof. d-ro Riedl

---

## SANITARA LERNEJA SERVO EN FRANCIO—LA DENTOJ DE LA LERNANTO

Nur 1 infano el 10 havas 2 vicojn da tute sendifektaj dentoj. La dentoj sesjarulaj estas profunde kariaj (putriĝintaj) ĉe 5 infanoj el 10. Ili estas tute sanaj nur ĉe 2 infanoj. Nura patologio de la sesjarula dento sufiĉas por pravigi pri la infana denta kario la alnomon socia malbonaĵo, kaj en tiu ĉi jam malgaja bildo ankaŭ aperas plie diri, ke preskaŭ la tuta nombro de la lernaĝaj infanoj bezonas flegadon de dentkuracisto kaj ke por preskaŭ duono el ili la afero komplikiĝas per makzelaj difektoj kaj reeĥas al la farto de la tuta infankorpo.

En urbo havanta 10.000 lernaĝajn infanojn, proksimume 6.000 infanoj tre bezonas dentflegadon kaj tiu flegado postulus la tutan laboron de tri dentkuracistoj. Oni ne forgesu ke se taŭgtempa flegado ne okazos, necesiĝos elradikigo de la dentoj, kio estas ege bedaŭrinda, ĉar ĉe infano elradikigo de definitiva dento ĉiam signifas kripligon.

D-ro F. Watry (Revuo: «Al la Sano»)

---

Tiel parolas fama franca kuracisto, sed la reakcia «Gazeto de la Geinstruistoj» forgesas komenti ĉi tiun artikolon laŭ edukista vidpunkto.

La denta flegado en Francio tute ne ekzistas. Citi escepton eĉ mi ne povas. En mia departemento (Lortei), kiu enhavas 300.000 loĝantojn, en kiu estas 1.200 geinstruistoj, do 1.200 klasĉambroj kun meznombre 30—40 lernantoj en ĉiu, ekzistas neniu dentkuracisto lerneja.

Efektiva kuracista lerneja servo ankaŭ ne ekzistas. Estas vere, ke kuracistoj inspektas la infanojn, ke oni dungis lernejajn flegistinojn — sed utilas por nenio. Vana malŝparo de mono! La kuracisto inspektas, ne rajtas flegi, ne rajtas verki receptojn. Vi ja komprenu, ke se la lerneja kuracisto verkus receptojn por flegi malsanan knabeton, tuj protestus la aliaj kuracistoj, kiuj en nuna socio devas konkuri por akiri plej multan klientaron. Nur en tre maloftaj okazoj, tuberkulozaj grandurbaj infanoj estas sendataj mallongan tempon en preventorion aŭ sanatorion, aŭ en liberaeran lernejon.

La geinstruistoj konstatas:
ke la kuracista inspekto estas plejofte neserioza kaj en mala okazo nur atentigas la familion pri malsaneco de l'infano, tute ne helpante ĝin. Ili konsideras, ke la prizorgo de la sano de l'infanoj devas esti socia devo. Tiu saniga servo estu, same kiel lernejo, tute senpaga. Inspekti ne sufiĉas. La socio devas flegi ĉiujn popolinfanojn, nebezonante pagi viziton de kuracisto, kaj medikamentojn aŭ flegadon de dentisto. Plie, la socio devas senpage doni en lernejo plian nutraĵon al malriĉaj infanoj, kaj liveri ĉiujn higienajn flegojn (banoj, haroj, ktp.). Ĝis senpageco de la higienigo kaj flegado de l'infanoj ne ekzistos, eĉ la plej serioza kuracista lerneja servo estos mensogo.

La ruĝaj avangardaj geedukistoj el Francio kaj precipe la feminismaj edukistinaj grupoj multfoje esprimis eĉ pli radikalan opinion.

1. Patrineco estas socia funkcio kaj la tutan koston de la prizorgado de l'infano ĝis ĝia laborkapablo devas pagi la socio (ŝtato).

2. La nuna burĝaro, kiu instruas la proletidojn nur tiom sufiĉe por ke ili fariĝu pli produktivaj laborsklavoj, devus ankaŭ zorgi la sanon de siaj «estontaj laborsklavoj» sed la sklavarmeo estas ankoraŭ tiel multa, malgraŭ lasta hombuĉado, ke ne bezonas elspezi monon por savi vivon al centmiloj da infanoj; estas preferinde elspezi 15 miliardojn (1/3 de jara tuta buĝetsumo) por milito kaj militistaro.

Konklude, la nuna larneja kuracista servo en Francio estas trompa «demokrata» afero por kredigi al bonkora prizorgemo de burĝaro; ĝi efektive estas lerta rimedo por akceptigi al la popolo la kvazaŭ «naturan» selektadon de l'estonta laborularo produktokapabla.

SAT - ano 518

# TEPS TUTMONDA ESPERANTA PEDAGOGIA SERVO

Tiu ĉi ribriko estas gvidata de K-do M. BOUBOU, 96, rue Saint-Marceau, Orléans (Loiret), Francio

## EL AŬSTRIO

### Reformo de Konstitucio kaj la Viena lerneja urb-konsilantaro

Kiam la reakcio dum aŭtuno penis ŝanĝi la demokratan konstitucion laŭ sia senco, antaŭ ĉio volis reformi la administradon pri instruado. Ĉar Vieno posedas unu el la plej demokrataj lernej-registaroj de la tuta mondo, ĝi estas vera parlamento de 109 delegitoj, elektita de popolo kaj de geinstruistoj laŭ proporcio. Ĉiuj lernejoj krom la alt-lernejoj estas sub administrado de tiu ĉi korporacio.

Nu, la reakciuloj ne nur volis ŝanĝi ĝian demokratan organizon, sed ankaŭ forpreni el ĝia influo ĉiujn mezajn lernejojn, kies instruistaro bedaŭrinde grandparte simpatias kun la reakcio, kvankam la anstataŭonta ĉefo estus la ministerio por instruado, reakcia kaj burokrata oficejo sen ia socia kompreno.

La ŝovinismaj profesoroj eĉ aranĝis stratan manifestacion kontraŭ la urbkonsilantaro, plendante, ke la viena lerneja urbkonsilantaro ilin subpremas, sklavigas. Kiam la prezidanto de tiu ĉi estraro (lerneja urbkonsilantaro), Otto Gläckel, la kreinto de la aŭstria instrureformado, volis aŭdi faktojn, ili ne sciis citi eĉ unu ekzemplon. La tuta laboristaro estis preta defendi la ĝisnunan demokration, precipe la aŭtonomion de Vieno kaj la rajtojn de la lerneja urbkonsilantaro. Tial la mallumaj projektoj de la nigruloj grandparte malsukcesis. La nova konstitucio nur garantias al la ministerio la eblon inspekti la mezajn lernejojn. Ankaŭ tion nur dum ĉeesto de la inspektoro de la lerneja urbkonsilantaro — rajton, kiun ankaŭ ĝis nun oni ne rifuzis al la ministerio.

Ankaŭ la ministerio nun havas la rajton fari instrukcion al la suba oficejo. Sed la reakciuloj eraris, kiam ili tro frue triumfis kaj esperis, ke per tiu ĉi rajto nun oni povas subfosi la nunajn leĝojn, ĉar samtempe la urba aŭ lerneja estraro ricevis la rajton — anstataŭ blinde sekvi la instrukciojn de la ministerio — esplori ilin, ĉu ili estas laŭleĝaj kaj eventuale provoki decidon de administra tribunalo.

Do tiun ĉi fojon oni sukcesis, malhelpi grandparte la danĝeran atakon Tamen la danĝero daŭras kaj la liberema popolo devas esti preta al pluaj bataloj.

---

## EL BULGARIO

### Persekuto kontraŭ studentoj

Malgraŭ la sennombraj persekutoj, kiujn jam suferis la instruistoj kaj studentoj el Bulgario, novaj batalantoj stariĝas. Lastatempe kreiĝis avangarda studenta Unio kun organo «Studenta Tribuno».

La avangardaj studentoj partoprenis sociajn manifestojn kontraŭ proceso de komunistaj akuzitoj kaj okaze de jubileo de rusa revolucio unu tagon eĉ flirtis ruĝa standardo supre de l'Universitato.

K-do Aleksief, redaktoro de «Studenta Tribuno», ankaŭ kunlaboranto de la esperantista proleta gazeto «Balkana Laboristo» ĵus estis arestita kaj estos juĝata laŭ la monstra leĝo pri defendo de ŝtato (t. n. leĝo Z.Z.Z.).

Laŭ informo de «Balkana Laboristo»

---

## EL ĈEĤOSLOVAKIO

### La burĝlernejaj geinstruistoj plendas

La sindikato de la geinstruistoj de burĝlernejoj («Burgerschulen-Mest'ankych skol) ĵus eldonis 80-paĝan broŝuron, kiun ĝi dissendis ankaŭ eksterlanden, por prezenti sian salajran postulon.

La geinstruistoj de la burĝlernejoj perdis la salajregalecon kun kategorio B de la ŝtatoficistoj, kiun ili estis akirintaj antaŭ la milito.

Mi, senpartia eksterlandano, konstatas, ke la sendependeco de Ĉekoslovakio ne konservis al instruistoj ĉekoslovakaj justan rajton pri salajregaleco kun samkulturaj aliaj ŝtatoficistoj, kaj espereble la tieaj edukistoj konscios pri neceso malfidi la novan junan ĉekan naciismon kaj partopreni la ekonomian klasbatalon.

La monvaluto fariĝis 7,5—8-ono de l'antaŭmilita, dum la salajroj de geinstruistoj kreskis nur 4,5—6,5-oble. Ili postulas revalorigon de sia salajro kaj ilia projekto montras indekson de 678—715 kontraŭ 100 en 1914 (dum monvaluto-indekso estas 750—800).

De 1926 oni paciencigas ilin. Paciencon ili ne plu havas, sed ŝajnas, ke ili ne aŭdacas alpreni la taŭgajn batalrimedojn, tiujn de klasbatala sindikalismo meze de la tuta ekspluatita salajrularo.

SAT—518

---

### Postuloj de ĉeĥoslovaka geinstruistaro

Jam dek jarojn ni havas nian propran ŝtaton. Ĝi estas tute kontrasta el la estinta ŝtato aŭstria, kiu estis nin sklaviganta. Pro tio ni staras antaŭ novaj kulturtaskoj, antaŭ kreo de nova ĉekoslovaka lernejo kaj de ĝia nova instruisto.

En la intereso de nia respubliko ne povas la registaro resti kontenta kun ĝisnunaj malnovaj lernejaj leĝoj kaj estas devigata nepre alpaŝi al la kreo de novaj leĝoj por reguligi la vojon de la kultura progresado de la ŝtato. La nova ĉekoslovaka lernejo, elirante el principoj

demokrataj, estas destinata doni al ĉiu civitano ne nur egalajn devojn antaŭ la leĝo, sed ankaŭ egalajn rajtojn kaj eblon al klerigo; ĝi devas racie mastrumi kun popola talento kiel kun plej grandvalora posedaĵo de malgranda nacio; ĝi devas konduki ĉiun individuon al la tasko, kiu estas konforma al ĝia talento kaj kapablo. Sed ĉi tiun taskon ne povas realigi la malnova lerneja organizo, kreita por la bezanoj de estinta Aŭstrio-Hungario. Nova ĉekoslavaka lernejo, havante novajn taskojn, nepre bezonas ankaŭ novan geinstruistaron kun superlerneja klerigo, kiu troviĝus en jure kaj materie bona situacio. Nur tia instruistaro povas, kiel aŭtonomia faka faktoro, plene valorigi sin ne nur en interna lernejlaboro, sed ankaŭ en la administrado de la lernejo.

Pro tio la ĉekoslovaka instruistaro postulas de la registaro antaŭ ĉio la instruistan aŭtonomion, partoprenon en la administrado de lernejaferoj, en kvalifikaj kaj disciplinaj komitatoj per libera elekto.

Koncerne la salajrojn, postulas la popola instruistaro tute novan sistemon de salajroj. Ĝi deziras, ke la instruisto de la popola lernejo fariĝu tiurilate egalvalora al la ŝtataj oficistoj kun samvalora klero.

Plia postulo estas la universitata klerigo al instruistoj de popollernejoj: ĝi estas neprokrastebla postulo de la nova lernejo. La ĝis nun ekzistantaj porinstruistaj institutoj devas esti nuligitaj. Al la klerigo de la popolinstruistaro devas servi estonte pedagogiaj fakultatoj ĉe la universitatoj kun dujara studado.

La ĉekoslovaka instruistaro postulas krome kunigi la burĝan lernejon (6a, 7a kaj 8a lernjaroj) kun pli malsuperaj mezgradaj lernejoj en novan tipon de la unueca diferenciga(?) lernejo de la 2-a ŝtupo, malaltigon de la nombro de gelernentoj en la klaso kaj reformon de pli supra mezgrada lernejo en unuecan lernejon de la 3a ŝtupo. Ni rekomendas organizi tiucele ĉe la ministerio de klerigo porreforman fakon, kies estro estus profesoro D-ro B. Bidzovsky.

La jam preparitaj leĝprojektoj pri infanĝardenoj, pri distriktaj burĝaj lernejoj, pri 4aj klasoj de burĝlernejoj kaj pri okklasaj reallernejoj estu senprokraste realigataj.

Plue postulas la ĉekoslovaka instruistaro, ke la administrado de popola lernejaro estu nepre apartigita de la politika administrado. En la nova lernejar-administrado devas partopreni voĉdone elektitaj reprezentantoj de la civitanaro, reprezentantoj de la ŝtato kaj elektitaj fakuloj el la instruistaro. La influo de l'eklezioj estu tute malebligita.

Ĉar nia geinstruistaro estis pruvinta sian kapablon, iniciativojn kaj fakan sperton en la solvado de l'aktualaj demandoj lernejaj, ĝi fine postulas, ke ĝiaj fakuloj estu invitataj al pritraktado de ĉiuj leĝoprojektoj kaj diversaj instrukcioj por kunlabori al prospero de la ĉekoslovaka lernejaro. Ĉiuj menciitaj postuloj estis transdonitaj al la leĝdonantaj faktoroj de ĉekoslovaka respubliko.

A. Valoušek
(Brno 12, Tyršova 19)

## La estonta senpageco de la duagrada lernejo

De post la milito, la avangardaj edukistoj elpensis la ideon de «unika lernejo», donante al ĝi jenan revolucian signifon: «al la plej malriĉa proletido estu ebligate transiri sen mona baro ĉiujn gradojn de instruado kaj atingi la plej altan instruan gradon, se li mense kapabla estas».

Sed la burĝaj gvidantoj tuj aliformigis la signifon de l'unueca lernejo por forigi la revolucian enhavon el la du vortoj «unueca lernejo». Tiel ankaŭ ili penis sufoki propagandon bazitan sur revolucia signal-vorto.

La franca burĝaro ĵus sukcesis en siaj klopodoj, lerte maskante per la vortoj «unueca lernejo» kaj per ia ŝajna demokrateco esence burĝklas-ecan reformon. De nun, la sesa (komenca) jarklaso de la duagrada instruo estos s e n p a g a kaj la teksto de la leĝo voĉdonita 11-an de marto 1930 anoncas, ke oni akcelos la senpagecon por ĉiuj aliaj jarklasoj.

La debato en la Deputita Ĉambro montris jenan karakteron. La alta burĝaro batalis la senpagecon dezirante, ke nur la plej riĉaj infanoj havu duagradan instruadon klasikan, t. e. akiri psikologian senton de reganta klaso daŭrigonta la superregadon de burĝaro. La et-burĝaro (radikaluloj kaj socialistoj) batalis por la senpageco en celo faciligi al et-burĝidoj la duagradan kulturon. La du flankoj de burĝaro facile interkonsentis per akcepto de la senpageco por la komenca sesa jarklaso.

Kaj nun la burĝaro distrumpetas, ke la «unueca lernejo» fariĝis efektivaĵo. Tiu ŝajndemokrata reformo kaŝas abomenan trompon — ĉar ĝi faris riĉan donacon al burĝa klaso, kies ĉiuj idoj vizitas la duagradan lernejon, dum la proletidoj devas je 12-a aŭ 13-a jaro labori en ekspluatejo: al proletaj gepatroj urĝas la tempo, kiam iliaj infanoj estos laborkapablaj kaj salajron akirantaj.

Unueca lernejo povos fariĝi nur: 1. per dono de plena stipendio al ĉ i u j kapablaj proletidoj, 2. per elekto de ĉiuj kapablaj lernantoj, kia ajn estas ilia socia deveno, el unika (por ĉiuj sama) popollernejo; 3. per forigo de gimnaziaj aŭ aliaj infanklasoj por riĉulidoj; 4. per alta pago (ja ne senpageco) por ĉiuj familioj de riĉaj studentoj — ĉar la sumo elspezata por unu studento duagrada estas multe pli alta ol tiu difinita por lernanto de popollernejo, kaj justas, ke riĉulo pagu por suplementa kulturo liverata al sia filo.

«Tio estos neeblaĵo» respondas demokrataj geinstruistoj. Prave kaj ili aldiru: «...neeblaĵo en nuna sociordo» kaj tiel stariĝas la problemo de socia transformo. Tiel stariĝas ankaŭ la evidentaĵo pri tio, ke la unueca lernejo estas atingebla nur revolucie. En kapitatisma sociordo unueca lernejo estas «trompilo».

SAT—ano 518

---

## La Ŝovinismigo de l'franca edukistaro

La Ministro por Internaj Aferoj en cirkulero de 7-a de decembro 1929 plendas, ke la ŝtatoficistoj ne partoprenas la oficialajn ceremoniojn okaze de naciaj festoj. Tio estas «respekto-manko al la registaro kaj al la invitantaj aŭtoritotaj». La Ministro rememorigas al ĉiuj ŝtatoficistoj, ke ĉeesti tiajn ceremoniojn estas «ofica devo».

La signifo de tiu ĉi cirkulero estas klara. Ĝi koncernas ĉefe la geinstruistaron, kiu pli kaj pli forgesas en la ceremonioj ŝovinismaj pri la naciaj festoj: 14-a de julio (nacia ĉeffesto), festo pri Johanino d'Ark, Armistica datreveno, ktp... Tiu ministra rememorigo al ŝtatoficistoj estas paŝo al pliseverigo de la disciplino kaj faŝismigo de la ŝtataj funkcioj en periodo, kiam estas ellaborata faŝisma regado kaj konkordato en Francio.

SAT—ano 518

---

### EL GERMANIO

## Pedagogia Instituto de Brunsvigo (Braŭnŝvajg)

Kun helpo de registaro, de la 150.000 instruistoj germanaj el la «Deutscher Lehrer-verein» (Germana Instruista Ligo) de la ŝtato Brunsvig kaj de la urbo Brunsvigo, fondiĝis Internacia Instituto de l'Edukscienco en granda konstruaĵo donacita de Komunumo Brunsvigo. Ĝi celas esplori funde la edukformojn kaj lernejstrukturojn el ĉiuj landoj laŭ internacia kaj scienca spirito kaj kun paca kaj kunlabora idealo. Ĝi dividiĝas laŭ 3 sekcioj: fremdlanda sekcio — Materiala sekcio — Teknika sekcio (biblioteko, arkivoj, eldonaĵoj). La fremdlanda sekcio nun konsistas el jenaj fakoj: Francio, Britio kun kolonioj, Usono, Hispanio, Sudameriko kaj Ĉinio.

La Novan Instituton oni inaŭguris la 2-an de februaro 1930; ĝin direktas profesoro d-ro Rickel.

---

### EL HISPANIO

## Situacio de la hispana geinstruistaro rilate al la popolkulturo

P r e p a r a d o d e l a g e i n s t r u i s t o j: Oni formas la geinstruistojn en la normalaj lernejoj (pedagogiaj lernejoj), kie la junuloj povas eniri je la 14-a jaro post simpla ekzameno. La lernado konsistas el kvar kursoj, kies sukceso donas rajton peti la instruistan diplomon. Sed por gvidi lernejon, estas necese fari novan konkurs-ekzamenon je dato difinita de la registaro por distribui la seninstruistajn lernejojn.

O r g a n i z a d o d e l a l e r n e j o j: Se eble, la infanaj lernejoj estas organizitaj gradigite, de 1-a ĝis 6-a grado, aŭ malpli da gradoj se la nombro de instruistoj en la vilaĝo ne sufiĉas por tia aranĝo. En ĉiu urbo kaj vilaĝo ekzistas loka komitato, kunmetata de la urbaŭ vilaĝestro, la paroĥestro kaj aliaj loĝantoj. Tiu komitato zorgas

pri la aranĝo de la lernejoj kaj pri la laboro de la instruisto. Estas ja facilkompreneble, ke la komitato ne ĉiam agas justece kaj iafoje, la instruisto ne sin movas libere. Multe, sed ne bone, oni povus paroli pri tio.

Religio en lernejo: Estas deviga la instruado de religio, kompreneble de katolika religio. La instruisto devas esti katolika, ĉar li «estas spegulo, sur kiun rigardas la infanoj». Tiel parolas la regantoj, kiuj por vivi trankvile bezonas popolon religian kaj humilan, sed ne kleran. Ni ĉiuj scias, ke la pastroj preferas homon pli simpla ol klera, ĉar klerulo estas ribelema ne bezonante la konsilojn de la salajritaj disirvistoj.

Privataj lernejoj: Oni devas distingi tri specojn: gemonaĥaj, privataj kaj nereligiaj.

Monaĥoj kaj monaĥinoj sorbas preskaŭ plene la infanan lernigadon. Lernejo ne regata de religiuloj estas rigardata kiel nesufiĉe taŭga. Ne nur la riĉuloj estas jungitaj al la klerikalismo, sed ankaŭ la laboristoj, oficistoj, komizoj sin konsideras altrangaj, enkondukas siajn gefilojn en la religiulajn lernejojn. Vidu, kion ni povas esperi de generacio tiele edukita!

Ŝajnas, ke la instruistoj gvidantaj lernejojn devus peni por eduki la junularon racie kaj konscie, por ke ili estu kapablaj forigi la klerikalan povon, sed kontraŭe, tiaj timemaj instruistoj ne trovas alian rimedon ol plifortigi la religian infanedukadon. Pro tio, oni rimarkas ke en la plej granda parto de privataj lernejoj, la katolika religio estas instruata tiel funde, kiel en la religiulaj lernejoj. Malgraŭ tio, kreskas la nombro de religiulaj lernejoj dum malkreskas la nombro de privataj.

La nereligiaj lernejoj (laikaj aŭ neŭtralaj) penas forigi el la neŭtralaj cerboj la superstiĉojn, kies loko devas esti okupata de iuj solidaj sciencokonoj, kiuj ebligos, ke la infanoj estu kapablaj pensi per siaj propraj mensoj, serĉante la veron inter la sennombraj mensogoj ĉirkaŭantaj nin. Kompreneble tiuj ĉi lernejoj ricevas nenian oficialan helpon kaj nur vivas per siaj propraj rimedoj, kiuj estas honorarioj de la lernantoj, kotizoj de l'aliĝantoj kaj nenio pli.

Malfeliĉe, ne ĉiuj, kiuj sin nomas progresamantoj, apogas la laikajn lernejojn, kies vivo estas mizera.

Emilio Artigas (Zaragoza), SAT—2461

---

## EL ITALIO

### La nova Encikliko pri Eduko

La novan Enciklikon (papan cirkuleron) pri Edukado eldonis la Papo la 11-an de januaro en itala lingvo kaj unuafoje publikigis franclingve la 6-an de februaro la franca gazeto «La Croix» (La Kruco—katolika ĵurnalo).

Ĝi estas ne nur dokumento respondanta al principa diskuto inter Papo kaj Mussolini (oni ja scias, ke ekzistas daŭra ŝajna konflikto in-

ter ili pri superregado en edukado); ĝi estas ja dokumento prezentanta universan doktrinan aserton de Papo, kiun devas akcepti ne diskutante katolikoj el tutmondo. Ĝi signalas novan ekpenegon koncentri ĉiujn katolikajn fortojn el tutmondo por regadi edukadon en ĉiuj landoj.

Al kiu apartenas edukadrajto? Respondas Encikliko «al 3 necesaj societoj starigitaj de Dio... du estas naturaj: familio kaj civila socio, la tria estas supernatura: ĝi estas Eklezio». Kompreneble la papo asertas, ke la Eklezio estas la plej «perfekta» el la tri societoj kaj ke ĝi devas «regadi» en la eduka spirita ordo, kiu estus propre ĝia! Ĉu Kristo ne diris al siaj apostoloj: «iru eduki ĉiujn naciojn, baptante ilin je nomo de Dio-Patro, Dio-filo, kaj Dio-Sanktspirito».

Plie Encikliko deklaras, ke «Eklezio estas sendependa de ĉiuj surteraj regpovoj ankaŭ en la edukado, ne nur en la eduka celo sed ankaŭ en la elekto de taŭgaj rimedoj por ĝin atingi». Tio signifas, ke la Papo asertas, ke eduka superregado de l' Eklezio estas nepra ĉiama ĉiea veraĵo spite kia ajn politika regpovo. Kaj laŭ la Encikliko, la «Supereminenteco» de l' Eklezio konsistas en tio, ke «ĝi estas la plenrajta prizorganto de literaturo, sciencoj kaj artoj» kaj ankaŭ de «korpa kulturo, kiu estas rimedo povanta servi aŭ malutili al kristaneca edukado».

La politikan celon de l'Encikliko oni ne kaŝas kaj la nuna Papo Pio la XI-a en ĝi rememorigas la faman Enciklikon de Leo la XIII-a (8 feb. 1884) «Junuloj ne plu kutimigitaj respekti Dion, ne plu povos elporti ian ajn regulon de honesta vivo kaj ĉar kutimigitaj neniam rifuzi al siaj deziroj, ili facile emos renversi la ŝtatojn...»

Plue, la Encikliko akre kritikas la modernajn pedagogio - sistemojn, kiuj sin bazas sur iniciativo de l'infanoj; for «ĉia pedagogia naturismo, ĉia edukrimedo neanta la originan homaran pekon kaj la dian favoron (graco) kaj sin apogas sur nuraj naturfortoj».

Poste estas senbrida kritiko pri kunedukado de ambaŭ seksoj kaj de t. n. seksedukado. Papo kondamnas tiun pedagogian sistemon, kiu akceptas «maldecan miksitecon kaj nivelegalecon» de ambaŭ seksoj. Ĉar ja la kreinto farinte malsamaj la du seksojn, ne volis egalecon, sed malsuperecon de la virino!

La neŭtralan aŭ laikan lernejn Encikliko kondamnas per jenaj vortoj «La neŭtrala aŭ laika lernejo, el kiu la religio estas ekskludita (eligita) kontraŭas la unuajn principojn de edukado. Cetere tia lernejo estas praktike nerealigebla, ĉar ĝi estas fakte kontraŭreligia. Viziti tiujn lernejojn estu malpermesate al la katolikaj infanoj».

Laŭ la Encikliko, la tuta instruado: lernejorganizado, geinstruistaro, programo, libroj, disciplino, «ĉio devas esti penetrita de vere krista spirito, sub direkto de zorgema patrineca Eklezio tiamaniere, ke la religio estu la fundamento kaj la krono de la tuta instruado, je ĉiuj instrugradoj, ne nur de l'elementa, sed ankaŭ de la meza kaj de la supera gradoj». Kaj fine la Papo insistas pri la devo de ĉiuj ŝtatoj monhelpi la konfesiajn katolikajn lernejojn!!

La papa Encikliko aperas en epoko, kiam estas sieĝata de la nigra reakcio la fortikaĵo de laikismo (senkonfesieco). Francio, kies registaro estas baldaŭ sendube akceptonta Konkordaton kaj multon promesis

al la papa legato por ebligi al la pastroj eniri la senkonfesiajn lernejojn, komence nur post la klaslaboro kaj por subvencii la privatajn katolikajn (en F. ncio strange nomatajn: «liberaj») lernejojn.

Al tutmondaj edukistoj kaj gepatroj, ni ripetu pli laŭte «Religio estas opio de la popoloj!» For religio, stultiga superstiĉo, kiu ŝafigas laborulojn por kapitalisma ekspluatado.

Libere aranĝis:
SAT-ano 518

Laŭ artikolo de franca «Liberiga lernejo»
(L'Ecole Liberaturice — 8.3.30.)

————

## EL JAPANIO

### Situacio de l'edukado en Japanio

En la imperio de la leviĝanta suno, tiu lando, kiu staras je l'antaŭvespero de burĝa-demokrata revolucio, en kiu la oficialaj statistikoj registras 270.000 senlaborulojn por la tuta lando kaj pli ol 2.000 sinmortigintojn lastjare nur en Tokio, la klasbatalo estas ankaŭ tre grava sur la kultura grundo. En lastaj monatoj, ĝi estis aparte akra sur ĉiuj medioj de l'edukado: studentoj, instruistoj, pioniroj-infanoj.

Ĉe studentoj:

La granda ribelo en Koreo komenciĝis per la lukto inter la koreaj kaj japanoj gimnazianoj en Kosû. La 12-an de novembro 1929, la koreaj gimnazianoj okazigis demonstracion kaj 300 estis arestitaj. La 13-an de novembro, manifestaciis 200 studentinoj kaj, post tiu ĉi okazaĵo, la ondo de protesto kaj ribelo kovris la tutan Koreon. La 2-an kaj 3-an de decembro, okazis en Seul manifestacioj kaj 130 gimnaziaj gejunuloj estis arestataj.

La batalado inter koreaj kaj japanaj studentoj daŭris ĝis januaro. Plene senarmitaj, gejunuloj batalis kuraĝe kontraŭ japanaj policanoj kaj ĝendarmoj. Barikadoj estis konstruataj en kelkaj urboj... 60 mortigitoj, vunditoj sennombre! Oni frakasis la ribelon per mobilizo de tuta policistaro. Sume, 900 studentoj estis arestitaj kaj ĝis la 22-a de decembro 160 estis akuzataj. La burĝaj gazetoj tute silentas pri tiu ĉi sangaĵo.

Tiu abomenaĵo trovis sian eĥon en Japanio mem. En Tokio, la 25-an de decembro, 300 koreoj estis arestitaj (laboristoj kaj studentoj) kaj oni metis en karceron 63 el ili. Oni diras, ke la polico, eksciinte ilian planon ataki la ministrarejon por enlanda afero per ilia sekreta instrukcio: «Jam la tempo! Kolektiĝu en la Korea Junulara Domo en Kanda!» trovis teruran projekton de konspiro.

Ankaŭ la japanaj avangardaj studentoj agitas kaj en aŭtuno 1929, okazis multnombraj strikoj de studentoj kontraŭ la reakcia edukado. Tiuj ĉi strikoj okazis en gimnazioj kaj universitatoj en Hirosaki, Urawa, Macue, Himeĵi, Ŝizouka kaj Sendai. La studentoj havas fortikan organizon kaj strikas sub la gvidado de studentoj-komunistoj, kiuj ja agas tute mallegale de la lasta printempo. Lernantoj de mezgrada ler-

nejo en Hirosima estis arestitaj, pro ke ili studis socialismon kaj aliĝis sekretan socialisman organizon: ĉi tio okazis la 24-an de novembro. Ankaŭ la Kokugakiun Universitato ne estis escepto, kvankam ĝi estas lernejo de naciistoj Sinto-pastroj, ultranaciŝovinistoj kaj la plej sendanĝera de marksisma miasmo; 3 studentoj estis arestitaj en lasta decembro pro ilia vigla efektiva agado en kontakto kun maldekstraj unuiĝoj laborulaj.

Antimarksisma edukado:

Jam pasis tempo de Kant-anoj kaj Nov-Kant'anoj. En la katedroj de l'imperiaj universitatoj, nun la profesoroj lekcias pri germana-aŭstra skolo, pri fenomenologio kaj pri Hegel. Sur filozofiaj revuoj ankaŭ prosperas la studoj de Hegel kaj de fenomenologio. La registaro nun aktive klopodas malhelpi la kreskadon de la dialektika materialismo kaj akcelas la studojn de l'orientaj filozofio kaj moralo, per grandaj premio kaj subvencio. Kompreneble, sufiĉe multaj profesoroj okupiĝas en tia pseŭdostudado. Sed en la popolo, la revolucia tendenco neeviteble akiras potencon kaj la filozofiaj verkoj de Plehanof, Lenin, k. a. estas alte taksataj kaj donas pli kaj pli da influo.

La 27-an de novembro, kelkdekoj da reakciaj kaj liberaj profesoroj sub la aŭspicioj de la Ministrejo de Edukado planis eldonon de antimarksismaj literaturoj. Oni opinias, ke marksismo estas terure disvastigita inter la junaj gestudentoj. Do estus necese, unuflanke, plue forrabi liberon de la gestudentoj, kaj aliflanke, kontraŭbatali marksismon per la eldonado de libroj pri antikvaj historioj kaj etikoj!

La registaro subpremis ĉiujn provojn de proleta klerigo. Antaŭ ne longe, la polico malpermesis prezenti sur la scenejo la revolucieman teatraĵon «La ĝenerala linio» (pri ĉina revolucio) de K-do Murajama. Malgraŭ ĉio, proleta kulturo vigle desvastiĝas. Aperis proletaj kulturaj revuoj specialigitaj «Nova Kino», «Proleta Belarto», «Scienco Proleta» kaj «La Standardo» (Senki) ĝis nun proletara literatura gazeto, estas pli kaj pli vasta legata kaj pro tio, adaptiĝinte al vasta proletamasa postulo ĝi ricevas pli kaj pli la karakterojn de ĝenerala proletkleriga organo. La 2-a ekspozicio de Proleta Belarto okazis de la 1-a ĝis la 15-a de decembro ĉe Ueno Parko; ĉi-foje, ĝi okulfrape progresis nombre kaj kvalite kompare kun lasta jaro.

## Ĉe instruistaro:

Por efektivigi la deziron de la financ-kapitalistoj, kio estas reenkonduki la oran monstandardon en la japana ekonomio, la registaro proponis interalie malpliigi per 10% la buĝeton aranĝitan de l'antaŭa ministraro kaj malpliigi la salajrojn de la ŝtatoficistoj, sekve ankaŭ de l'instruistoj. Sed la ŝtatoficistoj vigle konstraŭstaris. La instruistoj kunvenis en la Eduka Asocio la 9-an de Novembro kaj decidis kontraŭbatali la planon de la registaro. Ili ne kaŝis sian malkontenton kaj nun estas naskiĝonta eduklaborista sindikato.

Ĉe la fondkunveno de l'Instituto por Scienco proleta okazis ankaŭ referato pri la nunaj problemoj de prolet-edukado starantaj antaŭ la eduklaboristaro. La jenaj demandoj estis pritraktitaj:

1 — Por klaseca edukado de la proletoj; 2 — Organiziĝo de l'Eduklaboristoj 3 — Esploro de l'edukmetodoj en estonta socialisma socio.

El tiuj ĉi celoj sekvas la jenaj esplortemoj, kiujn studos la pedagogia fako de l'Instituto de Scienco Proleta:

1 — Rilato inter edukado kaj socio; 2 — kritiko de ĝisnunaj pedagogioj;

3 — Edukpolitiko en ĉiuj landoj; 4 — Movado de eduklaboristoj en tutmondo, precipe de Eduklaborista Internacio; 5 — Laborista edukado en ĉiuj landoj; 6 — Pri ĉi tiuj supraj problemoj en Japanio; 7 — Eduka situacio en Sovetio; 8 — Proleta Pedagogio.

### Ĉe infanaro:

Klasbatalo ĉe kamparanaro laborista estas akra. Okazis eĉ de 26-a ĝis 28-a de Novembro tritaga batalo per pistoloj kaj dinamito kun la policistoj, kiuj volis aresti la gvidantojn de la «bienlaborista sindikato» Dum la vilaĝaj strikoj kamparanaj, naskiĝis dumstrikaj kamparanaj lernejoj kaj proletaj knabaj organizoj (pioniroj). Ekzemple, okaze de la kampara striko en Maeda, la kamparanaj geknaboj fondis pionirrondon, kiu decidis ne legi la burĝajn gazetojn krom «La Pionira Standardo», nia unika gazeto por proletaj infanoj.

La tre vigla pionira sekcio aperinta dum lasta decembro sub la Kamparana Sindikato en gubernio de Tokio havis, kun la junula sekcio, la semajnon de Karlo-Roza-Lenin de la 15-a de januaro, kiun oni komencis per ekskurso kaj parol-kunveno. Nun ili havas dimanĉlernejojn en ses vilaĝoj. La pionirrondo de Tojosato en la gubernio Mijagi unue fondita en Japanio, kiu estis supozita, kiel pereinta, rekomencis viglan agadon kune kun la reorganiziĝo de ties sindikato.

Esperanto-informoj de l'Instituto
por Scienco Proleta, en Tokio

---

## EL NOVZELANDO

### La instruado de legado

Ĉar la Kieva Pedologia Instituto esploras ĉi tiun temon, mi volas skribi pri ĝi. Mi klarigu kiel oni instruas en Nova Zelando.

Kutime oni uzas unu el du jenaj metodoj: la fonetikan aŭ la «rigardu kaj pensu». Mi traktos ilin aparte. Unue la fonetikan. Laŭ tiu ĉi metodo oni unue instruas al la infanoj la sonojn de la literoj. Por fari tion oni uzas rakonton. Ekzemple por instrui la sonon de «s», oni rakontas pri serpento, kiu siblas; por instrui «t» oni rakontas pri katidoj, kiuj kraĉas, ktp... Post la lernado de ekzemple ses konsonantoj, oni instruas vokalon kaj kunigas ĝin al la konsonantoj uzitaj:

sa ta pa fa ktp... kaj sa-t ta-p pa-t fa-t ktp...

Bedaŭrinde la angla lingvo ne estas tute fonetika! Estas do necese, ke samtempe, kiam oni instruas la fonetikojn, oni ankaŭ instruu ĉirkaŭe tridek vortojn nefonetikajn. Tion oni faras per diversaj metodoj. Ekzemple, oni uzas bildojn kaj la infanoj metas vorton sur la koncernan bildon. La vortoj tiel lernitaj estas uzataj en malgrandaj frazoj. Tuj kiam la literoj estas sufiĉe lernitaj, oni prezentas la unuan libron.

Laŭ la dua metodo, oni ne instruas la instruon de la literoj ĝis post la lernado de vortoj (anstataŭ samtempe kiel en la unua metodo). La aboco-libro enhavas multajn bildojn klarigantaj la legaĵon kaj ili estas tiel aranĝitaj, ke la infanoj povas rigardi ilin kaj ekkoni la vortojn. Poste oni instruas la sonojn de la literoj per studado de la komencantaj literoj. Oni elektas ses vortojn same komenciĝantajn kaj per akcentado atentigas la sonon de la komenca litero al la infanoj. Oni same faras la mezsonojn. Ekzemple: b o o t... t o o t... r o o t... s o o n...

Tiel, la infanoj ankaŭ lernas la fonetikon kaj la metodo estas efektive fonetika, kvankam ĝi ne enkondukiĝas per la fonetiko. En mia lernejo, mi uzas la unuan metodon, sed estus malfacile diri, kiu metodo estas la plej uzata.

C. LJ. Adcock, Drury, Auckland

---

### Studo de l' «evoluado» en novzelandaj lernejoj

Finfine ni legas en la «Syllabus of instructio for Public Schools» (Programo de Instruado por la ŝtataj lernejoj en Novzelando) jenan informon:

«... en la lastgradaj klasoj la gelernantoj devus akiri kelkajn definitivajn ideojn pri la principo de evoluado» (paĝo 42).

Tiu ĉi malkaŝa enkonduko de la evoluado en la ĉi tieaj ŝtataj lernejoj fariĝis sen multe da opozicio. Kelkaj leteroj aperis en pluraj gazetoj, el kiu unu almenaŭ signifoplene titolita «Evolutionism and Apeman-ism in Schools» (Evoluado kaj Simiismo en Lernejoj) estis represita kaj sendita al la parlamentanoj kaj al la religiaj kaj edukaj estraroj tra la lando.

De nun, niaj gelernantoj ne tiel facile ignoros la aron da faktaj, kiuj montras: 1. ke ni ĉiuj, homoj, bestoj, plantoj, estas anoj de la sama familio de la vivo, 2. ke tiu familio estas ĉiam evoluanta, kreskanta, ĉiam «sin kreanta» per siaj propraj «fortoj», 3 — ke fariĝas pli facile per la kompreno de ĉi tiuj esencaj fortoj gvidi la disvolvon de la evoluanta vivo.

Esperantaj informoj de gazeto novzelanda
«The Intarnational Sunbeam»

### Nia demandaro al ĉiuj

Ni petas samideanojn, ke ili informu nin per malmulte da vortoj pri la sekvantaj temoj:

a) En kia grado oni instruas esperanton en ilia lando, urbo, distrikto?
b) Kiel oni rigardas la malarmigon, evoluadon kaj religion ĉe ili?
c) Ĉu oni enkondukas novajn metodojn en la malliberejoj?
d) Ĉu oni provas memregad-eksperimentojn en la lernejoj?
e) Kiel oni instruas historion?
f) Kio estas la plej grava afero nuntempe en ilia lando?

Bonvolu respondi al: K — doj Bell kaj Page, redakcio de «The International Sunheam» — 134 Fritzgerald str. — St Albans — Christechurch — New-Zealand.

---

## EL NEDERLANDO

### Pri «unueca» lernejo en Nederlando

En la sfero de l'instruado, la klasbatalo ankoraŭ ja ne penetris por klarigi al la holandaj popolamasoj la hipokritecon de iuj lernejaj reformoj. Post longa «lerneja batalo», la instrusistemo preskaŭ tute konformas al la realaj sociaj cirkonstancoj.

Post la milito, estis kelkaj reformoj, kiuj montris la postmilitan plifortigon de la laborista klaso. Nun, ili sinsekve ekmalaperas aŭ estas senefikigitaj.

La ĉefa el tiuj reformoj estas la «unueca» lernejo. Ĝi signifas, ke ĉiuj ŝtataj lernejoj estos egalaj. Antaŭe estis 4 gradoj de lernejoj kun diversaj lernokotizoj. Poste ĉiu pagos lernkotizon laŭ la imposto. Tiel estas nun la sistemo de la ŝtataj lernejoj. Sed estas du malefikigantaj faktoroj:

La unua estas, ke ĉiu devas sendi siajn infanojn al la lernejo en sia propra lernejdistrikto. Ĉar la lernejdistriktoj nature sociklase diferencas, ankaŭ la lernejo estas tia. La dua estas, ke ĉiu povas sendi siajn infanojn al ne-ŝtata lernajo, aŭ konfesia aŭ neŭtrala. Kaj tiujn ne trafas la leĝo pri la unueca lernejo.

Do la efikoj de la leĝo, kvankam ne nulaj, estas ne grandaj. Kvankam ni devas akcepti tiajn leĝojn, ili ne povas ŝanĝi, ke malunueco en lernejo kiel en vivo estas la baza trajto de kapitalisma sistemo.

J. Mannoury

---

## EL SOVETIO

### Vespera Pedagogia Universitato

Ĉe Akademio de Kom. Edukado en jaro 1927 estis organizita vespera pedagogia universitato. La ĉefa tasko de ĉi tiu institucio estas plialtigi kvalifikon de Moskva geinstruistaro. En Universitato estas dujara kurso por instruado, entenanta tri horojn povespere, trifoje en ĉiu semajno. Ekzistas jenaj fakoj:

1. por geinstruistoj de unuagradaj lernejoj;

2. por geinstruistoj de duagradaj lernejoj;

kiu dispartiĝas laŭ jenaj fakoj: a) fiziko kaj matematiko; b) biologio; c) literaturo; ĉ) sociscienco.

3. pedagogia fako.

La fundamenta instrumetodo estas la lekcio, ĉar geinstruistoj ne havas multe da tempo. Sed studado pri fiziko, kemio, biologio, fiziologio okazas en kabinetoj laŭ laboratoria metodo. Unua ellaso de geinstruistoj, kiuj sukcese finis la instruadon, okazis en printempo 1929. La sperto de kreado de Universitato estas utiligita, kaj en diversaj urboj de USSR ankaŭ estis organizitaj vesperaj universitatoj. En Moskva Vespera Universitato deziras lerni tre multaj geinstruistoj, sed lernas

nur 670 ĉar mankas monrimedoj kaj estas malgranda ejo. Ĉirkaŭe 1.000 personojn malakceptis la Universitato pro tiu kaŭzo.

Ni tre deziras scii: Kiaj formoj de plialtigo de kvalifikado ekzistas en la diversaj landoj por geinstruistoj?

Jakobson,
Vespera Pedagogia Universitato,
B. Trubeckoj 16, Moskvo 21, USSR.

---

## La Internacia Kunveno de Kiev'aj Pedagogoj

(Letero el Kiev)

Antaŭ nelonge en la Kiev'a Pola Klubo je la nomo de K-do Krulikovski okazis la unua granda internacia kunveno de kleriglaborantoj. Grandamase kolektiĝis diversnaciaj gekolegoj, ukrainoj, rusoj, poloj, hebreoj, germanoj, ĉeĥoj. La sama ideo unuigis ilin. Tiun ĉi ideon akcentis ĉiuj parolintoj en diversaj lingvoj, kaj kiam fine eksonis la esperantlingva parolado de Kiev'a instruisto-esperantisto K-do D. Viktorov-Ĉeĥoviĉ, ĉiuj estis ege surprizitaj, preskaŭ plene komprenante la esp. paroladon! La internacian karakteron de la diversnacia kunveno bone kronis belaj sonoj de esperanto.

«Ni, Kiev'aj kleriglaborantoj de diversaj nacioj, kunvenintaj al unua internacia vespero kun celo de reciproka kuniĝo inter diversnaciaj gekolegoj, sendas flaman fratsaluton al niaj eksterlandaj kamaradoj-gekolegoj, kiuj agas sub standardo de la revolucia ruĝa Internacio de Edukistoj. Ni kredas, ke baldaŭ venos la tempo kiam falos la limoj kaj ni senpere ligiĝos kun vi, niaj karaj eksterlandaj fratoj-kolegoj.

Vivu internacia solidareco de kleriglaborantoj en la tuta mondo!

Vivu revolucia ruĝa Edukintern!»

Tiun ĉi rezolucion unuanime akceptis la kunveno, kaj komisiis reprezentanton de esp. instruistoj, K-don Viktorov-Ĉeĥoviĉ traduki ĝin esperanten kaj sendi al Ekzekutivo de Edukintern.

La vespero estis finita per la bele aranĝita koncerto. La programo estis diverslingva, kaj denove eksonis ankaŭ esperantaj vortoj. Tre forte impresis «Tri Testamentoj» — de la fama popola ukrainia poeto Taras Ŝevĉenko, de nia Majstro, kaj tiu de Lenin.

La unua internacia vespero de Kiev'aj pedagogoj havis tian grandan sukceson, ke oni decidis ripeti pli ofte similajn kunvenojn. Aparte ni esp-istoj, almilitis certan grupon da novaj adeptoj. En Kiev'a Centra Domo de Klerigo kreiĝis nova esp. rondo el pedagogoj. Gvidas K-do Viktorov-Ĉeĥoviĉ. En kelkaj laborlernejoj komencis laboron esp. rondetoj. Esperanto progresas ĉe ni.

---

**Rubrikestroj, kunlaborantoj, sendu senpere al nia redaktoro viajn artikolojn (nur por TEPŜ al gia rubrikestro).**

## Internacia edukado en nia lernejo

La demando pri internacia edukado ne estas malnova en nia lernejo, sed nur lastatempe ĝi estas la plej serioze starigata. Eĉ hodiaŭ oni povas renkonti ŝovinismajn okazojn, kvankam tre malofte. Kiel do ĉe nia lernejo tiu demando estas efektivigata?

Nia pionirmovado nur lastatempe ĝuste transiris al tiu demando. Nenio pli bone taŭgas ol memstara internacia korespondado. Bonvolu aŭskulti pri tiu afero. Kelkfoje mi diris al pionirgvidanto, ke necesas interligi niajn infanojn kun alilandaj, sed li ne tro multe atentis ĉi tiun aferon. Mi ŝanĝis la taktikon, donante al li kaj al aliaj geinfanoj miajn internaciajn ilustritajn korespondaĵojn. La infanaro ekinteresiĝis kaj petis, ke mi helpu interkorespondi por memstare kompreni kaj tralegi skribaĵon de alilanduloj. Mi tradukis en esperanto kelkajn de ili skribitajn poŝtkartojn kaj dissendis ilin ĉiulanden. Iufoje ni ricevis respondon kaj ili montris nepriskribeblan ĝojon petegante, ke mi traduku kaj respondu senprokraste.

Nun nia pionirgvidanto atentis kaj organizis ĉe nia pionirklubo brigadon por internacia korespondado kaj nun eĉ ekfunkciis esperanta rondeto kaj brigado por tio.

K l i m e n k o

## Socia laboro en nia lernejo

Unu el la plej gravaj taskoj de nia lernejo estas partopreno de nia lernantaro en la «kolektivigado» de nia loĝantaro, t. e. ĉefe de niaj kampolaboristoj kaj kampokulturistoj. En nia vilaĝo nun okazas plena rekonstruado de nia agrikulturo kaj partopreno de niaj gelernantoj konsistas en tio, ke ili alportas al la loĝantaro la diversajn sciigojn por kunvenoj, ktp... Okaze de nia printempa semkampanio, nia lernejo devas partopreni en la sempuriga kampanio. Por kolektado de mono estas preparataj spektakloj kaj listoj de mondonacoj. Ne estas lasta la lernejo ankaŭ en likvido de la analfabeteco. Nia lernejo, kiel entreprenoj kaj fabrikoj, komencis konkuradi. Preskaŭ ĉiuj lernejoj estas entiritaj en soci-konkurado.

K l i m e n k o

## Rondet-laboro en nia lernejo

Por doni al la lernantaro eblon plivastigi sian scion kaj intereson por ŝatataj de ili fakoj, ĉe nia lernejo funkcias jenaj rondetoj: literatura, drama, naturscienca, muzika, kanta, rondeto por defendo de birdoj kaj bestoj, rondeto de rapida helpo (flego). Kvankam la lerneja tempo estas tro superŝarĝita, la rondetoj plejparte funkcias inter la pioniroj kaj organizitaj lernantoj. Nia peto al ĉiulandaj kolegoj estas, ke ili bonvolu kunligi siajn lernantojn kun la niaj kaj ili skribu laŭ jena adreso: USSR. Trostjanec, Sums. okrug. — 7-a ŝkola im. Ŝevĉenko, al K-do Klimenko.

 Presèjo «Internacia» de Moskva Trusto «Mospoligraf»

# NOVA PEDAGOGIO

## LABORISTKLASA EDUKADO

**La sekvanta artikolo estas eltiraĵo el la nova broŝuro lastatempe eldonita de la «Industriaj Laboristoj de la Mondo» en Ĉikago. La aŭtoro, C. B. Ellis, estas redaktoro de «The Industrial Worker» en Seattle. Li skribas pri Edukado. Post klarigo pri burĝa edukado sekvas la parto, kiun mi tradukas por la legantoj de «Sennacieca Pedagogia Revuo».**

**La tradukinto.**

Laborista edukado estas, necese, edukado je klaskonscio. Estas tia ĉar la ekonomia strukturo, en kiu ili naskiĝas kaj sen adapto al kiu ili ne povas vivi, estas posedanta kaj kontrolata de aparta klaso— la kapitalista klaso. Se la vero estas instruata al la laborista klaso, ĝi devas montri al ili la karakteron de tiu funkcio,kiun ili plenumas en la ekonomia strukturo. Ĝi devas montri al ili, kiel la ekonomia strukturo funkcias ĉe ĉiuj ĝiaj partoj. Ĝi devas analizi la funkciadon de la senkompata maŝino kaj redukti al ĝusta mezuro la profitojn kiujn ili, kiel vendantoj de laborpovo—ilia neevitebla sorto—ricevas. Se ĝi ne montras tion ĝi ne edukas tute. Ĝi misedukas kaj trompas. Ĝi kreas falsan koncepton pri la mondo kaj pri sociaj interrilatoj. Ĝi preparas ilin por senhelpa ekspluatado kaj viktimigado. Se oni instruas la faktojn pri socio al la laboristo, li neeviteble fariĝas klaskonscia.

La neceso je klasedukado estas trudata al la laborista klaso de la faktoj de industrio. Tiu klopodado al la vivo—la volo vivi—kiu estas enestanta en ĉiu vivanta ĉelo de la vivo, faras necese eduki la laboristojn je aferoj, kiuj estas difektaj al ilia sano, malprofitaj al iliaj vivoj kaj malhelpivaj al iliaj ŝancoj vivi. La kapitalista sistemo aŭ iu ajn sistemo, ĉe kiu unu klaso vivas je la kosto kaj de la intenca ekspluatado de alia klaso, estas kontraŭ la vivŝancojn de la laboristoj. Ili vivadas je hazardo pro la trudo de kontraŭaj laborad- kaj vivad-kondiĉoj. Ilia nesufiĉa parto en la socia dividado de la riĉaĵo produktita de ilia laboro, estas nesufiĉa por subteni la vivon. La hazardo de ekzisto estas pligrandigata de ilia funkcio en la ekonomia strukturo kiel laboristoj, dum tiu de la posedanta klaso estas reduktata je la kosto de la gelaboristoj. La vivasekura kaj sana statistikoj pruvas tion esti fakto — realo. Malatenti instruon pri tiaj gravaj faktoj estas miseduki. Kaj ne atribui la faktojn cititajn al ilia kaŭzo—klasa sistemo en la socio—estas mensogi per la subpremo al la vero. Pro tio klaskonscia edukado estas necesa.

Klasaj sistemoj ne estas eternaj. Ili estas okazaĵoj en la historio de la homa familio. La klasa divido militas kontraŭ la biologiaj fortoj, kiuj formas la vivadon de la homa raso. Pro tio ĉiuj klassistemoj en la socio laste estis renversitaj de revolucio. Pro tio la kresko de la ekonomia strukturo, kiu estas apartaĵo de la raso mem, ĉiam montris

tendencon larĝigi la amplekson de la reganta klaso kaj enteni ĉiam grandiĝantan nombron de la raso. Moderna historio estas kompare nelonga apud la biologiaj epokoj. Estas periodo el kelkaj miloj da jaroj kontraste al la milionoj da jaroj, dum kiuj la raso disvolviĝadis el la unuaj homsimilaĵoj. Ĝi eliras ĉe ĝia komenco el etapo de prakomunismo, en kiu la individuo estis ĉefa. Ĝi komencas konstrui socian ekonomian strukturon. Ĝi gajnas sekurecon de ekzisto per oferado de individua libero. Sed ĉiam dum la kompare mallonga tempo, en kiu la ekonomia strukturo estis en procezo de evoluado, la biologiaj fortoj militadis kontraŭ la klasaj formoj. Revolucio post revolucio larĝigis la regant-klasajn limojn kaj enlasis pligrandiĝantan nombron el la raso al ŝanco. La sklavposedantaj patricioj cedis al pli multnombra klaso — la feŭda nobelaro; la feŭda nobelaro siavice estis renversita de pli multnombra klaso — la burĝaro; la kreskanta nombro de la proletaro batalinvitas la burĝaron por la kontrolo de la ekonomia strukturo kaj la klaslimoj havas tendencon larĝiĝi kaj malaperi en la fina senklasa socio, en kiu la laboristaro estos la sola klaso, entenanta la tutan homfamilion, kun posedeco kaj kontrolo super la vivrimedoj en la manoj de la kolektivo. Tio ĉi estas la fina solvo de sociaj problemoj — industria demokratio.

## La Pasado de Klas-sistemoj

La neceso, kiu kaŭzis klasojn en la socio, estas pasinta. La socia ekonomia strukturo estas sufiĉe kompleta. Ĝia kapablo produkti riĉaĵon pligrandiĝis ĝis punkto, kie ĝi estas sufiĉega provizi nutraĵon por ĉiuj, kiuj volas labori. La homamasoj estas disciplinitaj uzi la socian maŝinaron socie sendevige. La solaj senordegaĵoj estas la reganta klaso kaj ĝia parazita ekzisto. La produktado estas sociigita. Nur restas sociigi la kontrolon de la ekonomia strukturo kaj elimini la ekspluatadon.

Laborista edukado ampleksas tiun ĉi skizon. Ĝia celo estas instrui la faktojn de industrio anstataŭ la sklavmoro de la burĝaj lernejoj. Ĝia teknika edukado estas por disvolvi teknikon por la kunordigo de la produktivaj fortoj en la produktado por uzo kaj ne por subteno de malutila klaso el kapitalistaj parazitoj. Ĝi estas por doni al edukado gravan, vivantan, bezonatan ion, kio faras al homvivo anstataŭ al subpremo. Estas por disvolvi la spiriton de libero k demokratio, sen kio la raso ne povas progresi.

La I. W. W. estas okupata pri tiu ĉi tasko, ĉar tio estas unu el la necesaj funkcioj en laborist-klasa progreso. Ĝi estas la lumportanto de moderna demokratio — industria demokratio. Ĝi estas, kiel ĉiu progresema forto en socio, kontraŭstarata de la klasantagonismoj de eluzita sistemo de regantklasa edukado je «socia kontrolo». Ĝi estas dediĉita al realismo k scienca vero. Ĝi estas kontraŭ klasaj fikcioj k iluzioj. Ĝi estas pure materia. Ĝia celo estas senigi al la socia strukturo ĉiujn tiajn tradiciajn mitojn k montri ĝian strukturon k funkciadon. Ĝi volas ekzerci la laborist-klasan menson k manon al la libero el sub regant-klasa kontrolo k ekspluatado — ebligi la laboristaron mastri

k kontroli la mondon je la intereso de la homaro. Ĝi estas por ebligi al ili «konstrui la strukturon de la nova socio en la ŝelo de la malnova».

Por plenumi tion ĝi edukas per la rimedoj ĉemanaj — per siaj gazetoj, broŝuroj, paroladoj, k per sia unua starigita kolegio, la Kolegio de la Gelaboristoj en Duluth, Minn. (Angle: Work Peoples College). Sed ankoraŭ pli potenca estas la edukado, farata ĉe la punkto de produktado, ĉe la laborejo. Ĝi klarigas la fenomenojn de la klasbatalo, kiam ili aperas en la formo de strikoj k lokaŭtoj. Ĝi serĉas iliajn originojn. Ĝi instruas la laboristojn pri la naturo de organizado k ĝia celo. Ĝi montras al ili kiel adapti la organizon al la ŝanĝiĝanta ekonomia strukturo por meti povon en manojn laboristajn. Ĝi disvolvas la instituciojn por laborist-klasa kontrolo de la mondo per siaj laborejaj komitatoj, distriktaj konsilantaroj, ordinaraj kunvenoj, referendumoj k konferencoj. Ĝi klopodas realan kunordigon de laborist-klasaj fortoj en la batalo al povo. Ĝi estas plastika, etendiĝema, libera, demokratia, progresema. Ĝi estas la antaŭgvardio de tiu leviĝanta proletaro, kiu prepariĝas por preni la rimedojn de produktado k distribuado je la intereso de la homa raso k elpeli ekspluatadon k sklavecon mensan k korpan por ĉiam el la homa scenejo.

Tradukis SAT-ano 1781

---

## LA PORINFANA TEATRO EN DNEPROPETROVSK

Neceso de porinfana teatro aperis antaŭ 5 jaroj. Ni tiam legis multon en la gazetaro pri ĉi afero. La fundamentaj postuloj por tia teatro estis: «ĝi kuru antaŭen al postuloj kaj interesoj de l'infanoj, vigligu la infanojn por estonta batalo en socialisma konstruado, entiru ilin al vigla laboro por plenumo de leninaj testamentoj, konduku ilin sur hela vojo de nova vivo».

Post kelkaj monatoj de insista laboro, la teatro estis inaŭgurita kaj vigle funkciis: ĉiu infano povis ĉeesti reprezentaĵon por 10—15 kopekoj. La teatro ludis 3 scenaĵojn 50-foje, ĝin vizitis 46 000 infanoj. Sed la monmanko rompis la junan floron, ĝi mortis kaj ĉi tiu fakto tre ĉagrenis la gepatrojn kaj la gvidantojn. Kun helpo de la ukrainia popolkleriga Komisario kaj distrikta komitato de Komjunularo, ĝi reekfunkciis en 1929. Post la dua komenco, la teatro kreskis kaj fortiĝis. La 15-an de aprilo ĉi-jare ĝi festis sian 3-jaran jubileon. Granda festo por nia grandurbo metalurgia (300.000 loĝantoj). Post sia reekfunkcio, la teatro ludis 10 teatraĵojn 500-foje, por 200 000 rigardantoj. Ĉiuj vizitadoj, organizitaj de pioniroj kaj lernejoj, estas nur kolektivaj. Post la scenaĵo estas kinofilmoj kaj konversacioj pri la ludprezento scena, kaj la infanoj aktive partoprenas en la interparoladoj. La multnombran vizitadon oni ŝuldas al malmultekosto de la bileto (nur 5 kopekoj) kaj al bona teatra laboro teknika kaj socia.

La ludprezento okazas sen sufloristo. La teatro havas specialan pentriston; por ĉiu nova teatraĵo oni faras novajn dekoraĵojn, kostumojn. La teatro havas specialan orkestron el 10 personoj.

## EKSPOZICIO DE PEDAGOGIAJ HELPILOJ EN PRAHA

En la monato februaro 1930 aranĝis Supera Pedagogia Lernejo en Praha ekspozicion de pedagogiaj helpiloj kune kun aŭtodidaktika materialo kaj modernaj ludiloj. Tiu ĉi interesega ekspozico estis solene malfermita sabate la 15-an de februaro en artindustria muzeo en Praha.

La malfermon partoprenis 140 reprezentantoj de diversaj organizoj, oficoj, redakcioj ktp. El la ministerio de popolklerigo venis d-ro R. Müler kaj arĥitekturisto d-ro Klimeŝ. Plue ĉeestis la landa lernejinspektoro Zeman; inspektoro Vydra el Bratislava, docento d-ro V. Prihoda k. a. La artindustrian muzeon estis reprezentanta d-ro Herain.

Novaj metodoj en instruado ĉiam postulis ankaŭ aliajn instruhelpilojn. Apenaŭ ĉi tiuj metodoj komencis enpenetri en la praktikon, ĉiam aperis pedagogoj, kiuj estis al si plifaciligantaj la lernejlaboron per iaj «pedagogiaj eltrovaĵoj». La devizoj «instruadi per la ludo» kaj «memlernadon en la lernejon» havis por la edukado kaj instruado grandan sitgnifon. Tion klare pruvis la menciita ekspozicio.

Al la infanludo oni donis novan sencon. Oni eluzis ĝin plej multe ĵus en tiu infanaĝo, en kiu ĝi estas unusola metodo, kiu samtempe edukas kaj instruas. Ĝi edukas: alkutimigas la infanon al laboro, al pacienco kaj persisteco, al la ĝojo el la propraj sukcesoj, al kamaradeco, se la ludo estas kolektiva ktp. Ĝi instruas: laŭ la ekspoziciitaj helpiloj estas eble instruadi ĉiujn infanojn. Malgrandaj infanoj lernas ekkoni diversan materialon laŭ la glateco, malglateco aŭ laŭ ĝia formo, ili lernas koni la kolorojn, grandecon kaj pezon de diversaj objektoj; la infanoj ilin envicigas, kunmetas, ordigas, grupigas kaj kalkulas.

Por infanĝardenoj estis en la ekspozicio diverskoloraj globetoj kaj pladetoj. La infano devas amasigi ĉiujn bluajn globetojn en la bluan pladeton, ĉiujn globetojn flavajn en la pladeton flavan. Ĝi devas envicigi la bastonetojn laŭ la koloro kaj laŭ la grandeco. Ĝi devas grupigi la pezilojn laŭ la pezo, enmetadi diversformajn prismetojn en la konformajn truojn, surpendigi la globetojn kun ŝnuretoj sur la hoketojn, kombinadi el diversaj partoj de kolorigitaj kartonoj belajn figuraĵojn, enmetadi malgrandajn skatoletojn en la pligrandajn, klasifiki diversajn tukpecetojn, kubetojn, ringetojn kaj najlojn.

Por la popola lernejo estis ĉi tie ankaŭ interesegaj helpiloj. Multaj instruhelpiloj estis precipe por la kalkulado: kalkuliloj kun buletoj, pupoj, stangetoj, multiplikaj tabeloj el papero kaj ligno. Estis tie la helpiloj por elementa legado kaj kunmeteblaj alfabetoj. Precipe eksperimentaj lernejoj estis ekspoziciantaj novajn objektojn. Ili havis ĉi tie ankaŭ provlaborojn kaj lecionojn, el kiuj estis klarvideble, kiamaniere la lernantoj lernas sen instruisto. Estis tie ĉi lecionoj, instrukcioj por la eksperimentoj, la manlaboroj de lernantoj, faritaj aparatoj: lokomotivoj, aŭtomobiloj, flugmaŝinoj, dometoj, ŝipoj, dotaĵoj por la pupoj, konstrumaterialo ktp. Oni vidis ĉi tie ankaŭ tutan laboratorion kun elektraj aparatoj, gramofonojn por lerni fremdajn lingvojn kaj bone konatajn ludilojn de direktoro Bakule.

La ekspozicion partoprenis ankaŭ la fremdlando. La urbo Vieno alsendis precipe la helpilojn por la lerneja memlernado, Charles Chatelain el Genève ekspoziciis materialon por la nova historia instruado kaj Pedagogia instituto en Leipzig sciencajn ludilojn. Troviĝis tie ankaŭ fame konataj ludiloj el Waldorf kaj aŭtodidaktika materialo kun ludiloj el Instituto J. J. Rousseau en Genève.

En la ekspozicio estis ankaŭ la fako kun porinfana literaturo. En ĝi estis la verkoj de Thampson-Seton, Fleuron, Korensky, libroj eldonitaj de la ĉekoslovaka ruĝa kruco, kelkaj verkoj de London, Storch, Dolensky k. a.

Tuta ekspozicio estis propre ekspozicio de instruistaj eltrovintoj, kiuj ofte kelkajn jarojn energie estis laborantaj por almenaŭ iomete plifaciligi kaj komprenigi la instruadon, por helpi la infanojn kaj instruistojn de ĉiuj popoloj kaj ŝtatoj. Ili fervore klopodis disvastigi la klerigon, kiu kondukos al la plialtigo de kulturo de la tuta homaro. Ofte unusola instruhelpilo kapablas helpi al centmiloj da instruistoj kaj al milionoj da lernantoj. Tiukaŭze la instruistojn, kiuj estas preparantaj novajn pedagogiajn helpilojn kaj serĉas novajn vojojn, oni devas energie subteni en ilia laboro, por ke ili povu en trankvilo serĉi kaj kun ĝojo krei.

A. Valoušek, Brno 12, Tyršova 19

## LA 1-a KONFERENCO DE MOSKVAJ PEDAGOGOJ-ESPERANTISTOJ

La 4-an de marto 1930, laŭ iniciato de Centra Komitato de la Sindikato de eduklaborantoj, okazis konferenco de l'reprezentantoj de moskvaj pedagogoj-esperantistoj. La konferenco pridiskutis diversajn problemojn de organiza kaj eldona karaktero. Estis organizita la grupo de eduklaborantoj-esperantistoj, kiu zorgos pri realigo de ĉiuj decidoj de la konferenco.

Speciale estis diskutata demando pri internacia korespondado de sovetaj geinstruistoj kun alilandaj eduklaboristoj. La konferenco decidis alvoki ĉiujn alilandajn pedagogojn al la plej vigla interligo kun sovetaj geinstruistoj kaj precipe kun la sovetaj eduklaborantoj-esperantistoj kaj kun la redakcio de «Soveta Pedagogia Biblioteko», kiu estas eldonata de la Sindikato de eduklaborantoj (Moskvo, Dvoréc Trudá, Solanka 12, kómnata 558. Redakcio de «Soveta Pedagogia Biblioteko»).

Laŭ ĉi tiu adreso alilandaj eduklaborantoj estas petataj sendi diversajn materialojn pri pedagogiaj temoj, pri instruista sindikata movado, pri instruistaj vivkondiĉoj, pri organizo de kleriglaboro, militinstruado, religio kc. Ĉiuj materialoj estos utiligataj por soveta pedagogia kaj instruista gazetaro. Per la sama adreso alilandaj pedagogoj povos interrilati kun sovetiaj geinstruistoj por reciproka profesia informado, por reciproka interligo de edukata gejunularo ktp.



K-do E. Drezen (unua de maldekstre) raportas ĉe la konferenco

Samtempe la 1-a konferenco de l'eduklaborantoj alvokas ĉiujn pedagogojn vaste diskonigi en instruistaj medioj «Sovetan Pedagogian Bibliotekon», traduki ĝiajn materialojn en naciajn lingvojn kaj presigi en siaj naciaj pedagogiaj kaj instruistaj organoj.

# SUR EDUKISTA ★★★ ★★★ BATALFRONTO

## KIEL REALIĜAS DEVIGA INSTRUADO EN LITOVIO

Al ĉiuj alirebla, senpaga kaj deviga elementa instruado—jen la kulturtaskoj de ĉiuj civilizitaj ŝtatoj de la mondo.

Ankaŭ en Litovio ekde 1929 j. la deviga instruado estas realigata. Sed por realigo de tiu granda paŝo, estas necesaj:

1. konvena kontigento de kvalifikitaj instruistoj;
2. sufiĉa reto da bonaj lernejoj kun necesa instruilaro;
3. bona prizorgado de malriĉaj infanoj, ke ili povu konstante vizitadi la lernejon;
4. bona registrado de l' infanoj lernejaĝaj.

Ĉu tiuj nepraj kondiĉoj de la deviga instruado estas en Litovio? Ne! Mankas bonaj lernejoj—entute malsufiĉas la estantaj lernejoj; mankas instruistoj; la malriĉaj infanoj ne estas prizorgataj.

En Litovio oni komencis realigi la tutan planon per cirkuleroj. En unu de tiuj cirkuleroj oni deklaris, ke 7—8 jaraj infanoj vizitados la lernejon de 1. majo ĝis 1. julio kaj de 1. septembro ĝis 1. novembro, — kaj ĉiuj aliaj — de 1. novembro ĝis 1. majo.

Tiel ordiginte ĉion, aspektis, ke sufiĉos da lernejoj kaj instruistoj. Oni pravigas tion, ke oni tiel faris nur pro tio, ke vilaĝaj infanoj estas somere ĉe laboro kaj ne povas vizitadi la lernejon, do frue en printempo kaj aŭtuno la lernejon vizitados nur pli malgrandaj, kiuj ne estas multe okupitaj, — kaj nur poste ĉiuj aliaj.

Sed ĉu tio estas bone? Ne. Ĉar estas tre maloportune instrui 7—8 jarajn infanojn, kiam ili vizitadas la lernejon nur 4 monatojn kaj ankaŭ tiujn kun 6 monata interrompo; ne pli bonajn rezultojn oni ricevas instruante aliajn infanojn, se ili nur vizitados 6 monatojn.

Pri tio ni ne trovas ion en la cirkuleroj!

Nur la ĝistempa ĉefurbo — Kaunas — estas privilegiita. Ĉi tie la lernejjaro ne estas mallongigita. Sed kiam oni anoncis la devigan instruadon kaj komencis la instrulaboron, ekestis kuriozo: en iuj lernejoj ekmankis la infanoj!

Iuj ĝojas, ke tio estas bona, kaj ne plu estas necesaj novaj lernejoj. Sed pli ekrigardante, ni tuj vidos, ke la stratinfanoj vagadas en la «tolkuĉkoj», kiel iam; ke la hebreoj instruadas siajn infanojn en «ĥedero» kiel antaŭe; ke iom pli riĉaj gepatroj dungas la repetitorojn (guvernistojn?) kaj instruigas siajn infanojn hejme.

Kaj vere: kion signifas la leĝo de la deviga instruado kaj la minaco per la § 138 de la Pun-Kodo, — se la infanoj malhavas botetojn, vestojn..., se por la aktiva lernejlaboro ili malhavas sufiĉan nutradon?!

Ankaŭ la pli riĉaj gepatroj, vidante, ke la plimulto da lernejoj en Kaŭnas ne estas konvenaj eĉ al minimumaj pedagogiaj postuloj koncerne la aeron, purecon kaj varmecon — kaj pro tio detruas la sanon de iliaj infanoj-, ektimas kaj ne irigas siajn infanojn al lernejo, sed lernigas ilin hejme.

Tiel same estas ankaŭ en aliaj urboj. En la vilaĝoj estas ankoraŭ pli malbone. Mankas bonaj lernejloĝejoj, multaj malriĉaj infanoj ne estas prizorgataj. En kelkaj distriktoj (Trakai...) preskaŭ ĉiuj infanoj estas de mizere vivantaj familioj. Ankaŭ tiuj gepatroj kiuj ne irigas la infanojn en la lernejon, ne estas punataj, ĉar la punprocedo (laŭ cirkulero) estas tre longa; cetere estas ja ĉiam tiel, ke kiam la lernejgvidanto admonas la gepatrojn pri la puno, tiam ili sendas siajn infanojn al la lernejo. Sed post kelkaj tagoj la infanoj denove ne vizitadas la lernejon.

Ankaŭ la komunumoj tre malakurate registras la lernejaĝajn infanojn. Entute la komunumoj tre malvolonte, tute malkonscie, realigas la cirkuleron pri la deviga instruado.

Sed oni esperas, ke venkinte ĉiujn malhelpojn, la deviga instruado estos enkondukita en la tuta lando. Ni vidos.

«N.C.»

---

## CENTOJ DA LITOVAJ GEINSTRUISTOJ MALDUNGITAJ AŬ TRANSLOKITAJ, KIEL «PUPOJ»

La instruistojn, kiuj ne ankoraŭ havis leĝdifinitan «cenzon», oni jam estis komencintaj likvidi antaŭ 3—4 jaroj. Sed ĉi-jare oni maldungis proksimume 300 personojn.

Ni ne forgesu ankaŭ mencii, ke multaj instruistoj, kiuj estis finintaj la seminarion antaŭ la Granda Milito, nun devis akiri novan ateston pri la scipovo de litova lingvo kaj ĝia literaturo.

Ne parolante pri la maldungitaj geinstruistoj, ni ankaŭ mencios, ke antaŭ la nova lernejjaro multaj geinstruistoj estis ne propravole ŝanĝlokitaj el unuj lernejoj en aliajn. Nur el la urbo Kaŭnas oni translokis proksimume 60 personojn, inter kiuj troviĝis multaj bonaj, kun dekjara praktiko, geinstruistoj, kiuj estis oficintaj en la lernejoj de Kaŭnas jam ekde la fondo de tiuj lernejoj en sendependa Litovio. Anstataŭ ili oni oficigis junajn genstruistojn, kiuj ne ankoraŭ estis praktikintaj instrulaboron.

Tia ŝanĝlokigo kaŭzas al la instruistoj grandan materialan kaj moralan malprofiton kaj por la kleriglaboro estas direktiga. Meznombre, al unu instruisto la translokiĝo kostis 150-200 lidojn, nur por la 60 Kaŭnaj geinstruistoj la translokiĝo kostis 14.000 lidojn, ne kalkulante aliajn malprofitaĵojn.

Tia ciganvivo tre misefikas por la instru - laboro de geinstruistoj. Ĉar antaŭ ol la instruisto ordigas ĉion, konatiĝas kun novaj loko kaj homoj, pasas la jaro kaj pro tio multe estas ĝenata la instruado mem. Ofte ankaŭ okazas, ke la instruisto denove estas lokata en alian lernejon.

La instruistoj entute estas emaj al sia laboro kaj deziras pli perfektiĝi. Tion pruvas la fakto, ke instruistoj multe vizitadas diversajn nedevigajn somerkursojn. Jen ĉi-jaraj faktoj: pedagogian laborkurson en Telŝiai vizitadis 80 pers., en Alytus — 58; Gimnastik- kaj sport-kurson en Kaŭnas — 99 pers., en Panevézys — 150, en Palanga (por mezlernejoj kaj gimnazioj — 70 pers., Terkultur-kurson en Kaŭnas kaj Dotnuva — 98 pers.; kurson de litova lingvo kaj ĝia literaturo en Ukmergé — 70 pers.; entute kursojn vizitadis 625 personoj. Pro manko da loko ne ĉiuj povis esti akceptataj.

Sed kiam la instruistoj vidos, ke ili estas ĉiujare ŝanĝlokataj, ili certe ne plu vizitados iajn ajn kursojn kaj al ĉio fariĝos indeferentaj.

Multaj geinstruistoj estis kontraŭ sia volo ŝanĝlokitaj. Ankaŭ multaj geinstruistoj estis tute maldungitaj. Pasintjare oni likvidis 14 mezlernejojn kaj pro tio ankaŭ instruistojn de ili maldungis aŭ parte donis al ili oficon en elementaj lernejoj.

Ĉu tiu amasa maldungo de popolinstruistoj estas pravigebla de malmultiĝo de lernantoj? Ne! La nombro de elementaj lernejoj kreskis de 2401 pasintjare ĝis 2431 (plimultiĝis per 30); la nombro de instruistoj de 3604 kreskis ĝis 3678 pers. (plimultiĝis per 214). La nombro de la lernantoj kreskis de 153.699 ĝis 171.313 (do plimultiĝis per 46.735).

La plimultiĝon de la lernantoj oni povas klarigi per tio, ke oni enkondukis la devigan instruadon, kaj ankaŭ pro tio, ke jam pasis la tempo de la depost milita malmultiĝo de la familioj.

Finante ni ne volas preterlasi diri tion, ke la instruistaro en Litovio atendas pli bonan, pli liberan tempon, kiam ili povos esti pli sendependaj, ne estos translokataj kiel pupoj, kiam ili havos pli bonajn, pli kulturajn lernejojn kaj loĝejojn ktp., ktp.

Por ke tio efektiviĝu, la instruistaro nepre devas pli bone organiziĝi kaj... batali, batali!

«N. C.»

---

# EDUKISTO KONTRAŬ PASTRO

Tiu ribriko estas gvidata de Sekretario de liberpensula SAT-sekcio K-do KURT HUBRICHT, Mariannenstr 22/1, Leipzig 030 (Germanio)

## «INSTRUADO DE RELIGIO ESTAS LA PLEJ GRANDA KRIMO KONTRAŬ INFANARO»

Iu soveta K-do skribis al ni por miri, ke fama kristano Leo Tolstoj skribis la sentencon, aperintan sur la unua kajero de nia revuo. Li ŝajne ne volas kredi, ke Tolstoj tiel akre kaj klare kondamnis ne la religion, sed la instruadon de la religio. Ĉar multaj scias, ke en la lernejo de Jasnaja-Poljana, fondita de Tolstoj, oni instruis la «sanktan biblion» laŭ tre religia tendenco, estas necese klarigi, kiam Tolstoj esprimis la opinion, kiu tiel kolerigis la vienan policon kaj aŭstrian arkiepiskopon Piffl.

En la pedagogia vivo de Tolstoj, oni povas konsideri kvar periodojn, kiuj respondas al evoluo de lia ribelemo kontraŭ la socio kapitalisma. En unua periodo, Tolstoj estas nur filantropia grafo, bonfaranta nobelo, kiu provas fondi iun «societon por popolklerigo» kun helpo de kelkaj riĉeguloj, ĉar la devo de la reganta klaso estas donaci iom da instruo al malalta popolo. En tiu periodo, de 1850 ĝis 1860, li fondas diversajn lernejojn por kamparanidoj.

Poste Tolstoj vojaĝas eksterlanden (1860—61); li ekkonscias, ke filantropio ne povas agordi la interesojn de la riĉulo kaj tiujn de la kamparano kaj drama morala konflikto akriĝas en lia animo. Li nun kritikas la regantan lernejon kaj predikas liberecan edukadon. Li montras, ke la burĝaj klasoj perforte trudas sian kulturon al la popolo, ke la tiama lernejo estas senviva, ke ĝi mortigas la vivon de l'infano. Li konscias la rekonstruon de la socio per ia nebula sistemo anarkisma de libereca edukado.

En tria periodo, Tolstoj provas vivi sian idealon kun la infanaro en Jasnaja-Polana. Li fortiriĝas de la plenkreska homaro kaj penas idealemigi infanaron. En tiu momento, en 1862, li bazas la tutan edukadon sur religio. Li deklaras interalie, ke «religio estas la sola laŭrajta kaj laŭracia fundamento de l'edukado». Sur libro eldonita de SAT: «T r i v e r k o j d e T o l s t o j», oni povas legi multon pri la religia tendenco de la Tolstoja pedagogio. Sed Tolstoj jam agnoskis, ke la religia instruado estas kontraŭa je principo de libereco en edukado kaj estas ja perfortaĵo. Li eĉ tiam asertas: «La religia instruado estas nedubeble inokulenda en la popolo kaj tie ĉi, nur tie ĉi, la perforto estas laŭrajta».

Fine venas la kvara periodo, kiu prezentas Tolstoj, kiel grandan verkiston kaj potencan batalanton kontraŭ Eklezio kaj Ŝtato. Li kritikas la oficialan religion kaj kreas propran religion. Li nun fine konscias, ke ĉia perforto devas foresti en la edukado. Li korektas multajn

el siaj antaŭaj opinioj, konstatas, ke en edukado la religia perforto estas la plej terura kaj li kritikas ĝin, kiel «la plej granda krimo kontraŭ infanaro». Li eĉ furioze atakas la instruadon de religio en la popollernejoj, deklarante ĝin mortigado kaj atencado kontraŭ la infanaro (1892).

Ni tre dezirus, ke sovetaj K-doj ĉerpu el la lastaj verkoj de Tolstoj la fragmentojn, kiuj montras lian lastan opinion kontraŭ religia instruado. La revoluciemo de Tolstoj restis ĉiam sufiĉe negativa, sed lia pedagogio montras pozitivajn trajtojn, kiuj nun penetras la novan edukadon kaj ĉefe la sovetian lernejon, Tolstoj montris konstantan altiĝon al komprenemo de proletaj idealoj kaj la avandgardaj edukistoj prave utiligas liajn lastajn sentencojn por lukti kontraŭ la ekleziaj postuloj en lernejo.


La kloŝo pastra vagas — timas la infanoj

La SAT-edukistoj, kiuj miris pri la tolstoja frazo de nia kajero, devas scii, ke ĝi nun apartenas al historio de l'edukista avangarda movado. Kiel ĉeestinto de la Viena Kongreso de Edukintern (1926), mi povas rakonti la jenan okazintaĵon, kiu pruvas, je kioma grado la lasta tolstoja penso konsternas la ekleziajn rondojn. Dum la kongreso, en la malnova urbdomo viena, la proletaj edukistoj gluis diversajn afiŝojn kun proleteduka karaktero. Interalie estis la du frazoj: «La religio estas opio de la popoloj» (Marks) kaj «La instruado de religio estas la plej granda krimo kontraŭ infanaro» (Tolstoj). Policistoj venis kaj ŝiris la du afiŝojn kun marksa kaj tolstoja frazoj. Tio ege ĝojigis la kongresanaron kaj la tutan vienan laboristaron; la sekvantan tagon la viena gazeto «Abend» montris en karikatura desegno la policestron antaŭ la arkiepiskopo Piffl: «Via ordono estas plenumita, Emanenco! la revoluciemaj afiŝoj estas forŝiritaj!»—«Jes, sed ĉu utilos, se ni ne sukcesos eltiri el la homaj koroj tiun Tolstojon kaj tiun Markson?» Tial, gek-doj, ni akcentis sur nia unua kajero la frazojn de Tolstoj kaj de Marks. Ni konservu ilin funde de niaj koroj kaj al ili ni ofte pensu en la lernejo kaj en la batalo.

SAT-ano 518.

---

**Ĝustigo**

K-do Kurt Hubricht petas, ke la nomo «Karl» kaj la titolo «Sekretario» ĉe la kapo de la rubriko «Edukisto kontraŭ pastro» estu ŝanĝataj je «Kurt» kaj «Redaktanto» respektive.

Sur la dua paĝo de la kovrilo de Kajero 2-a estas eraro ĉe la nomo STAY, nome V anstataŭ Y.

## LA ANSTATAŬIGO DE LA PRIVATAJ KATOLIKAJ GIMNAZIOJ PER LA ŜTATAJ

Pasintjare estis fermitaj privataj gimnazioj en Plungé kaj Utena. Tiujn gimnaziojn tenis la privata, klerikala organizo «Saulé». Anstataŭ ili oni fondis la ŝtatajn gimnaziojn.

Komence de la nuna jaro oni ankaŭ ŝtatigis la privatan (tenatan de la same klerikala organizo «Ziburys») gimnazion en Vilkaviŝkis.

Pro tiu gimnazi-ŝtatigo eksplodis en iuj soci - partoj (sendube klerikalaj) grandega malkontento kaj senfinaj diskutoj. Oni eĉ parolis, ke la registaro persekutas la katolikajn lernejojn ktp.

La privatajn gimnaziojn nun oni likvidis ne nur pro la ordiĝo de la ministerio, sed ankaŭ pro la ne egala monpago pro la instruado en tiuj lernejoj. La privataj altlernejoj postulis de la lernantoj pli altan pagon, ol la ŝtataj gimnazioj. Precipe, kiam la registaro forprenis la monsubtenon de tiuj gimanzioj. Do la gepatroj de la lernantoj komencis plendi kaj peti la klerig-ministerion, ordigi la aferon, ŝtatigante tiujn gimnaziojn. Sed tiujn ĉi petojn la klerig - ministerio ne tuj povis kontentigi. Tiam la gelernantoj de la gimnazio en Plungé, ne povante plu atendi, komencis s t r i k i kaj ne plu vizitadis la lecionojn. Sendube, ke tion fari instigis la gepatroj aŭ eĉ personoj, kiuj staris tre proksime al la nuna registaro (kiu ja ankaŭ deziras naciuligi la privatajn lernejojn).

Sed la ministerio sciigis al la lernantaro, ke la striko ne estas permesata, kaj ke la tuta afero ne estas ĝia afero. Kaj oni proponis vizitadi la lernejon. Laboro en la lernejo komenciĝis. Sed ne por longa tempo. Ĉar post la semajno, la instruistaro de la gimnazio, ne plu ricevanta la salajron (la organizo, ne plu havante ŝtatan monsubtenon, ne plu povis salajri la instruistojn) rezignis doni lecionojn.

Tiam la registaro proponis al la organizo, ŝtatigi la gimnazion, sed la organizo ne konsentis. Do tiam la registaro fermigis la gimnazion.

Tia sama historio okazis ankaŭ rilate la gimnazion en Utena. Tie ĉi ankaŭ la lernantaro komencis striki. La gepatroj ekpostulis ŝtatigi la gimnazion. Oni fermis la gimnazion kaj en aparta ejo malfermis la ŝtatan gimnazion kun la sama instru - personaro, escepte la direktoro.

Pasintjare en Novembra monato ekestis embarasoj en la gimnazio de Vilkaviŝkis. Oni proponis al la organizo, «Ziburys» ŝtatigi la gimnazion. Sed la organizo malkonsentis. Pro tio la lernantaro kaj la gepatroj denove ekpostulis ŝtatigi la gimnazion. Fine la organizo «Zib.» ekkonsentis, kaj la klerig - ministerio transprenis la gimnazion kun la tuta instru-personaro.

La klerikaloj faris grandegan tumulton. Oni komencis paroli, ke la fermo aŭ ŝtatigo de la «katolikaj» gimnazioj kontraŭas al la Konkordato. Sed tio estas malvero. La registaro havas la rajton fondi la ŝtatajn lernejojn. Ankaŭ estas malvera la diro, ke la gimnazioj, tenataj

de «Saulé» aŭ «Ziburys» — estas katolikaj, kaj tenataj de la ŝtato — ne katolikaj. Envere ia ajn diferenco inter ili ne ekzistas. En ĉiuj lernejoj oni instruas pri la religio. En la ŝtatigita (kiu antaŭ nelonge estis «katolika») gimnazio de Vilkaviŝkis: 32 luteranoj, 7 hebreoj kaj 3 alireligianoj. Laŭ la leĝo, ĉiuj ĉi lernantoj havas la rajton postuli la instruiston pri sia religio. Kaj tiu instruisto estas salajrata de la ŝtato. Do la klerikaloj krias sencele.

«N. C.»

---

## LA PASTRO ANKAŬ ĈE NI!

Ĉi tiu rakonto de vera okazintaĵo aperis sur la gazeto «Liberiga Lernejo», organo de l' Amsterdama Nacia Sindikato de geinstruistoj, kaj pruvas, ke la senkonfesia lernejo estas en danĝero, ankaŭ en Francio, kie ĝis nun ĝi estis pli forta ol ĉie ajn. Kvankam la kaŝe projektita kaj nun ellaborata konkordato ne laŭleĝe ekzistas, la pastroj estas kuraĝigataj kaj aŭdacas penetri kontraŭleĝe la ŝtatajn (senkonfesiajn) lernejojn.

— Estis 5 minutoj post la 11-a, t. e. post la lernofino. Mia leciono pri scienco estis finiĝinta kaj la lernejanoj kopiis ankoraŭ la lecionan resumon, kiam mi aŭdis frapi ĉe pordo. Mi iris tuj malfermi. Estis tie la pastro, li salutis kaj eniris: «Mi venas serĉi la infanojn por la katekisma leciono», li diris al mi. (Katekisma leciono devas ĉiam okazi ekster la laika lernejo, ekzemple en la preĝejo, ĉar franca ŝtata lernejo estas tute senkonfesia. Noto de tradukinto).

— Mi tuj foririgos la infanojn, mi respondis, sed atendu ankoraŭ kelkajn sekundojn, mi petas. — Ne, ne! respondis la pastro. Kaj li ekkoleriĝis kaj ordonis al la infanoj: «Kolektu viajn propraĵojn kaj sekvu min!» — Mi tion tute malpermesis al la lernantoj kaj la pastro tiam sin turnis al mi, insultis min per vorto «sektulo», diris al mi, ke li estas en la vilaĝo de jam 16 jaroj kaj mi nur de 3 monatoj kaj ke mi ne estos la mastro.

Tiel estis diskuto kun la pastro en ĉeesto de la tuta lernantaro. Mi invitis la pastron foriri. Li rifuzis. Mi ne volis lin kapti kaj perforte elirigi lin. Tiam li ordonis al la infanoj: «Surgenue, kaj ni diru la preĝon». Li faras krucosignon, kunigas porpreĝe la manojn kaj jen li komencas preĝi. Mi malpermesas al miaj lernantoj moviĝi. Konstatante, ke li ne estas obeata, la pastro ĉesigas preĝi kaj ankoraŭfoje invitas la infanojn eliri. Fine, ĉar mi havis neniun motivon por ne allasi la plej malgrandajn lernantojn, tiujn mi allasas foriri, sed konservas la grandajn, kiuj finas kopii la resumon. Kaj la pastro foriras, dirante al mi, ke li revenos ĉiufoje, kiam mi konservos la infanojn post la fino de la klaslaboro.

La nomo de la insruisto, al kiu okazis tiu pastra fi-atako estas Loustalet, la vilaĝo estas La Cropte (Mayenne), la dato de l' okazo: la 18-a de februaro 1930. Sur la gazeto «Emancipa Lernejo», organo de l' avan-

gardaj geinstruistoj de la moskva sindikato, ĉi okazaĵo estas komentariata ankaŭ pro la senzorgo de la administraj aŭtoritatoj, kiuj nur ses semajnojn poste fine informis la junan raportintan kaj konsilpetintan instruiston Loustalet (Lustalè), ke la pastron vokos la tribunalo. Kompreneble, kulpigi la pastron la aŭtoritatoj decidis nur tial, ke la juna instruisto decidis publikigi la fakton sur la gazetaro; ankaŭ evidente, la pastro estos punata al ridinde malalta puno aŭ eĉ tute ne punata.

Tradukis kaj prezentis: SAT 518.

## PRI PRETENDITAJ RELIGIAJ PERSEKUTOJ KAJ SOVETA EDUKADO

Karaj eksterlandaj Kamaradoj!

Ni dezirus pli proksime per korespondo konatiĝi kun vi — instruistoj kaj ekscii vian pedagogian sperton.

Ni, sovetlandaj instruistoj, fervore kaj vigle plenumas nian parton de ŝtata «kvinjara plano» kaj ni kredas, ke via simpatio al frata (laŭ klaso) agado povus multe helpi al ni en la problemo de rokonstruado de nia lernejsistemo.

Respondu al ni; skribu, bonvolu, pri via moderna pedagogia idealo kiun vi celas, pri ĉiutaga laborado de via lernejo, pri mankoj kaj malhelpoj, kiuj vin ĉagrenas.

Niaflanke, ni kun plezuro respondos ĉiujn viajn demandojn. Ĉi tie ni devus meti punkton, atendante vian amikan leteron. Sed, supozante ke vi interesiĝas pri nia vivo, ni iomete enskribos tuj pri la aktuala temo, kiu tro interesis la Papon mem — pri libereco de konfesio en nia Unio.

Ĝuste nun (16-an de marto) la tuta kristana mondo laŭ iniciato de la Papo preĝas por helpi per tio sama al niaj kredantoj. Ho, ni — senpartiaj instruistoj timetas, ke tiuj preĝoj semas kaj kreskigas en mensoj kaj koroj de viaj preĝantoj tute ne kristanecan malamon al nia lando.

Kiun situacion havas ĉe ni la diversaj eklezioj?

Kredantoj pli aĝaj ol 18 jaroj plenrajtas organizi religiajn societojn, havigi je sia dispono preĝhalojn kaj instali salajratajn pastrojn; kaj ili havas plenan liberecon plenumi la ritojn, se ĉi tio ne rompas sovetiajn leĝojn. Kial do la pastraro estas malkontenta? La pastraro de ĉiuj religioj, subtenante dum cara reĝimo la regantajn klasojn, ricevadis de ili diversajn avantaĝojn. Nune ĉi tiuj privilegoj malaperis kaj la pastraro nature pri tio estas tre malkontenta.

Laborista klaso, preninta la potencon, tute ne bezonas helpon de religioj kaj eĉ kontraŭbatalas ilin, konsiderante ilin kiel baroj sur la vojo de kulturo kaj socialisma konstruado. Kaj la lastaj cirkonstancoj kaŭzas ne nur malplezuron de ekleziuloj sed ankaŭ puŝis, puŝas kaj verŝajne puŝados ilin kontraŭ revolucia agado.

Tuta nia lernejreto estas apartigita de la eklezio. En lernejoj ne estas instruata la religio. Ni, pedagogoj uzas ĉiujn sciencajn argumentojn por kontraŭbatali religiajn superstiĉojn. Ĉiuj lernobjektoj celas substreki en konvenaj okazoj antagonismon de la scienco kaj de la religioj. Ni edukas novan feliĉan generacion, kiu tute jam konas nek caron, nek bienposedantojn, nek policanojn. Tiu generacio — ni do ĉi tion observas — jam ne havas tiujn misterajn ideojn, de kiuj ni estis en la infaneco infektitaj. Nia infanaro jam tute ne povas kompreni, ke granda Faraday (F a r a d é j) estis tre fervora religiulo.

Ŝekve nia instruistaro havas sufiĉan sukceson en tiu rilato. «Des pli malbone — povas al ni kontraŭdiri iuj eksterlandaj instruistoj — sen religio do certe estas neeble eduki bonajn homojn».

Tamen ĉi tiu opinio ankaŭ estas granda superstiĉo. Rigardu! Nia infanaro estas morale tute sana, pli sana ol multaj religiuloj. Ĝi bezonas neniujn timigilojn por esti altmoralaj homoj. Kaj nia moralo nur altkreskis dum lasta jardeko. La bazoj de la soveta moralo estas reciproka estimo de gecivitanoj, emo al fruktodona laboro, amo al socia kolektivo, plenrajteco de virino, plenrajteco de ĉiuj nacioj de nia Unio. Nia junularo havas fervoran entuziasmon; ĝi kune kun ni konstruas la socialismon.

Nia «kvinjara plano» havas gravan mankon: en ĝi oni ne diras pri kioma grado en morala progresado. Sed en tiu rilato, nia sukceso estos tiel ega, ke neniu profeto kuraĝas antaŭdiri la proksiman estontecon.

Kun kamarada saluto, unu el la kolektivo: Aleksandro Borislavskij. Nepre respondu al: Moskvo— Dvorec Truda — Solanka 12 — kom. 558 — Redakcio de «Soveta Pedagogia Revuo» por Borislavskij.

---

**AL TEPS - ANOJ**

**Ne forgesu, ke «SENNACIECA PEDAGOGIA REVUO» aperigas multajn el viaj artikoloj. Abonu ĝin al: R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig, O 27 (6 N-oj—$^1/_2$ dol.).**

# NI, GESTUDENTOJ...

**Tiu ribriko, sub kontrolo de SAT-studenta sekcio estas gvidata de K-do D. SNEĴKO, Poŝtkesto 33, Minsk (Soveta Blankrusio)**

## MILITISTIGO KAJ MIZERO DE LITOVAJ STUDENTOJ

La militistigo de la tuta litova lernejaro estas nun entreprenata. Eĉ en la elementaj lernejoj oni provas enprogramigi la preparon militan de la lernantoj. Samtempe oni solidarecon propagandas internacian kaj pacon, kaj instruas la infanojn militi.

Militpreparo inter la lernantoj de mezlernejoj kaj gimnazioj kvankam ne deviga, tamen rekomendata estas komencita jam en la j. 1928—29, nunjare oni intencas pli intense eklabori. Tiun taskon plenumas la estintaj oficiroj, kiuj aldone ankoraŭ prelegos pri la milithistorio kaj militagoj. En pli proksima estonto oni intencas tiun militpreparan instruadon fari deviga kaj sistema.

La militsferoj kaj oficirĵurnaloj multe persistas, ke la lernejojn estas necese militigi. Sed la instruistaro indiferente akceptas iliajn postulojn. Kaj en pedagogiaj ĵurnaloj pri tio ĉi ne estis ankoraŭ eĉ iomete priparolita!

La nombro de mezlernejoj kaj gimnazioj multe plimalgrandiĝis, precipe mezlernejoj. Pasintjare la mezlernejoj ĉiuj ankoraŭ ekzistis, sed la nombro de lernantoj plimalmultiĝis de 22.734 (1927—28) ĝis 21.766 (1928—29), t. e. per 1032 pers. La plimalmultiĝo estas klarigebla per tio, ke gimnazioj nun preparas nur studentojn por la universitato kaj pro tio multaj malriĉaj familioj igas siajn infanojn fariĝi metiistoj ktp., sed ne plu donas al ili la eblecon fini la gimnazion. La plej multaj el litovaj studentoj povas studi nur kiam ili sukcesas trovi ian ajn laboron en Kaŭnas, kio nuntempe estas tre malfacila.

«N. C.»

# TEPS TUTMONDA ESPERANTA PEDAGOGIA SERVO

Tiu ĉi rubriko estas gvidata de K-do M. BOUBOU, 96, rue Saint-Marceau, Orléans (Loiret), Francio

## EL AŬSTRIO

### Preparo de l'instruistoj

La instruista klerigo sin bazas sur la Reichsvolksschulgesetz (Regna leĝo pri popollernejoj) el jaro 1869. Laŭ tiu leĝo ekzistas Lehrerbildungsanstalten (Preparaj lernejoj por instruistoj), faklernejoj, kiuj ampleksas 4 jarojn. Vizitantoj de tiuj lernejoj devas esti 15 jaraj por esti — post akcepta ekzameno — akceptata, en la unuan klason. Ĉar la elementa lernejo finas kun la 14-a jaro, do estas unuajara intertempo inter la lasta klaso de la elementa lernejo kaj la unua klaso de la pedagogia faklernejo; ĉe la lasta estas fonditaj t. n. Vorbreitungsklassen (preparaj klasoj), kiujn vizitas la absolvintoj de l'elementa lernejo, antaŭ kiam ili vizitos la unuan klason de la pedagogia faklernejo.

La klerigo, kiun ricevas la estontaj instruistoj, estas tute nesufiĉa. La instruo eĉ ne atingas la gradon de la mezlernejoj (gimnazio k. a.), kaj tial la instruistaro jam de jardekoj batalas por plibonigo de la instruista klerigo. Sed laŭ la politikaj cirkonstancoj, ŝanĝo de la antikviĝinta leĝo estas neebla. La socialdemokrata kaj la germannaciula partioj postulas universitatan klerigon por la instruistoj, sed la katolika partio estas kontraŭ la propono. Jena statistiko klarigas tiun kontraŭstaron.

En Aŭstrio ekzistas 16 faklernejoj por instruistoj; el tiuj apartenas al la ŝtato 10, al la monaĥejoj 3 kaj al la ekleziaj unuiĝoj 3; por instruistinoj ekzistas 19; el tiuj estas 5 ŝtataj, 3 monaĥinejaj kaj **1** privata. Do el sume 35 instruistaj faklernejoj, 20 apartenas al ekleziaj organizoj kaj nur 15 estas ŝtataj. Se nun la preparo de la geinstruistoj okazus en la universitatoj, la eklezio perdus la influon al la juna instruistaro. Por ke oni faru leĝon, kiu koncernas la lernejon, en Aŭstrio, laŭ la konstitucia leĝo estas necesaj samtekstaj leĝoj de la nacia kaj de ĉiuj 9 liglandaj deputitaroj (provincaj parlamentoj). Nun Vieno, kiu validas kiel liglando, estas en la manoj de la socialdemokratoj, la aliaj liglandoj estas sub la potenco de la katolika partio. Tial samtekstaj leĝoj ne estas atingeblaj kaj la stato restas kiel en la jaro 1869!

Tamen en la kadro de la nuna faklernejaro, oni povis plibonigi la klerigon tiel, ke oni kelkaloke gvidas la preparan klason, kiel unuan klason kaj tiamaniere havas kvin klasojn.

La socialdemokrata registaro de Vieno, tute memstare, ne ema atendi ĝiseterne, fondis pedagogian instituton, kiu akceptas la vizitintojn de pedagogiaj faklernejoj aŭ de iu alia tipo mezlerneja, kaj en dujara kurso dum kiu la vizitantoj ne nur devas viziti la lecionojn de ĝi kaj studi la pedagogian praktikon en elementaj lernejoj, ĉe eminentaj instruistoj, sed ankaŭ devas studi iujn sciencojn dum 10 horoj posemajne en universitato, por esti preparitaj al instruista profesio.

La nuntempa stato estas, ke en la landoj ekster Vieno la preparaj studoj daŭras 4 aŭ 5, en Vieno 7 jarojn. Ĉar tiu Viena stato estas eksterleĝa la absolvintoj de la pedagogia instituto krom la ekzamenoj de ĝi ankaŭ devas fari tiujn laŭ la leĝo de la jaro 1869.

Vizitinto de la pedagogia faklernejo rajtas instrui, kiel provizora instruisto en popollernejo (unuaj kvar jaroj de la unuagrada deviga lernejo). Post dujara praktikado, ili devas fari lernejpraktikan ekzamenon kaj kiel absolvintoj de ĝi ili estas oficigitaj kiel definitivaj instruistoj. Kiu volas esti instruisto en ĉeflernejo (5-a ĝis-

8-a klaso de la unuagrada lernejo) devas fari apartan rigoran ekzamenon. Li povas elektiiun fakgrupon: 1—lingva, historia, geografia; 2—naturscienca kaj matematika; 3—artaj fakgrupoj.

La instruistoj por mezlernejoj (gimnazioj, reallernejoj ktp...) ricevas klerigon en universitatoj.

Jen kelkaj ciferoj pri pedagogia instrtuto: en jaro 1928—29 vizita ĝin 63 viroj kaj 59 virinoj. Al la fin ekzameno anoncis sin 65; (la aliaj vizitis la unuan klason) el tiuj 65 estis diplomitaj 59. Instruis 39 docentoj.

Pri la ekzamensukceso en la diversaj liglandoj informas jenaj ciferoj:

Ekzamensukcesoj en la jaro 1928:

| Lando: (liglando) | Maturec-ateston post fino de ped. faklern. | | Praktik-ekzamenon por popolernejoj | | | | Ekzamenon por ĉef (burĝ) lernejo | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | viroj | virinoj | provis | | sukcesis | | provis | | sukcesis | |
| | | | viroj | inoj | viroj | inoj | viroj | inoj | v. | inoj |
| Vieno . . . . . . . . | 71 | 87 | 18 | 37 | 17 | 36 | 36 | 30 | 36 | 30 |
| Malsupra Aŭstrio . . | 65 | 18 | 81 | 36 | 81 | 35 | 58 | 10 | 55 | 10 |
| Supra Aŭstrio . . . . | 52 | 46 | 70 | 42 | 69 | 41 | 15 | 2 | 6 | — |
| Salzburgo . . . . . | 23 | 21 | 18 | 18 | 17 | 15 | 7 | 2 | 6 | 2 |
| Stirio . . . . . . . . | 48 | 77 | 56 | 82 | 46 | 78 | 31 | 20 | 20 | 20 |
| Karintio . . . . . . | 37 | 24 | 30 | 16 | 27 | 16 | 15 | 5 | 15 | 3 |
| Tirolo . . . . . . . | 14 | 30 | 17 | 31 | 15 | 27 | 8 | 2 | 8 | 2 |
| Vorarlberg . . . . . | 6 | — | 10 | 9 | 9 | 9 | 2 | 2 | 2 | 2 |
| Burgenlando . . . . | 14 | — | 16 | — | 15 | — | 5 | 1 | 5 | 1 |
| Sume: . . . . | 330 | 303 | 316 | 271 | 296 | 257 | 177 | 76 | 153 | 70 |

**Verkis: Franz Jeitler (Vieno)**

---

## EL BELGIO

### Paska Kongreso de 1930 de Centralo de Belga Socialista Geedukistaro

Dum 15. 16. 17. aprilo 1930 kongresis, en Popoldomo de Bruxelles, la Centralo de Belga Socialista geedukistaro. Ampleksa estis la tagordo. Inter ĉefaj punktoj ni citu: la raportojn financan kaj moralan, tiujn de redaktestro de l'Etincelle (Fajrero), de pedagogia sekretario, pri salajroj.

Diversaj proletaj reprezentantoj salutis la kongreson: K-do A. Wouters, je nomo de belgia socialista partio, K-do P. Van Malderen, sekretario de tutbelgia sindikata movado — K-do Fraiture por sindikata kartelo de ŝtat-provinc- kaj komunuma laboristoj. K-do Lebaillif por Amsterdama franca Federacio de Edukistoj.

K-do Van Malderen entuziasme laŭdis la Centralon pro ĝia vigla agado, ĝia senĉesa membro-kreskado kaj ĉefe pro ĝia energia, senlaca batalo kontraŭ la ŝtataj (provinc- kaj komunumaj) subvencioj al konfesiaj lernejoj (entreprenoj de la klerikala partio). Li diris, sub vigla aplaŭdo de la ĉeestantoj, ke ĉefe dank'al tiu agado, la kontraŭuloj de tiu subvencia politiko sukcesis akiri unuan venkon en la Socialista Partio, kaj li varme alvokis al daŭra agado tiusenca por ke tutfine venku en la partio la moto «ĉesigo de ĉia subvencio al konfesia edukado». La financa raporto estis voĉe akceptata dum la morala estis aprobata per 2177 voĉoj kontraŭ 719 kaj 561 sindetenoj. Pri ĉi lasta okazis, kiel ĉiam, vigla, pasia kaj interesa debato. Estis denuncata la agado de la Klerikala Partio por krei teknikajn lernejojn subvenciataj de la ŝtato. La kvie-

ton, kiun allasis al ĝi la maldekstraj (liberalaj kaj socialistaj) partioj, ĝi tiel lerte uzis, ke ĝiaj teknikejoj nun estas dufoje plimultnombraj ol la oficialaj kaj ke ili formanĝas 75% de ĉiuj subvencioj por teknika instruado. La nigra reakcio do daŭrigas sukcese por sia teknika instruado la elrabon de la ŝtataj kasoj kiun ĝi lerte plenumas jam de longe por siaj unuagradaj lernejoj. Tiu politiko estas rekta minaco por la klasbatalaj sindikatoj, ĉar la teknikaj lernantoj estas envicigataj en reakciaj junulorganizoj kaj de tie rekte en strikrompaj sindikatoj.

K-do René Jadot, profesoro de duagrada lernejo kaj pedagogia sekretario de la Centralo, faris interesan prelegon pri Unika Lernejo, kiun la kongreso merite honoris, decidinte, ke lia raporto estos eldonata libroforme de la Centralo.

Dum diskuto pri salajroj oni konigis, ke la ŝtato, kiu tiel avare pagas la servojn de publikaj instruistoj, sin montras mirige pli malavara por salajri samgradajn intruistojn, kiuj laboras en «Ecole des Pupilles», t. e. lernejoj, kiuj preparas knabojn al soldata metio; signo nedubinda, pri la klasa instinkto, kiu instigas la regantojn dorloti la dresistojn de la reĝimdefendontoj.

La kongreso aprobis salajropostulon por geinstruistoj de unuagradaj lernejoj (geknaboj de 6—14-a jaro) ĉi-sube klarigitan:

La salajro konsistu el stabiligita parto (ĝis indekso 700) kaj variebla aldono kalkulata laŭ 1/20 de la stabiligita parto por ĉiu 35 poenta tavolo super indekso 700.

Laŭ nuna situacio de l'indekso, salajro por la unua servojaro estus 21.000 fr.; kun 20 ĉiujaraj plialtigoj da 700 fr., la maksimumo atingus je la 21-a servojaro 35.000 fr. Bazante sin sur tiu skalo, speciala komisiono fiksos la depostulon por frebellernejaj edukistinoj, profesoroj de duagradaj fernejoj kaj de instruistpreparejoj.

La kongreso ĉiuvoĉe per du rezolucioj ree konfirmis la neŝanceligeblan sintenadon de la publika (senkonfesia) lernejo.

La unua postulas por edukistoj, ekster la lernejo, senbaran opini- kaj esprimliberon similan al ĉiuj civitanoj.

La dua salutas la ŝanĝiĝon de la sintenado de l'Socialista Partio pri la publika subvenciado al konfesiaj lernejoj kaj proklamas la nealiigeblan volon de Soc. Edukistaro batali por plene ĉesigi ĉiajn subvenciojn al lernejoj de la klerikala Partio.

La kongreso laboris sub la signo de plena fido al la Soc. Partio, ĝenerala sindikatunuiĝo de Belgio kaj Profsekretariejo de Amsterdam. La laboro plenumita dum jaro k kongreso havigis al la Centralo, flanke de estroj de la laborista movado k de la proleta gazetaro, laŭdojn, kiujn la socialistaj edukistoj alte taksas.

M. Van Aelst, Sat-ano 155.

## EL ĈEĤOSLOVAKIO

### Masarik pri edukado kaj instruistaro.

La 7-an de marto 1930 ni festis 80-an datrevenon de la naskiĝtago de nia prezidanto D-ro F. G. Masarik. Ĉe tiu okazo ni rememorigis al ni ankaŭ, kiel tiu ĉi estinta universitata profesoro restis ĉiam moderna ankaŭ sur la kampo pedagogia. Pro tio mi penos priskribi mallonge liajn ideojn pri edukado kaj instruistaro.

La edukado kaj instruado komenciĝas en familio. Ĝi estas la unua infanlernejo. Ne per tio, kion oni al la infano ordonas aŭ malpermesas sed, per tio, kion la infano hejme vidas. Kiaj estas la gepatroj, ilia reciproka interrilato, tio havas plej grandan influon je infano. Precipe estas necese, ke ni amu niajn infanojn. Ne per la buŝo, sed per agado: ni devas pli multe zorgi pri ili kaj pli multe kun ili vivi. Ni zorgu pri niaj familioj tiel, ke en ili kresku sanaj, decaj kaj memstaraj homoj.

La dua edukisto de infanoj estas la socio. Ĝi estas konstanta lernejo kaj ĝiaj influoj estas grandaj. Plenaĝuloj influas ofte eĉ kontraŭ la propra volo je gejunularo. Pro tio edukadi infanojn signifas edukadi sin mem. Sekve reformi la infanedukadon signifas ne nur reformi la metodon, sed ankaŭ la vivmanieron de ni plenaĝuloj. Ni estas la fundo, el kiu kreskas la novaj generacioj. De ni dependas, ĉu ili estos pli bonaj kaj pli feliĉaj.

Grava estas la demando pri la sano de infanoj. Kial ni tiel ofte forgesas pri infanludejoj, banejoj kaj parkoj porinfanaj? Ju pli malriĉa estas kvartalo, des pli multenombraj ili devas esti. Deponi la monon en infanojn — jen plej certa investo de kapitalo.

Nia pedagogio kaj lernejo rompas ofte la memstarecon de infanoj. La infano bone sentas, ĉu la plenaĝuloj estas liberaj kaj kia estas ilia reciproka interrilato. En Ameriko estas infanoj pli liberaj, ili ne timas la plenaĝulojn, vidante ilian reciprokan sinceron. Jen la influo de respubliko kaj libero! Eĉ niaj infanoj devus esti pli kuraĝaj kaj pli sinceraj, por ke ili kresku vere liberaj homoj.

Masarik estis ĉiam kontraŭ la ŝablono kaj mekanismo rilate la instruadmetodon. Infanoj estas per sia natureco sciavidaj. Ni ne turmentu ilin per konstantaj demandoj kaj respondoj, sed donu al ili la okazon, ke ili mem demandu. Logika empirio, de ĝi per indukcio al ĝeneraligo—jen la metodo de Masarik. La fundamento de metoda principo estas kiel eble plej multe da memstareco por infano kaj kreema, spontanea laboro, kiu ne devas esti ĉiam nur ludo. La nuntempa pedagogio estas en la stadio de evoluo.

Nun pri la demando, kia devas esti instruisto laŭ la ideoj de Masarik. Instruisto estas en lernejo aŭtoritato. Li povas esti tie monarĥo, konstitucia reĝo aŭ demokrata prezidanto. Li havas eblon jam en lernejo doni al siaj lernantoj la politikan modelon. Infano lernas ne per tio, kion la instruisto rakontas, sed plimulte per tio, kion li estas faranta. Ĉiu instruisto por sukcese labori, devas esti aŭtoritato ne nur en lernejo, sed ankaŭ ekster ĝi. Pro tio estas grave, ke li estu materiale sendependa. Aŭtoritato li devas esti nepre ankaŭ en sia mastrumo. Nur se instruisto estas amiko de sia propra familio, povas esti amiko de infanoj. Li devas pozitive influi je siaj propraj infanoj; nur tiam li havas la moralan rajton konsili al aliaj gepatroj, kiele ili povas edukadi siajn infanojn. Fina postulo estas, ke li estu aŭtoritato en sia komunumo. Tio ne signifas esti komunuma sekretario, sed esti klera, bonmora kaj karaktera. Estas ankaŭ necese, ke li estu politike sendependa.

La reformo de lernejo estas samtempe reformo de instruisto. Tio signifas plibonigi lian situacion socian kaj lian kleron. Ĉefa kondiĉo estas, ke la instruisto amu siajn lernantojn kaj entreprenu ilian spiritan vivon, kiu ne estas abstrakte scienca, sed kutime konkreta. Li devas instruadi demonstrative, aligi la instruadon al tio, kion la lernantoj en sia ĉirkaŭaĵo vidas kaj la instruadon kiel eble plej individuigi.

Instruisto fariĝu kamarado de siaj lernantoj. Lia aŭtoritato baziĝu nur en la diferenco de l'aĝo, en lia supereco koncerne la scion, praktikon kaj karakteron. Ankaŭ la rilato de infanoj al instruisto estu ĉiam harmonia, kamarada. Inter instruisto kaj lernanto estas ofte fremdeco. Estas necese pli multe da intimeco, korafablo kaj demokratio. Ne blinda aŭtoritato de instruistoj, ne pasiva eldevigita obeemo de infanoj, sed edukado per bona ekzemplo. Nuntempe la tuta pedagogio kaj didaktiko estas malsana je metodiko.

Ĉar la lernejo devas servi al la socia kaj filozofia celoj de la nacio, bezonas la instruisto koni la ĝeneralan historion kaj patrujsciencon. La historio montras al li la celon, kiu estas de la nacio kaj ŝtato atingota. En la evoluo de la lernejo estas la sorto de demokratio.

La instruisto bezonas la klerigon ekonomian, por kompreni la laboriston kaj kamparanon. Li nepre konatiĝu kun ĉiuj sociaj nuntempaj problemoj, speciale kun socialismo. La instruisto estu instruita en la morala statistiko. Tio estas statistika patologio, enhavanta kiel eble plej sciencan priskribon de la malsanaj statoj de la socio. Pro tio la instruisto havas la devon konatiĝi kun la konkreta psikologio kaj psikologio. Plue estas al li necesa la psikiatrio por kompreni diversajn patologiajn kazojn. Tio kompreneble postulas la kleriĝon en ĝenerala biologio, fiziologio kaj infana psikologio. Al ĉio menciita apartenas ankoraŭ la konatiĝo kun arto kaj literaturo. Jen estas la sumo de klerigo de moderna instruisto! El ĉio aludita rezultas, ke ĉiu instruisto devas havi la u n i v e r s i t a t a n k l e r i g o n.

Se pastro, se kuracisto, se eĉ veterinaro estas akademie klerigitaj, se la samon oni ankaŭ komencas postuli eĉ de la terkulturistoj, administrantaj bienojn, kiel estas eble, ke ni kontentiĝas pri pli malalta klerigo de l'instruistoj?

Provizore ni povus atingi, ke kiel eble plej granda nombro da instruistoj estu sin preparanta ne en la porinstruistaj institutoj, sed en la mezgradaj lernejoj (gimnazioj

kaj reallernejoj). La instruistaj organizoj povus prizorgi la kompletigan fakan klerigon de plenumintoj de la mezgradaj lernejoj.

Ni rimarkigas, ke tiu ĉi postulo de Masarik jam efektiviĝis. La progresema ĉeĥoslovaka instruistaro fondis per propraj monrimedoj Superan Pedagogian Lernejon kaj Pedagogian Fakultaton en Praha kaj en Brno. Restas nur demando: kial la ĉeĥoslovaka registaro ĉesos esti apatia al tiu ĉi fakto kaj decidiĝos enkonduki la devigan klerigon de l'instruistaro en la pedagogiaj fakultatoj ĉe universitatoj.

A. Valoušek — Brno, Tyršova 19.

## EL GERMANIO

### Lernejaj malsanoj — profilaktiko per pureco kaj reguleco

La ŝtatkomitato por Prihigiena Popolinstruo skribas al la Oficiala Prusa Gazetarservo:

«En nunaj tagoj niaj malgrandaj ge-ABC-uloj estas enirintaj fierpaŝe la lernejon. Sed en la infana ĝojo ne povas partopreni multaj patrinoj, ĉar ili scias, ke la lernejo — precipe la kunesto kun multe da infanoj en malvasta loko — donas al iliaj infanoj ne nur scion kaj ĝojon, sed ofte ankaŭ korpan suferon. Ja atentas nuntempe la lerneja kuracisto pri tio, ke estas detenataj de la infano ĉiuj malbonaĵoj, kiujn enhavas en si la laboro lerneja — malvastsence. Sed kontraŭ infektoj — tiaj estas la ĉefaj malsanoj lernejaj — eĉ la lerneja kuracisto estas senpova, se la gepatra domo komprenеme ne helpas lin en tio. Kiel tio povas okazi?

Unue oni kutimigu la lerninfanon al pureco. Akurateco kaj reguleco estas plej esencaj postuloj de profilaktika higieno. La infano devas esti kutimigata ellitiĝi ĝustatempe, nome tiom frue, por ke ĝi povu tute ne rapide enstomakiĝi sian matenmanĝon. Sed ĝustatempe ĝi ankaŭ devas veni al la manĝoj kaj al la lito por ke ĝi per regula kaj sufiĉa dormo — kiu sumiĝu por la lerninfano je 10—11 horoj — venu tute finripozinta en la lernejon.

La dentpurigado vespere kaj matene estu plenumata kun plej granda reguleco, por ke estu evitataj al la infano dolorplenaj horoj, ĝenerale domaĝoj de la sano kaj mankoj en la instruado. Oni atentu precipe pri rekta tenado kaj perfektigo de l'korpo en libera tempo. Fine: la plej efika gardo kontraŭ la malsanoj enestas en raciaj hardiĝo kaj sporta okupiĝo, precipe en freŝa aero.

Se gepatra domo kaj lernejo tiel agas man-en-mane, certe la lernejaj malsanoj baldaŭ perdos multon el sia timigo.

Tradukis: Hoffmann W. — Quedlinburg a. Harz — Höhenweg 1. Noto: K—go W. Hoffmann nun loĝas en belega Harz-montara regiono, vizitata de la tuta mondo: certe gekolegoj volonte lin vizitus. Quedlinburg estas miljara urbo kun 28.000 loĝantoj kaj situas en la «koro» de Germanio. Li volonte korespondadus kun tiuj, kiuj intencas viziti Germanion, precipe ankaŭ kun francaj gekolegoj.

## EL JAPANIO

### Famegaj Prapatroj kaj Vivantaj Dioj kontraŭ komunismo

Ĉi suba artikoleto konfirmas la diversajn informojn de niaj japanaj kunlaborantoj pri la sufoko de la progresideoj en japana edukado; ĝi aperis en reakcia franca «Gazeto de la Geinstruistoj», 22-an de marto 1930, kiu represis ĝin el «Japan Advertiser».

Princino Taka, lasta naskiĝinto de la japana imperiestrino, aĝa je 8 monatoj, hieraŭ vizitis la Imperiestran Maŭzoleon por prezenti fidelan ĵuron al la «spiritoj» de siaj «Famegaj Prapatroj»... La Imperiestra Bubino portis skarlatan peltomantelon, sur kiu estis brodita la naĝanta testudo. Por tiu vizito, la juna Taka estis en la brakoj de S—ino Yamaoka, korteganino.

La Ministro de Publikinstruado en Japanio estigis kasfondon de 110 000 jen'oj por disvastigi la studadon de la naturaj psikologio kaj filozofio laŭ vojoj ja tute malsamaj de tiuj kutime uzataj en Okcidento. Tiuj studoj dediĉigas apartan atenton al la «Vivantaj Dioj» de Japanio kaj al historiaj metodoj de la nacia penso. Oni volas plifirmigi la intelektan ekvilibron de la japana nacio, revivigi la malnovajn naciajn idealojn por kontraŭbatali la invadon de komunismo. La «Vivantaj Dioj» en Japanio estas eminentuloj diigataj, dum ili ankoraŭ vivas. Iafoje oni starigas templojn por honori ĉi tiujn personegojn, atingintajn la plej altan punkton de sia kariero.

## EL JUGOSLAVIO

### La Kurso por preparado de helplernejaj geinstruistoj

Laŭ lasta statistiko en Jugoslavio estas infanoj: 11.536 blinduloj, 16.571 surdmutuloj, 38.000 kripluloj kaj 22.586 spiritmalfortuloj (spirite malbonkapabluloj) — entute 88.693 nenormalaj infanoj.

Nova leĝo (de 9-a Dec. 1929) pri popollernejoj postulas, ke ĉiuj infanoj, tiel normalaj kiel nenormalaj devas viziti popollernejon: normalaj vizitu normalajn lernejojn, kaj ne normalaj — specialajn helplernejojn.

Sed, ĉar nun ekzistas nur 4 institutoj por surdmutaj infanoj, 3 institutoj por blindaj, unu por kripligitaj, kaj 3 helplernejoj kun 13 klasoj por spirite malbonkapablaj infanoj, kiuj (helplernejoj) estas vizitataj de 92 knaboj kaj 65 knabinoj, grandega nombro de nenormalaj infanoj, en Jugoslavio, restas neinstruataj kaj needukataj, aŭ vizitas normalajn lernejojn kie ili faras grandan malhelpaĵon.

Pro tio estas tre necese organizadi apartajn helplernejojn kaj helpajn klasojn ĉe normalaj popollernejoj, precipe por spirite malbonkapablaj infanoj, kiuj estas multnombraj kaj troviĝas en ĉiu lerneja klaso. Sed por fondado, organizado kaj malfermado de tiaj lernejoj, oni devas plenumi specialajn kondiĉojn. Plej ĉefa el ili estas havigi, por tiu celo, preparitajn geinstruistojn.

Tial Ministerio de klerigo antaŭ nelonge aranĝis en Belgrado la kurson por preparado de 10 geinstruistoj, kiuj instruos kaj edukos en helplernejoj kaj helpklasoj. La kurso komencis la 20-an de decembro 1929 kaj daŭros ĝis fino de tiu-ĉi 1929/30 lernjaro (fino de junio).

La aŭskultantoj estas popollernejaj geinstruistoj kaj studadas jenajn objektojn (disciplinojn): 1° infanpsikologio, 2° infanpsikopatologio, 3° esplorado de inteligenteco ĉe lernejaj infanoj, 4° edukado de spirite malbonkapablaj infanoj (spiritmalfruuloj), 5° instruado en helplernejaj klasoj, 6° praktikaj ekzercadoj.

Je la fino de la kurso la aŭskultantoj devas fari ekzamenon el ĉiuj nomitaj kaj studitaj objektoj. La prelegistoj estas la plej eminentaj pedagogoj kaj scienculoj: D-ro Bran. Krstiĉ, D-ro med. Mil. Dragiĉ, Mil. Vanliĉ, Miliĉ Rakoviĉ kaj profesoro Drag. Brankoviĉ, kiu gvidas la kurson kiel direktoro.

Estas videble, ke 10 geinstruistoj estas tre malgranda nombro rilate al granda nombro da infanoj, kiuj bezonas specialajn instruadon kaj edukadon. Certe tio estas pro financaj malfacilaĵoj. Ministerio de klerigo ricevas kaj disponas tre malgrandan sumon por tiu celo, ĉar ĝi devas plene salajri la geinstruistojn (aŭskultantojn) kaj pagi honorariojn al la profesoroj-prelegistoj.

Stanko Prvanoviĉ.

## EL LITOVIO

### La litovia lernejo iras malantaŭen

Ĝis anekso ŝtatpotenca fare de faŝistaj elementoj, ekzistis ankoraŭ, kvankam malfortaj, tamen kelkaj rimedoj por efektivigi ian progreseman reformon. Sed nun... vel la reakcia besto, faŝista aparato, nuligis ĉian liberan spiron...

La reakciuloj senhonte ignoras ĉian progreseman venteton. La metodoj en lernejo restis malnovaj, gramatikaj, car-reĝimaj. Kaj ĉiuj babilaĉoj pri neceso de novaj metodoj estas hipokritaj parolaĉoj.

Ne nur lernantoj, sed eĉ instruistoj ne rajtas aliĝi al ia organizo ekster lernejo mem. Sed la fileto de burĝoj povas aliĝi al ia faŝista organizo, ekzemple: tiu de junularpafistoj. En la gimnazioj ekzistas bone organizitaj «senpolitikaj» skoltoj; krom tio ekzistas kaŝaj organizoj de militjunularo «Feraj Lupoj». En la superaj lernejoj ekzistas oficiale faŝistaj ĉeloj.

La liberpensaj kaj progresemaj studentoj estas terure persekutataj kaj oni forpelas ilin el la lernejoj. Inter la lernantoj troviĝas multaj faktoj de spionado, kiel en jezuitaj lernejoj en mezepoko.

La popolaj lernejoj konsistas, kiel kutime, nur el proletidoj ĉar la riĉulidoj lernas plejparte en gimnazioj. Ĉie mankas konstruoj kaj instrumaterialo. Por 100 lernantoj estas ofte nur unu instruisto. Estas ankaŭ ofte, ke en vilaĝoj mankas lernejoj tiel, ke la infanoj estas devigataj piediri 10 km ĝis la plej proksima lernejo.

Se iu instruisto iniciatas aranĝi iel pli progresan instrumanieron, li tuj estas maldungata kaj la lernejkomitato estas tiam transdonata al manoj de «propraj homoj», t. e. faŝistoj. Aliflanke, malgraŭ la leĝo pri deviga instruado, ĉiu infano devas iri la lernejon, sed la leĝo ekzistas nur sur papero!

En vilaĝoj tute ne ekzistas vesperlernejoj, malgraŭ tio, ke tie ili estas treege necesaj; kelkaj troviĝas nur en grandurboj. En Litovio preskaŭ tute malestas fabrikoj, tial la proletoj estas tre malfortaj kaj ne havas proprajn lernejojn. Pro manko de monrimedoj, la vilaĝanidoj ne povas malgraŭ sia deziro viziti la mezlernejojn, tial ili estas devigataj resti en siaj kampaj laboroj — la registaro tute ne helpas.

La katolikaj pastroj havas grandan influon en lernejoj je gepatroj kaj je administracio. Ili bremsas la kleriglaboron, forĵetante la instruistojn, kiuj ne plaĉas al ili. La plej reakciaj estas la novaj, kiuj vizitis dujare la teologian fakultaton. Ili cenzuras la lernejbibliotekojn kaj ĉe ĉiu paŝo kontrolas kaj regas la instruadon. Kompreneble, la protestoj kaj plendoj de la instruistoj estas vanaj.

Jozeforo.

---

## EL NEDERLANDO

### La kristanaj lernejasocioj, kiel ŝirmantoj de militarismo

En la norda parto de Nederlando kuŝas la urbeto «De Lemmer», kie, same kiel en tiu tuta norda parto, ekzistas forta, influriĉa kristana lernejasocio. Deĵoris en la lernejo de tiu asocio iu instruisto: F. Schurer, kiu e k s t e r sia lernejlaboro sinokupis pri: pacifismo, la «Neniam plu milito» movado (rifuzo de militservo). Li i. a. ankaŭ propagandis por la unuiĝo: «Eklezio kaj Paco».

Tiu agado ne plaĉis al la estraro de l' «militema», «kristana» lernejasocio; unue ĝi avertis la infanedukiston, ke li ĉesigu sian pacifistan laboron, poste li devis subskribi «klarigon», kiu entenis i.a. la kondiĉon, ke «povos resti deĵoranta, se li e n kaj e k s t e r la lernejo ne plu propagandos por pacifismo. Li ne lasis sin devigi; sed obeis sian konsciencon. Sekvo... eksigo de l'«sentaŭgulo». Nun li povas perlabori sian panon per prelegoj por la aludita unuiĝo «Eklezio kaj Paco»; kaj ankaŭ restas por li loko en la publikaj ŝtataj lernejoj.

Tiel vere la k r i s t a n a j lernejasocioj montras sian veran kristanan vizaĝon!

Van Essen. (10. 287.)

---

## La pedagogiaj lernejoj en Nov-Zelando

En Nova Zelando estas 1 400 000 loĝantoj, kaj 4 pedagogiaj lernejoj kun 1 250 lernantoj. La profesoroj de la pedagogiaj lernejoj devas havi la ateston de la universitato; tio estas, ke ili devas esti studintaj tie dum minimume 4 jaroj. Oni ankaŭ postulas, ke la profesoro havu sperton, kiel instruisto en la unuagradaj lernejoj (por infanoj 5—14 jaraj).

Estas unika tipo de pedagogia lernejo, principe por instruistoj de l'elementaj lernejoj; sed ĉi-jare oni aranĝas tiel , ke la studentoj povu praktiki ankaŭ en duagradaj lernejoj, se ili tie intencas instrui post la studjaroj. La lernantoj kaj la profesoroj devenas de preskaŭ ĉiuj sociaj klasoj. Estas ĉirkaŭe 40 profesoroj en la pedagogiaj lernejoj.

La pedagogiaj lernejoj estas ŝtataj institutoj sub rekta gvidado de la eduka departamento. La kursoj en ili daŭras 2 aŭ 3 jarojn. Al ĉirkaŭe 50 lernantoj oni permesas resti dum tria jaro.

La instruprogramoj ampleksas: metodoj de instruado, edukada teorio, psikologio, historio, angla literaturo, desegno, kantado, higieno, ĝenerala scienco (tri horojn po semajno). Historio estas tiu de Eŭropo dum la 20-a jarcento. Oni devas studi la anglan historion antaŭ ol eniri la pedagogian lernejon.

La militista instruado ekzistas; ĝi estas tute sama, kiel por ĉiu junulo en la lando. Dum du semajnoj, oni iras al tendaro kaj estas tute sub la gvidado de la militistoj. La laborista partio protestas kontraŭ tiu jara devigo, sed ĝis nun van e

En la pedagogia lernejo, dum duono de la jaro, oni instruas dum 3 tagoj en ĉiu semajno en la apudaj elementaj lernejoj. Estas po 3 aŭ 4 studentoj en klaso kaj la klasa instruist(in)o aranĝas la lecionojn kaj kritikas poste. Speciala profesoro vizitas la lernejojn por rigardi dum la studentoj praktike instruas kaj li kritikas kaj konsilas. Li estas spertega kaj lertega instruisto, kiu cetere lekcias pri instrumetodoj. Estas nenia kontakto kun la produktado ekonomia.

La instrumetodo en la pedagogia lernejo estas jena: la profesoroj lekcias, kiel ĉe la universitato, sed ankaŭ la studentoj devas fari «projektojn» diverstipajn. Ekzemple, oni skribas historian dramon por la infanoj. Instruante pri la metodoj de instruado, la profesoroj havas klason de geknaboj por elmontri la metodojn. Estas kutime tri ekzamenoj ĉiujare en ĉiu temo. Fine oni kalkulas la meznombron de poentoj.

La administrado de la pedagogia lernejo estas sub la rekta kontrolo de la Edukada Fako (ŝtata); la elspezo por ĉiu studento estas 133 sterlingaj funtoj; oni notu, ke la studento ricevas salajron dum lernado (80 s. f.). La fakto, ke la studentoj ricevas salajron, kaŭzas, ke la disciplino estas facile kontrolebla. Ne ekzistas kontakto inter la studentaro kaj la socia vivo kaj ne ekzistas sociutila laboro ekster la lernejo.

La studentoj sukcesas en la fina ekzameno preskaŭ ĉiam, laŭ 99%. Sed oni frue elsendas la studentojn, kiujn la estro opinias netaŭgaj por la instruista laboro. La nomoj de la sukcesintaj studentoj estas enskribataj sur la postenliston de instruistoj kaj ili povas havigi al si postenon laŭ pozicio sur la listo.

La salajro de la komencanta instruisto estas 140 s. f., de la instruistino 135. Sed dum tiu jaro komenca, la instruist(in)o estas sub la speciala gvidado de la lernejestro. Dum la dua jaro, la juna instruisto ricevas 190 s. f. kaj la juninstruistino 170.

La pedagogia instruado estas kunligata kun la ĝenerala ĉefe duagrada instruado. La studentoj, kiuj sukcesis ĉe la ekzameno ĉe duagrada lernejo kutime povas sukcesi ĉe la speciala ekzameno por studentoj enirontaj en la pedagogian lernejon. La preskaŭ sola diferenco inter la universitata ekzameno de la duagrada lernejo kaj tiu por la akcepto en la pedagogian lernejon estas, ke la lasta postulas desegnon sur la nigra tabulo kaj laŭtlegadon. Cetere la programo de la duagrada lernejo (kiu principe preparas al la poruniversitata ekzameno) konsistas el: angla lingvo, matematiko, franca aŭ latina lingvoj, historio, geografio, kemio, hejmscienco, agrikulturo, muziko, desegno, fiziko.

La infanoj eniras la duagradajn lernejojn post okjara lernado en elementa lernejo kaj la studoj en la duagrada lernejo daŭras tri-kvar jaroj. Mi devas aldoni, ke estas ĉe la duagradaj lernejoj ankaŭ specialaj fakkursoj por pedagogia preparo, kiel por komercistoj kaj farmistoj; sed la studentoj tamen devas prepari la unuan universitatan ekzamenon; faka instruo estas nur pliaĵo.

Nuntempe estas en Nova Zelando 340 instruistoj senoficaj. Antaŭ 3 jaroj, la instruistoj laboris dum du jaroj kiel instruistlernantoj antaŭ ol ili eniris la pedagogian lernejon. Oni tiel bezonis 4 jarojn por la preparado. Sed nun ili laboras nur unu jaron antaŭe kaj devas labori unu jaron poste (post la fino de la studoj en la pedagogia lernejo), kiel provinstruistoj. Do fakte, ili nun ankoraŭ preparas dum 4 jaroj; diferenco estas, ke dum la kvara jaro, ili laboras, kiel veraj instruistoj, havas propran klason kaj okupas lokon antaŭe okupita de finlerninta instruisto. Ni protestas, sed la registaro iras sian vojon kaj la juninstruisto devas suferi pro tromulta laboro.

La Novzelanda Edukada Instituto, kiu ampleksas la plejmulton de la instruistaro de la lando celas la plialtigon de la ĝenerala edukada nivelo, sed ne ekzistas institucio eĉ provizora por plialtigi la pedagogian nivelon de la geinstruistaro.

Lasta reformo estas, ke oni aranĝis specialan praktikadon ankaŭ por la studentoj, kiuj celas instruadon en la duagradaj lernejoj. Mi povas diri, ke oni malmulte interesiĝas pri la preparado de la geinstruistoj ĉi tie; ekzemple, la lernejestro de pedagogia lernejo ricevas salajron malpli grandan ol tiu de estro de duagrada lernejo. La ega deziro de la geinstruistoj estas kunligi la instruadon en la pedagogia lernejo kun tiu en la universitato (supergrada lernejo) kaj uzi la pedagogian lernejon nur por la specialaj faktemoj de l'eduka profesio.

C. J. Adcock, Drury, Auckland.

---

## EL SOVETIO

### Malpermeso de infanlaboro sur kamparo

La nombro de laborantoj en agrikultura mastrumado kaj en hejmindustrio en USSR estas ĉiklaŭe tri milionoj da homoj, sed preskaŭ duono konsistas el neplena ĝuloj. Nia laborleĝaro permesas dungi por laboro neplenaĝulojn almenaŭ 16-jarajn, sed nur en esceptaj okazoj — almenaŭ 14-jarajn. La leĝo starigas mallongan labortagon por la junlaboristoj: de 4 ĝis 6 horoj. Supernormaj kaj noktaj laboroj, subteraj kaj malsanigaj laboroj estas malpermesataj por tiuj junlaboristoj.

Krom la norma dusemajna libertempo (jara) por plenaĝuloj, oni donas ankaŭ suplementan dusemajnan libertempon por la laborjunularo. Tion devas nepre plenumi ĉiuj dungintoj. Gravan signifon havas la devigita atesto de kuracisto pri la junlaboristoj.

Tamen kiel escepto al la ĝenerala leĝo, la dungo de malpliaĝuloj en kamplaboroj estas permesata por junuloj ne malpli ol 12-jaraj, nur por plenumo de facilaj laboroj. Ankaŭ estas allasataj supernormaj laboroj dum la rikolto, kondiĉe ke la plilongigita labortago ne superu 10 horojn en la labormastrumoj kaj 8 horojn en mastrumoj de vilaĝburĝoj.

La pago de la kamparlaboro estas permesata tiel per naturaĵo (nemona salajro), kiel per mono; tamen la labormastrumoj (kolektivaj entreprenoj) devas pagi la salajron ĝis duone per produktoj (natura salajro) kaj almenaŭ duone per mono dum la vilaĝburĝaj mastrumoj devas pagi ĝistrione per produktaĵoj kaj almenaŭ du trionojn per mono. Tiaj estas la fundamentaj leĝaj garantioj, kiuj defendas la infanan laboron nuntempe en la soveta kamparo.

G. M. Dubinkin.

Poĉt. Otd. Dolon, Semipalatinsk. okrug USSR.

---

## Proceso de «Unuiĝo por liberigo de Ukrainio»

Nun en Ĥarkovo — ĉefa urbo de Ukrainio — pasas grandega laŭ ĝia signifo politika proceso de «Unu iĝo por liberigo de Ukrainio».

Tiu kontraŭrevolucia, kontraŭsoveta organizo jam ekzistadis kaj laboradis pene por siaj kontraŭsovetaj celoj dum kelkaj jaroj kaj havis siajn radikojn en la plej eminentaj sciencaj kaj pedagogiaj institucioj kaj en rondoj de plej gravaj scienc-politik-ekonomiaj centroj de Ukrainio kiel en urboj: Ĥarkov, Kiev, Odesa kaj aliaj.

En aro de akuzatoj troviĝas akademianoj, profesoroj, verkistoj, pedagogoj, instruistoj, studentoj, eksministroj de burĝa ukrainia eksregistaro, membroj de ukrainia ekssocialdemokrata partio kaj aliaj eminentuloj, sume: 45 akuzatoj.

«Unuiĝo por liberigo de Ukrainio» celis nuligi la sovetan potencon en Ukrainio per ĉiuj rimedoj ĝis fremdlanda perarma interveno kaj teroro kontraŭ sovetiaj partiestroj.

Estas interese, ke ĝi provis estigi «medicinan teroron», t. e. ne kuraci «sovetiajn gvidantojn» aŭ tiel «kuraci», ke la kuracato nepre mortu.

La politika programo de «Unuiĝo por liberigo de Ukrainio» estis: «rekonstrui burĝan potencon, redoni la fabrikojn al eksposedantoj, revenigi la principon de «privata posedaĵo» ĉe kampo, ĉe industrio... Tiu organizo ankaŭ havis kunligon kun rusaj blankgvardianoj elmigrintaj.

La ĉefa akuzato, organizanto kaj gvidanto de ĉi tiu organizo, akademiano Efremov, nun respondas antaŭ proleta juĝistaro. Tiu ĉi proceso kaj la plimultigo de similaj procesoj dum la du lastaj jaroj montras la pliakrigon de klasbatalo en Sovetio, kie nun estas detruataj restaĵoj de kapitalismo.

A. B. Ŝatalov.

---

## Kiel pasis paska tempo en mia lernejo

Dum tuta semajno antaŭ pasko estis preparata senreligia laboro. Dum ĝenerala kunveno de infanoj estis tralegita la tasko pri senreligia laboro ĉe iliaj familioj, farota flanke de l'infanaro mem. Samtempe aperis senreligia murgazeto, kiu estis redaktita de l'infanoj mem.

Sabaton antaŭ pasko, niaj gelernantoj partoprenis ĉe ĝenerala antireligia vespero, kiu konsistis el koncerta parto kaj poste estis prezentita kino. En koncerta parto, niaj gelernantoj prezentis kelkajn kantojn kaj nia orkestro donis kelkajn muzik-numerojn.

Dum unua tago de pasko, ni foriris por planti arbaron proksime de nia lernejo; alia parto ordigis la lernejkorton por someraj sportaj ekzercoj. Alveno de gelernantoj dum la unua tago estis kontentiga kaj nur malmultaj forestis. Dum la dua tago ni plantis en nia legomĝardeno terpomojn. Interesaj okazaĵoj estis en kamparo, ĉar tien alvenis la orkestro kaj kino kaj efektive estis batalo inter eklezio kaj avangardularo, kiu konsistis el junularo kaj el anoj de kolĥozo» (kolektiva bieno).

Necesas diri, ke la infanoj efektive batalas kontraŭ siaj gepatroj, kiuj malpermesas al ili viziti la lernejon dum la paskaj festotagoj, kaj spite ĉio la gelernantoj obeas ĉi tion. La senreligia edukado efektive okupas gravan lokon en nia lernejo.

B. Klimenko.

Trostjanec, Sumsk. okrug. 7-ja ŝkola im. Ŝevĉenko.

---

**Kamaradoj, Edukistoj! antaŭ vi diskutas pri Sovet.Rusio tiom pasie, kiom erare. Vi abonu la „Sovetan Pedagogian Revuon", kiu enhavas plej riĉan informaron pri soveta lernejo. Ilustrita, bonstila, belaspekta, malkosta Jarabono: nur 1/2 dol. ĉe SEU aŭ ĉe: Lerchner, Colmstr. 1 — Leipzig O 27 —**

## Usono, lando kun plej multaj analfabetuloj kaj krimuloj.

Gazeto «Daily Telegraph» publikigis jenan artikoleton:

El statistikoj de l'usona registaro, evidentiĝas, ke Usono estas lando kun plejmulto da analfabetuloj. Post la popolkalkulado en 1920, oni konstatis, ke 5 milionoj da 10-jaraj infanoj kaj $5^1/_2$ milionoj da maturaĝuloj sciis nek legi, nek paroli anglan lingvon. Kiam oni aplikis la konskripcion dum milito, oni konstatis, ke 25% el la rekrutoj estis analfabetaj (La artikolo ne mencias la altan proporcion de analfabetuloj ĉe la nigraj enloĝantoj).

Gazeto «Chicago Tribune» (Pariza Eldono) publikigis jenan artikolon:

Krimeco kostas al Usono proksimume 1300 milionojn da dolaroj ĉiujare t. e. proksimume la sumon de la ŝuldoj de la Milit-kunligitaj Ŝtatoj (al Usono). Preskaŭ 12 000 mortigoj okazas ĉiujare, t. e. 50-oble pli ol en Britio; 30 000 krimuloj libere vivas en Nov-Jorko kaj 10 000 en Ĉikago.

La proporcio de krimeco pliiĝis per 350% depost 1900. Tiam jare estis 2 mortigoj el 100 000 loĝantoj. Nun estas jare 70. Estas nacia honto. La ĉefaj banditoj estas usonaj nacianoj, naskiĝintaj en eksterlando kaj negroj (!).

Pliiĝo de krimeco estas kaŭzata de pliiĝo de riĉeco. La postmilitaj pliriĉiĝoj estis akompanataj ofte de malŝparegoj malsaĝegaj; tio tentigas la mensmalfortulojn. Krimo estas plifaciligata de la nekapteblo ebligata per aŭtomobilo, revolvero, mitralilo, fum-ekrano, aviadilo.

En multaj usonaj urboj, ŝtelistaro kaj policistaro estas kunlaborantaj. La juĝaj formalaĵoj malhelpas la agadon de la tribunaloj kaj igas la krimopunon vera ŝerco.

La gazeto «Daily News» jene komentarias: En 1928 estis en Londono nur 18 mortigoj kaj ĉiam oni trovis la mortigiston. En sama jaro en Nov-Jorko estis pli ol 300 mortigoj kaj oni povis aresti nur 7 el la mortigistoj.

# NIA SAT EDUKISTA SEKCIO

**Tiu rubriko estas gvidata de Sekretario de SAT-edukista sekcio K-do M. BOUBOU, 96 rue Saint-Marceau, Orléans (Francio)**

## NIAJ RILATOJ KUN TAGE


Sur lastaj kajeroj de nia revuo ni difinis nian pozicion en la internacia edukista movado kaj pruvis, ke pro la ekzisto de internaciaj organizoj de avangardaj edukistoj, al kiuj ni apartenas, ni nepre devis apartiĝi de la neŭtrala instruista esperanto - movado. Ĝi ja ne povas organizi samtempe internacian ligadon de proletaj edukistoj kaj paralelan kunligon de ne klaskonsciaj, konfesiaj, religiaj, faŝistaj, eĉ demokrataj aŭ pacifistaj instruistoj.

Ni rediras, ke vole-nevole TAGE kaj IPR (Internacia Pedagogia Revuo) havas politikan vizaĝon, tiun de burĝa aŭ neŭtrala multnuanca pacifismo. Pli kaj pli sian vivon ili ligos kun tiu de la pacifismaj edukistaj organizoj. Cetere tio estas dezirinda por ĝenerala propagando de esperanto, kiu estas nur rimedo kunigi samcelanojn kaj ne celo unuigonta diversopiniantojn.

La pacifismo de la neŭtralaj edukistaj organizoj tute ne kontentigas nin. Malgraŭ la pompaj frazoj de siaj deklaroj kaj rezolucioj, ili estas entuziasmaj apogantoj de la plej ruzaj ŝtatestroj, kiuj en Ĝenevo, Hago aŭ Londono miele parolas pri paco, malarmado, Pan-Eŭropo dum ili enmarigas novajn militŝipojn, febre preparas novan militon, sovaĝe murdas indiĝenojn en Hindio, Indoĉinio kaj aliloke. Je nomo de siaj potencaj imperialismoj, ili volas la pacon per sekurigo de siaj teritorioj, per plifortigo de sia militpotenco per preparo de milito. En Ĝeneva kongreso, dum aŭgusto 1929, la Mondfederacio de Edukistaj Asocioj, kiu estas regata de usonaj burĝaj edukistoj, bele kaj ŝafmiene rezoluciis pri paco per edukado, sed tute silentis pri la sendo de usonaj soldatoj en Nikaragvon kaj en Kubon. En lasta kunveno en Praha, dum aprilo 1930, la FIAI (eŭropa Federacio Internacia de Asocioj Instruistaj) faris unuaniman voĉdonon ĉe rezolucio, kiu kondamnas persekutojn kaj militemon kaj kiu apogas la penadojn de tiuj ŝtatestroj, kiuj «celas iom-post-ioman malarmadon per organizo de sekurigo de siaj propraj landoj»... t. e. per organizo de armado!

Neŭtralan soci-edukan agadon de la neŭtralaj instruistoj ni ne povas partopreni, ĉar tiu pseŭdo-neŭtrala agado estas esence ideologia. Tion dirinte, ni volas rebati kelkajn argumentojn de TAGE kaj precizigi. kian limigitan rilaton ni povas havi kun TAGE.

TAGE kompreneble asertis, 1-e—ke ni ne estas vivkapablaj, 2-e — ke ni volas mortigi TAGE; do, ke ni faras vanan kaj malutilan laboron.




**Strik-lernejo en Burston**

Ĉu estas paradokso aŭ malveraĵo tiu aserto, ke SAT-edukistoj kreis mem aŭ helpis krei neŭtralan TAGE, ke ĝia organo IPR (tute prave) ne malofte aperigas materialon ĉerpitan en TEPS-informilo, Mortigi TAGE'on, ni ne deziras. Estos eble kaj dezirinde, ke la neŭtralaj esperanto-edukistoj prenu sur sin organizadon de tia informservo, kia estas TEPS, por asekuri la artikolan vivon de sia gazeto. Organizo montras laŭ du manieroj, ke ĝi estas vivkapabla: 1—per multa anaro; 2—per interna agado. TAGE nun havas konsiderindan nombron de membroj, sed ĝis nun ĝia interna vivo estas ankoraŭ ne vigla. Tion konstatis d-ro Riedl, redaktoro de IPR, bedaŭrante, ke liaj alvokoj por redakcia kunlaboro restas senehaj. «Ĉu Esperantujo estas lando seneha?» li demandas al membroj de TAGE en numero de januaro 1930. Vero estas, ke la vivkapableco kuŝas flanke de la SAT-edukistoj, kiuj progresis ne laŭ maniero sama, kiel TAGE—laŭ ekstero per membrarnombro (ĉar SAT — edukistoj estas ne sendependa parto de SAT) — sed progresis laŭ interna vivo per organizo de pedagogia servado kaj aplikado de esperanto. Aliflanke la Senn. Ped. Revuo estas vivkapabla, ĉar ĝi apartenas al organizo SAT, la plej potenca esperantista organizo, kies entreprenoj ĉiam sukcesis.

Laborante sur la peresperanta praktika edukista kampo de jam pli ol dek jaroj kaj ankaŭ bone konante la poresperantan organizan laboron, mi povas aserti, ke la timoj de TAGE montras malsagacan pesimismon. Mi opinias, ke apartiĝo de SAT-edukistoj (al kiuj estas ne malpermesate aliĝi al TAGE kaj eĉ estas rekomendate aboni IPR) neniel endanĝerigos vivon de TAGE kaj de IPR, sed kontraŭe ĝi stimu-

los aktivecon de la neŭtraluloj, devigos ilin studi metodojn de interna laboro, organizon de propra pedagogia servo, liveronta la necesan informan materialon kaj plivigligonta la kunlaborajn rilatojn inter membroj. SAT-edukistoj povos nur ĝoji pro la interna laboro de TAGE, ĉar ĝin ili profitos; cetere ili jam grave helpas al tiu peresperanta informado, al kies vojo ili paŝis la unuaj. Ankaŭ ni scias, ke edukado havas teknikan sciencan flankon. Tial informan kaj teknikan kontakton kun TAGE la SAT-edukistoj ĉiam deziros havi. Tia kondiĉa aŭ limigita kunlaboro ĉe l'esperantista geinstruistaro tute respondas al la principo, vortigita de k-do Lanti en «For la Neŭtralismon» kaj «La Laborista Esperantismo» pri kondiĉa kunlaboro je teknika lingva kampo kun la neŭtrala esperanto—movado.

Sur venonta kajero, mi montros per pritrakto de kelkaj organizaj problemoj, kiel kaj kie povas okazi tiu kunlaboro, kiu neniel kontraŭas nian klasbatalan ideologion, sed ebligos meti per esperanto sciencan kaj teknikan informejon je servo de proleta edukado.

Marsel Bubu (Marcel Boubou).

---

**Per Senn. P. R.**

**ni kondukas vin senpere**

**en la internacian bataladon de la mondedukistoj. Abonu kaj kunlaboru!**

## Pola faŝista pedagogia gazeto pri raportoj de SAT-edukistoj

En TEPS—informilo kaj sur unua kajero de «Sennacieca Pedagogia Revuo» aperis artikoloj pri la instruista kaj pedagogia stato en faŝista Polio. Tiuj artikoloj — pere de la germanlingva bulteno de «Edukintern» atingis la pedagogian gazetaron en Polio kaj jen preciza traduko de menciinda noto en la «Revuo Pedagogia» («Przeglad Pedagogiczny»), semajna organo de faŝistemaj intruistoj de mez- kaj alt-lernejoj (№ 2, 18 jan. 1930).

### Bolŝevikoj atakas la polan lernejon

Jen kuŝas antaŭ ni la Numero 20—21—22 (sept—okt—nov. 1929) de «Presse-Bulletin», organo de «Eduklaborista Internacio» en Parizo. Tiu monata organo enhavas raportojn el tutmondo. El Polio, tiu organo aperigis tri mallongajn sciigojn. La unua «Studento Maks Lapone mortigita»: studento de teknika altlernejo (kia—nemenciite) arestita, estis mortigita de policistoj aŭ mortis en ĉelo pro epilepsia atako. La dua, sub titolo: «Polia lernejo edukadas faŝistajn bandojn armitajn», temas tie pri la armadleĝo, religia edukado de l'junularo kaj fine pri kontraŭgasa landdefendo. La tria: «Pastro, Karl Marks kaj forigo el lernejo»: la afero ŝajne okazis en unu el varsoviaj gimnazioj, el kiu lernanto verŝajne estis forigata pro aliĝo al t. n. «ruĝa skolto». Tiuj du lastaj notoj estas aperigataj pere de «Padagogischer Esperanto-Dienst» (TEPS).

Ni ne tro ĉagreniĝu pro tiuj sciigoj, ĉar jen la enhavo de t nibulteno: Aŭstralio — 100 sterlingaj funtoj, kiel monpuno, pro propagando de bulteno; Dancig — 8 monata aresto pro elkrio; Francio: franciaj intsruistoj en malliberejo; Granda Britio — Lerneja striko en Anglio; Kolonioj — Striko de lernantoj en Kalkuto; Latin-Ameriko — 13,3% kripligitaj infanoj pro batoj en Buenos-Aires; USSR — Laboristoj kaj altlernejoj...

Vera «laŭfakta» enhavo... Ni ne havas kaŭzon por ĉagreniĝi...

### Komentario

Tiel la pola gazeto tute ne malkonfirmas, sed ŝajne kuraĝas «ne ĉagreniĝi». Ĝi trankvilas meze de tutmonda lerneja reakcio kaj persekutado kontraŭ instruistoj kaj lernantoj. Ĝi ja ne estas en sola lando, kie okazas tiaj malgravaĵoj. Dementi la skandalojn de la pola lernejo la pola revuo nek kuraĝas, nek povas. Ni klaskonsciaj edukistoj, des pli ne ĉagreniĝu, sed malkaŝu ĉiam la veran aspekton de la burĝa edukado kaj veku batalemon en niaj medioj por nova edukado!

K. Helmont (Sat—ano 10 099).

## Organizo de kolektiva korespondado inter SAT-Edukistoj

Multaj K-doj parolas pri krizo de la peresperanta korespondado. Interne de SAT, interesega materialo estas interŝanĝata koresponde inter diverslandaj K-doj; multa materialo perdiĝas pro nerespondo aŭ malmulte efikas pro tio, ke ĝi atingas nur unu personon.

La SAT — anoj ankaŭ per korespondado povas meti Esperanton je servo de proletaro. Anstataŭ korespondi p r i v a t e, ili organizu rondojn utiligistajn kaj korespondu k o l e k t i v e. Kaj tiu kolektiva korespondaĵo ne restu en la rondo; ĝi estu komunikata al niaj centraj organoj—«Sennaciulo», «Prolet-Servo» ktp., por esti okaze deskonigata al tuta SAT-anaro.

Sur tiu bazo funkcias Tutmonda Esperantista Pedagogia Servo (TEPS). Baldaŭ komenciĝos la kvara jaro de TEPS-Informilo. Senlace ni daŭrigos la komencitan vojon. Ni estas pli kaj pli firme konvinkitaj, ke la celo de Esperanto estas la peresperanta laboro, ke oni lernas Esperanton por apliki ĝin.

TEPS estas modelo de kolektiva korespondado inter samfakanoj pri edukadaj kaj edukistaj demandoj. Ŝi estas bazita sur reciproka informado kaj kunigas centon da ĉiulandaj instruistoj. Sola devo estas sendi ĉiumonate artikolon pri aktuala internacie interesa demando koncerne landan edukadon aŭ edukistaron. Kompense TEPS dissendas senpage, nur al siaj korespondantoj, ĉiumonatan informilon almenaŭ dekdu-paĝan, prezentantan la kolektivan korespondaĵon kaj aldone la Esperanto-resumon de la grava Ĥarkova pedagogia gazeto «Vojo de Klerigo». Kompreneble, ĉiu TEPS ano, konscianta pri la celo de Esperanto kaj la riĉo de la ricevita materialo devas traduki la Esperanto-devenajn dokumentojn kaj penu ilin utiligi por sialandaj instruistaj gazetoj. Esperanto en la manoj de l'edukistoj devas, en nuna epoko, igi ilin la plej kompetentaj informantoj pri ĉiuj internaciaj pedagogiaj kaj instruistaj demandoj. La celo de TEPS estas do prepari instruistajn Esperanto-gazetistojn. La faktoj jam pruvas — ĉe kelkaj instruistaj organoj, kiuj utiligas regule Esperanton por sia informado konkure kun aliaj lingvoj — ke Esperanto estas la teknikrimedo plej universala, plej repida kaj plej malmultekosta.

Aparte petataj estas vi, malproksimaj Esperanto-kolegoj el Nova Kontinento (usonaj, meksikaj, sudamerikaj) kaj el Azio (japanaj, ĉinaj, hindaj, nederland-aziaj). Pri vi, kiuj vivas meze de gravaj politikaj konfliktoj, al kies kaŭzo aŭ rezulto ne estas fremda la malnova Eŭropo, ni speciale interesiĝas. Kunlaboru.

Sin turni al K-do M. Boubou, 96, rue Saint-Marceau, Orleans (Loiret), Francio.

SAT — ano 518



Presejo «Internacia» de Moskva Trusto «Mospoligraf»

57(05)
37

Jaro I. Kajero unua Marto 1930

# SENNACIECA PEDAGOGIA REVUO



Dumonata organo de
SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

ENHAVO:

**Nova pedagogio:** Kieva teatro por infanoj — Eksperimento de brita pedagogo.

**Sur edukista batalfronto:** Socialisma konkurado. — Misinstruo de historio en usona lernejo.

**TEPS:** El Aŭstrio, Britio, Francio, Germanio, Jugoslavio, Latvio, Polio.

**Edukisto kontraŭ pastro:** Hispanaj pastroj murdis Ferrer. — Katolika pastro, Karl Marks kaj ...eksigo el lernejo.

**Por edukistinoj:** Edukistina situacio en tutmondo.— En Britio.—Francaj instruistinoj.—Demandaro.

**Ni, gestudentoj:** Studenta vivo en Japanio.— Latvia universitato.

**Nia SAT-edukista sekcio:** Ni kaj la neŭtraluloj. — Ligo per esperanto.— Angulo de l'interhelpo.

**Nia programo**

**Redakcio:** 14, Avenue de Corbéra, Paris XII (Francio)
**Administracio:** R. Lerchner. Colmstr. 1, Lepzig 027 (Germanio).

# REDAKCIA KOMITATO

**S. FREINET** Iniciatinto de lernej-tekniko "Presarto en lernejo"

**M. STARR** Organizanto de Laboristaj Kolegioj el Britio

**J. ZILBERFARB** Redaktisto ĉe "Vojo de Klerigo" el Ukrainio

**M. BOUBOU** Eks-helpsekretario de l' Eduklaborista Internacio

**H. STAY** (Britio)

**F. JEITLER** (Aŭstrio)

**Ĉio rilatanta la redakcion de l'Revuo estu sendata al la komisiita redaktoro.**
**K-do H. STAY, 18 A Grand Avenue, BOURNEMOUTH (Britio)**

## FRATAN SALUTON

### al avangardaj edukistoj el tutmondo!

Tutmonda kapitalismo, kiu posmilite forte sin organizis, jen ekonomie en internaciaj potencaj trustoj, jen politike en Ligo de Nacioj, nun koncentrigas siajn penojn por organizi sian kontraŭ-kulturan fronton. En lastaj jaroj okazis nekutima multo da kongresoj edukistaj. Kapitalismo disdonis milionojn da dolaroj al iuj edukistaj organizoj, sendis al ties kongresoj siajn plej imponajn ŝtatestrojn kaj ministrojn, siajn plej lertajn moralistojn kaj oratorojn. Al kapitalismo urĝas unuecigi la neklasbatalajn edukistojn por refirmigi la ŝanceliĝantan kredon je Malnovo.

Sed jam de dek jaroj maltime stariĝas avangardaj edukistoj el tutmondo kontraŭ la misedukaj klopodoj de kapitalismo. Pli kaj pli la avangardaj edukistoj konsciiĝas pri sia socia rolo kaj rifuzas «dresi» novajn laborsklavojn por la burĝa klaso. Ĉie kaj ĉiel ili senmaskigas la fi-intencojn de kapitalisma lernejo. Ankaŭ ili sin organizas tutmonde. Ili batalas tutmonde. Ni, esperantistaj avangardaj edukistoj ne staras for de la batalo. Ni, praktikaj sennaciuloj lingve kaj sente kaj opinie unuigataj kunportas al niaj edukistaj klasfratoj plian batalilon, nian «Sennaciecan Pedagogian Revuon», kiu aperas oportune por plifaciligi per uzado de komuna lingvo esperanto la internacian kunligon de l'edukistoj.

Al vi, avangardaj edukistoj el tutmondo, ni sendas nian klasfratan saluton!

Redakcio de «Sennacieca Pedagogia Revuo»

## NIA PROGRAMO

La programo de S. P. R. fidele spegulos la ĵus esprimitan celon. S. P. R. ne estos nur iu interna bulteno pri la propraj aferoj de la SATedukista sekcio. Ĝi celas esti grava kaj utilega gazeto, informonta ankaŭ la neesperantistajn klasbatalajn edukistojn. Ĝi celas esti aplika revuo, kiu metu esperanton je servo de l'tutmonda edukista proletaro.

Komence S. P. R. aperos nur ĉiudumonate. Sed ju pli fortiĝos la organiziteco kaj kreskos la nombro de la SAT-edukistoj, des pli ofta kaj pli multpaĝa fariĝos la gazeto.

Rilate la diversajn tendencojn de l'instrulaborista movado, S. P. R. respektos la unuecigan celadon de SAT, kaj oni ne trovos sur ĝi atakojn kontraŭ iu flanko. S. P. R. estos klaseduka kaj informa, al ĉiuj malfermata. Cenzuro ne estos, krom kontraŭ evidentaj tendencatakoj kaj lingvaj malkorektoj.

Ĉiu SAT-edukisto estas ege petata kunlabori al S. P. R. sur bazo de internacie utiligebla materialo, de vasta servado al ĉiulandaj instrulaboristoj kaj de reciproka helpado pri instruistaj aferoj. Jam estas organizitaj kelkaj rubrikoj-fakoj. El SAT-edukistaro sin prezentu aliaj laboremaj K-doj kompetentaj pri iuj aliaj fakoj por koncentrigi ĉiujn laboremajn K-dojn kompetentajn pri iuj aliaj fakoj por koncentrigi ĉiujn samfakajn penojn kaj liveri al nia gazeto materialon interesan al ĉiuj. La-

rubrikgvidantoj estu kunhelpantoj de nia redaktoro, kiu respondas pri la tuta enhavo de la gazeto, sub kontrolo de la redakcia komitato.

Jen niaj rubrikoj:

1. Nova pedagogio, ĉiam konsiderata samtempe de scienca kaj socia vidpunkto. La proleta pedagogio rigardas la infanon, kiel konstruonton de socialismo kaj elĉerpas el la burĝaj eksperimentoj la esencon aplikeblan al sia morgaŭa lernejo.

2. Sur edukista fronto ankaŭ okazas la socia batalo. Ni diskonigu tra tutmondo la batalojn de l'edukistoj kontraŭ kapitalismo kaj ŝtato sur pedagogia kaj profesia kampoj kaj ankaŭ la penadojn de l'avangarduloj progresigi la lernejon sur vojo prolete socia.

3. Tutmonda Esperantista Pedagogia Servo (TEPS), kiu jam kunigas multajn SAT-edukistojn, raportos pri ĉiaj informoj, dokumentoj, eksperimentoj, strikoj, persekutoj, travivaĵoj, salajroj... pri ĉio koncernanta instruiston, pedagogion kaj lernejon. Per tiu ĉi rubriko, ni organizas la kunlaboradon de ĉiuj legantoj de S. P. R. El ĉiu lando SAT-edukistoj nepre kunlaboru. Eĉ la plej mallongan informon ni publikigos, ĉu sur S. P. R., ĉu sur aparta limografa bulteno.

4. Edukisto kontraŭ pastro. En multaj landoj, edukistoj ankoraŭ nun estas devigataj instrui religion en lernejo kaj eĉ devas suferi ĉeeston aŭ inspekton de pastro. Eĉ en la t. n. laikaj landoj, kapitalismo kaj ŝtato favoras la hipokritajn klopodojn de pastraro kontraŭ la senkonfesia lernejo. Edukistoj, kiuj pretendas sin progresemaj,ankoraŭ akceptas influon de religio sur lernejo kaj tolereman «neŭtralecon» de la lernejo. Kunhelpate de liberpensula SAT-seckio, S. P. R. senmaskigos la pastrojn, edukistojn kaj «neŭtralulojn» el ĉiuj religioj; ĝi helpos purigi la opian atmosferon de lernejo.

5. Por edukistinoj... nia devo estas ankaŭ helpi la plej ekspluatatajn el ni: juninstruistojn kaj instruistinojn . En multaj landoj edukistino ricevas malpli multan salajron, estas kondamnita al senedzeco kaj ne havas voĉdonrajton. S. P. R. petas alsendon de dokumentoj, kiuj helpu liberigi la edukistinojn. Kunhelpate de virina SAT-sekcio, S. P. R. luktos por salajregaleco. Aliflanke, ni laŭte deklaras, ke patrineco estas favora kondiĉo kaj valora rajtigilo por edukadi alies infanojn.

6. Ni, studentoj... rajtas paroli, kiel estontaj edukistoj komence al plej ekspluatataj, kiel nova generacio de edukistaj batalontoj, per kies energio efektiviĝos la kultura socia transformo, kaj ankaŭ kiel nuna jam klaskonscia gelernantaro senpere suferanta de kapitalismo kaj de ties lernejo. SAT-studenta sekcio finorganizu vin kaj kunlaboru: S. P. R. ankaŭ al vi apartenas.

7. En nia SAT-sekcio... ni ne forlasos niajn internajn organizo-problemojn, senĉese penos altiri en niajn vicojn la socialismemajn edukistojn el neŭtrala movado, diskonigos niajn taskojn kaj sukcesojn en edukistaj medioj, koncentrigos la penojn esperanto-aplikajn kaj rezervos angulon por interhelpo.

Certe iam okazos, ke mankos tiu aŭ alia rubriko sur la revuo pro amplekso de l'cetera materialo. Kredeble aliaj rubrikoj aldoniĝos; ekzemple, ŝajnas utilega rubriko pri «instruado de esperanto» por faciligi la taskojn de la laboristaj kursgvidantoj kaj diskonigi la metodo-progresojn en la instruado de fremdaj lingvoj (tio ankaŭ estas organiza problemo, ĉar en tio parte kuŝas plufirmigo de nia movado).

Ĉiuj SAT-entreprenoj ĝis nun plene sukcesis; ankaŭ asukcesos S. P. R. kaj ni povas jam deklari, ke ĝia vivo estas asekurita. Sed ĝia kresko, pliofteco kaj laborientiĝo nun dependas de vi, SAT-edukistoj, edukamikaj SAT-anoj, socialismemaj gekolegoj bedaŭre ankoraŭ ne aliĝintaj al SAT. Vin ĉiujn ni petas pri opinio, kritiko kaj kunlaboro. Sed via plej pozitiva kritiko koncerne tiun ĉi unuan numeron de S. P. R. certe estos via kunlabora artikolo pri temo kaj maniero dezirataj de vi. Ĝis nun vi montriĝis, kiel plej sindonaj gvidantoj de laboristaj esperanto-grupoj kaj esperanto-kursoj. Vi ankaŭ entreprenis vastan, sed privatan, internacian korespondadon. Venis la momento transiri de privata korespondado al kolektiva, per ĝi profitigi la tutan SAT-edukistaron kaj ĉiujn avangardajn organizojn el instrulaboristoj, kies revuoj sopiras niajn informojn.

For la sekreteco de la privata korespondo, kiam temas pri gravaj informoj interesaj al ĉiuj. Via peresperanta servopovo kaj klasbatalemo ne restu, kune kun dokumentriĉaj leteroj de viaj eksterlandaj korespondantoj, kaŝita kaj senutila funde de via tirkesto.

La batalkrion, plendon, postulon, ĉian liberigan penson de la prolet-edukisto ni disvastigu tra tutmondo per nia sennacieca lingvo kaj nia sennacieca pedagogia revuo. SAT-edukistoj, nun vi havas voĉorganon. Parolu kaj agu!

REDAKCIO .

# SENNACIULO

**Sola semajna gazeto laborista en esp-o**

Aperas regule ĉiunumere en amplekso de 12 paĝoj. Bele ilustrita. Krome estas liverata la senpaga monata aldono de la instrua kaj lingvo-progresiga suplemento «La Lernanto»

KUN INTERESAJ ORIGINALAJ RAPORTOJ PRI VIVO KAJ BATALO DE LA LABORISTARO EN LA TUTA MONDO. DISKUTEJO

ĈEFARTIKOLO PRI AKTUALAJ PROBLEMOJ DE POLITIKO, EKONOMIO KAJ SOCIOLOGIO

**SPECIAL-PAĜOJ ĈIUFAKAJ, INFORMSERVO EN ĈIU N-O**

★

Adonkondiĉojn petu ĉe

**ADMINSTREJO DE SAT, LEIPZIG**

Specimeno senpaga

ABONTARIFO DE

## SENNACIECA PEDAGOGIA REVUO

(La unua nombro montras jarabonon por membroj de SAT, la dua en krampoj montras la jarabonon por nemembroj.

**Argentino, pes. 1 [1,5]; Aŭstrio, ŝil. 2 [2,5]; Belgio, belgoj 1,5 [2]; Brazilio, milr. 2,5 [3,5]; Britio, ŝil. 1,5 [2,5]; Bulgario, lev. 50 [75]; Ĉehoshovakio, kr. 10 [12,5]: Danio, kr. 1,5 [2]; Estonio, kr. 1,25 [1,5]; Finlando, mk. 12,5 [15]; Francio, fr. 7,5 [9]; Germanio, mk. 1,5 [2]; Hispanio, pes. 2 (2,5); Hungario, peng. 2 (2,5); Italio, lir. 7,5 (10); Japanio, jen. 1 (1,25); Jugoslavio, din. 20 (22,5); Latvio, lat. 1,5 (2); Litovio, lid. 3 (4); Nederlando, guld. 1 (1,25); Norvegio, kr. 1,5 (2); Polio, zlot. 2,5 (3,5); Portugalio, esk. 6 (7,5); Rumanio, lej. 60 (75); Sovetio, rubl. 0,75 (1); Svedio, kr. 1,5 (2); Svisio, fr. 2 (2,5); Usono, dol. 0,5 (0,75).**

Jaro I. Kajero dua

Majo 1930

# SENNACIECA PEDAGOGIA REVUO



**Dumonata organo de**

**SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA**

ENHAVO:

Redakcia Angulo.

1. **Nova pedagogio:** Pri infanaj konsum-kooperativoj en sovetia lernejaro. Mezuri la intelekton. La soveta pedagogia gazetaro. Radio kaj kino en Usona lernejo.
2. **Sur edukista batalfronto:** Kongreso de la instruista Labor-Ligo. Studa trostreĉo de la francaj gelernantoj. La trabo kaj la pajlero. La eduk-laboristo en Sovetio. Instituto por scienco proleta. Niaj principoj.
3. **Tutmonda Esperanta Pedagogia Servo.** El Blankrusio, Ĉeĥoslovakio, Francio, Germanio, Hispanio, Sovetio, Svisio.
4. **Edukisto kontraŭ pastro:** Scienco kaj religio. Senoficigita! ĉar ne s diablon! (kun bildo). Kiajn rekompencbiletojn uzas la katolikaj privataj lernejoj en Francio. La «vila mano» nigrula sin etendas al franca lernejo. Religio estas bremso por socialismo.
5. **Por edukistinoj:** Situacio de la Saksa Instruistino. Situacio de la Blankrusa Instruistino.
6. **Ni gestudentoj:** Nia lernejo en Saratov. Studentoj, bojkotu militistan instruon!
7. **Nia SAT Sekcio:** Efiko de peresperanta laboro. «La Soveta Pedagogia Revuo». Ĉe F. I. A. I. kaj S. P. I. Ĉe Edukintern. Protesto de la T. L. L. kontraŭ persekutado en Hindio. Grava enketo.

**Redakcio:** 14, Avenue de Corbéra, Paris XII (Francio)
**Administracio:** R. Lerchner. Colmstr. 1, Leipzig 027 (Germanio).

# REDAKCIA KOMITATO

**S. FREINET** Iniciatinto de Iernej-tekniko "Presarto en Iernejo"

**M. STARR** Organizanto de Laboristaj Kolegioj el Britio

**J. ZILBERFARB** Redaktisto ĉe "Vojo de Klerigo" el Ukrainio

**M. BOUBOU** Eks-helpsekretario de l' Eduklaborista Internacio

**H. STAY** (Britio)

**F. JEITLER** (Aŭstrio)

**Ĉio rilatanta la redakcion de l'Revuo estu sendata al al komisiita redaktoro K-do H. STAV, 18 A Grand Avenue, BOURNEMOUTH (Britio)**

## Redakcia Angulo

Jen la dua numero de nia nova «Sennacieca Pedagogia Revuo». Ni jam ricevis kelkajn leterojn rilate al tiu ĉi nova elpaŝo de SAT, kaj ni petas, karaj legantoj, ke vi sendu viajn impresojn, por ke ni povu mezuri la pulsadon de via fervoro. Speciale ankaŭ ni dezirus ricevi la konstantan kunlaboron de diversaj sekcioj en SAT—studenta, liberpensula, k. s.

Unu valora sugesto venis de k-do Sikorski (Orenburg); se nur ĝi sukcesos trovi efektivigantojn. Jen ĝi. «Mi proponas enpresigi en ĉiuj avangardaj instruistaj gazetoj (unuavice, la esp-aj) alvokon kun jena enhavo: «La Redaktoro de «Sennacieca Pedagogia Revuo» turnas sin al ĉiuj esperantistoj edukistoj, dezirantaj aktive helpi en la laboro por diversaj instruistaj unuĝoj, petante ke ili sin anoncu al li. La eventuala laboro: ĉefe informado kaj informperado! Tiam vi scios, kian efikan kaj realan priserveblan aparaton vi disponas, kaj en kiuj lokoj». Li sin anoncas je nia dispono, instigate de la alvoko aperinta en la Edukada Kajero de «La Nova Epoko», nov. 1928, paĝo 38. Kiuj ankoraŭ pretas promesi tuj liveri informon al ni, kiam petite? Cetere, la TEP-Servo jam montris kiom povas realiĝi en tiu ĉi direkto eĉ ne granda aro da aktivuloj!

Apartiĝi de la cetera SAT-anaro la edukistoj ja ne volas. Dank' al SAT vivas nia revuo do, edukistoj, ni ĉiuj nepre SAT-aniĝu.

Ni alvokas denove por la X-a Kongreso de SAT en Londono, kaj invitas al Konferenco de SAT-edukistoj, kiun partoprenos la angla Instruista Labor-Ligo. (Vidu raporton pri Kongreso de tiu Ligo en tiu ĉi numero). Ĉe tiu konferenco oni pritraktos la temojn: «Ŝovinismaj lernolibroj historiaj», kaj «Aktiva metodo en instruado de fremdaj lingvoj kaj de esperanto».

La Redakcio.

**Pro la kaŭzoj teknikaj, de la redakcio sendependaj, la nuna kajero aperas kun malfruo.**

## Grava enketo pri preparado de l'edukistoj en ĉiuj landoj

Legantaj k-doj, vi nepre kaj plej baldaŭ respondu al tiu ĉi alvoko de Eduk-intern. La tuta materialo ricevita estos publikigata sur nia revuo aŭ sur TEPS-informilo. Plenumu la enketon, eĉ se vi ne povos respondi ĉiujn demandojn. Vian respondon ni bezonas plej urĝe. Apliku esperanton. Fariĝu la plej sindonaj kaj plej rapidaj informistoj de la interedukista internacia korespondado. Nepre kaj nepre respondu al:

k-do Marcel Boubou, 96, rue Saint-Marceau, ORLEANS (Loiret) Francio.

1. Nombro da loĝantoj en la lando.
2. Nombro da pedagogiaj lernejoj.
3. Nombro da gelernantoj en pedagogiaj lernejoj diverstipaj.
4. Ĝenerala kaj pedagogia instruiteco de la instruantaj instruistoj.
5. Pri ĉiu tipo de pedagogia lernejo, respondu al jenaj demandoj:

a) nombro da gelernantoj, ilia socia deveno;

b) nombro da profesoroj, ilia socia deveno;

c) grado kaj formoj de aparteno al ŝtato, komunumoj, eklezio, homamaj societoj, ktp.;

ĉ) kioma daŭro de la kursoj;

d) karakterizoj de studplano kaj programoj en la diversaj instrufakoj: sociaj kaj ekonomiaj sciencoj, historio, civitana moralo, ktp.;

e) militista preparo: programo, instruktoroj, nombro de lernantoj partoprenantaj tiun ĉi instruadon, financaj rimedoj;

f) Kiel estas organizata instrulaboro ĉe elementaj praktikaj lernejoj aneksitaj al la pedagogiaj lernejoj kaj ankaŭ la kontakto kun la produktado ekonomia?

g) instrumetodoj;

ĝ) ekzamenoj;

h) buĝeto, elspezoj por unu lernanto;

ĥ) Kiel estas administrata la lernejo (direktoroj aŭ lernejaj konsilantaroj, elektitaj aŭ oficiale nomitaj);

i) kontakto inter lernejo kaj loĝantaro, sociutila laboro ekster la lernejo;

j) memadministro de lernantoj, formoj kaj influo sur funkciado de lernejo;

ĵ) ĉu lernejo plenumas la celojn difinitajn al ĝi?

k) ĉu ekzistas internejoj (internatoj)? iliaj karakterizoj?

l) karakterizoj de interna reĝimo kaj disciplino;

m) procentoj da ekzamensukcesantoj (diplomuloj) ĉe fino de la studoj kompare kun la nombro da lernantoj akceptitaj en la unua jaro;

n) kiujn rajtojn havas la pedagogia studento forlasanta lernejon?

o) salajroj de komencantaj geinstruistoj: — viroj,

6. Laŭ kioma mezuro la pedagogia instruado estas kunligata al ĝenerala kaj profesia instruado (grado de instruiteco postulata por akcepto de kandidatoj al normala lernejo, akcepteblo de tiuj pedagogiaj studentoj al aliaj pli altaj lernejoj); skizu skemon de instruado ĝenerala, profesia kaj pedagogia (en duagradaj kaj superaj lernejoj);
7. Nombro da junaj geinstruistoj sen ofico. Kaŭzoj de senlaboreco; klopodoj kontraŭ senlaboreco de la junaj geinstruistoj.
8. Ĉu ekzistas provizoraj institucioj por la preparado de geinstruistaro oficanta? iliaj celoj, iliaj programoj;
10. Ĉu ekzistas organizoj aŭ institucioj por plialtigi la pedagogian nivelon de la geinstruistaro? (kursoj, pedagogiaj semajnoj, hejmaj studoj, ktp). Karakterizoj de tiuj ĉi institucioj.
11. Kiajn sugestojn oni faras por plibonigi la nunan sistemon de pedagogia instruado? Klarigu la diversajn vidpunktojn pri tiu ĉi problemo en la koncerna lando.
12. Kiuj estas la organizoj el studentoj edukistiĝontaj? kiuj estas iliaj celoj? Karakterizu ilian laboron, ilian de 1926/27, ilian influon sur la studentojn, iliajn rilatojn kun la edukistaj organizoj.
13. Karakterizu la lastajn reformojn pri pedagogia instruado.
14. Donu viajn opiniojn pri la ĝenerala situacio en la pedagogia instruado, difinu la okazintajn modifojn.
15. Bibliografio pri la preparado de la pedagogiaj retoj (edukistaro).

---

# SENNACIULO

**Sola semajna gazeto laborista en esp-o**

Aperas regule ĉiunumere en amplekso de 12 paĝoj. Bele ilustrita. Krome estas liverata la senpaga monata aldono de la instrua kaj lingvo-progresiga suplemento «La Lernanto»

KUN INTERESAJ ORIGINALAJ RAPORTOJ PRI VIVO KAJ BATALO DE LA LABORISTARO EN LA TUTA MONDO. DISKUTEJO

ĈEFARTIKOLO PRI AKTUALAJ PROBLEMOJ DE POLITIKO, EKONOMIO KAJ SOCIOLOGIO

**SPECIAL-PAĜOJ ĈIUFAKAJ, INFORMSERVO EN ĈIU N-O**

★

Adonkondiĉojn petu ĉe

**ADMINSTREJO DE SAT, LEIPZIG**

Specimeno senpaga

ABONTARIFO DE

## SENNACIECA PEDAGOGIA REVUO

(La unua nombro montras jarabonon por membroj de SAT, la dua en krampoj montras la jarabonon por nemembroj.

Argentino, pes. 1 [1,5]; Aŭstrio, ŝil. 2 [2,5]; Belgio, belgoj 1,5 [2]; Brazilio, milr. 2,5 [3,5]; Britio, ŝil. 1,5 [2,5]; Bulgario, lev. 50 [75]; Ĉeĥoslovakio, kr. 10 [12,5]: Danio, kr. 1,5 [2]; Estonio, kr. 1,25 [1,5]; Finlando, mk. 12,5 [15]; Francio, fr 7,5 [9]; Germanio, mk. 1,5 [2]; Hispanio, pes. 2 (2,5); Hungario, peng. 2 (2,5); Italio, lir. 7,5 (10); Japanio, jen. 1 (1,25); Jugoslavio, din. 20 (22,5); Latvio, lat. 1,5 (2); Litovio, lid. 3 (4); Nederlando, guld. 1 (1,25); Norvegio, kr. 1,5 (2); Polio, zlot. 2,5 (3,5); Portugalio, esk. 6 (7,5); Rumanio, lej. 60 (75); Sovetio, rubl. 0,75 (1); Svedio, kr. 1,5 (2); Svisio, fr. 2 (2,5); Usono, dol. 0,5 (0,75).

Jaro I. Kajero kvara Septembro 1930

# SENNACIECA PEDAGOGIA REVUO



Dumonata organo de
SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

ENHAVO:

Redakcia Angulo.

1. **Nova pedagogio:** Laboristklasa edukado.—La porinfana teatro en Dnepropetrovsk. —Ekspozicio de pedagogiaj helpiloj en Praha —La 1-a Konferenco de Moskvaj pedagogoj-esperantistoj
2. **Sur edukista batalfronto:** Kiel realiĝas deviga instruado en Litovio.—Centoj da litovaj geinstruistoj maldungitaj.—
3. **Edukisto kontraŭ pastro:** Instruado de religio estas krimo kontraŭ infanaro.—La anstataŭigo de privataj katolikaj gimnarioj per la ŝtataj —La patro ankaŭ ĉe ni.— Pri religiaj persekutoj kaj soveta edukado
4. **Ni, gestudentoj...** Militistigo kaj mizero de litovaj studentoj.
5. **Tutmonda Esperanta Pedagogia Servo.** El Aŭstrio, Belgio, Ĉeĥoslovakio, Germanio, Japanio, Jugoslavio, Litovio, Nederlando, Novzelando, Sovetio, Usono
6. **Nia SAT-edukista sekcio.** Niaj rilatoj kun TAGE. —Pola faŝista gazeto pri raportoj de SAT-edukistoj.—Organizo de kolektiva korespondado

**Redakcio:** 14, Avenue de Corbéra, Paris XII (Francio)
**Administracio:** R. Lerchner. Colmstr. 1, Leipzig 027 (Germanio).

# REDAKCIA KOMITATO

**S. FREINET**
Iniciatinto de Iernej-tekniko "Presarto en lernejo"

**M. STARR**
Organizanto de Laboristaj Kolegioj el Britio

**J. ZILBERFARB**
Redaktisto ĉe "Vojo de Klerigo" el Ukrainio

**M. BOUBOU**
Eks-helpsekretario de l' Eduklaborista Internacio

**H. STAY**
(Britio)

**F. JEITLER**
(Aŭstrio)


**Ĉio rilatanta la redakcion de l'Revuo estu sendata al la komisiita redaktoro K-do H. STAY, 18 A Grand Avenue, BOURNEMOUTH (Britio)**

## REDAKCIA ANGULO

Trafoliuminte tiun ĉi kajeron, niaj legantoj facile konstatos, ke materialo mankas precipe por la rubrikoj «Por Edukistinoj», «Ni Gestudentoj», kaj «Gepatroj, Infanoj, Geinstruistoj». Ni do trovas la nunan momenton oportuna por rememorigi al niaj legantoj kaj kunlaborantoj, ke «Sennacieca Pedagogia Revuo» estas organo ne nur por edukistoj, sed ankaŭ por liberpensuloj, studentoj kaj gepatroj. Ni samtempe turnas nin denove al la koncernaj sekretarioj kaj gvidantoj de niaj SAT Sekcioj Junulara, Liberpensula, Studenta, kaj al ĉiuj gepatroj, kun insista alvoko, ke ili interrilatiĝu kaj konsiliĝu kun ni, kaj plie, liverigu al ni manuskriptojn taŭgajn por siaj diversaj rubrikoj.

Ankoraŭ unufoje ni volas direkti la atenton de niaj gekamaradoj edukistaj al la interesaj kaj valoraj kajeroj ilustritaj de «Soveta Pedagogia Biblioteko», el kies serio la lasttempe aperintajn numerojn «Pioniroj kaj Lernejo», «Religio kaj Lernejo», «Klerigsistemo en Soveta Ukrainio» ni varme rekomendas al ĉiuj. Por la nuna numero de «Sennacieca Pedagogia Revuo» ni ĉerpis, el la lastcitita, artikolon kaj bildon pri «La Unua Konferenco de Moskvaj Pedagogoj-Esperantistoj», kaj ĉi tie dankas al la Redakcio de «Soveta Pedagogia Revuo» pro ĝia komplezo.

Gek-doj, kiuj deziras aboni tiun revuon, sin turnu al la Redakcio, Moskvo 11, «Dvorec Truda», ĉambro 558, aŭ al K-do M. Boubou, 96 rue Saint-Marceau, Orleans, (Loiret), Francio. La abonprezo por kvin numeroj en Sovetio estas unu rublo, eksterlande duondolaro usona.

La Redakcio

**Pro la kaŭzoj teknikaj, de la redakcio sendependaj, la nuna kajero aperas kun malfruo.**

# SOVETA PEDAGOGIA BIBLIOTEKO

La «Soveta Pedagogia Biblioteko», eldonata de Centra Komitato de la Sindikato de Sovetaj Kleriglaborantoj, aperigas la plej aktualajn artikolojn pri la vivo kaj laboro de la soveta lernejo. Kiun interesas la stato kaj evoluo de la nuntempa soveta pedagogio, kiu deziras havi la aŭtentikajn materialojn pri la solvado de la novaj instruproblemoj en Sovetio, kaj ĝenerale la verajn informojn pri la lando de la konstruata socialismo, tiu nepre devas aboni al «Sov. Ped. Biblioteko» kaj abonigi al ĝi siajn konatajn kolegojn kaj ankaŭ diskonigi ĝin vaste en la pedagogiajn rondojn de sia lando.

**ABONPREZO POR 5 N-ROJ**
**DUONO DA DOLARO USONA**

**Abonejoj:**

1. Soveta Pedagogia Biblioteko, K-do Apletin, k. 558, Dvorec Truda, Solanka 12, Moskvo (USSR).
2. K-do R. Lerchner, Colmstr, 1, Leipzig 027 Germanio.

# SENNACIULO

**Sola semajna gazeto laborista en esp-o**

Aperas regule ĉiunumere en amplekso de 8 paĝoj. Bele ilustrita. Krome estas liverata la senpaga monata aldono de la instrua kaj lingvo-progresiga suplemento «La Lernanto»

KUN INTERESAJ ORIGINALAJ RAPORTOJ PRI VIVO KAJ BATALO DE LA LABORISTARO EN LA TUTA MONDO. DISKUTEJO

ĈEFARTIKOLO PRI AKTUALAJ PROBLEMOJ DE POLITIKO, EKONOMIO KAJ SOCIOLOGIO

**SPECIAL-PAĜOJ ĈIUFAKAJ, INFORMSERVO EN ĈIU N-O**

★

Adonkondiĉojn petu ĉe

**ADMINSTREJO DE SAT, LEIPZIG**

Specimeno senpaga

ABONTARIFO DE

## SENNACIECA PEDAGOGIA REVUO

(La unua nombro montras jarabonon por membroj de SAT, la dua en krampoj montras la jarabonon por nemembroj.

Argentino, pes. 1 [1,5]; Aŭstrio, ŝil. 2 [2,5]; Belgio, belgoj 1,5 [2]; Brazilio, mil. 2,5 [3,5]; Britio, ŝil. 1,5 [2,5]; Bulgario, lev. 50 [75]; Ĉehoslovakio, kr. 10 [12,5]: Danio, kr. 1,5 [2]; Estonio, kr. 1,25 [1,5]; Finlando, mk. 12,5 [15]; Francio, fr 7,5 [9]; Germanio, mk. 1,5 [2]; Hispanio, pes. 2 (2,5); Hungario, peng. 2 (2,5); Italio, lir. 7,5 (10); Japanio, jen. 1 (1,25); Jugoslavio, din. 20 (22,5); Latvio, lat. 1,5 (2); Litovio, lid. 3 (4); Nederlando, guld. 1 (1,25); Norvegio, kr. 1,5 (2); Polio, zlot. 2,5 (3,5); Portugalio, esk. 6 (7,5); Rumanio, lej. 60 (75); Sovetio, rubl. 0,75 (1); Svedio, kr. 1,5 (2); Svisio, fr. 2 (2,5); Usono, dol. 0,5 (0,75).

Jaro I. Kajero tria Julio 1930

# SENNACIECA PEDAGOGIA REVUO



Dumonata organo de
SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

ENHAVO:

Redakcia Angulo.

1. **Nova pedagogio:** Henri Ford — edukisto? Vivreformo kaj popollernejo. Brookwood—la laborista kolegio. La movado por avangardaj lernejoj en Nederlando.
2. **Sur edukista batalfronto:** Laboristaro — edukistaro. Lerneja sistemo kaj Kondiĉoj de instruistoj en Novsud-Kimrujo.
3. **Por edukistinoj:** Situacio de jugoslava instruistino.
4. **Edukisto kontraŭ pastro:** La moderna katolika religiinstruo. Scienco pli potencas!
5. **Gepatroj, infanoj, instruistoj.** Ĉu patrina edukado? Terapio de infektaj malsanoj per sero: A. Difterito. B. Skarlatino. Sanitara lerneja servo en Francio.
6. **Tutmonda Esperanta Pedagogia Servo.** El Aŭstrio, Bulgario, Ĉekoslovakio, Francio, Germanio, Hispanio, Italio, Japanio, Novzelando, Sovetio.

**Redakcio:** 14, Avenue de Corbéra, Paris XII (Francio)
**Administracio:** R. Lerchner. Colmstr. 1, Leipzig 027 (Germanio).

# REDAKCIA KOMITATO

**S. FREINET**
Iniciatinto de Iernej-tekniko "Presarto en lernejo"

**M. STARR**
Organizanto de Laboristaj Kolegioj el Britio

**J. ZILBERFARB**
Redaktisto ĉe "Vojo de Klerigo" el Ukrainio

**M. BOUBOU**
Eks-helpsekretario de l' Eduklaborista Internacio

**H. STAY**
(Britio)

**F. JEITLER**
(Aŭstrio)

**Ĉio rilatanta la redakcion de l'Revuo estu sendata al la komisiita redaktoro K-do H. STAY, 18 A Grand Avenue, BOURNEMOUTH (Britio)**

## NOTO DE LA REDAKTANTO

La plejparto de tiu ĉi kajero estas ĉerpita el la valoraj Informiloj de T. E. P. S., ĉar malmulto estas senpere sendita al la redaktanto. Ni insiste alvokas la gvidantojn de la diversaj rubrikoj, ke ili profitu la spacon, kiu estas je ilia dispono, instigante siajn konatojn kaj membrojn partopreni la sukcesigon de nia komuna gazeto per livero de interesaj, pripensigaj, kaj informoriĉaj artikoloj.

Ni atentigas niajn legantojn, speciale gepatrojn, ke en tiu ĉi numero, laŭ propono de kelkaj K-doj, kiuj bonovole skribis al ni pri la gazeto, ni enkondukas novan rubrikon, «Gepatroj, Infanoj, Instruistoj». Ni esperas, ke ĝi ankaŭ ricevos la aprobon de la ceteraj legantoj, sed ni estas senpovaj en niaj klopodoj vin kontentigi, gekamaradoj, se vi ne sendos al ni konstruemajn kritikojn kaj — artikolojn! Unudu K-doj jam montris sian intereson per sendo de leteroj kaj poŝtkartoj, sed ni bonvenigos multajn pli. Traktado de seksaj temoj kaj de metodoj por instrui esperanton estas proponita, kaj pli da informo pri orientaj landoj estas petita. Ni volonte ricevos tiutemajn artikolojn.

Gekamaradoj, aktiviĝu!

Red.

---

**Pro la kaŭzoj teknikaj, de la redakcio sendependaj, la nuna kajero aperas kun malfruo.**

# SOVETA PEDAGOGIA BIBLIOTEKO

La «Soveta Pedagogia Biblioteko», eldonata de Centra Komitato de la Sindikato de Sovetaj Kleriglaborantoj, aperigas la plej aktualajn artikolojn pri la vivo kaj laboro de la soveta lernejo. Kiun interesas la stato kaj evoluo de la nuntempa soveta pedagogio, kiu deziras havi la aŭtentikajn materialojn pri la solvado de la novaj instruproblemoj en Sovetio, kaj ĝenerale la verajn informojn pri la lando de la konstruata socialismo, tiu nepre devas aboni al «Sov. Ped. Biblioteko» kaj abonigi al ĝi siajn konatajn kolegojn kaj ankaŭ diskonigi ĝin vaste en la pedagogiajn rondojn de sia lando.

**ABONPEZO POR 5 N-ROJ**
**DUONO DA DOLARO USONA**

**Abonejoj:**

1. Soveta Pedagogia Biblioteko, K-do Apletin, k. 558, Dvorec Truda, Solanka 12, Moskvo (USSR).
2. K-do R. Lerchner, Colmstr, 1, Leipzig 027 Ĝermanio.

# SENNACIULO

**Sola semajna gazeto laborista en esp-o**

Aperas regule ĉiunumere en amplekso de 12 paĝoj. Bele ilustrita. Krome estas liverata la senpaga monata aldono de la instrua kaj lingvo-progresiga suplemento «La Lernanto»

KUN INTERESAJ ORIGINALAJ RAPORTOJ PRI VIVO KAJ BATALO DE LA LABORISTARO EN LA TUTA MONDO. DISKUTEJO

ĈEFARTIKOLO PRI AKTUALAJ PROBLEMOJ DE POLITIKO, EKONOMIO KAJ SOCIOLOGIO

**SPECIAL-PAĜOJ ĈIUFAKAJ, INFORMSERVO EN ĈIU N-O**

★

Adonkondiĉojn petu ĉe

**ADMINSTREJO DE SAT, LEIPZIG**

Specimeno senpaga


ABONTARIFO DE

## SENNACIECA PEDAGOGIA REVUO

(La unua nombro montras jarabonon **por membroj de SAT**, la dua en krampoj montras la jarabonon **por nemembroj.**

**Argentino, pes. 1 [1,5]; Aŭstrio, ŝil. 2 [2,5]; Belgio, belgoj 1,5 [2]; Brazilio, mil. 2,5 [3,5]; Bitio, ŝil. 1,5 [2,5]; Bulga io, lev. 50 [75]; Ĉehoshovakio, kr. 10 [12,5]: Danio, kr. 1,5 [2]; Estonio, kr. 1,25 [1,5]; Finlando, mk. 12,5 [15]; Francio, fr 7,5 [9]; Germanio, mk. 1,5 [2]; Hispanio, pes. 2 (2,5); Hungario, peng. 2 (2,5); Italio, lir. 7,5 (10); Japanio, jen. 1 (1,25); Jugoslavio, din. 20 (22,5); Latvio, lat. 1,5 (2); Litovio, lid. 3 (4); Nederlando, guld. 1 (1,25); Norvegio, kr. 1,5 (2); Polio, zlot. 2,5 (3,5); Portugalio, esk. 6 (7,5,; Rumanio, lej. 60 (75); Sovetio, rubl. 0,75 (1); Svedio, kr 1,5 (2); Svisio, fr. 2 (2,5); Usono, dol. 0,5 (0,75).**

12